**Ludoviko Lazaro Zamenhof**

# Proverbaro esperanta arangita laŭ unuopaj vortoj

Prilaboris Antonio De Salvo
2011

**abelo**
kiu havas abelojn, havas mielon

**abelujo**
abelujon ne incitu, amason ne spitu
en abelujon ne blovu

**abismo**
fremda animo estas abismo sen limo

**abomenaĵo**
ĉiu abomenaĵo trovas sian adoranton

**abomeni**
oni perfidon prenas, sed perfidulon abomenas

**absolute**
restis nenio absolute, nek por mordi, nek por gluti

**abunda**
saĝo abunda, sed ne profunda

**abunde**
kiu ripetas abunde, lernas plej funde

**abundo**
fiŝo serĉas profundon, homo serĉas abundon

**acida**
li estas en acida humoro
post dolĉa vino restas acida vinagro

**aĉetanto**
ju pli da aĉetantoj, des pli alta la prezo
se vendisto ne mensogas, li aĉetanton ne allogas
tro alta postulo aĉetanton ne ŝarĝas

**aĉeti**
marĉandado aĉeti ne devigas
marĉando aĉeti ne devigas
mankis al Petro klopodoj, li aĉetis al si domon

**aĉetita**
pli valoras vinagro donacita, ol vino aĉetita

**Adamo**
demeti de si la antikvan Adamon
komenci de Adamo
parenco per Adamo

**adiaŭ**
farita via faro, nun adiaŭ, mia kara!
li diris adiaŭ al la mondo surtera

**admirata**
edzin' admirata - edzo malsata

**admiri**
eĉ monstron admiras, kiu ame deliras
oni maron admiras, se oni maron ne iras

**admona**
vorto sona estas plej admona

**admono**
al malsaĝulo ne helpas admono, nur bastono
kvalito bona ne bezonas admonon
lin tuŝas nek admono, nek ordono
per lerta admono alfluas la mono
uzi monon kaj admonon kaj flaton kaj baton

**adoranto**
ĉiu abomenaĵo trovas sian adoranton

**adori**
kiu mem sin adoras, nenion valoras
vivanton ni malhonoras, mortinton ni adoras

**advokato**
leĝo estas bona, se advokato ĝin helpas
pastro vivas de preĝoj, advokato de leĝoj

**aera**
tute libera, kiel birdo aera

**aero**
aprila vetero - trompa aero
celi anseron, trafi aeron
el aero al tero
ĝi estas ankoraŭ pasero en aero
kastel' en aero - malsato sur tero
konstrui kastelojn en aero
oro estas pli peza ol fero, pli malpeza ol aero

trapafadi la aeron
verŝi aeron al aero

**afabla**
afabla vorto pli atingas ol forto
apud plena manĝotablo ĉiu estas tre afabla
nur pano kun fromaĝo, sed afabla vizaĝo
pli bona estas vorto afabla, ol kuko agrabla

**afable**
kiu agas afable, vivas agrable

**afero**
al la afero!
amikeco aparte, afero aparte
en sia afero ĉiu juĝu libere
estas tubero en la afero
formeti la aferon en la keston de forgeso
fremda mizero - ridinda afero
hoko elsaltis, afero haltis
faru vian aferon, Dio zorgos ceteron
la afero estas plenumita
la afero havas tempon
la afero malsukcesis
la afero ne brulas
la afero ne iras glate
la afero ne staras sur pinto de ponto
la afero ne urĝas
la sama afero, sed kun la kapo al tero
ludo aparte, kaj afero aparte
malnova afero en nova livero
malsaĝulo diris vorteron, saĝulo komprenas la tutan aferon
min ne tuŝas la afero, mi staras ekstere
ne en ĉiu afero estu severa
ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero
ne taŭgas la vero por komerca afero
negocaj aferoj estas severaj
paroloj kaj faroj estas malsamaj aferoj
peli tagojn sen afero de mateno al vespero
per insulto kaj kolero ne klariĝas afero
plena estas la infero de promesitaj aferoj
pri kio estas la afero?
pri propra afero neniu juĝas libere
saĝa tenas aferon, malsaĝa esperon
saltadi ĉirkaŭ afero, kiel blovata neĝero
se la ĉielo falus al tero, birdokaptado estus facila afero
sen ordo en afero ne ekzistas prospero
sen povo kolero estas ridinda afero
tago festa - for aferoj

tro forta ĵuro - la afero ne pura

**agaci**
Dio manĝon donacis, sed la dentoj agacas

**agi**
kiu agas afable, vivas agrable
kiu bone agas, timi ne bezonas
kiu glutis tro multe, tiu agas tro stulte
kiu kritikas kuraĝe, mem agas malsaĝe
pli facile estas regi ol agi
pripensu malrapide kaj agu decide
senkonscie vi agis - konscie vi pagos

**aglido**
ne naskas porko leonidon, nek korniko aglidon

**ago**
drinku tutajn tagojn, sed kontrolu viajn agojn
kia ago, tia pago
kia pago, tia ago
koniĝas birdo laŭ flugo kaj homo laŭ ago
laŭ la agoj de l' homo estas lia nomo
nenia ago fariĝas sen pago
por ĉiu ago venas la tempo de pago
vortojn ŝparu, agojn faru

**agrabla**
agrabla estas gasto, se ne longe li restas
gasto sen avizo estas agrabla surprizo
pli bona estas vorto afabla, ol kuko agrabla
vizaĝo agrabla kaj ungo diabla

**agrable**
kiu agas afable, vivas agrable

**aĝa**
forveturis malsaĝa, revenis nur pli aĝa

**aĝo**
aĝo maljuna ne estas oportuna
aĝo tro matura ne estas plezura
en ĉiu aĝo devas kreski la saĝo
kiam pasis la aĝo, aperas la saĝo
matura aĝo
ne ĉiam per aĝo mezuriĝas la saĝo
oni batas ne la aĝon, sed la vizaĝon

**ajn**
kie ajn rano iras, ĝi ĉiam marĉon sopiras
kien ajn mi pafas, ĉio maltrafas
kiom ajn oni penas, per forto plaĉo ne venas
kiom ajn vi penos, nenio elvenos

**akcelo**
tro rapida akcelo ne kondukas al celo

**akcepti**
kiu akceptas donacon, perdas la pacon
oni akceptas laŭ vizaĝo, oni forlasas laŭ saĝo

**akiri**
kiu amas la liton, ne akiros profiton
kiu kuraĝe aliras, facile akiras
kiu laboras kaj deziras, tiu akiras
kiu malmulte deziras, feliĉon akiras
kiu multon deziras, nenion akiras
kiu ne akiras, kiam li povas, tiu poste deziras, sed jam ne retrovas
kiu tro multe deziras, nenion akiras
pli facile estas perdi vilaĝon, ol akiri domon
pli facile estas vilaĝon perdi, ol domon akiri
rigardi kaj aspiri ne devigas akiri
scion akiru, sed ne ĉion eldiru
tapiŝon ne deziris, maton akiris
tie vi petos, vi tiros, vi nenion akiros

**akiriĝi**
per mezuro kaj peso akiriĝas sukceso

**akirita**
neleĝe akirita ne estas profita
peke akirita ne estas profita

**akirite**
kiel akirite, tiel perdite

**akiro**
akiro kaj perdo rajdas duope
ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro
laboro lacigas, sed akiro ĝojigas
malsaĝulo en foiro estas bona akiro
ne valoras la akiro eĉ la penon de l' deziro
ŝatu amikon laŭ la dato de akiro

**akorde**
kio akorde ne sonas, tio rimon ne donas

**akordo**
ili estas en akordo, kiel peto kaj mordo

**akra**
gasto havas akrajn okulojn
malgranda birdeto, sed akra ungeto
tro akra fajro estas sen daŭro

**akrigi**
sperto saĝon akrigas

**aktoro**
kia sufloro, tia aktoro

**akurate**
ni amu nin frate, sed ni kalkulu akurate

**akvero**
el malgrandaj akveroj fariĝas grandaj riveroj

**akvo**
akvo bolas, murmuras, sed fine ĝi kuras
akvo kaj pano servas al sano
akvo kura - akvo pura
akvo silenta subfosas la bordon
akvo trankvila estas akvo danĝera
akvon senmovan kovras putraĵo
al fiŝ' kuirita jam akvo ne helpos
barakti kiel fiŝo ekster la akvo
brogita eĉ sur akvon blovas
ĉerpi akvon per kribrilo
en akvo malklara oni fiŝkaptas facile
fajron estingas akvo, pekon pardono
ĝi estas akvo al lia muelilo
ĝi tuŝas lin, kiel akvo anseron
kiu akvon evitas, droni ne timas
kurbiĝadi kiel diablo en akvo benita
li pasis akvon kaj fajron kaj marĉojn kaj marojn
volus kato fiŝojn, sed la akvon ĝi timas

**aleno**
sako alenon ne tenas, ĝi baldaŭ elvenas

**alfabeto**
li neniam venkis la alfabeton
li ŝvitas ankoraŭ super la alfabeto

**alflugi**
elmetu mielon, muŝoj alflugos

**alflui**
per lerta admono alfluas la mono

**alglui**
al pec' pecon algluas, kiu neston konstruas

**algluiĝi**
insulto ne algluiĝas

**alia**
alia tempo, aliaj moroj
alia urbo, alia moro
aliaj domoj, aliaj homoj
aliaj tempoj, aliaj moroj
aliajn gvidas kaj mem ne vidas
alian ne mallaŭdu, vin mem ne aplaŭdu
bona estas fremdlando, sed aliaj tie loĝu
ĉiu mezuras aliajn laŭ sia mezurilo
en ĉiu angulo alia postulo
kio al unu donas forton, al alia donas morton
kiu fosas sub alia, falos mem en la foson
li havas ĉiun horon alian moron
ne kondamnu alian, oni vin ne kondamnos
ne moku mizeron de alia, ĉar baldaŭ venos via
por unu - festeno, por alia - ĉagreno
profiton celu, sed aliajn ne pelu
propra opinio ne estas leĝo por alia
se vi povas, profitu, sed aliajn ne incitu
sinjorino kaj sinjoro, unu alian valoras
unu floras, alia ploras
unu orienten, alia okcidenten
unu pasero alian valoras
unu vundo alian kuracas
vundan lokon protektis, alian difektis
zorgu vian metion kaj ne miksu vin en alian
zorgu vivon vian kaj lasu vivi alian

**aliĝi**
se gut' al guto aliĝas, maro fariĝas

**aliloka**
aliloka ĉielo estas sama ĉielo

**aliloke**
kio aliloke promenos, al ni ankaŭ ĝi venos

**alio**
nek io, nek alio

**aliri**
kiu kuraĝe aliras, facile akiras

**alkuri**
ankoraŭ multe vi kuros, ĝis vi alkuros

**alkutimiĝo**
post alkutimiĝo doloras disiĝo

**allogi**
eĉ per dolĉa kuko vi min ne allogos
famo kredon allogas, sed tre ofte mensogas
pli allogas kulero da mielo, ol da vinagro barelo
propra supo brogas, fremda allogas
se vendisto ne mensogas, li aĉetanton ne allogas

**almenaŭ**
se kalumnio ne brulas, ĝi almenaŭ makulas

**almozi**
kiu tro ripozas, baldaŭ almozas

**almozo**
almozoj ne malriĉigas
donado de almozoj neniam malriĉigas

**almozpetanto**
almozpetanto sinĝena restas kun sako malplena

**almozulo**
kiu vivas sen kalkulo, baldaŭ estos almozulo

**alporti**
kion jaroj ne donis, ofte minuto alportas
naskiĝu, edziĝu kaj mortu - ĉiam monon alportu
senlaboreco dormon alportas
tempo kaj cirkonstancoj saĝon alportas
unu hirundo printempon ne alportas

**alportita**
pano estas alportita, korbo estu forĵetita

**alpremi**
alpremi iun al muro

**alsendi**
sorto ofte alsendas, kion oni ne atendas

**alta**
altan arbon batas la fulmo
de rigardo tro alta malsaniĝas okulo
en plej alta mizero al Dio esperu
ju pli da aĉetantoj, des pli alta la prezo
tro alta postulo aĉetanton ne ŝarĝas

**altaro**
bela paro por altaro
li ŝtelas de najbaro, por doni al altaro
ricevi grizan haron, ne vidinte altaron

**alte**
kiu tro alte svingas, nenion atingas
kiu tro alten rigardon direktas, tiu tre baldaŭ okulojn difektas
spiko malplena plej alte sin tenas

**altiri**
ĉiu mano al si altiras
plena kaso ŝteliston altiras
sango komuna reciproke sin altiras

**aludo**
batita komprenas aludon
en ŝerco kaj ludo ofte sidas aludo
por saĝulo sufiĉas aludo

**alvoko**
malfeliĉo venas sen alvoko

**amanta**
por paro amanta ĉiu loketo sufiĉas

**amanto**
eĉ por pomo putranta troviĝas amanto
malamanto de faro estas amanto de kalendaro

**amaso**
abelujon ne incitu, amason ne spitu
al kuko kaj kaso ĉiam venas amaso
amaso da fianĉoj, sed la ĝusta ne venas
amaso da mono kaj titolo de barono
deziri al iu amason da mono kaj titolon de barono
en amaso eĉ morto estas pli gaja
festeno kaj ĉaso kaj da ŝuldoj amaso

kiso antaŭ amaso estas kiso de Judaso
la lastan el amaso atakas la hundo
sidi en amaso da embaraso

**amata**
en ĉeesto amata, en forest' insultata
morgaŭ estas la amata tago de mallaboruloj
ne bela estas amata, sed amata estas bela
se la gasto estas amata, eĉ lia servanto ne restas malsata
tio estas lia amata ĉevaleto

**ambaŭ**
ambaŭ floroj de samaj valoroj
dentoj mordas la langon, tamen ambaŭ sin amas
rigardu per ambaŭ okuloj!

**amboso**
esti inter martelo kaj amboso
pli feliĉa estas martelo insultata, ol amboso kompatata

**ame**
eĉ monstron admiras, kiu ame deliras

**amen**
ameno diablon ne forpelas
certaĵo kaj leĝo, kiel amen en preĝo
se ne estus "se" kaj "tamen", mi al ĉio dirus amen

**ami**
amu Antonon, sed gardu vian monon
amu domon novan kaj amikon malnovan
amu edzinon plej kore, sed tenu ŝin bonmore
dentoj mordas la langon, tamen ambaŭ sin amas
kiu amas ĝuon, amu ankaŭ enuon
kiu amas honoron, amu laboron
kiu amas la liton, ne akiros profiton
kiu amas okulaĉi, ne havas kion maĉi
mono amas kalkulon
ni amu nin frate, sed ni kalkulu akurate
se amas Dio, prosperas ĉio
se oni amas la gaston, oni zorgas la paston
vi amas preni, amu redoni

**amikeco**
amikeco aparte, afero aparte
amikeco aparte, ofico aparte
donacetoj subtenas amikecon
ju pli precizaj la kalkuloj, des pli fortika la amikeco
ne ekzistas en komerco amikeco nek ŝerco

vivi kun iu en intima amikeco

**amiko**
al glacio printempa kaj al amiko tro nova ne fidu
al amiko nova ne fidu sen provo
amiko de amiko estas ankaŭ amiko
amiko en ĝojo kaj malĝojo
amiko en ĝojo kaj ploro
amiko estas kara, sed mi mem estas pli kara
amiko estas kara, sed vero pli kara
amiko fidela estas trezoro plej bela
amiko - intimulo
amikon karesu, sed kalkuli ne forgesu
amikon montras malfeliĉo
amikon ŝatu, malamikon ne batu
amu domon novan kaj amikon malnovan
bona estas domo nova kaj amiko malnova
estinta amiko estas plej danĝera malamiko
estintaj amikoj plej kruele malpacas
gardu min Dio kontraŭ amikoj - kontraŭ malamikoj mi gardos min mem
ju pli da donoj, des pli da amikoj
ne fidu amikon, kiu havas jam flikon
perdiĝas per pruntedono amiko kaj mono
pli bona amiko intima, ol parenco malproksima
pli bona estas saĝa malamiko, ol malsaĝa amiko
por amiko intima ne ekzistas vojo malproksima
por amiko komplezo neniam estas tro peza
pri kio amikoj sekretas, ili vian juĝon ne petas
pro vorta piko ofte perdiĝas amiko
prunto amikon forpelas
sako ne sonas - amiko ne konas
se amiko petas, li neniam ripetas
ŝatu amikon laŭ la dato de akiro
tablo kovrita faras amikojn
unu amiko malnova pli valoras ol du novaj
unu malamiko pli difektas, ol cent amikoj protektas

**amo**
amo estas forta, sed mono pli forta
amo faras ion, mono ĉion
amo kaj ĵaluzo estas gefratoj
amo kaj puno loĝas komune
amo pli kora, disiĝo pli dolora
amo supermezura ne estas plezura
edziĝo pro amo flamanta al la sako sonanta
kiam sako mizeras, amo malaperas
perforta amo estas plej forta malamo
pro amo al la kandelo kato lekas la kandelingon
tuso kaj amo ne estas kaŝeblaj

**anaro**
ne iru al fremda anaro kun via regularo
ne puŝu vian regularon en fremdan anaron

**angle**
france saĝa, angle sovaĝa

**angulo**
ĉiu angulo kun sia sanktulo
en ĉiu angulo alia postulo
en propra angulo ĉiu estas fortulo
en sia angulo li estas bravulo
li estas bravulo en sia angulo

**anĝela**
parolo anĝela, sed penso pri ŝtelo

**anĝelo**
esti anĝelo inter homoj, sed satano en la domo
kalumniante konstante, oni eĉ anĝelon nigrigas
kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas
traflugis anĝelo preter orelo

**animo**
animo al paradizo deziras, sed pekoj retiras
forsavis sian korpon kaj animon
fremda animo estas abismo sen limo
klopodi sen limo per korpo kaj animo
ili vivas per unu animo en du korpoj
lia animo forkuris en la pinton de la piedo

**ankaŭ**
amiko de amiko estas ankaŭ amiko
ankaŭ al ni la suno eklumos
ankaŭ al nia nesto venos iam la festo
ankaŭ diablo tondron suferos
ankaŭ la lupon atingos la sorto
ankaŭ por diablo tondro ekzistas
bone sukcesu, sed ankaŭ nin ne forgesu
buĉas la lupo, oni ankaŭ ĝin buĉos
en via malica regalo vin atendas ankaŭ pokalo
fiŝo scias pri naĝo ankaŭ sen via saĝo
fremdan dorson bastoni - ankaŭ sian doni
kie estas sufero, estas ankaŭ espero
kie lumo ekzistas, ankaŭ ombro troviĝas
kio aliloke promenos, al ni ankaŭ ĝi venos
kio komenciĝis, tio ankaŭ finiĝos
kiu amas ĝuon, amu ankaŭ enuon

kiu aŭdis unuan, ankaŭ aŭdu la duan
kiu multe profitas, ankaŭ perdon ne evitas
lupo kaptas, sed li ankaŭ enfalas
mi ankaŭ lokon sur la tero okupas
ne ĉiam estas festo, venos ankaŭ fasto
pereis ŝafino, pereu ankaŭ la ŝafido
por mia mono mi ankaŭ estas barono
sciu elokventi, sciu ankaŭ silenti
se homoj mankas, infano ankaŭ estas homo
se vi donas mielon, donu ankaŭ kuleron
se vi prenis la violonon, prenu ankaŭ la arĉon
venos knabeto ankaŭ kun peto

**ankoraŭ**
ankoraŭ Dio ne dormas
ankoraŭ la ezoko ne estas sur la hoko
ankoraŭ la gajno ne estas en la mano
ankoraŭ multe vi kuros, ĝis vi alkuros
ankoraŭ neniu evitis la sorton
ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu
ĝi estas ankoraŭ birdo sur la tegmento
ĝi estas ankoraŭ malproksime en la kampo
ĝi estas ankoraŭ pasero en aero
ĝi estas ankoraŭ vortoj de orakolo
ĝi havas ankoraŭ signon de demando
ĝi ne eliris ankoraŭ el malproksima nebulo
ĝi staras ankoraŭ malproksime en la kampo
la manĝota fiŝo estas ankoraŭ en la rivero
la sigelo ankoraŭ ne estas metita
li havas ankoraŭ la lakton sur la lipoj
li havas ankoraŭ printempon en kapo
li ne elrampis ankoraŭ el la vindoj
li ne frapis al si ankoraŭ la kornojn
li ŝvitas ankoraŭ super la alfabeto

**ansero**
celi anseron, trafi aeron
celis paseron, trafis anseron
fordoni anseron, por ricevi paseron
ĝi tuŝas lin, kiel akvo anseron

**anstataŭ**
ne servas larmo anstataŭ armo

**antaŭ**
antaŭ ĉio zorgu oficon, plezuro atendos sian vicon
antaŭ la lango laboru la cerbo
antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon
antaŭ okuloj ne staras, doloron ne faras

antaŭ tima okulo potenciĝas eĉ kulo
antaŭ vespero ne estu fiera
atendu min antaŭ la domo de mia pranepo
danci antaŭ iu sur piedoj kaj manoj
fiereco venas antaŭ la falo
jen staras la bovoj antaŭ la monto!
ĵeti perlojn antaŭ la porkojn
kiso antaŭ amaso estas kiso de Judaso
konsumi sian grenon antaŭ ĝia maturiĝo
krevis la vazo antaŭ la nazo
kuraĝa mieno antaŭ propra kameno
malkovri antaŭ iu sian koron
malproksime vidas, antaŭ la nazo ne vidas
ne diru "hop" antaŭ la salto
ne elverŝu la malpuran, antaŭ ol vi havas la puran
ne iru fadeno antaŭ kudrilo
ne laŭdu la tagon antaŭ vespero
ne punu edzinon antaŭ infanaj okuloj, ne punu infanojn antaŭ fremduloj
ne rapidu kun fido antaŭ longa kunesido
se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo
ne laŭdu la tagon antaŭ vespero

**antaŭa**
konsumi sian antaŭan grason

**antaŭe**
antaŭe intencu kaj poste komencu
antaŭe kion vi devas, poste kion vi volas
danĝera estas bovo antaŭe, ĉevalo malantaŭe, kaj malsaĝulo de ĉiuj flankoj
leĝo valoras por poste, sed ne por antaŭe
malantaŭe mizero, antaŭe malespero
nazo supren, vento antaŭen
por pendigi ŝteliston, antaŭe lin kaptu

**antaŭparolo**
antaŭparolo liberigas de postparolo

**antaŭvidi**
kiu povas antaŭvidi!
uzu tempon estantan, antaŭvidu estontan, memoru estintan

**antikva**
demeti de si la antikvan Adamon

**Antono**
amu Antonon, sed gardu vian monon

**aparta**
al ĉiu sanktulo apartan kandelon
en ĉiu kranio regas aparta opinio

**aparte**
amikeco aparte, afero aparte
amikeco aparte, ofico aparte
ludo aparte, kaj afero aparte
oni ne povas sin movi laŭ ĉiu vento aparte

**aparteni**
al ĉiu konvenas, kio al li apartenas
vorto dirita al la mondo apartenas kaj neniam revenas

**aperi**
aperas prudento, kiam pasis la momento
eĉ el sub la tero aperas la vero
hom' malesperas, Dio aperas
homo esperas - morto aperas
kiam havo malaperis, saĝo aperis
kiam pasis la aĝo, aperas la saĝo
kio post ni aperos, ni de ĝi ne suferos
mi panon ne esperis, subite kuko aperis
ne atendis, ne esperis - malfeliĉo aperis
ne voku diablon, ĉar li povas aperi
tempo toleras, sed vero aperas
virino batas per lango - aperas vundo plej sanga

**apetito**
dum la manĝado venas apetito

**aplaŭdi**
alian ne mallaŭdu, vin mem ne aplaŭdu
Dion laŭdu kaj diablon aplaŭdu
edzo edzinon laŭdas, edzino edzon aplaŭdas
kion Parizo aplaŭdas, Berlino mallaŭdas
kiu mem sin laŭdas, tiun neniu aplaŭdas

**aplaŭdo**
fari aplaŭdon sur la vangon

**apogi**
beleco logas, virto apogas

**apogo**
por vendisto mensogo estas necesa apogo
unu kapo facile trovas apogon

**aprila**
aprila vetero - trompa aero
komenco aprila - trompo facila

**aprilo**
pluvo en aprilo - por la tero utilo

**apro**
tro nutrata kapro fariĝas kiel apro

**apud**
apud plena manĝotablo ĉiu estas tre afabla
apud propra domo ŝtelisto ne ŝtelas

**aranĝi**
ĉiu manĝas, kiel li aranĝas
kiu kaĉon aranĝas, tiu ĝin manĝas
kiu konstante lokon ŝanĝas, neniam sin aranĝas
se Dio ne aranĝos, lupo vin ne manĝos
tago aranĝas, tago ŝanĝas

**aranĝite**
aranĝite, ordigite

**aranĝo**
de lia vivo aranĝo estas trinko kaj manĝo
tro kara aranĝo por malkara tagmanĝo

**arbaro**
arbaro aŭdas, kampo vidas
dancu diabloj, sed ne en mia arbaro
en arbaro sidas kaj arbojn ne vidas
en arbaro sidis kaj arbojn ne vidis
en landoj transmaraj estas oraj arbaroj
kiu timas bestaron, ne iru arbaron
laŭdu belecon de l' maro, sed ĉe rando de arbaro
lupo sopiras, al arbaro sin tiras
ne elvoku lupon el la arbaro
pli bona apude najbaro, ol frato post arbaro
ne serĉu bonan arbaron, serĉu bonan najbaron
nutru lupon plej sate, li ĉiam serĉas arbaron
pro multo da arboj li arbaron ne vidas

**arbo**
altan arbon batas la fulmo
arbo krakanta venton ne timas
el post la arbo li estas bravulo
en arbaro sidas kaj arbojn ne vidas
en arbaro sidis kaj arbojn ne vidis

fleksu arbon dum ĝia juneco
konservas eĉ karbo la strukturon de l' arbo
laŭ la frukto oni arbon ekkonas
ne falas frukto malproksime de l' arbo
pro multo da arboj li arbaron ne vidas
se la arbo falis, ĉiu branĉon derompas
sur arbon kliniĝintan saltas la kaproj

**arĉo**
se vi prenis la violonon, prenu ankaŭ la arĉon

**argila**
ĝi ne estas tiel facila, kiel laboro argila
por pot' argila poto fera estas najbaro danĝera

**argumenti**
batanto povas argumenti, batato devas silenti

**arĝento**
li estas kompetenta, kiel besto pri arĝento
parolo estas arĝento, oron similas silento
vort' en ĝusta momento faras pli ol arĝento

**arĥivo**
formeti en arĥivon

**arko**
fari el iu arkon

**armeo**
du kontraŭ unu prezentas armeon

**armo**
ne servas larmo anstataŭ armo

**arto**
laŭ ĉiuj leĝoj de la arto
vivon travivi estas art' malfacila

**aspekte**
malgranda aspekte, sed granda intelekte

**aspekti**
kio bone aspektas, tion ĉiu elektas

**aspiranto**
ne ĉiu aspiranto devas esti prenanto

**aspiri**
rigardi kaj aspiri ne devigas akiri

**ataki**
atakis lin horo malsaĝa
atakis teruro, ektremis la kruro
falinton ĉiu atakas
frosto lin atakis
la lastan el amaso atakas la hundo
manon malkvietan ĉiu muro atakas
se al hundo mankas nenio, ĝin atakas rabio
ŝipon rompitan ĉiuj ventoj atakas
tremo atakas

**atako**
hako post hako estas la plej efika atako
helpas krako kontraŭ atako

**atendi**
antaŭ ĉio zorgu oficon - plezuro atendos sian vicon
atendi bonan veteron kaj laman kurieron
atendi sur tero, ĝis sekiĝos la rivero
atendis, atendis, ĝis lin ĉerko etendis
atendis, meditis, ĝis en tombon englitis
atendu min antaŭ la domo de mia pranepo
bongusta peco longe ne atendas
bovidon mi atendis, infanon Dio sendis
ĉasaĵo ĉasanton ne atendas
en via malica regalo vin atendas ankaŭ pokalo
fidanta al vorto atendas ĝis morto
li atendas kaj plendas kaj denove atendas
li atendas, ke la okazo venu al lia nazo
malfeliĉo inviton ne atendas
mizero faras viziton, ne atendante inviton
ne atendis, ne esperis - malfeliĉo aperis
ne bedaŭru hieraŭan, ne atendu morgaŭan, ne forlasu hodiaŭan
saĝo barbon ne atendas
se unu ne venis, dek ne atendas
sorto ofte alsendas, kion oni ne atendas
vulpo faras oferon - atendu danĝeron

**atendita**
ne atendita, ne esperita ofte venas subite
neniam atendita ofte venas subite

**atendo**
de atendo kaj espero pereis multaj sur la tero
sen atendo, sen espero venis mizero
tro longa atendo ĝis fino de l' vendo

**atente**
aŭskultas prudente, kiu aŭskultas atente

**atenti**
kiu ne atentas la "se", tiu sentas la "ve"
okulo ne atentas - dorso eksentas
piedo ne atentis, kapo eksentis
se lupo ekpentis, ŝafo atentu
se okulo ne atentas, dorso eksentas
sprita vorto tentas, nenion atentas

**atento**
de legado sen atento ne riĉiĝas la prudento

**atesti**
griza barbo saĝon ne atestas

**atesto**
atesto de matureco
unua atesto estas la vesto

**atingi**
afabla vorto pli atingas ol forto
ankaŭ la lupon atingos la sorto
atingi la vesperon de sia vivo
deziru sincere, vi atingos libere
kiu ŝuldojn estingas, riĉecon atingas
kiu tro alte svingas, nenion atingas
kiu tro forte la manon svingas, nenion atingas
knabon senfortan ĉiuj batoj atingas
kuraĝo ĉion atingas
la morto ne distingas, ĉiujn egale atingas
lango nenion atingas, se ĝin saĝo ne svingas
malsaĝulo ŝtonon ĵetis, dek saĝuloj ĝin ne atingos
ne atingos krio ĝis la trono de Dio
ne moku riveron, ne atinginte la teron
oro nur fingron eksvingas kaj ĉion atingas

**atleto**
en sia dometo li estas atleto

**aŭ**
aŭ ĉio, aŭ nenio
aŭ festene, aŭ malplene
aŭ festo, aŭ fasto
aŭ kuseno sub ripo, aŭ bato per vipo
aŭ ministran postenon, aŭ pundoman katenon
aŭ plej riĉa stato, aŭ plena malsato
senditon oni aŭskultas aŭ ne aŭskultas, sed ne punas nek insultas
trafe aŭ maltrafe
voli aŭ ne voli neniu malpermesas

**aŭdanto**
parolanto semas, aŭdanto rikoltas

**aŭdi**
arbaro aŭdas, kampo vidas
bojas hundido, kiel ĝi aŭdas de hundoj
kie ĵuron vi aŭdas, malbonon suspektu
kiu aŭdis unuan, ankaŭ aŭdu la duan
kiu aŭskultas, kie li ne devas, tiu aŭdas, kion li ne revas
kiu ĉion senpripense parolas, aŭdos tion, kion li ne volas
mi flanke sidis, mi ne aŭdis nek vidis

**aŭdo**
unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj

**aŭskulti**
aŭskultas prudente, kiu aŭskultas atente
aŭskulti kiel ĥinan predikon
kiu aŭskultas, kie li ne devas, tiu aŭdas, kion li ne revas
kiu trans muro aŭskultas, tiun la muro insultas
la luno ne aŭskultas, kiam hundo ĝin insultas
ne aŭskultinte, ne kondamnu
ne rapidu insulti, volu aŭskulti
senditon oni aŭskultas aŭ ne aŭskultas, sed ne punas nek insultas
vi ne kredas, ne aŭskultu, sed min ne insultu

**aŭtuna**
li tremas, kiel aŭtuna folio

**aŭtuno**
printempo semas, aŭtuno rikoltas

**avara**
riĉa preparo, sed povo avara

**avari**
avarulo avaras, heredantoj malŝparas
kiu promesojn faras, tiu ne avaras
patroj avaras, infanoj malŝparas

**avarulo**
avarulo avaras, heredantoj malŝparas
avarulo pagas duoble
malŝparulo ĝuas nelonge, avarulo neniam

**averti**
kiu minacas, tiu avertas

**averto**
ni forgesas averton, ni memoras la sperton
pasero sperta ne bezonas averton
por Paŭlo sperto - por Petro averto
proverbo estas sperto, proverbo estas averto

**avide**
dronanto eĉ herbeton kaptas avide
oni prenas avide, oni redonas malrapide

**avidi**
ju pli oni posedas, des pli oni avidas
kiu avidas pli bonan, perdas plej bezonan
kiu fremdan avidas, propran forperdas
okulo avidas ĉion kion vidas
se okulo ne vidas, koro ne avidas

**avidulo**
donu fingron al avidulo, li tutan manon postulas

**avizo**
gasto sen avizo estas agrabla surprizo

**azenido**
forveturis azenido kaj revenis azeno

**azeno**
azen' al azeno riproĉas malsaĝon
azenon komunan oni batas plej multe
forveturis azenido kaj revenis azeno
kion rajtas leono, ne rajtas azeno
ne volis rajdi sur ĉevalo, ekrajdis sur azeno

**babilado**
ju pli da babilado, des pli da pekado

**babili**
babilas, muelas, kion lango elpelas
ju pli oni babilas, des pli oni al si malutilas
kiu multe babilas, al si mem malutilas
kiu multe babilas, pensas malmulte
pri tio jam ĉiuj paseroj babilas

**babilo**
ĉe tablo malplena babilo ne fluas
ne timu tranĉilon, timu babilon

**bagatela**
pro najleto bagatela pereis ĉevalo plej bela

**bagatelema**
homo bagatelema

**bagatelo**
eĉ bagatelo povas servi al celo

**baki**
nek por baki, nek por haki

**balaaĵo**
balaaĵon el korto eksteren ne elportu

**balai**
nova balailo bone balaas
se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo

**balailo**
nova balailo bone balaas
sidi kiel muso sub balailo

**baldaŭ**
feliĉo vezike sin levas, sed baldaŭ falas kaj krevas
gasto kiel fiŝo baldaŭ fariĝas malfreŝa
imiti grandsinjoron - perdi baldaŭ la oron
kie sklav' regadon havas, tie mastro baldaŭ sklavas
kiu leviĝis fiere, baldaŭ falos al tero
kiu tro alten rigardon direktas, tiu tre baldaŭ okulojn difektas
kiu tro rapide saltas, tiu baldaŭ haltas
kiu tro ripozas, baldaŭ almozas
kiu vivas sen kalkulo, baldaŭ estos almozulo
larmo virina baldaŭ sekiĝas

malbonon oni memori ne ĉesas, bonon oni baldaŭ forgesas
ne moku mizeron de alia, ĉar baldaŭ venos via
sako alenon ne tenas, ĝi baldaŭ elvenas
se muso nur unu truon disponas, ĝi baldaŭ la vivon fordonas
se sako tro pleniĝas, ĝi baldaŭ disŝiriĝas
se vi pri ĉio informiĝos, vi baldaŭ maljuniĝos
sinjoro karesas, sed baldaŭ ĉesas

**balo**
sen regalo ne estas balo

**bandito**
ricevis bandito laŭ sia merito

**banka**
ne ĉiu papereto estas banka bileto

**bano**
forfluu infano kune kun la bano

**barakti**
barakti kiel fiŝo ekster la akvo

**barbo**
barbo elkreskis, sed saĝon ne naskis
barbo potenca, sed kapo sensenca
griza barbo saĝon ne atestas
ĵuri per la barbo de l' Profeto
karesi al iu la barbon
kiu supren kraĉon ĵetas, sian barbon al ĝi submetas
li havas pli da ŝuldoj en la urbo, ol da haroj en la barbo
saĝo barbon ne atendas

**barelo**
barelo malplena sonas plej laŭte
pli allogas kulero da mielo, ol da vinagro barelo
pli helpas guto da feliĉo, ol barelo da saĝo

**bari**
kuraĝe li staras, kiam muro lin baras

**barilo**
malantaŭ barilo kuraĝo estas facila

**baro**
kontraŭ malfeliĉoj baro ne ekzistas
gardu vin du baroj: lipoj kaj dentaroj
pro limoj kaj baroj malpacas najbaroj
tro rapida faro estas nur baro

**barono**
amaso da mono kaj titolo de barono
ĉiu barono havas sian kapricon
deziri al iu amason da mono kaj titolon de barono
peto de barono estas ordono
por mia mono mi ankaŭ estas barono

**bastoni**
fremdan dorson bastoni - ankaŭ sian doni

**bastono**
al hundo bastono - al hom' leciono
al malsaĝulo ne helpas admono, nur bastono
bastono batas, bastono resaltas
de la volo la ordono pli efikas ol bastono
ĵeti bastonon en la radon
kia fripono, tia bastono
kiu bati deziras, trovas bastonon
kiu regalas per ŝtonoj, tiun oni dankas per bastonoj
ne batas bastono sen persono
por malsaĝulo bastono - por saĝulo leciono
por via bono vin regalas bastono
se peko trafas, eĉ bastono ekpafas

**bata**
tro sata, tro bata

**batadi**
batadi kiel fiŝo kontraŭ glacio
batadi la venton

**bataladi**
bataladi kontraŭ la sorto

**batalanto**
brava batalanto kontraŭ plado bolanta

**batali**
kiam fratoj batalas, fremdulo ne eniĝu
kontraŭ kalumnio ne povas batali eĉ Dio
kontraŭ peko batalu, sed pekanton ne tuŝu
ne batalu pot' el tero kontraŭ kaldrono el fero

**batalo**
inter generaloj parolu pri bataloj
post la batalo preĝo ne helpas
post la fino de l' batalo estas multe da kuraĝuloj

**batanto**
batanto povas argumenti, batato devas silenti

**batato**
batanto povas argumenti, batato devas silenti

**batego**
li donas peceton da pano kaj bategon per mano

**bati**
altan arbon batas la fulmo
amikon ŝatu, malamikon ne batu
azenon komunan oni batas plej multe
bastono batas, bastono resaltas
batu malbonulon, li vin flatos - kisu, li vin batos
Dio batas, Dio kompatas
kiu batas edzinon, tiu vundas sin mem
kiu bati deziras, trovas bastonon
kiu hundon mian batas, min mem ne tre ŝatas
malpaculon ĉiu batas
malsaĝulo kiel tamburo - kiu pasas, lin batas
malsaĝulon oni batas eĉ en la preĝejo
ne batas bastono sen persono
ne ĉio batas, kio tondras
oni batas la oron, por provi ĝian valoron
oni batas, malkaresas, kaj eĉ plori ne permesas
oni batas ne la aĝon, sed la vizaĝon
oni batas per vipo, por ke sentu la ripo
per lango flatas, per mano batas
propran vangon neniu batas
se geedzoj sin batas, fremdulo restu flanke
se la sorto vin batas, mokantoj ne mankas
sinjoroj sin batas, servantoj vundojn ricevas
ŝteletiston oni batas, ŝtelegiston oni ŝatas
tempo flatas, tempo batas
venkiton oni ne batas
virino batas per lango - aperas vundo plej sanga
vivo glate ne fluas, ĉiam batas kaj skuas

**batita**
batita komprenas aludon
vojon batitan herbo ne kovras

**bato**
aŭ kuseno sub ripo, aŭ bato per vipo
bato de frato estas sen kompato
bato de patrino ne longe doloras
doni al iu la baton de morto

doni la finofaran baton
esperis flaton - ricevis baton
knabon senfortan ĉiuj batoj atingas
komenci per flato kaj fini per bato
kontraŭ bato senatenda ekzistas nenia defendo
malfeliĉoj kaj batoj venas ĉiam kun fratoj
mi ne volas baton, mi ne volas kompaton
mono fluas al riĉulo, batoj al malriĉulo
pli efike ol bato pelas malsato
saĝa estas la frato post ricevo de l' bato
uzi monon kaj admonon kaj flaton kaj baton

**bazo**
ne ekzistas terno sen nazo nek fakto sen bazo
sur leĝa bazo

**bedaŭri**
kiu ne konfidas, tiu ne bedaŭras
ne bedaŭru hieraŭan, ne atendu morgaŭan, ne forlasu hodiaŭan

**bedaŭro**
bedaŭro kaj ĉagreno ŝuldon ne kovras

**beki**
se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas

**beko**
birdo kantas laŭ sia beko

**bela**
amiko fidela estas trezoro plej bela
bela birdo!
bela celo por fabelo
bela paro por altaro
bela per vizaĝo, sed ne bela per saĝo
bela vizaĝo estas duono da doto
bela vizaĝo, sed ne bela la saĝo
bela per vizaĝo, sed ne bela per saĝo
bela vizaĝo, sed ne bela la saĝo
belaj rakontoj el trans la montoj
eĉ ŝtipo estos bela, se vi ĝin ornamos
ne bela estas amata, sed amata estas bela
ne bela estas kara, sed kara estas bela
pro najleto bagatela pereis ĉevalo plej bela

**beleco**
beleco hodiaŭ estas, morgaŭ ne restas
beleco logas, virto apogas
belecon taksas ne okulo sed koro

laŭdu belecon de l’ maro, sed ĉe rando de arbaro
ne spiciĝas manĝo de mastrina beleco

**beligi**
ne beligas loko homon, sed homo la lokon

**belulo**
nokte eĉ monstro estas belulo

**bena**
horo matena estas horo bena

**benefico**
ne ekzistas ofico sen benefico

**beni**
Dio donis kaj benis, sed diablo forprenis
kiu sian langon katenas, Dio lin benas

**benita**
kurbiĝadi kiel diablo en akvo benita

**beno**
kie estas harmonio, estas beno de Dio
okulo de mastro pli ol beno de pastro
ordo estas beno por ĉiu entrepreno
pli da infanoj, pli da beno

**Berlino**
kion Parizo aplaŭdas, Berlino mallaŭdas

**bestaro**
kiu timas bestaron, ne iru arbaron

**besto**
al bona ĉasisto iras mem la besto
al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto
ĉiu besto zorgas pri sia nesto
li estas kompetenta, kiel besto pri arĝento
ne kotas besto en sia nesto

**bezona**
kiu avidas pli bonan, perdas plej bezonan

**bezone**
ŝparu kiam bone, vi havos kiam bezone

**bezoni**
fremdlando objekton por speso donas, sed por ĝin venigi, oni spesmilon bezonas
granda ŝipo bezonas profundon
honoro ne donas, kion stomako bezonas
ju pli la infanoj bezonas, des pli Dio al vi donas
kion ni vere bezonas, Dio ĝin donas
kiu bone agas, timi ne bezonas
kiu perdis la kapon, ne bezonas jam ĉapon
kiu tro bezonas, tiu leĝon ne konas
kiu volas komerci, tiu saĝon bezonas
konsilojn ĉiu donas, sed ne kiam oni bezonas
kvalito bona ne bezonas admonon
lerteco sorĉon ne bezonas
li dentojn prunti ne bezonas
li kuraĝon kolekti ne bezonas
metio manĝon ne bezonas kaj manĝon tamen donas
ne bezonas la kapo konsilon de kruroj
ne kraĉu en puton, ĉar vi trinki bezonos
ni reciproke nin konas, klarigon ne bezonas
pasero sperta ne bezonas averton
pekon serĉi oni ne bezonas
por glate mensogi, oni spriton bezonas
vero ne bezonas mediti nek spriti

**bezono**
bezono estas plej forta ordono
ĉiu persono kun sia bezono
Dio scias bone pri niaj bezonoj
en puton ne kraĉu, ĉar vi trinki bezonos
ju pli granda bezono, des pli granda la prezo
kara estas dono en minuto de bezono
li havas pli da mono ol da bezono
per bezono venas mono

**Biblio**
en buŝo Biblio, en koro malpio

**bieno**
du sinjoroj en unu bieno, du mastrinoj ĉe unu kameno - neniam vivas sen reciproka malbeno
pro karta preno perdiĝis bieno

**bileto**
ne ĉiu papereto estas banka bileto

**birdeto**
malgranda birdeto, sed akra ungeto

**birdo**
bela birdo!
birdo kantas laŭ sia beko
birdo petolas, kiom ĝi volas
ĝi estas ankoraŭ birdo sur la tegmento
kia la birdo, tia la kaĝo
koniĝas birdo laŭ flugo kaj homo laŭ ago
li loĝas tie, kien eĉ birdo ne flugas
se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas
tute libera, kiel birdo aera

**birdokaptado**
se la ĉielo falus al tero, birdokaptado estus facila afero

**blanka**
eĉ plej nigra bovino donas lakton nur blankan
oni lin konas, kiel blankan lupon

**blanke**
sapo blankecon ne havas, tamen blanke ĝi lavas

**blankeco**
sapo blankecon ne havas, tamen blanke ĝi lavas

**blankigi**
nigran kornikon sapo ne blankigos

**blankiĝi**
de zorgoj, ne de jaroj, blankiĝas la haroj
lavu tutan jaron, negro ne blankiĝos

**blanko**
nigro sur blanko pruvas sen manko

**blinda**
eĉ blinda kokino povas trovi grajnon

**blinde**
mi blinde pafos, eble trafos

**blindulo**
blindulo kartojn ludi ne devas
inter la blinduloj reĝas la strabuloj
ridas blindulo pri lamulo

**blovata**
saltadi ĉirkaŭ afero, kiel blovata neĝero

**blovi**
brogita eĉ sur akvon blovas
el la sama buŝo li blovas varmon kaj malvarmon
en abelujon ne blovu
ne sama la vento blovas konstante
paca silento, ke ne blovas eĉ vento
sama buŝo blovas varmon kaj malvarmon

**bobeno**
ŝiriĝis fadeno sur la bobeno

**bofilo**
ne valoras bofilo, kiam mortis filino

**bojanta**
ne ĉiu hundo bojanta estas hundo mordanta
ne timu hundon bojantan, timu hundon silentan

**bojato**
ne ĉiu bojato estas ŝtelisto

**boji**
bojas hundido, ĉar tiel faras la hundo
bojas hundido, kiel ĝi aŭdas de hundoj
bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno
hundo bojas, homo vojas
hundo bojas la vojon, vento portas la bojon
hundo bojas, pasanto vojas
hundo povas boji eĉ kontraŭ la reĝo
kiu bojas, ne mordas
ne donu kaj ne boju

**bolanta**
brava batalanto kontraŭ plado bolanta
li ekscitiĝas kiel bolanta lakto

**boli**
akvo bolas, murmuras, sed fine ĝi kuras
prenu kiel vi volas, la poto ĉiam bolas
sango bolas, juneco petolas
se vi senfine parolos, de ĝi la poto ne bolos

**bona**
al bona ĉasisto iras mem la besto
atendi bonan veteron kaj laman kurieron
bona estas domo nova kaj amiko malnova
bona estas fremdlando, sed aliaj tie loĝu
bona estas Romo, sed tro malproksima de nia domo
bona famo sin trenas testude, malbona kuras rapide
bona gloro pli valoras ol oro
bona ideo venas post la pereo
bona kaporalo revas esti generalo
bona puno por malbona peno
bona stato saĝigas, malbona malsaĝigas
bona vino al la fino
bonaj infanoj gepatrojn feliĉigas, malbonaj ilin entombigas
bonaj kalkuloj, bonaj kunuloj
de bona vorto lango ne doloras
de malbona ŝafo estas bona eĉ tufo
deziri al iu ĉion bonan
eĉ plej bonan ŝipon malbonigas la ventoj
en bona horo!
en bona ordo tra la pordo!
en la bona malnova tempo
fari al iu bonan lavon
fino bona, ĉio bona
foresto de ofendo estas plej bona defendo
fremda manĝo havas bonan guston
hundo bonrasa estas bona por ĉaso
interkonsento estas pli bona ol mono
iri for en bona hor'
kaŝu malbenon kaj faru bonan mienon
kio estas bona por vi, estas bona por mi
kio mia, tio bona
kiu avidas pli bonan, perdas plej bezonan
kiu havas bonan najbaron, havas bonan tagon
kiu pli frue venas, pli bonan lokon prenas
komenco bona - laboro duona
konscienco trankvila estas bona dormilo
kontenteco estas pli bona ol riĉeco
kontraŭ doloro helpas bona humoro
kvalito bona ne bezonas admonon
la dorm' estas bona, se mankas la mono
leĝo estas bona, se advokato ĝin helpas
lernado havas maldolĉan radikon, sed bonan efikon
malavarulo kaj porko estas bonaj post la morto
malsaĝulo en foiro estas bona akiro
mensoganto devas havi bonan memoron
ne serĉu bonan arbaron, serĉu bonan najbaron
neniom da oro, sed bona gloro

pago de ŝuldanto estas bona en ĉiu kvanto
plej bona gvidilo estas la lango
plej bona kuracisto estas la tempo
plej bona sprito estas silento
pli bona ĉifona vesto, ol riĉeco en malhonesto
pli bona amiko intima, ol parenco malproksima
pli bona apude najbaro, ol frato post arbaro
pli bona branĉo sennuksa, ol kaĝo plej luksa
pli bona estas gajno malgranda, ol granda malgajno
pli bona estas io, ol nenio
pli bona - estas malamiko de bona
pli bona estas malgranda "jen prenu" ol granda "morgaŭ venu"
pli bona estas paco feliĉa, ol havo plej riĉa
pli bona estas saĝa malamiko, ol malsaĝa amiko
pli bona estas virto sen oro, ol oro sen honoro
pli bona estas vorto afabla, ol kuko agrabla
pli bona homo sen mono, ol mono sen homo
pli bona io, ol nenio
pli bona pano sen butero, ol dolĉa kuko sen libero
pli bona pura konscienco, ol malpura potenco
pli bona virto sen oro, ol oro sen honoro
pli valoras paco malbona, ol malpaco plej bona
post dorma trankvilo venas bona konsilo
regna kaso - bona ĉaso
ripetado estas plej bona lernado
rol' de virino - bona mastrino
se ne venas per bona vorto, oni prenas per forto
troviĝas bonaj homoj en la mondo
unu saĝo estas bona, du estas pli bonaj

**bone**
bone kreskas la herbo, sed ĉevalo jam mortis
bone sukcesu, sed ankaŭ nin ne forgesu
bone tiu sidas, al kiu la sorto ridas
Dio scias bone pri niaj bezonoj
eĉ kiu plej bone pafas, tamen iam maltrafas
esti bone enskribita ĉe iu
kio bone aspektas, tion ĉiu elektas
kiu bone agas, timi ne bezonas
kiu bone sidas, tiu lokon ne ŝanĝu
kiu bone ŝmiras, bone veturas
kiu volas mensogi, devas bone memori
kun edzo plej malmola estas pli bone ol sola
malsato plej bone gustigas la manĝon
nova balailo bone balaas
plej bone ridas, kiu laste ridas
pli bone estas enviigi, ol kompatigi
pli bone estas havon fordoni, ol kun homoj malpaci
pli bone estas reiri, ol perdi la vojon

pli bone estas sensale, ol tro sale
pli bone estas ŝviti, ol tremi
pli bone fleksiĝi, ol rompiĝi
pli bone malfrue, ol neniam
pli bone malmulte gajni, ol multe perdi
pli bone ne fari, ol erari
pli bone ne sali, ol sali tro multe
pri lando malproksima estas bone mensogi
ŝparu kiam bone, vi havos kiam bezone

**bonfaro**
bonfaron oni facile forgesas

**bongusta**
bongusta peco longe ne atendas
frukto malpermesita estas plej bongusta

**bongustigi**
por kapti ezokon, bongustigu la hokon

**bonĝua**
scienco havas semon enuan, sed frukton bonĝuan

**bonmore**
amu edzinon plej kore, sed tenu ŝin bonmore

**bono**
bono farita ne estas perdita
bono posedata ne estas ŝatata
ĉia dono estas bono
ĉiu sezono kun sia bono
eĉ plej granda malbono al bono kondukas
en ĉiu malbono estas iom da bono
en nomo de l' ĉielo, sed pro bono de l' felo
fiŝo serĉas dronon, homo serĉas bonon
kiu laboron evitas, bonon ne vidas
malbonon oni memori ne ĉesas, bonon oni baldaŭ forgesas
oni bonon forgesos, malbonon memoras
plej kruela estas redono por farita bono
plibono estas malamiko de bono
por via bono vin regalas bastono
tro da bono ne turmentas

**bonorda**
virino bonorda estas muta kaj surda

**bonrasa**
hundo bonrasa estas bona por ĉaso

**bonstato**
laboro donas bonstaton, mallaboro malsaton

**bonvena**
ĝi estas al li tre bonvena

**bordo**
akvo silenta subfosas la bordon

**bori**
guto malgranda, sed ŝtonon ĝi boras

**botisto**
ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo
tajloro krimis, botisto pendas

**boto**
du botoj faras paron
najbaro ne ĝemas, kiam boto nin premas

**bovido**
bovidon mi atendis, infanon Dio sendis
foriris bovido, revenis bovo
rigardaĉi kiel bovido

**bovino**
eĉ plej nigra bovino donas lakton nur blankan
ne trovante bovinon, oni ŝtelas kokinon

**bovo**
al malriĉulo ovo kiel al riĉulo bovo
bovo prenita, koko donita kaj - kvita
danĝera estas bovo antaŭe, ĉevalo malantaŭe, kaj malsaĝulo de ĉiuj flankoj
de unu bovo oni du felojn ne deŝiras
doni ovon, por ricevi bovon
foriris bovido, revenis bovo
infano ŝtelas ovon, grandaĝulo ŝtelas bovon
jen staras la bovoj antaŭ la monto!
li komprenas predikon, kiel bovo muzikon
melku bovon senfine, li lakton ne donos
nenia peno nek provo donos lakton de bovo
oni ekkonas bovon per la vido kaj malsaĝulon per lia rido
oni vokas la bovon ne festeni, sed treni
pli valoras konkorda ovo, ol malkonkorda bovo
pli valoras tuj ovo, ol poste bovo

**branĉo**
hakilo estas tranĉa, sed ne cedas la branĉo
pli bona branĉo sennuksa, ol kaĝo plej luksa
se la arbo falis, ĉiu branĉon derompas

**brano**
se vi sidos en branoj, vin manĝos la porkoj

**brava**
brava batalanto kontraŭ plado bolanta
brava homo en sia domo

**bravulo**
bravulo kontraŭ muŝo, sed muŝo kontraŭ bravulo
el post la arbo li estas bravulo
en sia angulo li estas bravulo
kontraŭ muŝoj bravulo, kontraŭ homoj timulo
li estas bravulo en sia angulo

**brido**
riĉeco sen gvido kiel ĉevalo sen brido

**briko**
dronanto domon proponas, savito eĉ brikon ne donas

**brilanta**
ne ĉio brilanta estas diamanto

**brili**
ne ĉio utilas, kio brilas

**brogi**
propra supo brogas, fremda allogas

**brogita**
brogita eĉ sur akvon blovas

**brua**
post brua vento subita silento

**brui**
per paroloj li bruas, tutan urbon detruas
ŝuldo ne bruas, tamen dormon detruas

**bruli**
kurba estas la ligno, sed rekte ĝi brulas
la afero ne brulas
se brulas nenio, fumo ne iras

se kalumnio ne brulas, ĝi almenaŭ makulas
sen fajro ne brulas eĉ pajlo
sur la ŝtelisto brulas la ĉapo

**bruligi**
bruligi al si la lipharojn
li bruligis al si la lipharojn
ne estingu la fajron, kiu vin ne bruligas
riĉulo kiel fajro proksime bruligas, malproksime ne varmigas

**brulo**
ne ekzistas fumo sen brulo

**bruo**
bruo potenca, nula esenco
ju pli da bruo, des malpli da ĝuo
li vivas en ĝuo kaj bruo
nenia konstruo povas esti sen bruo
pli da bruo, ol da faro

**brusto**
dorloti serpenton sur sia brusto
en ĉiu brusto estas sia gusto
gast' en tempo malĝusta estas ŝtono sur brusto
vivi kiel ĉe la brusto de Dio

**buĉi**
buĉas la lupo, oni ankaŭ ĝin buĉos
virina lango buĉas sen sango

**buŝeto**
rostita kolombeto ne flugas al buŝeto

**buŝo**
al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras
al la buŝo de "oni" neniu povas ordoni
de la buŝo ĝis la manoj estas granda interspaco
Dio donis buŝon, Dio donos manĝon
eĉ malgranda muŝo ne estas sen buŝo
el la buŝ' multaj vortoj eliras, sed ne ĉiuj ion diras
el la poŝo al la buŝo
el la sama buŝo li blovas varmon kaj malvarmon
en buŝo Biblio, en koro malpio
fluis sur lipoj, sed en buŝon ne trafis
ĝi iris al li preter la buŝon
inter la mano ĝis la buŝo ofte disverŝiĝas la supo
koro tro plena - buŝo parolas
kovri la buŝon de sia konscienco
la lipoj ne montru, kion manĝis la buŝo

li ne enlasas puŝon en sian buŝon
ne movi la buŝon!
ofte kantas la buŝo, kiam ploras la koro
ofte mano forgesas, kion buŝo promesas
pano buŝon ne serĉas
proksima kubuto, sed ne por la buŝo
sama buŝo blovas varmon kaj malvarmon
se io venas al buŝo, buŝon ne fermu
teni sian langon en la buŝo

**butero**
instruas mizero manĝi panon sen butero
pli bona pano sen butero, ol dolĉa kuko sen libero
vivi kiel kuko en butero

**butonumi**
butonumi iun malvaste

**cedema**
leĝo estas cedema: kien vi deziras, ĝi iras

**cedi**
al tiu ĉio cedas, kiu monon posedas
feliĉon oni ne heredas nek cedas
hakilo estas tranĉa, sed ne cedas la branĉo
kiu cedas al sia infano, ĝin pereigas per propra mano

**cele**
ŝerce dirite, cele pensite

**celi**
celi anseron, trafi aeron
celis paseron, trafis anseron
oni lekas la manon, sed celas la panon
profiton celu, sed aliajn ne pelu

**celo**
bela celo por fabelo
eĉ bagatelo povas servi al celo
kiu havas malican celon, ofte perdas sian propran felon
kiu rigardas ĉielon, maltrafas sian celon
mortinta serĉu ĉielon, vivanta ian celon
nek al temo, nek al celo
okupi sen celo lokon sub ĉielo
tro rapida akcelo ne kondukas al celo
trafi du celojn per unu ŝtono

**cent**
cent jarojn silentis kaj subite sin prezentis
unu malamiko pli difektas, ol cent amikoj protektas

**cento**
kolera kiel cento da diabloj

**cerbo**
antaŭ la lango laboru la cerbo
eĉ en Parizo herbo ne fariĝas cerbo
ju cerbo pli prudenta, des lango pli silenta
kapo kun herbo, sen guto da cerbo
kapo majesta, sed cerbo modesta
li havas cerbon ne tro potencan
li havas en la cerbo tro multe da herbo
lia cerbo iris promeni
montras parolo, kion cerbo valoras
ricevi muŝon en la cerbon
venas proverbo el popola la cerbo

**certa**
plej certa laboro - laboro per oro

**certaĵo**
certaĵo kaj leĝo, kiel amen en preĝo

**certe**
certe, kiel duoble du kvar
ju pli frue, des pli certe - ju pli volonte, des pli lerte
kiu iras sperte, iras certe

**certeco**
pli da okuloj, pli da certeco

**certigi**
disputo kredigas, sed ne certigas

**cetero**
faru vian aferon, Dio zorgos ceteron

**cindro**
paco al lia cindro!

**cirkonstanco**
raporti pri ĉiuj cirkonstancoj kaj nuancoj
tempo kaj cirkonstancoj saĝon alportas

**ĉagreno**
bedaŭro kaj ĉagreno ŝuldon ne kovras
por unu - festeno, por alia - ĉagreno
rusto manĝas feron, ĉagreno la koron
venas ĉagreno sen granda peno

**ĉampano**
riĉa zorgas pri ĉampano, malriĉa pri pano

**ĉapo**
estu ĉapo laŭ la kapo
kia la kapo, tia la ĉapo
kiu perdis la kapon, ne bezonas jam ĉapon
ofte ĉapo de kampulo kovras kapon de saĝulo
pli kara estas kapo ol ĉapo
sur la ŝtelisto brulas la ĉapo

**ĉar**
bojas hundido, ĉar tiel faras la hundo
en puton ne kraĉu, ĉar vi trinki bezonos
ne kraĉu en puton, ĉar vi trinki bezonos
ne moku mizeron de alia, ĉar baldaŭ venos via
ne voku diablon, ĉar li povas aperi
okazon kaptu ĉe l' kapo, ĉar la vosto estas glita
ŝiru rozojn en somero, ĉar en vintro ili ne estas
ŝiru rozojn en somero, ĉar en vintro ili ne estos
ŝtelisto ŝteliston evitas, ĉar li tie ne profitas

**ĉarma**
al ĉiu sia propra estas ĉarma kaj kara
al loko dolora ni manon etendas - al loko ĉarma okulojn ni sendas
ĉio sia estas plej ĉarma
ĉio transmara estas ĉarma kaj kara

**ĉarme**
ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme

**ĉasaĵo**
ĉasaĵo ĉasanton ne atendas

**ĉasanto**
ĉasaĵo ĉasanton ne atendas

**ĉasi**
kiu ĉasas du leporojn, kaptas neniun
ne unu fajron li pasis, ne unu hundo lin ĉasis

**ĉasisto**
al bona ĉasisto iras mem la besto
komercisto estas ĉasisto, li rigardas, kiu sin ne gardas

**ĉaso**
festeno kaj ĉaso kaj da ŝuldoj amaso
hundo bonrasa estas bona por ĉaso
regna kaso - bona ĉaso
dormus leporo, se ĝi ĉason ne timus

**ĉe**
okazon kaptu ĉe l' kapo, ĉar la vosto estas glita

**ĉeesto**
en ĉeesto amata, en forest' insultata

**ĉefa**
havi la ĉefan voĉon

**ĉelo**
li havas nek ĉelon, nek kelon

**ĉemizo**
pli valoras propra ĉemizo, ol fremda plena valizo

**ĉerko**
atendis, atendis, ĝis lin ĉerko etendis

**ĉerpi**
ĉerpi akvon per kribrilo
el malplena telero vane ĉerpas kulero
longe ĉerpas la kruĉo, ĝis ĝi fine rompiĝas

**ĉesi**
ĉesis esti vino, sed vinagro ne fariĝis
danĝero sieĝas, al Dio ni preĝas - danĝero ĉesas, ni Dion forgesas
kion leĝo malpermesas, tio plaĉi ne ĉesas
kriu eĉ raŭke, sed kanti ne ĉesu
malbonon oni memori ne ĉesas, bonon oni baldaŭ forgesas
oni faris, oni ĉesis, kaj ni ĉion forgesis
sinjoro karesas, sed baldaŭ ĉesas
vivu, progresu, sed lerni ne ĉesu

**ĉeso**
kelktempa ĉeso ne estas forgeso
komenciĝis proceso, mono fluas sen ĉeso

**ĉevala**
pli tiras virina haro, ol ĉevala paro

**ĉevaleto**
tio estas lia amata ĉevaleto

**ĉevalo**
al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras
bone kreskas la herbo, sed ĉevalo jam mortis
danĝera estas bovo antaŭe, ĉevalo malantaŭe, kaj malsaĝulo de ĉiuj flankoj
eĉ kvar piedoj de ĉevalo ĝin ne savas de falo
ne mia estas la ĉevalo, min ne tuŝas ĝia falo
ne volis rajdi sur ĉevalo, ekrajdis sur azeno
pro najleto bagatela pereis ĉevalo plej bela
rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo
riĉeco sen gvido kiel ĉevalo sen brido
selante ĉevalon, oni ĝin karesas
sur ĉeval' de najbaro la ŝarĝo ne pezas

**ĉia**
ĉia dono estas bono

**ĉiam**
al kuko kaj kaso ĉiam venas amaso
al sklavo mon' ne estas savo, li ĉiam restas sklavo
ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo
diablo ne ĉiam unu pordon sieĝas
en unu sako du katoj, ĉiam mordoj kaj gratoj
fianĉiĝis - por ĉiam ligiĝis
kie ajn rano iras, ĝi ĉiam marĉon sopiras
kiu forton ne havas, ĉiam malpravas
la forestanto ĉiam estas malprava
la tempo ĉiam malkaŝas la veron
malfeliĉoj kaj batoj venas ĉiam kun fratoj
mordantaj hundoj kuras ĉiam kun vundoj
muso la katon ĉiam ofendis
naskiĝu, edziĝu kaj mortu - ĉiam monon alportu
ne ĉiam daŭras malbona vetero, ne ĉiam daŭras homa sufero
ne ĉiam estas festo, venos ankaŭ fasto
ne ĉiam estas sankta Johano
ne ĉiam per aĝo mezuriĝas la saĝo
nin ĉiam ravas, kion ni ne havas
nutru lupon plej sate, li ĉiam serĉas arbaron
plej kuirita kampulo ĉiam restos krudulo
prenu kiel vi volas, la poto ĉiam bolas
pronomoj "mia" "min" kaj "mi" en mondo reĝas ĉiam tri
se kalumnio eĉ pasas, ĝi ĉiam ion lasas
unu fojon ŝtelis pomon kaj perdis por ĉiam honestan nomon

unufoje ŝtelinta restas ĉiam ŝtelisto
vivo glate ne fluas, ĉiam batas kaj skuas

**ĉie**
ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme
kien vi vin turnos, ĉie malbone
kion mem mi faras, tion ĉie mi flaras
kun Dio vi iros ĉien, sen Dio nenien
malsaĝulo ĉie sian nomon skribas
nenie semata, ĉie trovata

**ĉiela**
edzo kaj edzino - ĉiela difino

**ĉielo**
aliloka ĉielo estas sama ĉielo
el klara ĉielo tondro ekbatis
en nomo de l' ĉielo, sed pro bono de l' felo
kiu rigardas ĉielon, maltrafas sian celon
mortinta serĉu ĉielon, vivanta ian celon
ne gutas mielo el la ĉielo
okupi sen celo lokon sub ĉielo
pura ĉielo fulmon ne timas
se la ĉielo falus al tero, birdokaptado estus facila afero

**ĉies**
klopodi pri ĉies favoro estas pleje malsaĝa laboro

**ĉifona**
pli bona ĉifona vesto, ol riĉeco en malhonesto

**ĉio**
amo faras ion, mono ĉion
ĉio dependas de "se" kaj "kiam"
ĉio estas por li kiel polvero sur la tero
ĉio havas finon
ĉio havas sian "sed" kaj "se"
ĉio sia estas plej ĉarma
ĉio supermezura estas terura
ĉio taŭgas, kio venas
ĉio transmara estas ĉarma kaj kara
ĉion novan oni ŝatas, malnovan oni forbatas
ĉion rigardi tra sia persona vitro
deziri al iu ĉion bonan
disputu pri ĉio, sed sen garantio
du manoj faras ĉion, sed unu nenion
fino bona, ĉio bona
kapo estas por tio, ke ĝi zorgu pri ĉio
kien ajn mi pafas, ĉio maltrafas

kio servas por ĉio, taŭgas por nenio
kiu ĉion formanĝis en tago, malsatos vespere
kiu ĉion senpripense parolas, aŭdos tion, kion li ne volas
kiu kutimis ĉion juĝi, nenie povas rifuĝi
kiun feliĉo subtenas, al tiu mem ĉio venas
kiun la sorto karesas, al tiu ĉio sukcesas
kuraĝo ĉion atingas
la tempo venos, ni ĉion komprenos
mono perdita, nenio perdita, honoro perdita, ĉio perdita
montru moneron, ĉio fariĝos
ne ĉio batas, kio tondras
ne ĉio brilanta estas diamanto
ne ĉio griza estas lupo
ne ĉio utilas, kio brilas
ne ĉion oni devas severe ekzameni
okulo avidas ĉion kion vidas
oni faris, oni ĉesis, kaj ni ĉion forgesis
ora ŝlosilo ĉion malfermas
oro nur fingron eksvingas kaj ĉion atingas
per vorto ĝentila ĉio estas facila
rakonti ĉion faritan kaj kaŝitan
saĝulo scias ion, sed neniu scias ĉion
scion akiru, sed ne ĉion eldiru
se amas Dio, prosperas ĉio
se ne estus "se" kaj "tamen", mi al ĉio dirus amen
se vi krudulon iom karesos, li al si ĉion permesos
se vi pri ĉio informiĝos, vi baldaŭ maljuniĝos
simio al simio plaĉas pli ol ĉio
al tiu ĉio cedas, kiu monon posedas
antaŭ ĉio zorgu oficon, plezuro atendos sian vicon
aŭ ĉio, aŭ nenio

**ĉirkaŭ**
ĉirkaŭ sanktuloj diabloj vagas
danci kiel kato ĉirkaŭ poto
saltadi ĉirkaŭ afero, kiel blovata neĝero

**ĉirkaŭflatadi**
ĉirkaŭflatadi kaj ĉirkaŭflirtadi iun

**ĉirkaŭflirtadi**
ĉirkaŭflatadi kaj ĉirkaŭflirtadi iun

**ĉiu**
al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto
al ĉiu frato lian parton
al ĉiu konvenas, kio al li apartenas
al ĉiu sanktulo apartan kandelon
al ĉiu sia propra estas ĉarma kaj kara

al ĉiu sinjoro estu lia honoro
ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu
apud plena manĝotablo ĉiu estas tre afabla
ĉiu abomenaĵo trovas sian adoranton
ĉiu angulo kun sia sanktulo
ĉiu barono havas sian kapricon
ĉiu besto zorgas pri sia nesto
ĉiu eraro estas kulpo
ĉiu estis junulo, ĉiu estis pekulo
ĉiu familio havas sian kriplulon
ĉiu havas sian guston
ĉiu havas sian kaŝitan mizeron
ĉiu havas sian propran guston
ĉiu havas sian ŝarĝon
ĉiu havas sian vermon
ĉiu iras, kiel saĝ' al li diras
ĉiu klopodu nur en sia metio, tiam al la urbo mankos nenio
ĉiu komenco estas malfacila
ĉiu kreas sian forton, ĉiu forĝas sian sorton
ĉiu "li" havas sian "ŝi"
ĉiu manĝas, kiel li aranĝas
ĉiu mano al si altiras
ĉiu medalo du flankojn posedas
ĉiu mezuras aliajn laŭ sia mezurilo
ĉiu morgaŭ havas sian zorgon
ĉiu persono kun sia bezono
ĉiu por si - por ĉiuj Di'
ĉiu por si mem estas la plej kara
ĉiu propran saĝon posedas
ĉiu provas, kion li povas
ĉiu sezono kun sia bono
ĉiu sin direktas, kiel la kap' al li diktas
ĉiu sin gvidas, kiel li vidas
ĉiu tajloro havas sian tranĉmanieron
ĉiu "tial" havas sian "kial"
ĉiu vivas laŭ sia prudento kaj sento
ĉiu vulpo sian voston laŭdas
ĉiuj enterigitoj estas plenaj de meritoj
ĉiuj milionoj konsistas el milonoj
ĉiun demandu, sed mem al vi komandu
danĝera estas bovo antaŭe, ĉevalo malantaŭe, kaj malsaĝulo de ĉiuj flankoj
el la buŝ' multaj vortoj eliras, sed ne ĉiuj ion diras
el lia mano ĉiu monero elglitas
en ĉiu aĝo devas kreski la saĝo
en ĉiu angulo alia postulo
en ĉiu brusto estas sia gusto
en ĉiu kranio estas sia opinio
en ĉiu kranio regas aparta opinio
en ĉiu malbono estas iom da bono

en ĉiu objekto troviĝas difekto
en ĉiu transloĝiĝo estas parto de ruiniĝo
en la propra sia domo ĉiu estas granda homo
en propra angulo ĉiu estas fortulo
en sia afero ĉiu juĝu libere
en sia korto ĉiu kok' estas forta
en trankvila vetero ĉiu remas sen danĝero
falinton ĉiu atakas
famo laŭte krias, ĉiuj ekscias
ilo el oro taŭgas por ĉiu laboro
iras ĉiu kruro laŭ sia plezuro
kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas
kio bone aspektas, tion ĉiu elektas
kiu ĉe l' vojo konstruas, tiun ĉiu instruas
kiu flatas al ĉiu, plaĉas al neniu
kiu por ĉiuj laboras, pri si mem ne memoras
kiu servas al ĉiu, al si mem malutilas
knabon senfortan ĉiuj batoj atingas
konsilojn ĉiu donas, sed ne kiam oni bezonas
kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas
kontraŭ ĉiu malfacilo ekzistas konsilo
kontraŭ ĉiu tedo ekzistas rimedo
kontraŭ vesto malbona konspiras ĉiu ŝtono
la morto ne distingas, ĉiujn egale atingas
laŭ ĉiuj leĝoj de la arto
li havas ĉiun horon alian moron
malpaculon ĉiu batas
malsaĝulo de ĉiuj flankoj
manon malkvietan ĉiu muro atakas
maro ĉiujn riverojn ricevas kaj tamen ne krevas
mono plenumas ĉiujn oficojn
ne ĉiu aspiranto devas esti prenanto
ne ĉiu bojato estas ŝtelisto
ne ĉiu fianĉiĝas, kiu svatiĝas
ne ĉiu ĝibulo estas sanktulo
ne ĉiu havas egalan feliĉon
ne ĉiu hundo bojanta estas hundo mordanta
ne ĉiu papereto estas banka bileto
ne ĉiu raporto estas vera vorto
ne ĉiuj havas egalan feliĉon
ne el ĉiu ligno oni faras violonon
ne en ĉiu afero estu severa
ne povas ĉiu homo esti pap' en Romo
ora ŝlosilo ĉiun pordon malfermas
ordo estas beno por ĉiu entrepreno
pago de ŝuldanto estas bona en ĉiu kvanto
per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro
plena sako ĉiun mastron al vi klinos
por ĉiu ago venas la tempo de pago

por ĉiu ago venos tempo de pago
por ĉiu faro estas horo
por ĉiu plezuro devas esti mezuro
por paro amanta ĉiu loketo sufiĉas
por sia oro ĉiu estas sinjoro
pri tio jam ĉiuj paseroj babilas
raporti pri ĉiuj cirkonstancoj kaj nuancoj
se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo
se ĉiu speson donos, malriĉulo malsaton ne konos
se la arbo falis, ĉiu branĉon derompas
se malriĉulo sukcesas, li ĉiujn forgesas
se mi scius, kion mi ne scias, ĉiuj saĝuloj min envius
senlaboreco estas patrino de ĉiuj malvirtoj
sur ĉiu flanko nur manko kaj manko
ŝipon rompitan ĉiuj ventoj atakas

**danci**
danci antaŭ iu sur piedoj kaj manoj
danci kiel kato ĉirkaŭ poto
danci laŭ ies fajfilo
dancu diabloj, sed ne en mia arbaro
facile estas danci, se la feliĉo kantas
murmuregas la urso, sed danci ĝi devas

**danco**
konduki la dancojn

**dando**
dando el reĝa hundejo

**danĝera**
akvo trankvila estas akvo danĝera
danĝera estas bovo antaŭe, ĉevalo malantaŭe, kaj malsaĝulo de ĉiuj flankoj
estinta amiko estas plej danĝera malamiko
kiso malsincera estas danĝera
kiu multe minacas, ne estas danĝera
komplezema malsaĝulo estas pli danĝera ol malamiko
la plej danĝera homo - malbona in' en domo
plej danĝera malsano estas manko de saĝo
por pot' argila poto fera estas najbaro danĝera
troa petolo estas danĝera por la kolo
virino kolera pli ol hundo danĝera

**danĝere**
koko krias fiere, sed ne danĝere

**danĝeri**
por virta orelo ne danĝeras vorto malbela

**danĝero**
danĝero sieĝas, al Dio ni preĝas - danĝero ĉesas, ni Dion forgesas
en trankvila vetero ĉiu remas sen danĝero
iom da malvero ne estas danĝero
la lumo por vero ofte estas danĝero
por ebriulo ne ekzistas danĝero
vulpo faras oferon - atendu danĝeron

**danki**
kiu regalas per ŝtonoj, tiun oni dankas per bastonoj
por honoro ni dankas, se manĝ' al ni mankas

**dato**
ŝatu amikon laŭ la dato de akiro

**daŭri**
knaba gusto kun forto daŭras ĝis la morto
komenca inklino daŭras ĝis la fino
leĝo malaperas, moro daŭras
ne ĉiam daŭras malbona vetero, ne ĉiam daŭras homa sufero
ne longe sinjora daŭras favoro
nek ĝojo, nek malĝojo daŭras eterne

**daŭro**
tro akra fajro estas sen daŭro

**decide**
pripensu malrapide kaj agu decide

**decidi**
homo fidas, feliĉo decidas
juĝanto decidas, kiel li vidas
ne kvanto, sed kvalito decidas pri merito
ne rapidu, trankvile decidu
se decidos la sorto, helpos nenia forto

**defendi**
kontraŭ malfeliĉo ne defendas eĉ riĉo
ne defendas oro kontraŭ doloro
se neniu plendas, neniu defendas

**defendo**
al li ne mankas defendo kontraŭ ofendo
foresto de ofendo estas plej bona defendo
kontraŭ bato senatenda ekzistas nenia defendo
senfara plendo ne estas defendo

**dek**
dek fojojn mezuru, unu fojon detranĉu
malsaĝulo malpacigis kaj dek saĝuloj repacigi ne povas
malsaĝulo ŝtonon ĵetis, dek saĝuloj ĝin ne atingos
ofte ligis malsaĝulo kaj dek saĝuloj malligi ne povas
pli zorgas unu patrino pri dek infanoj, ol dek infanoj pri unu patrino
se unu ne venis, dek ne atendas
unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj

**deka**
saltadi el unua al deka

**deko**
deko da pekoj, unu la puno

**dekreti**
sinjoro petas, kvazaŭ dekretas

**dekstra**
mano dekstra ne sciu, kion faras la maldekstra
via dekstra mano ne sciu, kion faras la maldekstra

**delira**
por parolo delira ne ekzistas rediro

**deliri**
eĉ monstron admiras, kiu ame deliras

**demandi**
ĉiun demandu, sed mem al vi komandu
kiu demandas, tiu ne eraras
malsanan demandu, al sana donu
ne demandu scienculon, demandu spertulon

**demando**
demando ne kostas, demando ne devigas
ĝi havas ankoraŭ signon de demando
kia demando, tia respondo
peto kaj demando kondukas tra l' tuta lando

**demeti**
demeti de si la antikvan Adamon

**demono**
inter fremdaj ŝi estas edzino-anĝelo, kun la edzo ŝi estas demono kruela

**denove**
li atendas kaj plendas kaj denove atendas

**densa**
tie iras fumo per densaj nuboj

**dentaro**
gardu vin du baroj: lipoj kaj dentaroj

**dento**
de fremda dento ni doloron ne sentas
dentoj mordas la langon, tamen ambaŭ sin amas
Dio manĝon donacis, sed la dentoj agacas
kie dento doloras, tien iras la lango

kio el la dentoj elsaltas, en la lipoj ne haltas
kio mem ne venas, li per la dentoj ĝin prenas
kio tra l' dentoj travenis, tion la lipoj ne retenos
li dentojn prunti ne bezonas
li havas dentojn ne por parado
liaj dentoj povas festi sabaton
liaj dentoj povas forgesi sian metion
minacas dento al la vento
montradi al si reciproke la dentojn
murmuri tra la dentoj
nuksoj venis, kiam dentoj elfalis
preni iun sur la dentojn
vi varmigos serpenton, ĝi al vi enpikos la denton

**dependi**
ĉio dependas de "se" kaj "kiam"

**depost**
depost tempo nememorebla

**derompi**
se la arbo falis, ĉiu branĉon derompas

**des**
ju cerbo pli prudenta, des lango pli silenta
ju disputo pli forta, des pli multaj la vortoj
ju homo pli fiera, des puno pli severa
ju laboro pli publika, des pli granda la kritiko
ju pli da aĉetantoj, des pli alta la prezo
ju pli da babilado, des pli da pekado
ju pli da bruo, des malpli da ĝuo
ju pli da donoj, des pli da amikoj
ju pli da havo, des pli da pravo
ju pli da honoro, des pli da laboro
ju pli da ĵuroj, des pli da suspekto
ju pli frue, des pli certe - ju pli volonte, des pli lerte
ju pli granda bezono, des pli granda la prezo
ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro
ju pli la infanoj bezonas, des pli Dio al vi donas
ju pli malproksimen la vojo, des pli da larmoj
ju pli oni babilas, des pli oni al si malutilas
ju pli oni posedas, des pli oni avidas
ju pli precizaj la kalkuloj, des pli fortika la amikeco

**deŝiri**
de unu bovo oni du felojn ne deŝiras

**detalo**
droni en detaloj

**detranĉi**
dek fojojn mezuru, unu fojon detranĉu

**detranĉita**
pecon detranĉitan al la pano ne regluu

**detrui**
envia moko sukceson ne detruas
konsento konstruas, malpaco detruas
per paroloj li bruas, tutan urbon detruas
ŝuldo ne bruas, tamen dormon detruas
vian vivon ĝuu, sed fremdan ne detruu

**detruita**
detruita ĝis la fundo de l' fundamento

**deveni**
el sama tero devenas, saman sukon entenas

**deveno**
elektu edzinon laŭ deveno kaj ne laŭ mieno
mono odoron ne havas, sian devenon ne diras

**devi**
antaŭe kion vi devas, poste kion vi volas
batanto povas argumenti, batato devas silenti
blindulo kartojn ludi ne devas
el la mizero oni devas fari virton
el la neceseco oni devas fari virton
en ĉiu aĝo devas kreski la saĝo
hodiaŭ pagi vi devas, morgaŭ kredite ricevos
iafoje oni devas okulon fermeti
juĝanto devas havi du orelojn
kiu aŭskultas, kie li ne devas, tiu aŭdas, kion li ne revas
kiu devas, tiu elekti ne povas
kiu devas, tiu povas
kiu levis la piedon, devas ekpaŝi
kiu sin enjungis, devas tiri
kiu volas mensogi, devas bone memori
mensoganto devas havi bonan memoron
murmuregas la urso, sed danci ĝi devas
ne ĉion oni devas severe ekzameni
ne ĉiu aspiranto devas esti prenanto
por ĉiu plezuro devas esti mezuro
pri gustoj oni disputi ne devas

**devigi**
demando ne kostas, demando ne devigas
ekzameni ne devigas preni
marĉandado aĉeti ne devigas
marĉando aĉeti ne devigas
rigardi kaj aspiri ne devigas akiri
se devigas neceso, faru kun kareso

**dezirado**
malriĉigas ne nehavado, sed trogranda dezirado

**deziri**
animo al paradizo deziras, sed pekoj retiras
deziri al iu ĉion bonan
deziri al iu amason da mono kaj titolon de barono
deziru sincere, vi atingos libere
deziru, ne deziru – ordon' estas, iru!
Dio puni deziras, li la saĝon fortiras
kiom la koro deziras
kion sobreco deziras, ebrieco ĝin diras
kiu bati deziras, trovas bastonon
kiu laboras kaj deziras, tiu akiras - kiu mem ne penas, nenio al li venas
kiu malmulte deziras, feliĉon akiras
kiu multon deziras, nenion akiras
kiu ne akiras, kiam li povas, tiu poste deziras, sed jam ne retrovas
kiu tro multe deziras, nenion akiras
leĝo estas cedema: kien vi deziras, ĝi iras
liberulo iras, kien li deziras
tapiŝon ne deziris, maton akiris
tien okuloj iras, kion la koro deziras

**deziro**
deziro kaj inklino ordonon ne obeas
deziro tre granda, sed mankas la forto
ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro
ne valoras la akiro eĉ la penon de l' deziro
piaj deziroj
volo kaj deziro leĝojn ne konas

**diabla**
vizaĝo agrabla kaj ungo diabla

**diablo**
al Dio plaĉu, sed sur diablon ne kraĉu
al Dio servu, diablon rezervu
ameno diablon ne forpelas
ankaŭ diablo tondron suferos
ankaŭ por diablo tondro ekzistas

ĉirkaŭ sanktuloj diabloj vagas
dancu diabloj, sed ne en mia arbaro
diablo ne ĉiam unu pordon sieĝas
diablo ŝercon ne komprenas, vokite li venas
Dio donis kaj benis, sed diablo forprenis
Dio ne ricevis, diablo forlevis
Dion laŭdu kaj diablon aplaŭdu
en infero loĝante, kun diabloj ne disputu
kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas
kolera kiel cento da diabloj
komenci per Dio kaj fini per diablo
kurbiĝadi kiel diablo en akvo benita
malbona virino diablon superas
malbonulon diablo ne prenas
ne pentru diablon sur la muro
ne voku diablon, ĉar li povas aperi
nek pio por Dio, nek kapablo por diablo
tro rapida riĉiĝo diablon ĝojigas

**diamanto**
ne ĉio brilanta estas diamanto

**diboĉi**
petolu, diboĉu, sed poste sorton ne riproĉu

**difekti**
kiu tro alten rigardon direktas, tiu tre baldaŭ okulojn difektas
tro da kuiristoj kaĉon difektas
unu malamiko pli difektas, ol cent amikoj protektas
unu ovo malbona tutan manĝon difektas
urtikon frosto ne difektas
vundan lokon protektis, alian difektis

**difekto**
difekton de naturo ne kovros veluro
en ĉiu objekto troviĝas difekto
valoron de objekto ni ekkonas post difekto

**diferenci**
kapoj diferencas, kranioj egalas
sub tero sklavo kaj sinjoro ne diferencas per valoro

**difinita**
fianĉon de l' sorto difinitan forpelos nenia malhelpo

**difino**
edzo kaj edzino - ĉiela difino
fluidaĵo sen difino, nek vinagro nek vino

**dikiĝi**
se lipo dikiĝas, ventro maldikiĝas

**dikti**
ĉiu sin direktas, kiel la kap' al li diktas

**Dio**
al Dio plaĉu, sed sur diablon ne kraĉu
al Dio servu, diablon rezervu
al porko Dio kornojn ne donas
ankoraŭ Dio ne dormas
bovidon mi atendis, infanon Dio sendis
ĉiu por si - por ĉiuj Di'
danĝero sieĝas, al Dio ni preĝas - danĝero ĉesas, ni Dion forgesas
Dio al vi donis, por ke vi povu doni
Dio batas, Dio kompatas
Dio donis buŝon, Dio donos manĝon
Dio donis, Dio prenis
Dio donis infanon, Dio donos por ĝi panon
Dio donis kaj benis, sed diablo forprenis
Dio donis oficon, Dio donas kapablon
Dio donis oficon, Dio donas prudenton
Dio donis tagon, Dio donos manĝon
Dio ĝuste faras, neniam eraras
Dio kompatu!
Dio longe paciencas, sed severe rekompencas
Dio manĝon donacis, sed la dentoj agacas
Dio ne perfidas, se homo lin fidas
Dio ne ricevis, diablo forlevis
Dio orfojn ne forgesas
Dio punas laŭ la fortoj
Dio puni deziras, li la saĝon fortiras
Dio scias bone pri niaj bezonoj
Dion fidu, sed senfare ne sidu
Dion kolerigis, homojn ridigis
Dion laŭdu kaj diablon aplaŭdu
en plej alta mizero al Dio esperu
faras rabon kaj ŝtelon, por oferi al Dio kandelon
faru vian aferon, Dio zorgos ceteron
forte sidas, kiu Dion fidas
gardu min Dio kontraŭ amikoj - kontraŭ malamikoj mi gardos min mem
hoko elsaltis, afero haltis
hom' malesperas, Dio aperas
homo pafas, Dio trafas
homo proponas, Dio disponas
ju pli la infanoj bezonas, des pli Dio al vi donas
kie estas harmonio, estas beno de Dio
kion Dio ne donis, perforte ne postulu
kion Dio ne donis, tion perforte ne serĉu

kion ni vere bezonas, Dio ĝin donas
kiu hontas nenion, ne timas Dion
kiu saĝon ne havas, Dio lin savas
kiu sian langon katenas, Dio lin benas
komenci per Dio kaj fini per diablo
kontraŭ homo fiera Dio estas severa
kontraŭ kalumnio ne povas batali eĉ Dio
kontraŭ volo de Dio helpos nenio
kun Dio vi iros ĉien, sen Dio nenien
mizero plej ekstreme, Dio plej proksime
ne atingos krio ĝis la trono de Dio
nek pio por Dio, nek kapablo por diablo
popolo diras, Dio diras
por ŝafo tondita Dio venton moderigas
preĝejo proksima, sed Dio malproksima
respektu Dion kaj reĝon kaj obeu la leĝon
se amas Dio, prosperas ĉio
se Dio ne aranĝos, lupo vin ne manĝos
se Dio ne volas, sanktulo ne helpos
se Dio ordonos, eĉ ŝton' lakton donos
servo al Dio vana ne restas
singardeman Dio gardas
tondro kampulon memorigas pri Dio
trio plaĉas al Dio
vivi kiel ĉe la brusto de Dio

**direkti**
ĉiu sin direktas, kiel la kap' al li diktas
kiu tro alten rigardon direktas, tiu tre baldaŭ okulojn difektas
unua paŝo iron direktas

**direkto**
Petro parolas sen direkto, sed Paŭlo konjektu

**diri**
ĉiu iras, kiel saĝ' al li diras
diri al iu nudan veron
diri la puran veron
diris kaj foriris
el la buŝ' multaj vortoj eliras, sed ne ĉiuj ion diras
kion sobreco deziras, ebrieco ĝin diras
kiu diras la veron, havas suferon
li diris adiaŭ al la mondo surtera
malsaĝulo diris vorteron, saĝulo komprenas la tutan aferon
mono odoron ne havas, sian devenon ne diras
ne diru "hop" antaŭ la salto
popolo diras, Dio diras
saĝa scias, kion li diras, - malsaĝa diras, kion li scias
se ne estus "se" kaj "tamen", mi al ĉio dirus amen

vi sekrete vorton diros, ĝi tra l' tuta mondo iros

**dirita**
vorto dirita al la mondo apartenas kaj neniam revenas

**dirite**
dirite, farite
ŝerce dirite, cele pensite

**diro**
diron oni neas, skribo ne pereas

**disdoni**
nobelo promesojn disdonas, kampulo promesojn plenumas

**disfali**
de guto post guto disfalas granito

**disiĝo**
amo pli kora, disiĝo pli dolora
post alkutimiĝo doloras disiĝo

**disponi**
homo proponas, Dio disponas
kie mi disponas, tie mi ordonas
kiu metion disponas, mizeron ne konas
se muso nur unu truon disponas, ĝi baldaŭ la vivon fordonas

**disputi**
disputu komence - vi ne malpacos en fino
disputu pri ĉio, sed sen garantio
en infero loĝante, kun diabloj ne disputu
pri gustoj oni disputi ne devas

**disputo**
disputo kredigas, sed ne certigas
disputoj kondukas al malpaco
ju disputo pli forta, des pli multaj la vortoj

**disstariĝi**
la haroj disstariĝas

**disŝiriĝi**
se sako tro pleniĝas, ĝi baldaŭ disŝiriĝas

**distingi**
la morto ne distingas, ĉiujn egale atingas

**disverŝiĝi**
inter la mano ĝis la buŝo ofte disverŝiĝas la supo

**diveni**
kion saĝulo ne komprenas, ofte malsaĝa divenas

**dokumento**
pli valoras interkonsento, ol juĝa dokumento

**dolĉa**
eĉ per dolĉa kuko vi min ne allogos
pli bona pano sen butero, ol dolĉa kuko sen libero
post dolĉa vino restas acida vinagro
pri dolĉa vorto ne fieru, maldolĉan ne koleru

**dolĉe**
dolĉe ŝmiri al iu la lipojn
paroli dolĉe en la orelon

**dolora**
al loko dolora ni manon etendas - al loko ĉarma okulojn ni sendas
amo pli kora, disiĝo pli dolora

**dolori**
bato de patrino ne longe doloras
de bona vorto lango ne doloras
de kantado senpaga doloras la gorĝo
de vorto ĝentila ne doloras la lango
fremda korpo ne doloras
kie dento doloras, tien iras la lango
kio doloras, pri tio ni ploras
kulo nenion valoras, sed ĝia piko doloras
ne doloras frapo sur fremda kapo
Petron kruro doloras, Karolo ne lamas
post alkutimiĝo doloras disiĝo
se stomako doloras, kapo laboras
vergo doloras, sed saĝon ellaboras
vundo sekreta doloras plej multe

**doloro**
antaŭ okuloj ne staras, doloron ne faras
de fremda dento ni doloron ne sentas
de plendo kaj ploro ne foriĝas doloro
ekstere honoro, interne doloro
fremda doloro ne kondukas al ploro
kontraŭ doloro helpas bona humoro
malgrandaj infanoj kaŭzas laboron, grandaj - doloron
ne defendas oro kontraŭ doloro

ne helpas ploro al doloro
pasinta doloro for el memoro
sorto donas favoron, sorto donas doloron

**domaĝi**
kiu domaĝas groŝon, perdas la tutan poŝon
pro vorta ludo li eĉ patron ne domaĝas

**domaĝo**
kia domaĝo!
post domaĝo venas saĝo

**dometo**
en sia dometo li estas atleto
hejma dometo estas kiel patrineto

**domo**
aliaj domoj, aliaj homoj
amu domon novan kaj amikon malnovan
apud propra domo ŝtelisto ne ŝtelas
atendu min antaŭ la domo de mia pranepo
bona estas domo nova kaj amiko malnova
bona estas Romo, sed tro malproksima de nia domo
brava homo en sia domo
dronanto domon proponas, savito eĉ brikon ne donas
en dom' de pendigito pri ŝnuro ne parolu
en la propra sia domo ĉiu estas granda homo
esti anĝelo inter homoj, sed satano en la domo
estu saĝa homo en via propra domo
kun sia tuta domo kaj havo
kuraĝa homo en sia domo
la plej danĝera homo - malbona in' en domo
mankis al Petro klopodoj, li aĉetis al si domon
pli facile estas perdi vilaĝon, ol akiri domon
pli facile estas vilaĝon perdi, ol domon akiri
se edzino ordonas, domo ordon ne konas
tolaĵon malpuran lavu en la domo

**donaceto**
donacetoj subtenas amikecon

**donaci**
Dio manĝon donacis, sed la dentoj agacas
oni donacas por speso kaj laborigas por spesmilo
oni invitas - venu, oni donacas - prenu
reĝo donacis, sed polico minacas

**donacita**
al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras
pli valoras vinagro donacita, ol vino aĉetita

**donaco**
donaco nesincera estas donaco infera
donacon reprenu kaj mian vivon ne venenu
kiu akceptas donacon, perdas la pacon
kiu donacon prenas, tiu sin katenas

**donado**
donado de almozoj neniam malriĉigas

**donanto**
pli feliĉa estas donanto ol prenanto

**doni**
al feliĉulo eĉ koko donas ovojn
al kokino la ovo lecionojn ne donu
al porko Dio kornojn ne donas
Dio al vi donis, por ke vi povu doni
Dio donis buŝon, Dio donos manĝon
Dio donis, Dio prenis
Dio donis infanon, Dio donos por ĝi panon
Dio donis kaj benis, sed diablo forprenis
Dio donis oficon, Dio donas kapablon
Dio donis oficon, Dio donas prudenton
Dio donis tagon, Dio donos manĝon
doni al iu la baton de morto
doni la finofaran baton
doni la tonon
doni lecionon de moroj
doni ovon, por ricevi bovon
donu al krudulo plezuron, li ne scios mezuron
donu fingron al avidulo, li tutan manon postulas
dronanto domon proponas, savito eĉ brikon ne donas
eĉ plej nigra bovino donas lakton nur blankan
espero panon ne donas
fasto kaj preĝo riĉecon ne donas
fremdan dorson bastoni - ankaŭ sian doni
fremdlando objekton por speso donas, sed por ĝin venigi, oni spesmilon bezonas
granda estas la mondo, sed rifuĝon ne donas
hakado de ligno donas lignerojn
honoro ne donas, kion stomako bezonas
ju pli la infanoj bezonas, des pli Dio al vi donas
karakteron al kanto donas la tono
kio akorde ne sonas, tio rimon ne donas
kio al unu donas forton, al alia donas morton

kion Dio ne donis, perforte ne postulu
kion Dio ne donis, tion perforte ne serĉu
kion jaroj ne donis, ofte minuto alportas
kion ni vere bezonas, Dio ĝin donas
kiu donas rapide, donas duoble
kiu donas rapide, donas duoble
kiu donis garantion, tiu pagu la ŝuldon
kiu konsilas kaj rezonas, tiu helpon ne donas
kiu manĝon al mi donas, tiu al mi ordonas
kiu panon donas, malsaton ne konas
kiu resonis, tiu sin donis
kolero pravecon ne donas
konsilojn ĉiu donas, sed ne kiam oni bezonas
laboro donas bonstaton, mallaboro malsaton
li donas peceton da pano kaj bategon per mano
li ŝtelas de najbaro, por doni al altaro
malsanan demandu, al sana donu
malsato donas spriton
melku bovon senfine, li lakton ne donos
metio manĝon ne bezonas kaj manĝon tamen donas
ne donu kaj ne boju
nenia peno nek provo donos lakton de bovo
rezonado kaj filozofado panon ne donas
se ĉiu speson donos, malriĉulo malsaton ne konos
se Dio ordonos, eĉ ŝton' lakton donos
se vi donas mielon, donu ankaŭ kuleron
silentu donante, parolu ricevante
sorto donas favoron, sorto donas doloron
sub seruro promesojn tenu, sed doninte ne reprenu
ŝafo donas sian lanon, por ke mastro havu panon
unu fojon oni donas kaj tutan vivon fanfaronas
unueco donas fortecon

**donita**
bovo prenita, koko donita kaj - kvita
vorto donita estas kiel leĝo

**dono**
ĉia dono estas bono
ju pli da donoj, des pli da amikoj
kara estas dono en minuto de bezono
ne ekzistas mono, ne ekzistas dono
ne prenis pastro la donon - rekaŝu sako la monon

**dorloti**
dorloti serpenton sur sia brusto
kiu volas panon, ne dorlotu la manon

**dorma**
post dorma trankvilo venas bona konsilo

**dormado**
longa dormado ŝuldojn kreskigas

**dormanta**
lupo dormanta ŝafon ne kaptas

**dormi**
ankoraŭ Dio ne dormas
dormus leporo, se ĝi ĉason ne timus
ekzistas ezoko, por ke fiŝetoj ne dormu
kiel oni sternas, tiel oni dormas
kiu dormas longe, vivas mallonge
ne veku malfeliĉon, kiam ĝi dormas
se ezoko piiĝis, gobio ne dormu

**dormilo**
konscienco trankvila estas bona dormilo

**dormo**
ebrieco pasas post dormo, malsaĝeco neniam
la dorm' estas bona, se mankas la mono
senlaboreco dormon alportas
ŝuldo ne bruas, tamen dormon detruas

**dorno**
riĉulo havas kornojn, malriĉulo dornojn

**dorso**
fremdan dorson bastoni - ankaŭ sian doni
mano pekis, dorso pagas
okulo ne atentas - dorso eksentas
se okulo ne atentas, dorso eksentas

**doto**
bela vizaĝo estas duono da doto
doto koron ne varmigas
eĉ kaprino plaĉas, se la doto sufiĉas
granda doto kaj oro, sed mankas la koro

**drapo**
kia drapo, tia vesto

**draŝejo**
se silentas draŝejo, malpacas loĝejo

**draŝi**
draŝi fojnon

**drinki**
drinku tutajn tagojn, sed kontrolu viajn agojn

**drinkulo**
ne pekas drinkulo, pekas ebriulo

**dronanto**
dronanto domon proponas, savito eĉ brikon ne donas
dronanto eĉ herbeton kaptas avide

**droni**
droni en detaloj
kiu akvon evitas, droni ne timas
pendonto ne dronos

**dronigi**
ne maro dronigas ŝipon, sed la ventoj
por hundon dronigi, oni nomas ĝin rabia

**drono**
fiŝo serĉas dronon, homo serĉas bonon

**du**
al du sinjoroj samtempe oni servi ne povas
certe, kiel duoble du kvar
ĉiu medalo du flankojn posedas
de unu bovo oni du felojn ne deŝiras
de unu bovo oni du felojn ne ŝiras
du botoj faras paron
du kontraŭ unu prezentas armeon
du manoj faras ĉion, sed unu nenion
du militas - tria profitas
du mortojn vi ne havos, de unu vi vin ne savos
du sinjoroj en unu bieno, du mastrinoj ĉe unu kameno - neniam vivas sen reciproka malbeno
el du malbonoj pli malgrandan elektu
en unu sako du katoj, ĉiam mordoj kaj gratoj
gardu vin du baroj, lipoj kaj dentaroj
ili vivas per unu animo en du korpoj
juĝanto devas havi du orelojn
kiu ĉasas du leporojn, kaptas neniun
mensogo kaj ŝtelo estas du fratoj
ne taŭgas du ursoj por unu nesto
per unu ŝtono oni du ĵetojn ne faras
ŝiru vin en du partojn, la mondo trian postulos
trafi du celojn per unu ŝtono

unu amiko malnova pli valoras ol du novaj
unu saĝo estas bona, du estas pli bonaj
unu, du, tri, kvar, kaj finita la far'

**dua**
kiu aŭdis unuan, ankaŭ aŭdu la duan
kutimo estas dua naturo
sen speso unua ne ekzistas la dua
tra unu orelo eniras, tra la dua eliras

**duba**
granda parolisto estas duba faristo

**dubo**
dubo gardas kontraŭ risko

**dum**
dum la manĝado venas apetito
fleksu arbon dum ĝia juneco
forĝu feron dum ĝi estas varmega
leviĝu kun la suno, edziĝu dum juna

**duoble**
avarulo pagas duoble
certe, kiel duoble du kvar
kiu donas rapide, donas duoble

**duona**
komenco bona - laboro duona

**duone**
iele, iome, duone malbone

**duongroŝo**
kiu groŝon ne honoras, eĉ duongroŝon ne valoras

**duono**
bela vizaĝo estas duono da doto

**duonpatrino**
urson evitu, duonpatrinon ne incitu

**duonvorto**
saĝa kapo duonvorton komprenas

**duope**
akiro kaj perdo rajdas duope

**eble**
faru hodiaŭ, kion vi povas, - morgaŭ vi eble okazon ne trovos
mi blinde pafos, eble trafos

**ebria**
li saltas gracie, kiel urso ebria

**ebrieco**
ebrieco pasas post dormo, malsaĝeco neniam
kion sobreco deziras, ebrieco ĝin diras

**ebrio**
vera opinio montriĝas en ebrio

**ebriulo**
ebriulon kaj malsaĝulon oni ne juĝas
ne pekas drinkulo, pekas ebriulo
por ebriulo ne ekzistas danĝero

**eco**
peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro

**eĉ**
al feliĉulo eĉ koko donas ovojn
antaŭ tima okulo potenciĝas eĉ kulo
bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno
brogita eĉ sur akvon blovas
de malbona ŝafo estas bona eĉ tufo
de nehavanto eĉ reĝo nenion ricevos
de ŝafo senlana eĉ lanero taŭgas
dronanto domon proponas, savito eĉ brikon ne donas
dronanto eĉ herbeton kaptas avide
eĉ bagatelo povas servi al celo
eĉ blinda kokino povas trovi grajnon
eĉ ĉe kokino troviĝas propra inklino
eĉ el sub la tero aperas la vero
eĉ en Parizo herbo ne fariĝas cerbo
eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan
eĉ inter piuloj ne mankas pekuloj
eĉ kaprino plaĉas, se la doto sufiĉas
eĉ kiu plej bone pafas, tamen iam maltrafas
eĉ kontraŭ pastra prediko troviĝas kritiko
eĉ kvar piedoj de ĉevalo ĝin ne savas de falo
eĉ malgranda muŝo ne estas sen buŝo
eĉ malsaĝulon sperto instruos
eĉ monstron admiras, kiu ame deliras
eĉ muŝo sentas, kiam vi ĝin turmentas

eĉ najtingalo ne estas sen galo
eĉ per dolĉa kuko vi min ne allogos
eĉ pinglo povas koron trapiki
eĉ plej bonan ŝipon malbonigas la ventoj
eĉ plej granda malbono al bono kondukas
eĉ plej nigra bovino donas lakton nur blankan
eĉ plej ruza vulpo en kaptilon falas
eĉ por plej terura tago venas vespero
eĉ por pomo putranta troviĝas amanto
eĉ signo ne restis, kie urbo estis
eĉ sur la suno troviĝas makuloj
eĉ ŝtipo estos bela, se vi ĝin ornamos
eĉ ŝtono verdiĝas, se ĝi longe ne moviĝas
eĉ vulpo plej ruza fine estas kaptata
en amaso eĉ morto estas pli gaja
en kompanio eĉ morto faciliĝas
en malfacila horo eĉ groŝ' estas valoro
en mizero eĉ saĝulo estas malsaĝa
gardatan ŝafon eĉ lupo timas
ĝi eĉ ne tuŝas lian orelon
hundo povas boji eĉ kontraŭ la reĝo
kalumniante konstante, oni eĉ anĝelon nigrigas
kiu groŝon ne honoras, eĉ duongroŝon ne valoras
kiun favoras la sorto, por tiu eĉ koko estas ovoporta
konservas eĉ karbo la strukturon de l' arbo
kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas
kontraŭ kalumnio ne povas batali eĉ Dio
kontraŭ nehavo eĉ juĝo silentas
kontraŭ tuta kohorto eĉ Herkulo estas malforta
kriu eĉ raŭke, sed kanti ne ĉesu
li eĉ el sablo vipojn tordas
li faras princan promeson, sed ne havas eĉ speson
li loĝas tie, kien eĉ birdo ne flugas
li ne toleras eĉ muŝon sur la muro
malsaĝulon oni batas eĉ en la preĝejo
ne valoras la akiro eĉ la penon de l' deziro
nokte eĉ monstro estas belulo
oni batas, malkaresas, kaj eĉ plori ne permesas
paca silento, ke ne blovas eĉ vento
per mono eĉ silento fariĝas elokvento
por li eĉ la muso ne estas sen felo
pro vorta ludo li eĉ patron ne domaĝas
rano eĉ en palaco sopiras pri marĉo
se Dio ordonos, eĉ ŝton' lakton donos
se kalumnio eĉ pasas, ĝi ĉiam ion lasas
se la gasto estas amata, eĉ lia servanto ne restas malsata
se la gasto meritas, eĉ lia hundo profitas
se peko trafas, eĉ bastono ekpafas
sen fajro ne brulas eĉ pajlo

senĉesa guto eĉ ŝtonon traboras
vi povas eĉ haki lignon sur lia kapo

**edukita**
timu lupon edukitan kaj malamikon repacigitan

**edzigi**
edzigu filon, kiam vi volas - edzinigu filinon, kiam vi povas

**edziĝi**
elektadis sen fino, edziĝis kun porkino
frue leviĝu kaj frue edziĝu
kiu edziĝas, tiu ŝanĝiĝas
leviĝu kun la suno, edziĝu dum juna
multaj svatiĝas, feliĉulo edziĝas
naskiĝu, edziĝu kaj mortu - ĉiam monon alportu
ŝtelu malproksime, edziĝu proksime

**edziĝo**
de edziĝo tro malfrua orfoj naskiĝas
edziĝo laŭ koro, laŭ la kvanto da oro
edziĝo najbara garantias de eraro
edziĝo pro amo flamanta al la sako sonanta
edziĝo tro momenta estas longapenta
fianĉiĝo ne estas edziĝo
ĝis la edziĝo ĝi resaniĝos
ĝis la edziĝo venos resaniĝo
tro rapida edziĝo - porĉiama kateniĝo

**edzinigi**
edzigu filon, kiam vi volas, - edzinigu filinon, kiam vi povas

**edziniĝi**
kiam filino edziniĝis, multaj fianĉoj troviĝis

**edzino**
amu edzinon plej kore, sed tenu ŝin bonmore
edzin' admirata - edzo malsata
edzino pli elverŝas per funelo, ol edzo enverŝas per sitelo
edzo edzinon laŭdas, edzino edzon aplaŭdas
edzo kaj edzino - ĉiela difino
edzo kaj edzino estas nur unu
elektu edzinon laŭ deveno kaj ne laŭ mieno
inter fremdaj ŝi estas edzino-anĝelo, kun la edzo ŝi estas demono kruela
kiu batas edzinon, tiu vundas sin mem
ne punu edzinon antaŭ infanaj okuloj, ne punu infanojn antaŭ fremduloj
per oreloj, ne per okuloj, edzinon elektu
se edzino ordonas, domo ordon ne konas
vi sekretos al edzino, ŝi sekretos al fratino, kaj tiel la sekreto promenados sen fino

**edzo**
edzin' admirata - edzo malsata
edzino pli elverŝas per funelo, ol edzo enverŝas per sitelo
edzo edzinon laŭdas, edzino edzon aplaŭdas
edzo kaj edzino - ĉiela difino
edzo kaj edzino estas nur unu
inter fremdaj ŝi estas edzino-anĝelo, kun la edzo ŝi estas demono kruela
kun edzo plej malmola estas pli bone ol sola

**efika**
hako post hako estas la plej efika atako

**efike**
pli efike ol bato pelas malsato

**efiki**
de la volo la ordono pli efikas ol bastono

**efiko**
lernado havas maldolĉan radikon, sed bonan efikon
ofte de kaŭzo senenhava venas efiko plej grava
sanigaĵo malbongusta, sed efiko plej ĝusta

**egala**
ne ĉiu havas egalan feliĉon
ne ĉiuj havas egalan feliĉon
nomo egala, sed esenco mala

**egale**
la morto ne distingas, ĉiujn egale atingas

**egali**
kapoj diferencas, kranioj egalas
kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas
kiu ŝteliston regalas, mem ŝteliston egalas
suspekto pruvon ne egalas

**ekami**
kiun vesto ornamas, tiun homoj ekamas

**ekbati**
el klara ĉielo tondro ekbatis

**ekbruli**
fendita ligno facile ekbrulas

**ekfari**
staris, ekfaris

**ekflugi**
vento al li ekflugis sub la haŭto

**ekkoni**
laŭ la frukto oni arbon ekkonas
oni ekkonas bovon per la vido kaj malsaĝulon per lia rido
valoron de objekto ni ekkonas post difekto

**eklumi**
ankaŭ al ni la suno eklumos

**ekpafi**
se peko trafas, eĉ bastono ekpafas

**ekpaŝi**
kiu levis la piedon, devas ekpaŝi

**ekpenti**
se lupo ekpentis, ŝafo atentu

**ekpepi**
ne ekpepi!

**ekprotesto**
sendemanda ekprotesto estas ofte kulpatesto

**ekprovi**
kiu mordi ne povas, kisi ekprovas

**ekrajdi**
ne volis rajdi sur ĉevalo, ekrajdis sur azeno

**eksalte**
eksalte senhalte

**eksalti**
muelilo haltas, muelisto eksaltas

**ekscii**
famo laŭte krias, ĉiuj ekscias

**ekscitiĝi**
li ekscitiĝas kiel bolanta lakto

**eksenti**
okulo ne atentas - dorso eksentas
piedo ne atentis, kapo eksentis
se okulo ne atentas, dorso eksentas

**eksoni**
tablon frapas tajloro, tuj tondilo eksonas

**eksplodema**
eksplodema kiel pulvo

**eksplodi**
eksplodis kiel pulvo

**ekster**
barakti kiel fiŝo ekster la akvo
ekster via ofico estas ekster via vico
ne rezonu pri tio, kio estas ekster via metio
ne zorgu pri tio, kio estas ekster via scio

**ekstere**
balaaĵon el korto eksteren ne elportu
ekstere honoro, interne doloro
min ne tuŝas la afero, mi staras ekstere
vivi modere, ne tro interne nek tro ekstere

**ekstero**
ĉe tro ĝentila ekstero mankas sincero
ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero

**ekstreme**
mizero plej ekstreme, Dio plej proksime

**eksvingi**
oro nur fingron eksvingas kaj ĉion atingas

**ektremi**
atakis teruro, ektremis la kruro

**ekuzi**
Petro rifuzas, Paŭlo ekuzas

**ekzameni**
ekzameni ne devigas preni
ne ĉion oni devas severe ekzameni

**ekzemplo**
ekzemplo proponas, sed ne ordonas

**ekzisti**
ankaŭ por diablo tondro ekzistas
ekzistas ezoko, por ke fiŝetoj ne dormu
homo senpeka neniam ekzistis

kie lumo ekzistas, ankaŭ ombro troviĝas
kontraŭ bato senatenda ekzistas nenia defendo
kontraŭ ĉiu malfacilo ekzistas konsilo
kontraŭ ĉiu rimedo ekzistas rimedo
kontraŭ ĉiu tedo ekzistas rimedo
kontraŭ malfeliĉoj baro ne ekzistas
naivuloj jam ne ekzistas
ne ekzistas en komerco amikeco nek ŝerco
ne ekzistas forto kontraŭ la morto
ne ekzistas fumo sen brulo
ne ekzistas fumo sen fajro
ne ekzistas honoro sen laboro
ne ekzistas juneco sen kapricoj, nek maljuneco sen malicoj
ne ekzistas kareso sen intereso
ne ekzistas mono, ne ekzistas dono
ne ekzistas naiva vulpo, ne ekzistas homo sen kulpo
ne ekzistas ofico sen benefico
ne ekzistas regulo sen escepto
ne ekzistas savo kontraŭ malbona virino
ne ekzistas terno sen nazo nek fakto sen bazo
ne kredas ŝtelisto, ke honestaj ekzistas
ne ŝtelus ŝtelistoj, se ne ekzistus kaŝistoj
por amiko intima ne ekzistas vojo malproksima
por ebriulo ne ekzistas danĝero
por fremda koro ne ekzistas esploro
por parolo delira ne ekzistas rediro
por patrino ne ekzistas infano malbela
por regna speso ne ekzistas forgeso
sen gutoj malgrandaj maro ne ekzistus
sen ordo en afero ne ekzistas prospero
sen speso unua ne ekzistas la dua
volu-ne-volu, - elekto ne ekzistas

**elastigi**
mizero piedojn sanigas, kolon elastigas

**elbabili**
mastro elbabilis, gastoj ne silentos

**elbatadi**
elbatadi ies sojlon

**elbati**
oni elbatas kojnon per kojno

**eldiri**
scion akiru, sed ne ĉion eldiru

**elefanto**
fari el muŝo elefanton

**elektadi**
elektadis sen fino, edziĝis kun porkino

**elektema**
tro elektema ricevas nenion

**elekti**
el du malbonoj pli malgrandan elektu
elektu edzinon laŭ deveno kaj ne laŭ mieno
kio bone aspektas, tion ĉiu elektas
kiu devas, tiu elekti ne povas
kiu elektas tro multe, ricevas nenion
kiun reĝo protektas, tiun ministro elektas
per oreloj, ne per okuloj, edzinon elektu
rangeto rangon respektu, modestan lokon elektu
se mi faru riverencon, mi elektas potencon

**elektito**
multaj vokitoj, sed ne multaj elektitoj

**elekto**
de elekto tro multa plej malbona rezulto
volu-ne-volu - elekto ne ekzistas

**elemento**
esti en sia elemento

**elfali**
nuksoj venis, kiam dentoj elfalis

**elgliti**
el lia mano ĉiu monero elglitas

**eliĝi**
virino eliĝis, kaleŝo senpeziĝis

**eliri**
el la buŝ' multaj vortoj eliras, sed ne ĉiuj ion diras
eliri sen frakaso el granda embaraso
ĝi ne eliris ankoraŭ el malproksima nebulo
kiam vorto eliris, vi ĝin jam ne retiros
kiu rabi eliras, ofte nuda revenas
tra unu orelo eniras, tra la dua eliras

**eliro**
esti en situacio sen eliro
nek eniro, nek eliro
situacio sen eliro

**elĵeti**
el kanto oni vortojn ne elĵetas

**elkreski**
barbo elkreskis, sed saĝon ne naskis
ne en unu tago elkreskis Kartago

**ellabori**
vergo doloras, sed saĝon ellaboras

**elmeti**
elmeti la okulon kaj vidi nulon
elmetu mielon, muŝoj alflugos

**elokventi**
sciu elokventi, sciu ankaŭ silenti

**elokvento**
per mono eĉ silento fariĝas elokvento

**elpeli**
babilas, muelas, kion lango elpelas
elpeli iun el la mondo de la vivuloj

**elpensi**
li ne elpensis la filozofian ŝtonon
li pulvon ne elpensis

**elporti**
balaaĵon el korto eksteren ne elportu

**elrampi**
li ĵus elrampis el la ova ŝelo
li ne elrampis ankoraŭ el la vindoj

**elsalti**
hoko elsaltis, afero haltis
kio el la dentoj elsaltas, en la lipoj ne haltas
se elsaltas la okazo, ĝi rompiĝas kiel vazo

**elspezi**
pli facile estas multe elspezi, ol malmulte enspezi
pli facile estas multon elspezi, ol malmulton enspezi

**elspezo**
enspezo postulas elspezon
riĉigas ne enspezo, sed prudenta elspezo

**elstrekita**
farita – elstrekita

**elŝovi**
kaŝu kiom vi povos, mensogo sin elŝovos
kion mi povas, tion mi elŝovas
miljaroj ne povis - minuto elŝovis

**elteni**
multe entreprenis, sed ne multe eltenis

**eltiri**
el flamo sin eltiris, en fajron eniris

**eltrinki**
eltrinki per unu tiro

**eluzita**
vesto eluzita, sed pureco spirita

**elveni**
kiom ajn vi penos, nenio elvenos
sako alenon ne tenas, ĝi baldaŭ elvenas

**elverŝi**
edzino pli elverŝas per funelo, ol edzo enverŝas per sitelo
elverŝi sur iun sian koleron
ne elverŝu la malpuran, antaŭ ol vi havas la puran

**elverŝiĝi**
de la manoj ĝis lipoj la sup' elverŝiĝis
se la kaliko tro pleniĝas, la vino elverŝiĝas

**elvoki**
feliĉo kaj riĉo envion elvokas
ne elvoku lupon el la arbaro

**embaraso**
eliri sen frakaso el granda embaraso
esti en granda embaraso
sidi en amaso da embaraso

**emerite**
vivi emerite

**eminenta**
eminenta ŝuldanto - malbona paganto

**enbati**
enbati al si en la kapon

**enesto**
valoras ne la vesto, valoras la enesto

**enfali**
lupo kaptas, sed li ankaŭ enfalas

**engliti**
atendis, meditis, ĝis en tombon englitis

**engluti**
fiŝo pli granda malgrandan englutas
fungon englutis!
se vi krudulon salutos, li vin tutan englutos

**enigmo**
la enigmo simple solviĝas

**eniĝi**
kiam fratoj batalas, fremdulo ne eniĝu

**eniri**
el flamo sin eltiris, en fajron eniris
sonorilo vokas al preĝejo kaj mem neniam eniras
tra unu orelo eniras, tra la dua eliras

**eniro**
nek eniro, nek eliro

**enjungi**
kiu sin enjungis, devas tiri

**enlasi**
li ne enlasas puŝon en sian buŝon

**enpakiĝi**
enpakiĝu kaj foriĝu

**enpiki**
vi varmigos serpenton, ĝi al vi enpikos la denton

**enpremi**
enpremi en la teron
enpremi iun en funelon

**enskribi**
enskribu en vian memoron

**enskribita**
esti bone enskribita ĉe iu

**enspezi**
pli facile estas multe elspezi, ol malmulte enspezi
pli facile estas multon elspezi, ol malmulton enspezi

**enspezo**
enspezo postulas elspezon
riĉigas ne enspezo, sed prudenta elspezo
tro da enspezo ne estas tro da pezo
vivi de estontaj enspezoj

**enteni**
el sama tero devenas, saman sukon entenas

**enterigito**
ĉiuj enterigitoj estas plenaj de meritoj

**entombigi**
bonaj infanoj gepatrojn feliĉigas, malbonaj ilin entombigas

**entrepreni**
kiu entreprenis, tiu sin tenu
multe entreprenis, sed ne multe eltenis

**entrepreno**
ordo estas beno por ĉiu entrepreno

**enua**
scienco havas semon enuan, sed frukton bonĝuan

**enuo**
kiu amas ĝuon, amu ankaŭ enuon

**enverŝi**
edzino pli elverŝas per funelo, ol edzo enverŝas per sitelo

**envia**
envia moko sukceson ne detruas

**envii**
kion mi ne scias, tion mi ne envias
se mi scius, kion mi ne scias, ĉiuj saĝuloj min envius

**enviigi**
pli bone estas enviigi, ol kompatigi

**envio**
feliĉo kaj riĉo envion elvokas

**erari**
Dio ĝuste faras, neniam eraras
kiu demandas, tiu ne eraras
kiu ne pekis, kiu ne eraris?
nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras
pli bone ne fari, ol erari

**eraro**
ĉiu eraro estas kulpo
edziĝo najbara garantias de eraro
ne hontu penti pri faro, hontu persisti en eraro
nin instruas eraro, kiun faras najbaro
pagas maljunaj jaroj por junaj eraroj
peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro
per eraro ne praviĝas la faro
pro eraro ne praviĝas la faro
vin ne tuŝu la eraroj en fremdaj faroj

**escepto**
ne ekzistas regulo sen escepto

**esenco**
bruo potenca, nula esenco
nomo egala, sed esenco mala

**esperi**
en feliĉo ne fieru, en malfeliĉo esperu
en plej alta mizero al Dio esperu
esperis flaton - ricevis baton
homo esperas - morto aperas
malpli esperu, pli konsideru
mi panon ne esperis, subite kuko aperis
ne atendis, ne esperis - malfeliĉo aperis
ni laboru kaj esperu

**esperita**
ne atendita, ne esperita ofte venas subite

**esperite**
ne esperite, ne sonĝite

**espero**
de atendo kaj espero pereis multaj sur la tero
espero kaj pacienco kondukas al potenco
espero logas, espero mensogas
espero panon ne donas
espero postulas oferon
kie estas sufero, estas ankaŭ espero
saĝa tenas aferon, malsaĝa esperon
sen atendo, sen espero venis mizero
tro longa sufero - malgranda espero

**esplori**
al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras
li esploris iom la fundon de la glaso

**esploro**
por fremda koro ne ekzistas esploro

**estanta**
uzu tempon estantan, antaŭvidu estontan, memoru estintan

**estingi**
fajron estingas akvo, pekon pardono
kiu ŝuldojn estingas, riĉecon atingas
ne estingu la fajron, kiu vin ne bruligas
puno pekon svingas, favorkoreco ĝin estingas

**estinta**
estinta amiko estas plej danĝera malamiko
estintaj amikoj plej kruele malpacas
uzu tempon estantan, antaŭvidu estontan, memoru estintan

**estonta**
vivi de estontaj enspezoj
uzu tempon estantan, antaŭvidu estontan, memoru estintan

**estro**
estro ne malsatas

**eta**
granda nubo, eta pluvo

**etendi**
al loko dolora ni manon etendas - al loko ĉarma okulojn ni sendas
atendis, atendis, ĝis lin ĉerko etendis

**eterne**
kaprica fianĉino restos eterne fraŭlino
nek ĝojo, nek malĝojo daŭras eterne

**eterno**
por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno

**Eternulo**
preĝu al la Eternulo, ne al lia sanktulo

**eviti**
ankoraŭ neniu evitis la sorton
kiu akvon evitas, droni ne timas
kiu laboron evitas, bonon ne vidas
kiu multe profitas, ankaŭ perdon ne evitas
pli facile estas eviti ol spiti
pli facile estas malbonon eviti, ol korekti
ploranton ni evitas, ridanton ni imitas
serpenton oni povas eviti, sed kalumnion neniam
sian sorton neniu evitos
ŝtelisto ŝteliston evitas, ĉar li tie ne profitas
urson evitu, duonpatrinon ne incitu

**ezoko**
ankoraŭ la ezoko ne estas sur la hoko
ekzistas ezoko, por ke fiŝetoj ne dormu
por kapti ezokon, bongustigu la hokon
se ezoko piiĝis, gobio ne dormu

**fabelo**
bela celo por fabelo
fabeloj por infanoj

**fablo**
malsatulon la fabloj ne nutros

**facila**
ĝi ne estas tiel facila, kiel laboro argila
komenco aprila - trompo facila
malantaŭ barilo kuraĝo estas facila
montroj kaj konsiloj estas facilaj
per vorto ĝentila ĉio estas facila
se la ĉielo falus al tero, birdokaptado estus facila afero

**facile**
bonfaron oni facile forgesas
el fremda poŝo oni pagas facile
en akvo malklara oni fiŝkaptas facile
facile estas danci, se la feliĉo kantas
fendita ligno facile ekbrulas
kiu frue leviĝas, facile riĉiĝas
kiu iras trankvile, iras facile
kiu kuraĝe aliras, facile akiras
kiu vivas trankvile, vivas facile
kritiki estas facile, fari malfacile
ligno fendita facile flamiĝas
nevo de Papo facile fariĝas kardinalo
ni facile forgesas, kio nin ne interesas
plej facile promeso rimiĝas kun forgeso
pli facile estas eviti ol spiti
pli facile estas malbonon eviti, ol korekti
pli facile estas multe elspezi, ol malmulte enspezi
pli facile estas multon elspezi, ol malmulton enspezi
pli facile estas ne iri, ol tro malfrue reiri
pli facile estas perdi vilaĝon, ol akiri domon
pli facile estas regi ol agi
pli facile estas vilaĝon perdi, ol domon akiri
unu kapo facile trovas apogon

**faciliĝi**
en kompanio eĉ morto faciliĝas

**fadeno**
fadeno iras, kien kudrilo ĝin tiras
kien kudrilo iras, tien fadenon ĝi tiras
ne iru fadeno antaŭ kudrilo
ŝiriĝis fadeno sur la bobeno

**fajfilo**
danci laŭ ies fajfilo

**fajro**
el flamo sin eltiris, en fajron eniris
fajro provas la oron, mizero la koron
fajron estingas akvo, pekon pardono
kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas
kiu komencis kuiri, ne forkuru de l' fajro
li pasis akvon kaj fajron kaj marĉojn kaj marojn
ne ekzistas fumo sen fajro
ne estingu la fajron, kiu vin ne bruligas
ne unu fajron li pasis, ne unu hundo lin ĉasis
riĉulo kiel fajro proksime bruligas, malproksime ne varmigas
sen fajro ne brulas eĉ pajlo
tro akra fajro estas sen daŭro

**fakto**
ne ekzistas terno sen nazo nek fakto sen bazo

**falĉilo**
trafis falĉilo sur ŝtonon

**fali**
eĉ plej ruza vulpo en kaptilon falas
falis el mano - prenu satano
feliĉo vezike sin levas, sed baldaŭ falas kaj krevas
kiu fosas sub alia, falos mem en la foson
kiu leviĝis fiere, baldaŭ falos al tero
lasi fali la manojn
ne falas frukto malproksime de l' arbo
pelis pavon, falis kavon
se la arbo falis, ĉiu branĉon derompas
se la ĉielo falus al tero, birdokaptado estus facila afero
se mi scius, kie mi falos, mi tien metus tapiŝon

**faligi**
unu hako kverkon ne faligas

**falinto**
falinton ĉiu atakas

**falo**
eĉ kvar piedoj de ĉevalo ĝin ne savas de falo
fiereco venas antaŭ la falo
ne mia estas la ĉevalo, min ne tuŝas ĝia falo
post la falo oni fariĝas singarda
rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo

**falpuŝiĝo**
ŝtono de falpuŝiĝo

**familio**
ĉiu familio havas sian kriplulon
en malsata familio mankas harmonio

**famo**
bona famo sin trenas testude, malbona kuras rapide
famo kredon allogas, sed tre ofte mensogas
famo laŭte krias, ĉiuj ekscias
famo ne flugas, se kaŭzo ne estas

**fanfaroni**
unu fojon oni donas kaj tutan vivon fanfaronas
ne fanfaronu irante, fanfaronu revenante

**faraĉo**
el la faraĉo fariĝis kaĉo

**fari**
al la malamik' en kuro faru ponton kun plezuro
amo faras ion, mono ĉion
antaŭ okuloj ne staras, doloron ne faras
bojas hundido, ĉar tiel faras la hundo
Dio ĝuste faras, neniam eraras
du botoj faras paron
du manoj faras ĉion, sed unu nenion
el la mizero oni devas fari virton
el la neceseco oni devas fari virton
faras rabon kaj ŝtelon, por oferi al Dio kandelon
fari al iu bonan lavon
fari al iu predikon pri moroj
fari al iu ursan kareson
fari aplaŭdon sur la vangon
fari el iu arkon
fari el muŝo elefanton
faru hodiaŭ, kion vi povas - morgaŭ vi eble okazon ne trovos

faru vian aferon, Dio zorgos ceteron
kapuĉo monaĥon ne faras
kaŝu malbenon kaj faru bonan mienon
kion fari!
kion mem mi faras, tion ĉie mi flaras
kiu multe parolas, ne multe faras
kiu promesojn faras, tiu ne avaras
kritiki estas facile, fari malfacile
li faras princan promeson, sed ne havas eĉ speson
li faris sian lastan translokiĝon
li jam faras la lastan spiron
malfeliĉo sin ne ĝenas, faru geston - ĝi tuj venas
mano dekstra ne sciu, kion faras la maldekstra
mizero faras lerta, mizero faras sperta
mizero faras viziton, ne atendante inviton
ne el ĉiu ligno oni faras violonon
ne faru kalkulon sen la mastro
ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ
ne sanktuloj potojn faras
nin instruas eraro, kiun faras najbaro
nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras
okazo faras ŝteliston
oni faris, oni ĉesis, kaj ni ĉion forgesis
per unu ŝtono oni du ĵetojn ne faras
pli bone ne fari, ol erari
por nenio oni faras nenion
preĝon faru, sed farunon preparu
se devigas neceso, faru kun kareso
se mi faru riverencon, mi elektas potencon
se vi faros vin ŝafo, la lupoj vin manĝos
tablo kovrita faras amikojn
unu soldato militon ne faras
via dekstra mano ne sciu, kion faras la maldekstra
volo kaj sento faras pli ol prudento
vort' en ĝusta momento faras pli ol arĝento
vortojn ŝparu, agojn faru
vulpo faras oferon - atendu danĝeron

**fariĝi**
ĉesis esti vino, sed vinagro ne fariĝis
eĉ en Parizo herbo ne fariĝas cerbo
el la faraĉo fariĝis kaĉo
el malgrandaj akveroj fariĝas grandaj riveroj
el multaj milonoj fariĝas milionoj
en infano vidiĝas, kia homo fariĝos
gasto kiel fiŝo baldaŭ fariĝas malfreŝa
ĝi fariĝis por mi osto en la gorĝo
kio fariĝis, jam ne refariĝos
kiu lupo naskiĝis, vulpo ne fariĝos

kiu naskiĝis sciuro, ne fariĝos vulturo
kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas
lumo fariĝos, kulpulo troviĝos
malpaco pro limo fariĝas kutimo, malpaco pro kredo fariĝas heredo
montru moneron, ĉio fariĝos
ne laciĝos mano, ne fariĝos pano
nenia ago fariĝas sen pago
nevo de Papo facile fariĝas kardinalo
per mono eĉ silento fariĝas elokvento
post la falo oni fariĝas singarda
se gut' al guto aliĝas, maro fariĝas
se vi ŝafo fariĝos, lupoj ne mankos
tro nutrata kapro fariĝas kiel apro

**farinto**
faro farinton rekomendas

**faristo**
granda parolisto estas duba faristo
granda parolisto, malgranda faristo

**farita**
bono farita ne estas perdita
farita - elstrekita
farita ne refariĝos
farita via faro, nun adiaŭ, mia kara!
kio estas farita, estas sankciita
kontraŭ faro farita ne helpas medito
la ĵeto estas farita
plej kruela estas redono por farita bono
rakonti ĉion faritan kaj kaŝitan

**farite**
dirite, farite

**faro**
ĉe l' freŝa faro
de parolo ĝis faro estas tre malproksime
farita via faro, nun adiaŭ, mia kara!
faro farinton rekomendas
inter faro kaj rakonto staras meze granda monto
kontraŭ faro farita ne helpas medito
lupo ŝanĝas la harojn, sed ne la farojn
malamanto de faro estas amanto de kalendaro
maljunaj jaroj, sed ne saĝaj faroj
ne hontu penti pri faro, hontu persisti en eraro
ne rapidu kun vortoj, rapidu kun faroj
ne valoras la faro la koston de l' preparo
paroloj kaj faroj estas malsamaj aferoj

per eraro ne praviĝas la faro
pli da bruo, ol da faro
pli valoras faro nenia, ol faro malbona
por ĉiu faro estas horo
pro eraro ne praviĝas la faro
rapide iras la vortoj, sed ne rapide la faroj
se ne plaĉas la najbaro, ne plaĉas lia faro
tro rapida faro estas nur baro
unu, du, tri, kvar, kaj finita la far'
vin ne tuŝu la eraroj en fremdaj faroj

**farto**
per tro multa varto malboniĝas la farto

**faruno**
al farun' malbonspeca ne helpos la spico
muso satiĝis, faruno malboniĝis
preĝon faru, sed farunon preparu

**fasto**
aŭ festo, aŭ fasto
fasto kaj preĝo riĉecon ne donas
ne ĉiam estas festo, venos ankaŭ fasto
plena stomako laŭdas la faston
por riĉulo fasto - por malriĉulo festo
post la fasto venas festo

**fava**
unu fava ŝafo tutan ŝafaron infektas

**favori**
kiun favoras la sorto, por tiu eĉ koko estas ovoporta
malsaĝulon favoras feliĉo

**favorkoreco**
puno pekon svingas, favorkoreco ĝin estingas

**favoro**
klopodi pri ĉies favoro estas pleje malsaĝa laboro
ne longe sinjora daŭras favoro
post kolero venas favoro
sorto donas favoron, sorto donas doloron

**feliĉa**
kontentulo estas pli feliĉa, ol homo plej riĉa
ne naskiĝu riĉa, naskiĝu feliĉa
pli bona estas paco feliĉa, ol havo plej riĉa
pli feliĉa estas donanto ol prenanto
pli feliĉa estas martelo insultata, ol amboso kompatata

pli feliĉa sinjoro sen havo, ol riĉulo sed sklavo

**feliĉe**
ofte saĝulo vivas malriĉe kaj malsaĝulo feliĉe

**feliĉigi**
bonaj infanoj gepatrojn feliĉigas, malbonaj ilin entombigas

**feliĉo**
en feliĉo ne fieru, en malfeliĉo esperu
facile estas danci, se la feliĉo kantas
feliĉo fierigas, malfeliĉo saĝigas
feliĉo hodiaŭ karesas, morgaŭ forgesas
feliĉo kaj riĉo envion elvokas
feliĉo leĝon ne konas
feliĉo leĝon ne obeas, subite naskiĝas, subite pereas
feliĉo venas gute, malfeliĉo venas flue
feliĉo vezike sin levas, sed baldaŭ falas kaj krevas
feliĉon oni ne heredas nek cedas
homo fidas, feliĉo decidas
kiu malmulte deziras, feliĉon akiras
kiun feliĉo subtenas, al tiu mem ĉio venas
malsaĝulon favoras feliĉo
ne ĉiu havas egalan feliĉon
ne ĉiuj havas egalan feliĉon
nur suferinto ŝatas feliĉon
pli helpas guto da feliĉo, ol barelo da saĝo
vitro kaj feliĉo ne estas fortikaj

**feliĉulo**
al feliĉulo eĉ koko donas ovojn
multaj svatiĝas, feliĉulo edziĝas

**felo**
antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon
de unu bovo oni du felojn ne deŝiras
en nomo de l' ĉielo, sed pro bono de l' felo
kiu havas malican celon, ofte perdas sian propran felon
la felo tanadon ne valoras
por li eĉ la muso ne estas sen felo

**fendita**
fendita ligno facile ekbrulas
ligno fendita facile flamiĝas

**fenestro**
al koro penetro per okula fenestro
komenciĝis mizero, ĝi venas per pordo kaj fenestroj
pelu mizeron tra l' pordo, ĝi revenos tra l' fenestro

**fera**
por pot' argila poto fera estas najbaro danĝera
teni iun per fera mano

**fermeti**
iafoje oni devas okulon fermeti

**fermi**
se io venas al buŝo, buŝon ne fermu

**fero**
forĝu feron dum ĝi estas varmega
ne batalu pot' el tero kontraŭ kaldrono el fero
oro estas pli peza ol fero, pli malpeza ol aero
rusto manĝas feron, ĉagreno la koron
rusto manĝas la feron, kaj zorgo la homon

**fervore**
preĝu kore kaj laboru fervore

**fervoro**
per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro

**festa**
tago festa - for aferoj

**festena**
tablo festena, sed telero malplena

**festene**
aŭ festene, aŭ malplene
hodiaŭ festene, morgaŭ malplene

**festeni**
ĝoju kaj festenu, sed malriĉulojn subtenu
kiam kato promenas, la musoj festenas
malsaĝulo venas, komercisto festenas
oni vokas la bovon ne festeni, sed treni

**festeno**
festeno kaj ĉaso kaj da ŝuldoj amaso
ne volas kokin' al festeno, sed oni ĝin trenas perforte
pagi por fremda festeno

pagi sen partopreno por fremda festeno
por unu - festeno, por alia - ĉagreno
troa festeno estas veneno

**festi**
kies gasto mi estas, ties feston mi festas
kun kiu vi festas, tia vi estas
liaj dentoj povas festi sabaton

**festo**
ankaŭ al nia nesto venos iam la festo
aŭ festo, aŭ fasto
kies gasto mi estas, ties feston mi festas
ne ĉiam estas festo, venos ankaŭ fasto
ofta festo - malplena kesto
por riĉulo fasto - por malriĉulo festo
post la fasto venas festo
pri laboroj maldiligenta, pri festoj plej kompetenta

**festotaga**
festotaga laboro estas sen valoro

**fianĉiĝi**
ne ĉiu fianĉiĝas, kiu svatiĝas
fianĉiĝis - por ĉiam ligiĝis

**fianĉiĝo**
fianĉiĝo ne estas edziĝo

**fianĉino**
kaprica fianĉino restos eterne fraŭlino
naskiĝas fianĉino por sia fianĉo

**fianĉo**
amaso da fianĉoj, sed la ĝusta ne venas
fianĉon de l' sorto difinitan forpelos nenia malhelpo
kiam filino edziniĝis, multaj fianĉoj troviĝis
multe da fianĉoj, sed la ĝusta ne venas
naskiĝas fianĉino por sia fianĉo

**fiasko**
plenumiĝis la tasko per granda fiasko

**fidanta**
fidanta al vorto atendas ĝis morto

**fidela**
amiko fidela estas trezoro plej bela

**fidelulo**
ne fidu fidelulon, fidu propran okulon

**fidi**
al amiko nova ne fidu sen provo
al glacio printempa kaj al amiko tro nova ne fidu
Dio ne perfidas, se homo lin fidas
Dion fidu, sed senfare ne sidu
forte sidas, kiu Dion fidas
homo fidas, feliĉo decidas
ne fidu amikon, kiu havas jam flikon
ne fidu fidelulon, fidu propran okulon
ne fidu heredon, fidu posedon
ŝajnon ne fidu, juĝi ne rapidu

**fido**
ĉe plej granda fido memoru pri perfido
ne rapidu kun fido antaŭ longa kunesido
vivi kun iu en fido kaj konfido

**fiera**
antaŭ vespero ne estu fiera
fiera mieno - kapo malplena
ju homo pli fiera, des puno pli severa
kontraŭ homo fiera Dio estas severa
mieno fiera al ludo mizera
pro homo fiera ĝojas infero

**fiere**
kiu leviĝis fiere, baldaŭ falos al tero
koko krias fiere, sed ne danĝere

**fiereco**
fiereco venas antaŭ la falo
riĉeco estas frato de fiereco

**fieri**
en feliĉo ne fieru, en malfeliĉo esperu
pri dolĉa vorto ne fieru, maldolĉan ne koleru

**fierigi**
feliĉo fierigas, malfeliĉo saĝigas

**fieriĝi**
kiu riĉiĝas, tiu fieriĝas

**filino**
edzigu filon, kiam vi volas - edzinigu filinon, kiam vi povas
kia patrino, tia filino
kiam filino edziniĝis, multaj fianĉoj troviĝis
ne valoras bofilo, kiam mortis filino
se vi volas filinon, flatu la patrinon

**filo**
filo konfesis - patro forgesis
edzigu filon, kiam vi volas - edzinigu filinon, kiam vi povas

**filozofado**
rezonado kaj filozofado panon ne donas

**filozofia**
li ne elpensis la filozofian ŝtonon

**financisto**
groŝon ŝtelis - ho, ŝtelisto! milojn ŝtelis - financisto

**fine**
akvo bolas, murmuras, sed fine ĝi kuras
eĉ vulpo plej ruza fine estas kaptata
longe ĉerpas la kruĉo, ĝis ĝi fine rompiĝas
longe ŝtelas ŝtelisto, tamen fine li pendos

**fingro**
donu fingron al avidulo, li tutan manon postulas
li minacas per fingro en la poŝo
oro nur fingron eksvingas kaj ĉion atingas

**fini**
kiu komencas tro frue, finas malfrue
komenci per Dio kaj fini per diablo
komenci per flato kaj fini per bato
oni komencas per ŝteletoj kaj finas per ŝtelegoj

**finiĝi**
kio komenciĝis, tio ankaŭ finiĝos
nun finiĝas mia klereco

**finita**
finita kaj glatigita
laboro finita, - ripozo merita
unu, du, tri, kvar, kaj finita la far’

**fino**
bona vino al la fino
ĉio havas finon
disputu komence - vi ne malpacos en fino
elektadis sen fino, edziĝis kun porkino
fino bona, ĉio bona
ĝemu kaj ploru, sed ĝis fino laboru
infana inklino restas ĝis la fino
kie regas virino, malbona estas la fino
komenca inklino daŭras ĝis la fino
la fino kronas la verkon
loĝi en la fino de la mondo
post la fino de l'batalo estas multe da kuraĝuloj
tro longa atendo ĝis fino de l'vendo
venis fino al mia latino
vi sekretos al edzino, ŝi sekretos al fratino, kaj tiel la sekreto promenados sen fino

**finofara**
doni la finofaran baton

**fiŝeto**
ekzistas ezoko, por ke fiŝetoj ne dormu

**fiŝkapti**
en akvo malklara oni fiŝkaptas facile

**fiŝo**
al fiŝ'kuirita jam akvo ne helpos
al la fiŝo ne instruu naĝarton
barakti kiel fiŝo ekster la akvo
batadi kiel fiŝo kontraŭ glacio
fiŝo granda naĝas profunde
fiŝo ne iras, sed hoko ĝin tiras
fiŝo pli granda malgrandan englutas
fiŝo scias pri naĝo ankaŭ sen via saĝo
fiŝo sen vino estas veneno
fiŝo serĉas dronon, homo serĉas bonon
fiŝo serĉas profundon, homo serĉas abundon
fiŝo volas naĝi
gasto kiel fiŝo baldaŭ fariĝas malfreŝa
ĝi estas nek viando, nek fiŝo
infanoj kaj fiŝoj voĉon ne havas
la manĝota fiŝo estas ankoraŭ en la rivero
putrado de fiŝo komenciĝas de l'kapo
volus kato fiŝojn, sed la akvon ĝi timas

**flamanta**
edziĝo pro amo flamanta al la sako sonanta

**flamiĝema**
flamiĝema kiel ligno rezina
li estas flamiĝema kiel rezina ligno

**flamiĝi**
ligno fendita facile flamiĝas

**flamo**
el flamo sin eltiris, en fajron eniris
malgranda estas la flamo, tamen ne mankas la fumo

**flanke**
mi flanke sidis, mi ne aŭdis nek vidis
se geedzoj sin batas, fremdulo restu flanke

**flanko**
ĉiu medalo du flankojn posedas
danĝera estas bovo antaŭe, ĉevalo malantaŭe, kaj malsaĝulo de ĉiuj flankoj
malsaĝulo de ĉiuj flankoj
sur ĉiu flanko nur manko kaj manko

**flari**
kion mem mi faras, tion ĉie mi flaras

**flati**
batu malbonulon, li vin flatos - kisu, li vin batos
kiu flatas al ĉiu, plaĉas al neniu
per lango flatas, per mano batas
se vi volas filinon, flatu la patrinon
tempo flatas, tempo batas

**flato**
esperis flaton - ricevis baton
komenci per flato kaj fini per bato
uzi monon kaj admonon kaj flaton kaj baton

**fleksi**
fleksu arbon dum ĝia juneco

**fleksiĝi**
pli bone fleksiĝi, ol rompiĝi

**fliki**
en fremda tegmento li flikas truon kaj en propra ne vidas la fluon
truon de l' honoro flikos neniu tajloro

**fliko**
ne fidu amikon, kiu havas jam flikon

**flori**
unu floras, alia ploras

**floro**
ambaŭ floroj de samaj valoroj
unu floro ne estas krono, unu monero ne estas mono

**flue**
feliĉo venas gute, malfeliĉo venas flue

**fluganta**
kudri per fluganta kudrilo

**flugema**
flugema kiel vento

**flugi**
famo ne flugas, se kaŭzo ne estas
li loĝas tie, kien eĉ birdo ne flugas
rostita kolombeto ne flugas al buŝeto

**flugilo**
liaj flugiloj paraliziĝis

**flugo**
koniĝas birdo laŭ flugo kaj homo laŭ ago

**flui**
ĉe tablo malplena babilo ne fluas
fluis sur lipoj, sed en buŝon ne trafis
komenciĝis proceso, mono fluas sen ĉeso
mono fluas al riĉulo, batoj al malriĉulo
riveretoj fluas al riveroj
vivo glate ne fluas, ĉiam batas kaj skuas

**fluidaĵo**
fluidaĵo sen difino, nek vinagro nek vino

**fluo**
en fremda tegmento li flikas truon kaj en propra ne vidas la fluon

**foiro**
malsaĝulo en foiro estas bona akiro

**fojno**
draŝi fojnon

**fojo**
dek fojojn mezuru, unu fojon detranĉu
unu fojon oni donas kaj tutan vivon fanfaronas
unu fojon ŝtelis pomon kaj perdis por ĉiam honestan nomon

**folio**
li tremas, kiel aŭtuna folio

**for**
for de l' okuloj, for de la koro
for el la manoj - for el kalkulo
for konscienco, venos potenco
iri for en bona hor'
li pafis sin for
pasinta doloro for el memoro
tago festa - for aferoj
venis mizero - helpu min, frato, pasis mizero, - for, malamato

**forbati**
ĉion novan oni ŝatas, malnovan oni forbatas

**forblovi**
se la tempo forblovis, ni jam helpi ne povas

**forbruli**
de malgranda kandelo forbrulis granda kastelo

**fordoni**
fordoni anseron, por ricevi paseron
pli bone estas havon fordoni, ol kun homoj malpaci
se muso nur unu truon disponas, ĝi baldaŭ la vivon fordonas

**fordormi**
fordormi la okazon

**forestanto**
la forestanto ĉiam estas malprava

**foresti**
se forestas la suno, sufiĉas la luno

**foresto**
en ĉeesto amata, en forest' insultata
foresto de ofendo estas plej bona defendo

**forfluginta**
kaptu lin kiel forflugintan venton

**forflui**
forfluu infano kune kun la bano

**forgesi**
amikon karesu, sed kalkuli ne forgesu
bone sukcesu, sed ankaŭ nin ne forgesu
bonfaron oni facile forgesas
ĉiu kreas sian forton, ĉiu forĝas sian sorton
danĝero sieĝas, al Dio ni preĝas - danĝero ĉesas, ni Dion forgesas
Dio orfojn ne forgesas
feliĉo hodiaŭ karesas, morgaŭ forgesas
filo konfesis - patro forgesis
liaj dentoj povas forgesi sian metion
malbonon oni memori ne ĉesas, bonon oni baldaŭ forgesas
ni facile forgesas, kio nin ne interesas
ni forgesas averton, ni memoras la sperton
ofte mano forgesas, kion buŝo promesas
oni bonon forgesos, malbonon memoras
oni faris, oni ĉesis, kaj ni ĉion forgesis
se malriĉulo sukcesas, li ĉiujn forgesas

**forgeso**
formeti la aferon en la keston de forgeso
kelktempa ĉeso ne estas forgeso
plej facile promeso rimiĝas kun forgeso
por regna speso ne ekzistas forgeso
post konfeso venas forgeso

**forĝi**
forĝu feron dum ĝi estas varmega

**forigi**
forigu lin!

**foriĝi**
de plendo kaj ploro ne foriĝas doloro
enpakiĝu kaj foriĝu

**foriri**
diris kaj foriris
foriris bovido, revenis bovo
gasto tro petata foriras malsata
li foriris kun longa nazo
malfeliĉo venas rajde, foriras piede
malsano venas rapide, foriras rigide

**forĵeti**
en juneco ni petas, en maljuneco forĵetas
ne havante, oni petas; ricevinte, forĵetas

**forĵetita**
pano estas alportita, korbo estu forĵetita

**forkuri**
kiu komencis kuiri, ne forkuru de l' fajro
lia animo forkuris en la pinton de la piedo
ne pelu tiun, kiu mem forkuras
sonĝo teruras, sonĝo forkuras

**forlasi**
kio pasis, nin forlasis
ne bedaŭru hieraŭan, ne atendu morgaŭan, ne forlasu hodiaŭan
oni akceptas laŭ vizaĝo, oni forlasas laŭ saĝo

**forlevi**
Dio ne ricevis, diablo forlevis

**formanĝi**
formanĝis en merkredo, ne serĉu en vendredo
kiam kato jam formanĝis, forpelado ne helpos
kiu ĉion formanĝis en tago, malsatos vespere
por ŝafon formanĝi, lupo trovos pretekston

**formeti**
formeti en arĥivon
formeti ĝis la grekaj kalendoj
formeti la aferon en la keston de forgeso

**forno**
ne el unu forno li manĝis jam panon
vivi inter forno hejtita kaj tablo kovrita

**forpelado**
kiam kato jam formanĝis, forpelado ne helpos

**forpeli**
ameno diablon ne forpelas
fianĉon de l' sorto difinitan forpelos nenia malhelpo
li forpelis siajn piedojn
prunto amikon forpelas

**forperdi**
kiu fremdan avidas, propran forperdas

**forporti**
forportu vian pakaĵon kaj havaĵon!

**forpreni**
Dio donis kaj benis, sed diablo forprenis

**forsalti**
laboro ne estas leporo - ĝi haltos, ne forsaltos

**forsavi**
forsavis sian korpon kaj animon

**forŝovi**
kiu okazon forŝovas, ĝin jam ne retrovas

**forta**
amo estas forta, sed mono pli forta
bezono estas plej forta ordono
en sia korto ĉiu kok' estas forta
ju disputo pli forta, des pli multaj la vortoj
kontraŭ forta mano la leĝo estas vana
perforta amo estas plej forta malamo
sklavo kun forta mano estas plej granda tirano
tro forta ĵuro - la afero ne pura

**forte**
forte sidas, kiu Dion fidas
kiu tro forte la manon svingas, nenion atingas

**forteco**
unueco donas fortecon

**fortigi**
laboro fortigas, ripozo putrigas
leĝo mallertulon ligas, lertulon fortigas

**fortika**
ju pli precizaj la kalkuloj, des pli fortika la amikeco
mono publika estu fortika
vitro kaj feliĉo ne estas fortikaj

**fortike**
li havas la kapon fortike sur la kolo

**fortiri**
Dio puni deziras, li la saĝon fortiras

**forto**
afabla vorto pli atingas ol forto
al mono kaj forto humiliĝas la sorto
al protekto kaj forto helpas la sorto
al venko rajto venas, se ĝin forto subtenas
ĉiu kreas sian forton, ĉiu forĝas sian sorton
deziro tre granda, sed mankas la forto
Dio punas laŭ la fortoj
fortoj leporaj, kaj kapricoj sinjoraj
ĝustatempa vorto estas granda forto
hodiaŭ forto, morgaŭ morto
kiam forto ordonas, leĝo pardonas
kie regas la forto, tie rajto silentas
kio al unu donas forton, al alia donas morton
kiom ajn oni penas, per forto plaĉo ne venas
kiu forton ne havas, ĉiam malpravas
kiu havas forton, havas rajton
kiu havas la forton, havas la rajton
knaba gusto kun forto daŭras ĝis la morto
kontraŭstari per ĉiuj fortoj
ne ekzistas forto kontraŭ la morto
por malsanulo forto, por kokido la morto
se decidos la sorto, helpos nenia forto
se ne venas per bona vorto, oni prenas per forto
venkas ne forto, venkas la sorto

**fortulo**
en propra angulo ĉiu estas fortulo

**forvelki**
kun vero severa komercaĵo forvelkos

**forveturi**
forveturis azenido kaj revenis azeno
forveturis malsaĝa, revenis nur pli aĝa

**fosi**
kiu fosas sub alia, falos mem en la foson

**foso**
kiu fosas sub alia, falos mem en la foson

**frakasi**
kio estis kaj pasis, tion tempo frakasis

**frakaso**
eliri sen frakaso el granda embaraso
granda frakaso en malgranda glaso

**france**
france saĝa, angle sovaĝa

**frapi**
eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan
kiu frapas, al tiu oni malfermas
li ne frapis al si ankoraŭ la kornojn
tablon frapas tajloro, tuj tondilo eksonas

**frapo**
ne doloras frapo sur fremda kapo

**frate**
ni amu nin frate, sed ni kalkulu akurate

**fratino**
vi sekretos al edzino, ŝi sekretos al fratino, kaj tiel la sekreto promenados sen fino

**frato**
al ĉiu frato lian parton
bato de frato estas sen kompato
kiam fratoj batalas, fremdulo ne eniĝu
li estas preskaŭ mia frato: nepo de kuzo de onklo de konato
malfeliĉoj kaj batoj venas ĉiam kun fratoj
malsato ne estas frato
mensogo kaj ŝtelo estas du fratoj
pli bona apude najbaro, ol frato post arbaro
riĉeco estas frato de fiereco
saĝa estas la frato post ricevo de l' bato
venis mizero - helpu min, frato; pasis mizero - for, malamato

**fraŭlino**
kaprica fianĉino restos eterne fraŭlino

**fremda**
de fremda dento ni doloron ne sentas
de fremda groŝo ŝiriĝas la poŝo
el fremda ledo oni tranĉas larĝe
el fremda poŝo oni pagas facile
en fremda okulo ni vidas ligneron, en nia ni trabon ne vidas
en fremda tegmento li flikas truon kaj en propra ne vidas la fluon
en fremdan vazon ne ŝovu la nazon
fremda animo estas abismo sen limo
fremda doloro ne kondukas al ploro
fremda korpo ne doloras
fremda malfeliĉo instruas
fremda manĝo havas bonan guston
fremda medito estas kaŝita
fremda mizero ne estas sufero
fremda mizero - ridinda afero
fremda spesmilo estas sen utilo
fremdan dorson bastoni - ankaŭ sian doni
fremdan vundon kaŝas vesto
inter fremdaj ŝi estas edzino-anĝelo, kun la edzo ŝi estas demono kruela
kiu fremdan avidas, propran forperdas
ne doloras frapo sur fremda kapo
ne iru al fremda anaro kun via regularo
ne laciĝu viaj manoj pri fremdaj infanoj
ne puŝu vian regularon en fremdan anaron
ne ŝovu nazon en fremdan vazon
pagi por fremda festeno
pagi sen partopreno por fremda festeno
pli valoras propra ĉemizo, ol fremda plena valizo
por fremda koro ne ekzistas esploro
propra supo brogas, fremda allogas
vian vivon ĝuu, sed fremdan ne detruu
vin ne tuŝu la eraroj en fremdaj faroj

**fremdlando**
bona estas fremdlando, sed aliaj tie loĝu
fremdlando objekton por speso donas, sed por ĝin venigi, oni spesmilon bezonas

**fremdulo**
kiam fratoj batalas, fremdulo ne eniĝu
ne punu edzinon antaŭ infanaj okuloj, ne punu infanojn antaŭ fremduloj
se geedzoj sin batas, fremdulo restu flanke

**freŝa**
ĉe l' freŝa faro

**freŝigi**
vespero lacigas, mateno freŝigas

**fripono**
kia fripono, tia bastono
vizaĝo de Katono, sed virto de fripono

**fromaĝo**
nur pano kun fromaĝo, sed afabla vizaĝo

**frosto**
frosto lin atakis
malbona herbo froston ne timas
urtikon frosto ne difektas

**frotita**
li estas frotita kaj polurita

**frue**
frue leviĝu kaj frue edziĝu
ju pli frue, des pli certe - ju pli volonte, des pli lerte
kiu frue leviĝas, facile riĉiĝas
kiu komencas tro frue, finas malfrue
kiu pli frue venas, pli bonan lokon prenas
kiu pli frue venas, pli frue muelas
kiu venas plej frue, sidas plej ĝue
kiu venis unue, muelas pli frue
morgaŭ frue venos plue

**frukto**
de semo putra venas frukto ne nutra
frukto malpermesita estas plej bongusta
laŭ la frukto oni arbon ekkonas
lernado sen fruktoj ne restas
ne falas frukto malproksime de l' arbo
scienco havas semon enuan, sed frukton bonĝuan

**frunto**
ne iru okuloj super la frunton

**fulmo**
altan arbon batas la fulmo
pura ĉielo fulmon ne timas

**fulmotondro**
kiu semas venton, rikoltos fulmotondron

**fumo**
kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas
malgranda estas la flamo, tamen ne mankas la fumo
ne ekzistas fumo sen brulo
ne ekzistas fumo sen fajro
se brulas nenio, fumo ne iras
tie iras fumo per densaj nuboj

**fundamento**
detruita ĝis la fundo de l' fundamento

**funde**
kiu ripetas abunde, lernas plej funde
sciu funde, sed tenu profunde

**fundo**
detruita ĝis la fundo de l' fundamento
li esploris iom la fundon de la glaso
sola vojo libera al la fundo rivera

**funebra**
mensogas kiel funebra parolo

**funelo**
edzino pli elverŝas per funelo, ol edzo enverŝas per sitelo
enpremi iun en funelon

**fungo**
fungon englutis!

**gaja**
en amaso eĉ morto estas pli gaja

**gajni**
kiu ne riskas, tiu ne gajnas
pli bone malmulte gajni, ol multe perdi

**gajno**
ankoraŭ la gajno ne estas en la mano
pli bona estas gajno malgranda, ol granda malgajno

**galo**
eĉ najtingalo ne estas sen galo

**garantii**
edziĝo najbara garantias de eraro
kiu garantias, trankvilon ne scias

**garantio**
disputu pri ĉio, sed sen garantio
kiu donis garantion, tiu pagu la ŝuldon

**gardata**
gardatan ŝafon eĉ lupo timas

**gardi**
amu Antonon, sed gardu vian monon
dubo gardas kontraŭ risko
gardu kandelon por la nokto
gardu min Dio kontraŭ amikoj - kontraŭ malamikoj mi gardos min mem
gardu vin du baroj: lipoj kaj dentaroj
kiu sin gardas, tiu sin savas
komercisto estas ĉasisto, li rigardas, kiu sin ne gardas
se vulpo pentofaras, gardu la kokidojn
singardeman Dio gardas

**gardo**
hazardo estas malbona gardo
sen rigardo, sen gardo

**gasto**
agrabla estas gasto, se ne longe li restas
gast' en tempo malĝusta estas ŝtono sur brusto
gasto havas akrajn okulojn
gasto kiel fiŝo baldaŭ fariĝas malfreŝa
gasto sen avizo estas agrabla surprizo
gasto tro petata foriras malsata
kies gasto mi estas, ties feston mi festas

mastro elbabilis, gastoj ne silentos
por gasto ne petita mankas kulero
por malfrua gasto restas nur osto
se la gasto estas amata, eĉ lia servanto ne restas malsata
se la gasto meritas, eĉ lia hundo profitas
se oni amas la gaston, oni zorgas la paston
sidas gasto minuton, sed vidas la tuton

**gazeto**
lerneja sekreto ne iru al gazeto
mensogas kiel gazeto

**geamantoj**
geamantoj sin pikas

**geedzoj**
geedzoj en paco vivas en reĝa palaco
se geedzoj sin batas, fremdulo restu flanke

**gefratoj**
amo kaj ĵaluzo estas gefratoj

**generalo**
bona kaporalo revas esti generalo
inter generaloj parolu pri bataloj
kiu ne estis kaporalo, ne estos generalo

**gento**
sama gento, sama sento

**gepatroj**
bonaj infanoj gepatrojn feliĉigas, malbonaj ilin entombigas

**gesto**
malfeliĉo sin ne ĝenas, faru geston - ĝi tuj venas

**glacio**
al glacio printempa kaj al amiko tro nova ne fidu
batadi kiel fiŝo kontraŭ glacio
konstrui kastelon sur glacio
mielo sur lango, kaj glacio en koro

**glaso**
granda frakaso en malgranda glaso
kiu rompis la glason, ordigu la kason
li esploris iom la fundon de la glaso
plena glaso da vino, sed kun guto da veneno
unu guto plenigas la glason
unu sola guto la glason plenigas

**glate**
la afero ne iras glate
por glate mensogi, oni spriton bezonas
vivi sate kaj glate
vivo glate ne fluas, ĉiam batas kaj skuas

**glatigita**
finita kaj glatigita

**glavo**
la lango de virino estas ŝia glavo

**glita**
okazon kaptu ĉe l' kapo, ĉar la vosto estas glita

**gliti**
ĝi glitas de li kiel pizo de muro

**glori**
kiu mem sin gloras, malbone odoras
kiu nenion valoras, plej multe sin gloras

**glorkrono**
ne helpas glorkrono al malplena kaldrono

**gloro**
bona gloro pli valoras ol oro
neniom da oro, sed bona gloro
oni ne pagas per gloro al sia tajloro

**gluti**
kiu glutis tro multe, tiu agas tro stulte
restis nenio absolute, nek por mordi, nek por gluti

**gobio**
se ezoko piiĝis, gobio ne dormu

**gorĝo**
de kantado senpaga doloras la gorĝo
ĝi fariĝis por mi osto en la gorĝo
ĝi jam staras al mi en la gorĝo
krii el la tuta gorĝo
tralavi la gorĝon
venis tranĉilo al la gorĝo

**gracie**
li saltas gracie, kiel urso ebria

**grajno**
eĉ blinda kokino povas trovi grajnon

**granda**
al grandaj sinjoroj grandaj honoroj
ĉe plej granda fido memoru pri perfido
de la buŝo ĝis la manoj estas granda interspaco
de malgranda kandelo forbrulis granda kastelo
deziro tre granda, sed mankas la forto
eĉ plej granda malbono al bono kondukas
el malgrandaj akveroj fariĝas grandaj riveroj
eliri sen frakaso el granda embaraso
en la propra sia domo ĉiu estas granda homo
esti en granda embaraso
fiŝo granda naĝas profunde
fiŝo pli granda malgrandan englutas
granda doto kaj oro, sed mankas la koro
granda estas la mondo, sed rifuĝon ne donas
granda frakaso en malgranda glaso
granda kranio, sed interne nenio
granda nubo, eta pluvo
granda nubo, malgranda pluvo
granda ofico - grandaj zorgoj
granda parolisto estas duba faristo
granda parolisto, malgranda faristo
granda parolo, sed malgranda volo
granda ŝipo bezonas profundon
granda telero, malplena kulero
grandaj malbonoj - grandaj rimedoj
ĝustatempa vorto estas granda forto
havu poton malgrandan, sed mem estu granda
inter faro kaj rakonto staras meze granda monto
ju laboro pli publika, des pli granda la kritiko
ju pli granda bezono, des pli granda la prezo
ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro
li ne estas el la grandaj saĝuloj
malgranda aspekte, sed granda intelekte
malgranda pezo, sed granda prezo
malgrandaj infanoj kaŭzas laboron, grandaj - doloron
nenio pli grandan mizeron prezentas, ol se sano mankas kaj ŝuldoj turmentas
okuloj estas pli grandaj ol la ventro
plej granda potenco kuŝas en la komenco
plenumiĝis la tasko per granda fiasko
pli bona estas gajno malgranda, ol granda malgajno
pli bona estas malgranda “jen prenu” ol granda “morgaŭ venu”

pli valoras kontenta spirito, ol granda profito
pli valoras malgranda reganto, ol granda servanto
propra sufero - plej granda sur tero
pura konscienco estas plej granda potenco
riĉulo havas grandan parencaron
sklavo kun forta mano estas plej granda tirano
timo havas grandajn okulojn
tro grandaj kalkuloj kondukas al nuloj
trovis malbonulo malbonulon pli grandan
venas ĉagreno sen granda peno

**grandaĝulo**
infano ŝtelas ovon, grandaĝulo ŝtelas bovon

**grandaĵo**
konkordo malgrandaĵon kreskigas, malkonkordo grandaĵon ruinigas

**grandiĝi**
kia naskiĝis, tia grandiĝis

**grandsinjoro**
imiti grandsinjoron - perdi baldaŭ la oron
kapricoj de grandsinjoroj kaj multego da kreditoroj
lipharo de grandsinjoro, sed koro de leporo

**granita**
eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan

**granito**
de guto post guto disfalas granito

**graso**
konsumi sian antaŭan grason

**grati**
kie jukas, tie ni gratas

**grato**
en unu sako du katoj, ĉiam mordoj kaj gratoj

**grava**
ofte de kaŭzo senenhava venas efiko plej grava

**gravediĝi**
monto gravediĝis, muso naskiĝis

**greka**
formeti ĝis la grekaj kalendoj

**greno**
kia greno, tia pano
konsumi sian grenon antaŭ ĝia maturiĝo

**griza**
griza barbo saĝon ne atestas
ne ĉio griza estas lupo
ricevi grizan haron, ne vidinte altaron

**griziĝi**
kapo malsaĝa ne griziĝas nek kalviĝas
malsaĝulo ne griziĝas nek senhariĝas

**groŝo**
de fremda groŝo ŝiriĝas la poŝo
en malfacila horo eĉ groŝ' estas valoro
groŝo ŝparita neniam perdiĝas
groŝon ŝtelis - ho, ŝtelisto! milojn ŝtelis - financisto
kiu domaĝas groŝon, perdas la tutan poŝon
kiu groŝon ne honoras, eĉ duongroŝon ne valoras
kiu groŝon ne respektas, riĉecon ne kolektas
nuda kaj kruda, sen groŝo en poŝo
ŝparu groŝon - vi havos plenan poŝon

**gustigi**
malsato plej bone gustigas la manĝon

**gusto**
ĉiu havas sian guston
ĉiu havas sian propran guston
de malriĉula manĝo ni guston ne scias
de manĝo malriĉula ni guston ne scias
en ĉiu brusto estas sia gusto
fremda manĝo havas bonan guston
kiom da homoj, tiom da gustoj
knaba gusto kun forto daŭras ĝis la morto
ordonita kiso havas guston maldolĉan
pri gustoj oni disputi ne devas
tio ĉi estas laŭ lia gusto
tute ĝuste laŭ lia gusto

**gute**
feliĉo venas gute, malfeliĉo venas flue

**guti**
ne gutas mielo el la ĉielo

**guto**
de guto post guto disfalas granito
eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan
guto malgranda, sed ŝtonon ĝi boras
kapo kun herbo, sen guto da cerbo
plena glaso da vino, sed kun guto da veneno
pli helpas guto da feliĉo, ol barelo da saĝo
se gut' al guto aliĝas, maro fariĝas
sen gutoj malgrandaj maro ne ekzistus
senĉesa guto eĉ ŝtonon traboras
unu guto plenigas la glason
unu sola guto la glason plenigas

**gvidi**
aliajn gvidas kaj mem ne vidas
ĉiu sin gvidas, kiel li vidas

**gvidilo**
plej bona gvidilo estas la lango

**gvido**
riĉeco sen gvido kiel ĉevalo sen brido

**ĝemi**
ĝemu kaj ploru, sed ĝis fino laboru
najbaro ne ĝemas, kiam boto nin premas

**ĝeni**
malfeliĉo sin ne ĝenas, faru geston - ĝi tuj venas

**ĝentila**
ĉe tro ĝentila ekstero mankas sincero
de vorto ĝentila ne doloras la lango
ĝentila kaj trankvila, kun koro el oro
per vorto ĝentila ĉio estas facila

**ĝibo**
propran ĝibon neniu vidas

**ĝibulo**
ĝibulo ĝis morto restos ĝibulo
ne ĉiu ĝibulo estas sanktulo

**ĝis**
ankoraŭ multe vi kuros, ĝis vi alkuros
atendi sur tero, ĝis sekiĝos la rivero
atendis, atendis, ĝis lin ĉerko etendis
atendis, meditis, ĝis en tombon englitis
de la buŝo ĝis la manoj estas granda interspaco
de la manoj ĝis lipoj la sup' elverŝiĝis
de majesta ĝis ridinda estas nur unu paŝo
de parolo ĝis faro estas tre malproksime
detruita ĝis la fundo de l' fundamento
fidanta al vorto atendas ĝis morto
formeti ĝis la grekaj kalendoj
ĝemu kaj ploru, sed ĝis fino laboru
ĝibulo ĝis morto restos ĝibulo
ĝis la edziĝo ĝi resaniĝos
ĝis la edziĝo venos resaniĝo
infana inklino restas ĝis la fino
inter la mano ĝis la buŝo ofte disverŝiĝas la supo
kiu mensogis per unu vorto, ne trovos kredon ĝis la morto
knaba gusto kun forto daŭras ĝis la morto
komenca inklino daŭras ĝis la fino
li estas en klopodoj de l' kapo ĝis piedoj
li sidas en ŝuldoj ĝis super la ŝultroj
li vidas nur ĝis la pinto de sia nazo
longe ĉerpas la kruĉo, ĝis ĝi fine rompiĝas
ne atingos krio ĝis la trono de Dio
ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ
neĝo kaŝas nur ĝis printempo

sidi en laboroj ĝis super la oreloj
tro longa atendo ĝis fino de l' vendo

**ĝoji**
ĝoju kaj festenu, sed malriĉulojn subtenu
pro homo fiera ĝojas infero

**ĝojigi**
laboro lacigas, sed akiro ĝojigas
tro rapida riĉiĝo diablon ĝojigas

**ĝojo**
amiko en ĝojo kaj malĝojo
amiko en ĝojo kaj ploro
kiun malĝojo ne turmentis, tiu ĝojon ne sentas
mastro en vojo - servantoj en ĝojo
nek ĝojo, nek malĝojo daŭras eterne
vivi en silko kaj veluro, en ĝojo kaj plezuro

**ĝue**
kiu venas plej frue, sidas plej ĝue

**ĝui**
malŝparulo ĝuas nelonge, avarulo neniam
vespere ĝuu lunon, sed ne serĉu la sunon
vian vivon ĝuu, sed fremdan ne detruu

**ĝuo**
de superfluo malboniĝas la ĝuo
ju pli da bruo, des malpli da ĝuo
kiu amas ĝuon, amu ankaŭ enuon
li havis viandon, mi havis nur oston - li havis la ĝuon, mi pagis la koston
li vivas en ĝuo kaj bruo

**ĝusta**
amaso da fianĉoj, sed la ĝusta ne venas
havi la orelojn sur ĝusta loko
havi orelojn sur ĝusta loko
li havas la kapon sur la ĝusta loko
multe da fianĉoj, sed la ĝusta ne venas
sanigaĵo malbongusta, sed efiko plej ĝusta
sprit' en tempo ne ĝusta estas tre malbongusta
venas prudento post la ĝusta momento
vivi laŭ postuloj de la ĝustaj kalkuloj
vort' en ĝusta momento faras pli ol arĝento

**ĝustatempa**
ĝustatempa vorto estas granda forto

**ĝuste**
Dio ĝuste faras, neniam eraras
tute ĝuste laŭ lia gusto

**hakado**
hakado de ligno donas lignerojn

**haki**
nek por baki, nek por haki
vi povas eĉ haki lignon sur lia kapo

**hakilo**
hakilo estas tranĉa, sed ne cedas la branĉo
ne iras hakilo al kolo humila
trafis hakilo al ligno malmola
trafos hakilo al ligno malmola

**hakite**
nek pikite, nek hakite

**hako**
hako post hako estas la plej efika atako
unu hako kverkon ne faligas

**halti**
kio el la dentoj elsaltas, en la lipoj ne haltas
kiu tro rapide saltas, tiu baldaŭ haltas
laboro ne estas leporo - ĝi haltos, ne forsaltos
mizero saltas, mizero haltas
muelilo haltas, muelisto eksaltas

**harmonia**
ŝafaro harmonia lupon ne timas

**harmonio**
en malsata familio mankas harmonio
kie estas harmonio, estas beno de Dio

**haro**
de zorgoj, ne de jaroj, blankiĝas la haroj
karesi kontraŭ la haroj
la haroj disstariĝas
la haroj streĉiĝas
li havas pli da ŝuldoj en la urbo, ol da haroj en la barbo
lupo ŝanĝas la harojn, sed ne la farojn
perdinta la kapon pri haroj ne ploras
pli tiras virina haro, ol ĉevala paro
ricevi grizan haron, ne vidinte altaron
se haroj ne mankus, oni kalvon ne havus
virino havas haron longan kaj saĝon mallongan

**haŭto**
juku la haŭto, sed ne sur mia korpo
streĉiĝi el la haŭto
tani al iu la haŭton
vento al li ekflugis sub la haŭto

**havaĵo**
forportu vian pakaĵon kaj havaĵon!

**havi**
ĉio havas finon
ĉiu havas sian guston
ĉiu havas sian kaŝitan mizeron
ĉiu havas sian propran guston
ĉio havas sian "sed" kaj "se"
ĉiu barono havas sian kapricon
ĉiu familio havas sian kriplulon
ĉiu havas sian ŝarĝon
ĉiu havas sian vermon
ĉiu "li" havas sian "ŝi"
ĉiu morgaŭ havas sian zorgon
ĉiu tajloro havas sian tranĉmanieron
ĉiu "tial" havas sian "kial"
du mortojn vi ne havos, de unu vi vin ne savos
fremda manĝo havas bonan guston
gasto havas akrajn okulojn
ĝi havas ankoraŭ signon de demando
havi ĉe iu krediton kaj meriton
havi iom da vaporo en la kapo
havi la ĉefan voĉon
havi la orelojn sur ĝusta loko
havi larĝan konsciencon
havi malprofiton
havi orelojn sur ĝusta loko
havu poton malgrandan, sed mem estu granda
havi varman lokon
havi vinagron en la mieno
infanoj kaj fiŝoj voĉon ne havas
jen havu!
juĝanto devas havi du orelojn
kie sklav' regadon havas, tie mastro baldaŭ sklavas
kion ni havas, por ni ne valoras - kiam ni ĝin perdis, ni ploras
kiu amas okulaĉi, ne havas kion maĉi
kiu diras la veron, havas suferon
kiu forton ne havas, ĉiam malpravas
kiu havas abelojn, havas mielon
kiu havas bonan najbaron, havas bonan tagon
kiu havas forton, havas rajton

kiu havas la forton, havas la rajton
kiu havas malican celon, ofte perdas sian propran felon
kiu havas nenion, estas nenio
kiu havas oron, havas honoron
kiu jam havas, tiu pravas
kiu mizeron ne havis, mizeron ne konas
kiu ne riskas, tiu ne havas
kiu neniun savis, malamikojn ne havas
kiu prudenton ne havas, tiun saĝo ne savas
kiu saĝon ne havas, Dio lin savas
la afero havas tempon
la muro havas orelojn
lernado havas maldolĉan radikon, sed bonan efikon
li faras princan promeson, sed ne havas eĉ speson
li havas ankoraŭ la lakton sur la lipoj
li havas ankoraŭ printempon en kapo
li havas cerbon ne tro potencan
li havas ĉiun horon alian moron
li havas dentojn ne por parado
li havas en la cerbo tro multe da herbo
li havas la kapon fortike sur la kolo
li havas la kapon sur la ĝusta loko
li havas muŝon en la kapo
li havas nek ĉelon, nek kelon
li havas pli da mono ol da bezono
li havas pli da mono, ol li povas kalkuli
li havas pli da ŝuldoj en la urbo, ol da haroj en la barbo
li havas siajn kapricojn
li havas truon en la manplato
li havis viandon, mi havis nur oston - li havis la ĝuon, mi pagis la koston
li ne havas kapon de ministro
malriĉulo parencojn ne havas
malsata stomako orelon ne havas
mensoganto devas havi bonan memoron
mi havas pri tio nek scion nek supozon
mizero havas talentan kapon
mono odoron ne havas, sian devenon ne diras
ne ĉiu havas egalan feliĉon
ne ĉiuj havas egalan feliĉon
ne elverŝu la malpuran, antaŭ ol vi havas la puran
ne fidu amikon, kiu havas jam flikon
ne havante, oni petas, ricevinte, forĵetas
nin ĉiam ravas, kion ni ne havas
ordonita kiso havas guston maldolĉan
popola kutimo havas valoron de leĝo
riĉulo havas grandan parencaron
riĉulo havas kornojn, malriĉulo dornojn
sapo blankecon ne havas, tamen blanke ĝi lavas
scienco havas semon enuan, sed frukton bonĝuan

se haroj ne mankus, oni kalvon ne havus
ŝafo donas sian lanon, por ke mastro havu panon
ŝparu groŝon - vi havos plenan poŝon
ŝparu kiam bone, vi havos kiam bezone
ŝuldo havas longan vivon
timo havas grandajn okulojn
ventro malsata orelon ne havas
virino havas haron longan kaj saĝon mallongan

**havo**
ju pli da havo, des pli da pravo
kiam havo malaperis, saĝo aperis
kun sia tuta domo kaj havo
malpli da havo, malpli da zorgoj
pli bona estas paco feliĉa, ol havo plej riĉa
pli bone estas havon fordoni, ol kun homoj malpaci
pli da havo, pli da klopodoj
pli feliĉa sinjoro sen havo, ol riĉulo sed sklavo
pri havo najbara oni estas malavara

**hazardo**
hazardo estas malbona gardo

**hejma**
hejma dometo estas kiel patrineto

**hejme**
ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme
mi hejme sidis, nenion vidis
pastro ŝafon ne prenas, ĝi hejmen revenas

**hejtita**
vivi inter forno hejtita kaj tablo kovrita

**hela**
post vetero malbela lumas suno plej hela

**helpanto**
multaj kompatantoj, sed neniu helpanto

**helpeble**
kie ne estas konsileble, tie ne estas helpeble
nek helpeble, nek konsileble

**helpi**
al farun' malbonspeca ne helpos la spico
al fiŝ' kuirita jam akvo ne helpos
al kavo senfunda ŝtopado ne helpas
al malsaĝulo ne helpas admono, nur bastono

al protekto kaj forto helpas la sorto
ĝi helpos kiel hirud' al mortinto
helpas krako kontraŭ atako
kiam kato jam formanĝis, forpelado ne helpos
kontraŭ doloro helpas bona humoro
kontraŭ faro farita ne helpas medito
kontraŭ kalumnio helpas nenio
kontraŭ lupo ne helpas kalkulo
kontraŭ neesto ne helpas protesto
kontraŭ volo de Dio helpos nenio
leĝo estas bona, se advokato ĝin helpas
ne helpas glorkrono al malplena kaldrono
ne helpas plendo nek ploro kontraŭ kreditoro
ne helpas ploro al doloro
ne helpas spegulo al malbelulo
oni konsilas kaj konsolas, sed helpi ne volas
pli helpas guto da feliĉo, ol barelo da saĝo
post la batalo preĝo ne helpas
post nokta ripozo helpas la muzo
se decidos la sorto, helpos nenia forto
se Dio ne volas, sanktulo ne helpos
se la tempo forblovis, ni jam helpi ne povas
venis mizero - helpu min, frato; pasis mizero - for, malamato

**helpo**
kiu konsilas kaj rezonas, tiu helpon ne donas

**herbeto**
dronanto eĉ herbeton kaptas avide

**herbo**
bone kreskas la herbo, sed ĉevalo jam mortis
eĉ en Parizo herbo ne fariĝas cerbo
kapo kun herbo, sen guto da cerbo
li havas en la cerbo tro multe da herbo
malbona herbo froston ne timas
vojon batitan herbo ne kovras

**hereda**
konateco ne estas hereda

**heredanto**
avarulo avaras, heredantoj malŝparas
ŝuldo estas unua heredanto

**heredi**
feliĉon oni ne heredas nek cedas

**heredo**
kun sia tuta posedo kaj heredo
malpaco pro limo fariĝas kutimo, malpaco pro kredo fariĝas heredo
ne fidu heredon, fidu posedon

**Herkulo**
kontraŭ tuta kohorto eĉ Herkulo estas malforta

**hidrargo**
li estas vera hidrargo

**hieraŭa**
ne bedaŭru hieraŭan, ne atendu morgaŭan, ne forlasu hodiaŭan

**hirudo**
ĝi helpos kiel hirud' al mortinto

**hirundo**
unu hirundo printempon ne alportas

**ho**
groŝon ŝtelis - ho, ŝtelisto! milojn ŝtelis - financisto
ho ve!

**hodiaŭ**
beleco hodiaŭ estas, morgaŭ ne restas
faru hodiaŭ, kion vi povas - morgaŭ vi eble okazon ne trovos
feliĉo hodiaŭ karesas, morgaŭ forgesas
hodiaŭ al mi, morgaŭ al vi
hodiaŭ festene, morgaŭ malplene
hodiaŭ forto, morgaŭ morto
hodiaŭ pagi vi devas, morgaŭ kredite ricevos
hodiaŭ supre, morgaŭ malsupre
ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ

**hodiaŭa**
ne bedaŭru hieraŭan, ne atendu morgaŭan, ne forlasu hodiaŭan

**hoko**
ankoraŭ la ezoko ne estas sur la hoko
fiŝo ne iras, sed hoko ĝin tiras
hoko elsaltis, afero haltis
kurbiĝu hoko laŭ postuloj de l' loko
por kapti ezokon, bongustigu la hokon

**homa**
ne ĉiam daŭras malbona vetero, ne ĉiam daŭras homa sufero

**homaro**
peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro

**homo**
al hundo bastono - al hom' leciono
aliaj domoj, aliaj homoj
brava homo en sia domo
Dio ne perfidas, se homo lin fidas
Dion kolerigis, homojn ridigis
en infano vidiĝas, kia homo fariĝos
en la propra sia domo ĉiu estas granda homo
esti anĝelo inter homoj, sed satano en la domo
estu saĝa homo en via propra domo
fiŝo serĉas dronon, homo serĉas bonon
fiŝo serĉas profundon, homo serĉas abundon
homo bagatelema
homo esperas - morto aperas
homo fidas, feliĉo decidas
homo lernas la tutan vivon
homo pafas, Dio trafas
homo proponas, Dio disponas
homo senpeka neniam ekzistis
hundo bojas, homo vojas
ju homo pli fiera, des puno pli severa
kia estas la homo, tia estas lia nomo
kia la homo, tia lia nomo
kiom da homoj, tiom da gustoj
kiun vesto ornamas, tiun homoj ekamas
koniĝas birdo laŭ flugo kaj homo laŭ ago
kontentulo estas pli feliĉa, ol homo plej riĉa
kontraŭ homo fiera Dio estas severa
kontraŭ muŝoj bravulo, kontraŭ homoj timulo
kuraĝa homo en sia domo
la plej danĝera homo - malbona in' en domo
laboro homon nutras, sen laboro li putras
laŭ la agoj de l' homo estas lia nomo
li estas homo sperta kaj lerta
mi konas miajn homojn
ne beligas loko homon, sed homo la lokon
ne ekzistas naiva vulpo, ne ekzistas homo sen kulpo
ne venas mont' al monto, sed homo homon renkontas
ne povas ĉiu homo esti Pap' en Romo
pli bona homo sen mono, ol mono sen homo
pli bone estas havon fordoni, ol kun homoj malpaci
pro homo fiera ĝojas infero

rusto manĝas la feron, kaj zorgo la homon
sanktfigurojn ornamas kaj homojn malamas
se homoj mankas, infano ankaŭ estas homo
se ne la “se” malfeliĉa, mi estus nun homo plej riĉa
suferoj sufokas kaj homoj mokas
troviĝas bonaj homoj en la mondo
vesto homon prezentas

**honesta**
ne kredas ŝtelisto, ke honestaj ekzistas
unu fojon ŝtelis pomon kaj perdis por ĉiam honestan nomon

**hop**
ne diru “hop” antaŭ la salto

**honori**
kiu groŝon ne honoras, eĉ duongroŝon ne valoras

**honoro**
al ĉiu sinjoro estu lia honoro
al grandaj sinjoroj grandaj honoroj
ekstere honoro, interne doloro
honoro ne donas, kion stomako bezonas
ju pli da honoro, des pli da laboro
kiam kreskas honoro, kreskas humoro
kiu amas honoron, amu laboron
kiu havas oron, havas honoron
laboro kondukas al honoro kaj oro
mono perdita, nenio perdita - honoro perdita, ĉio perdita
ne ekzistas honoro sen laboro
ne venas honoro sen laboro
pli bona estas virto sen oro, ol oro sen honoro
pli bona virto sen oro, ol oro sen honoro
por honoro ni dankas, se manĝ’ al ni mankas
truon de l’ honoro flikos neniu tajloro

**honti**
kiu hontas nenion, ne timas Dion
ne hontu penti pri faro, hontu persisti en eraro

**honto**
kie timo, tie honto

**hop**
ne diru “hop” antaŭ la salto

**horo**
atakis lin horo malsaĝa
en bona horo!
en malfacila horo eĉ groŝ' estas valoro
horo matena estas horo bena
iri for en bona hor'
la "tuj" de sinjoroj estas multe da horoj
li havas ĉiun horon alian moron
matena horo estas plena de oro
por ĉiu faro estas horo

**humila**
ne iras hakilo al kolo humila

**humiliĝi**
al mono kaj forto humiliĝas la sorto

**humoro**
kiam kreskas honoro, kreskas humoro
kontraŭ doloro helpas bona humoro
li estas en acida humoro

**hunda**
hunda vivo

**hunde**
li salutas profunde kaj mordas hunde

**hundejo**
dando el reĝa hundejo

**hundido**
bojas hundido, ĉar tiel faras la hundo
bojas hundido, kiel ĝi aŭdas de hundoj

**hundo**
al hundo bastono - al hom' leciono
bojas hundido, ĉar tiel faras la hundo
bojas hundido, kiel ĝi aŭdas de hundoj
bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno
hundo bojas, homo vojas
hundo bojas la vojon, vento portas la bojon
hundo bojas, pasanto vojas
hundo bonrasa estas bona por ĉaso
hundo povas boji eĉ kontraŭ la reĝo
kiu hundon mian batas, min mem ne tre ŝatas
kolera kiel rabia hundo
la lastan el amaso atakas la hundo

la luno ne aŭskultas, kiam hundo ĝin insultas
mordantaj hundoj kuras ĉiam kun vundoj
ne ĉiu hundo bojanta estas hundo mordanta
ne timu hundon bojantan, timu hundon silentan
ne unu fajron li pasis, ne unu hundo lin ĉasis
ne unu hundo lin mordis, ne unu vento lin tordis
oni lin konas, kiel makulharan hundon
por hundon dronigi, oni nomas ĝin rabia
saĝa estas la hundo post ricevo de l' vundo
saĝa hundo post la vundo
se al hundo mankas nenio, ĝin atakas rabio
se la gasto meritas, eĉ lia hundo profitas
virino kolera pli ol hundo danĝera
vivi kun iu kiel hundo kun kato

**Ĥaribdo**
trafi de Scilo al Ĥaribdo

**Ĥina**
aŭskulti kiel ĥinan predikon
ĝi estas por mi ĥina scienco

**ia**
mortinta serĉu ĉielon, vivanta ian celon

**iafoje**
iafoje oni devas okulon fermeti

**iam**
ankaŭ al nia nesto venos iam la festo
eĉ kiu plej bone pafas, tamen iam maltrafas

**ideo**
bona ideo venas post la pereo

**iele**
iele, iome, duone malbone

**ilo**
ilo el oro taŭgas por ĉiu laboro

**imiti**
imiti grandsinjoron - perdi baldaŭ la oron
ploranton ni evitas, ridanton ni imitas

**inciti**
abelujon ne incitu, amason ne spitu
malbone kaŝita ŝteliston incitas
se vi povas, profitu, sed aliajn ne incitu
urson evitu, duonpatrinon ne incitu

**infana**
infana inklino restas ĝis la fino
ne punu edzinon antaŭ infanaj okuloj, ne punu infanojn antaŭ fremduloj

**infano**
al malriĉulo infanoj ne mankas
bonaj infanoj gepatrojn feliĉigas, malbonaj ilin entombigas
bovidon mi atendis, infanon Dio sendis
Dio donis infanon, Dio donos por ĝi panon
en infano vidiĝas, kia homo fariĝos
fabeloj por infanoj
forfluu infano kune kun la bano
infano ne krias, patrino ne scias
infano ŝtelas ovon, grandaĝulo ŝtelas bovon
infanoj kaj fiŝoj voĉon ne havas
infanon malbonigas ne petolado, sed malbona kamarado
ju pli la infanoj bezonas, des pli Dio al vi donas
kiu cedas al sia infano, ĝin pereigas per propra mano
malgrandaj infanoj kaŭzas laboron, grandaj - doloron

malsaĝulo kaj infano parolas la veron
ne laciĝu viaj manoj pri fremdaj infanoj
ne punu edzinon antaŭ infanaj okuloj, ne punu infanojn antaŭ fremduloj
patroj avaras, infanoj malŝparas
pli da infanoj, pli da beno
pli da infanoj, pli da manoj
pli zorgas unu patrino pri dek infanoj, ol dek infanoj pri unu patrino
por patrino ne ekzistas infano malbela
se homoj mankas, infano ankaŭ estas homo

**infekti**
unu fava ŝafo tutan ŝafaron infektas

**infera**
donaco nesincera estas donaco infera

**infero**
en infero loĝante, kun diabloj ne disputu
li vivas sur la tero kiel en infero
per promesoj estas pavimita la infero
plena estas la infero de promesitaj aferoj
pro homo fiera ĝojas infero

**informiĝi**
se vi pri ĉio informiĝos, vi baldaŭ maljuniĝos

**inklino**
deziro kaj inklino ordonon ne obeas
eĉ ĉe kokino troviĝas propra inklino
infana inklino restas ĝis la fino
komenca inklino daŭras ĝis la fino

**ino**
la plej danĝera homo - malbona in' en domo

**insidi**
neniu vidas, kio lin insidas

**instrui**
al la fiŝo ne instruu naĝarton
eĉ malsaĝulon sperto instruos
fremda malfeliĉo instruas
instruas mizero manĝi panon sen butero
kiu ĉe l' vojo konstruas, tiun ĉiu instruas
mizero instruas
nin instruas eraro, kiun faras najbaro
ovo kokinon ne instruas

**insultata**
en ĉeesto amata, en foresto insultata
pli feliĉa estas martelo insultata, ol amboso kompatata

**insulti**
kiam pasanto jam trinkis, li la puton insultas
kiu trans muro aŭskultas, tiun la muro insultas
la luno ne aŭskultas, kiam hundo ĝin insultas
ne insultu mizeran, ne moku malliberan
ne rapidu insulti, volu aŭskulti
senditon oni aŭskultas aŭ ne aŭskultas, sed ne punas nek insultas
vi ne kredas, ne aŭskultu, sed min ne insultu

**insulto**
insulto ne algluiĝas
per insulto kaj kolero ne klariĝas afero

**intelekte**
malgranda aspekte, sed granda intelekte

**intence**
parenc' al parenco ne malhelpas intence

**intenci**
antaŭe intencu kaj poste komencu

**inter**
eĉ inter piuloj ne mankas pekuloj
esti anĝelo inter homoj, sed satano en la domo
inter kornikoj ne konvenas predikoj
inter la mano ĝis la buŝo ofte disverŝiĝas la supo
miraklo inter mirakloj
vivi inter forno hejtita kaj tablo kovrita

**interesi**
ni facile forgesas, kio nin ne interesas

**intereso**
ne ekzistas kareso sen intereso

**interkonsento**
interkonsento estas pli bona ol mono
pli valoras interkonsento, ol juĝa dokumento

**interligo**
li parolas sen senco kaj sen interligo

**interne**
ekstere honoro, interne doloro
granda kranio, sed interne nenio
vivi modere, ne tro interne nek tro ekstere

**interspaco**
de la buŝo ĝis la manoj estas granda interspaco

**intima**
pli bona amiko intima, ol parenco malproksima
por amiko intima ne ekzistas vojo malproksima
vivi kun iu en intima amikeco

**intimulo**
amiko – intimulo

**inviti**
oni invitas - venu, oni donacas – prenu

**invito**
malfeliĉo inviton ne atendas
mizero faras viziton, ne atendante inviton

**io**
amo faras ion, mono ĉion
el la buŝ' multaj vortoj eliras, sed ne ĉiuj ion diras
nek io, nek alio
nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras
pli bona estas io, ol nenio
pli bona io, ol nenio
saĝulo scias ion, sed neniu scias ĉion
se en kor' io sidas, vizaĝo perfidas
se kalumnio eĉ pasas, ĝi ĉiam ion lasas

**iom**
en ĉiu malbono estas iom da bono
havi iom da vaporo en la kapo
iom da malvero ne estas danĝero
li esploris iom la fundon de la glaso
se vi krudulon iom karesos, li al si ĉion permesos

**iome**
iele, iome, duone malbone

**iri**
al bona ĉasisto iras mem la besto
ĉiu iras, kiel saĝ' al li diras
deziru, ne deziru - ordon' estas, iru!

fadeno iras, kien kudrilo ĝin tiras
fiŝo ne iras, sed hoko ĝin tiras
ĝi iris al li preter la buŝon
iras ĉiu kruro laŭ sia plezuro
iri for en bona hor'
kie ajn rano iras, ĝi ĉiam marĉon sopiras
kie dento doloras, tien iras la lango
kien kudrilo iras, tien fadenon ĝi tiras
kio iras el koro, venas al koro
kiu iras sperte, iras certe
kiu iras trankvile, iras facile
kiu komencas juĝon, iras sub jugon
kiu timas bestaron, ne iru arbaron
kun Dio vi iros ĉien, sen Dio nenien
la afero ne iras glate
leĝo estas cedema: kien vi deziras, ĝi iras
lerneja sekreto ne iru al gazeto
lia cerbo iris promeni
liberulo iras, kien li deziras
ne fanfaronu irante, fanfaronu revenante
ne iras hakilo al kolo humila
ne iru al fremda anaro kun via regularo
ne iru fadeno antaŭ kudrilo
ne iru okuloj super la frunton
ne konante la profundecon, ne iru en la riveron
okaza komplimento ne iras al testamento
oni maron admiras, se oni maron ne iras
pensoj iras trans limo sen pago kaj timo
pli facile estas ne iri, ol tro malfrue reiri
rapide iras la vortoj, sed ne rapide la faroj
se brulas nenio, fumo ne iras
sen mensoga rekomendo ne iros la vendo
sen mono en urbon ne iru
tie iras fumo per densaj nuboj
tien okuloj iras, kion la koro deziras
unua paŝo iron direktas
vi sekrete vorton diros, ĝi tra l' tuta mondo iros

**jam**
bone kreskas la herbo, sed ĉevalo jam mortis
ĝi jam staras al mi en la gorĝo
kiam kato jam formanĝis, forpelado ne helpos
kiam pasanto jam trinkis, li la puton insultas
kiam vorto eliris, vi ĝin jam ne retiros
kio fariĝis, jam ne refariĝos
kiu jam havas, tiu pravas
kiu kapon posedas, kombilon jam trovos
kiu ne akiras, kiam li povas, tiu poste deziras, sed jam ne retrovas
kiu okazon forŝovas, ĝin jam ne retrovas
kiu perdis la kapon, ne bezonas jam ĉapon
li jam estas trans montoj kaj maro
li jam faras la lastan spiron
naivuloj jam ne ekzistas
ne el unu forno li manĝis jam panon
ne fidu amikon, kiu havas jam flikon
plej juna katido musojn jam pelas
post morto kuracilo jam estas sen utilo
pri tio jam ĉiuj paseroj babilas
se la tempo forblovis, ni jam helpi ne povas
staras la morto jam en la korto
tuta jam sata, sed okulo malsatas

**jaro**
cent jarojn silentis kaj subite sin prezentis
de zorgoj, ne de jaroj, blankiĝas la haroj
kion jaroj ne donis, ofte minuto alportas
lavu tutan jaron, negro ne blankiĝos
maljunaj jaroj, sed ne saĝaj faroj
pagas maljunaj jaroj por junaj eraroj

**jen**
jen kiaj ni estas!
jen staras la bovoj antaŭ la monto!
pli bona estas malgranda "jen prenu" ol granda "morgaŭ venu"

**Johano**
ne ĉiam estas sankta Johano

**ju**
ju cerbo pli prudenta, des lango pli silenta
ju disputo pli forta, des pli multaj la vortoj
ju homo pli fiera, des puno pli severa
ju laboro pli publika, des pli granda la kritiko
ju pli da aĉetantoj, des pli alta la prezo
ju pli da babilado, des pli da pekado
ju pli da bruo, des malpli da ĝuo

ju pli da donoj, des pli da amikoj
ju pli da havo, des pli da pravo
ju pli da honoro, des pli da laboro
ju pli da ĵuroj, des pli da suspekto
ju pli frue, des pli certe - ju pli volonte, des pli lerte
ju pli granda bezono, des pli granda la prezo
ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro
ju pli la infanoj bezonas, des pli Dio al vi donas
ju pli malproksimen la vojo, des pli da larmoj
ju pli oni babilas, des pli oni al si malutilas
ju pli oni posedas, des pli oni avidas
ju pli precizaj la kalkuloj, des pli fortika la amikeco

**Judaso**
kiso antaŭ amaso estas kiso de Judaso

**jugo**
jugo propravola ne estas malmola
kiu komencas juĝon, iras sub jugon

**juĝa**
pli valoras interkonsento, ol juĝa dokumento

**juĝanto**
juĝanto decidas, kiel li vidas
juĝanto devas havi du orelojn
kiom da juĝantoj, tiom da juĝoj
ne juĝo kondamnas, sed juĝanto

**juĝi**
ebriulon kaj malsaĝulon oni ne juĝas
en sia afero ĉiu juĝu libere
kiu kutimis ĉion juĝi, nenie povas rifuĝi
ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero
pri propra afero neniu juĝas libere
ŝajnon ne fidu, juĝi ne rapidu

**juĝisto**
venos ŝtelisto al la juĝisto

**juĝo**
juĝo komencita paciĝon ne malhelpas
kiom da juĝantoj, tiom da juĝoj
kiu komencas juĝon, iras sub jugon
kontraŭ nehavo eĉ juĝo silentas
ne juĝo kondamnas, sed juĝanto
pri kio amikoj sekretas, ili vian juĝon ne petas

**juki**
juku la haŭto, sed ne sur mia korpo
kie jukas, tie ni gratas
la mano lin jukas

**juna**
lernu juna, por esti saĝa maljuna
lernu juna - vi scios maljuna
leviĝu kun la suno, edziĝu dum juna
pagas maljunaj jaroj por junaj eraroj
plej juna katido musojn jam pelas

**juneco**
en juneco logas, en maljuneco tedas
en juneco ni petas, en maljuneco forĵetas
fleksu arbon dum ĝia juneco
juneco ne scias, maljuneco ne povas
juneco petolis, maljuneco malsatos
ne ekzistas juneco sen kapricoj, nek maljuneco sen malicoj
sango bolas, juneco petolas
se juneco estus sperta, se maljuneco estus lerta!

**junulo**
ĉiu estis junulo, ĉiu estis pekulo
pekas junuloj kaj pekas maljunuloj
se junulo ne lernis, maljunulo ne scias

**justeco**
pardonemeco superas justecon

**ĵaluzo**
amo kaj ĵaluzo estas gefratoj

**ĵeti**
ĵeti bastonon en la radon
ĵeti perlojn antaŭ la porkojn
ĵeti polvon en la okulojn
kiu supren kraĉon ĵetas, sian barbon al ĝi submetas
la ĵeto estas farita
malsaĝulo ŝtonon ĵetis, dek saĝuloj ĝin ne atingos

**ĵeto**
per unu ŝtono oni du ĵetojn ne faras

**ĵuri**
ĵuri kaj reĵuri
ĵuri per la barbo de l' Profeto
pri nenio oni povas ĵuri

**ĵuro**
ju pli da ĵuroj, des pli da suspekto
kie ĵuron vi aŭdas, malbonon suspektu
tro forta ĵuro - la afero ne pura

**ĵus**
li ĵus elrampis el la ova ŝelo

**kaĉo**
el la faraĉo fariĝis kaĉo
kiu kaĉon aranĝas, tiu ĝin manĝas
kiu kaĉon kuiris, tiu ĝin manĝu
tro da kuiristoj kaĉon difektas

**kaĝo**
kia la birdo, tia la kaĝo
pli bona branĉo sennuksa, ol kaĝo plej luksa

**kaldrono**
kaldrono ridas pri poto kaj mem estas kota
ne batalu pot' el tero kontraŭ kaldrono el fero
ne helpas glorkrono al malplena kaldrono

**kalendaro**
malamanto de faro estas amanto de kalendaro
mensogas kiel kalendaro

**kalendoj**
formeti ĝis la grekaj kalendoj

**kaleŝo**
virino eliĝis, kaleŝo senpeziĝis

**kaliko**
se la kaliko tro pleniĝas, la vino elverŝiĝas

**kalkuli**
amikon karesu, sed kalkuli ne forgesu
kalkuli muŝojn
li havas pli da mono, ol li povas kalkuli
ni amu nin frate, sed ni kalkulu akurate

**kalkulita**
ŝafo kalkulita ne estas savita

**kalkulo**
bonaj kalkuloj, bonaj kunuloj
for el la manoj - for el kalkulo
ju pli precizaj la kalkuloj, des pli fortika la amikeco
kiu vivas sen kalkulo, baldaŭ estos almozulo
kontraŭ lupo ne helpas kalkulo
mono amas kalkulon
ne faru kalkulon sen la mastro
oni metis makulon en mian kalkulon
tro grandaj kalkuloj kondukas al nuloj
unu similas nulon, ne prezentas kalkulon

vivi laŭ postuloj de la ĝustaj kalkuloj

**kalumnii**
kalumniante konstante, oni eĉ anĝelon nigrigas

**kalumnio**
kontraŭ kalumnio helpas nenio
kontraŭ kalumnio ne povas batali eĉ Dio
se kalumnio eĉ pasas, ĝi ĉiam ion lasas
se kalumnio ne brulas, ĝi almenaŭ makulas
serpenton oni povas eviti, sed kalumnion neniam

**kalviĝi**
kapo malsaĝa ne griziĝas nek kalviĝas

**kalvo**
se haroj ne mankus, oni kalvon ne havus

**kamarado**
infanon malbonigas ne petolado, sed malbona kamarado

**kameno**
du sinjoroj en unu bieno, du mastrinoj ĉe unu kameno - neniam vivas sen reciproka malbeno
kuraĝa mieno antaŭ propra kameno

**kamentubo**
notu en la kamentubo

**kampo**
arbaro aŭdas, kampo vidas
ĝi estas ankoraŭ malproksime en la kampo
ĝi staras ankoraŭ malproksime en la kampo
li serĉas la venton sur la kampo

**kampulo**
nobelo promesojn disdonas, kampulo promesojn plenumas
ofte ĉapo de kampulo kovras kapon de saĝulo
plej kuirita kampulo ĉiam restos krudulo
tondro kampulon memorigas pri Dio

**kandelingo**
pro amo al la kandelo kato lekas la kandelingon

**kandelo**
al ĉiu sanktulo apartan kandelon
de malgranda kandelo forbrulis granda kastelo
faras rabon kaj ŝtelon, por oferi al Dio kandelon
gardu kandelon por la nokto

la ludo kandelon ne valoras
la tuta ludo ne valoras kandelon
perdi la kandelon el la kapo
pro amo al la kandelo kato lekas la kandelingon

**kankro**
li scias, kie la kankroj pasigas la vintron

**kantado**
de kantado senpaga doloras la gorĝo

**kanti**
birdo kantas laŭ sia beko
facile estas danci, se la feliĉo kantas
kriu eĉ raŭke, sed kanti ne ĉesu
ofte kantas la buŝo, kiam ploras la koro

**kanto**
el kanto oni vortojn ne elĵetas
karakteron al kanto donas la tono

**kapablo**
Dio donis oficon, Dio donas kapablon
nek pio por Dio, nek kapablo por diablo

**kapo**
barbo potenca, sed kapo sensenca
ĉiu sin direktas, kiel la kap' al li diktas
enbati al si en la kapon
estu ĉapo laŭ la kapo
fiera mieno - kapo malplena
havi iom da vaporo en la kapo
kapo estas por tio, ke ĝi zorgu pri ĉio
kapo kun herbo, sen guto da cerbo
kapo majesta, sed cerbo modesta
kapo malsaĝa ne griziĝas nek kalviĝas
kapo pekas, piedoj suferas
kapoj diferencas, kranioj egalas
kia la kapo, tia la ĉapo
kio en la kapo, tio sur la lango
kiom da kapoj, tiom da opinioj
kiu kapon posedas, kombilon jam trovos
kiu perdis la kapon, ne bezonas jam ĉapon
la sama afero, sed kun la kapo al tero
li estas en klopodoj de l' kapo ĝis piedoj
li havas ankoraŭ printempon en kapo
li havas la kapon fortike sur la kolo
li havas la kapon sur la ĝusta loko
li havas muŝon en la kapo

li ne havas kapon de ministro
mankas klapo en lia kapo
mizero havas talentan kapon
multe en kapo, sed nenio en poŝo
ne bezonas la kapo konsilon de kruroj
ne doloras frapo sur fremda kapo
ofte ĉapo de kampulo kovras kapon de saĝulo
okazon kaptu ĉe l' kapo, ĉar la vosto estas glita
ordigi al iu la kapon
per la kapo malsupren
perdi la kandelon el la kapo
perdinta la kapon pri haroj ne ploras
piedo ne atentis, kapo eksentis
pli kara estas kapo ol ĉapo
pro kapo malsaĝa suferas la kruroj
putrado de fiŝo komenciĝas de l' kapo
saĝa kapo duonvorton komprenas
se stomako doloras, kapo laboras
unu kapo facile trovas apogon
vi povas eĉ haki lignon sur lia kapo

**kaporalo**
bona kaporalo revas esti generalo
kiu ne estis kaporalo, ne estos generalo

**kaprica**
kaprica fianĉino restos eterne fraŭlino

**kaprici**
ĉe stomako malsata ne kapricas palato

**kaprico**
ĉiu barono havas sian kapricon
fortoj leporaj, kaj kapricoj sinjoraj
kapricoj de grandsinjoroj kaj multego da kreditoroj
li havas siajn kapricojn
ne ekzistas juneco sen kapricoj, nek maljuneco sen malicoj

**kaprino**
eĉ kaprino plaĉas, se la doto sufiĉas

**kapro**
obstina kiel kapro
propeka kapro
sur arbon kliniĝintan saltas la kaproj
tro nutrata kapro fariĝas kiel apro

**kaproviro**
melki kaproviron

**kapti**
dronanto eĉ herbeton kaptas avide
eĉ vulpo plej ruza fine estas kaptata
kaptu lin kiel forflugintan venton
kiu ĉasas du leporojn, kaptas neniun
kiu kaptas tro vaste, konservas malmulte
lupo dormanta ŝafon ne kaptas
lupo kaptas, sed li ankaŭ enfalas
mi ne povas kapti en ĝi la sencon
okazon kaptu ĉe l' kapo, ĉar la vosto estas glita
por kapti ezokon, bongustigu la hokon
por pendigi ŝteliston, antaŭe lin kaptu
tro saltas la rato - ĝin kaptas la kato
virina rideto pli kaptas ol reto

**kaptilo**
eĉ plej ruza vulpo en kaptilon falas

**kaptita**
ne kaptita - ne punita

**kaptite**
kune kaptite, kune punite

**kapuĉo**
kapuĉo monaĥon ne faras

**kara**
al ĉiu sia propra estas ĉarma kaj kara
amiko estas kara, sed mi mem estas pli kara
amiko estas kara, sed vero pli kara
ĉio transmara estas ĉarma kaj kara
ĉiu por si mem estas la plej kara
kara estas dono en minuto de bezono
kara estas ovo, kiam venas la pasko
farita via faro, nun adiaŭ, mia kara!
ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro
malhumileco estas kara plezuro
ne bela estas kara, sed kara estas bela
pli kara estas kapo ol ĉapo
sia estas kara pli ol la najbara
tro kara aranĝo por malkara tagmanĝo

**karaktero**
karaktero olea
karakteron al kanto donas la tono

**karbo**
konservas eĉ karbo la strukturon de l' arbo

**kardinalo**
nevo de Papo facile fariĝas kardinalo

**kare**
kio kostas malmulte, kostas plej kare

**karesi**
amikon karesu, sed kalkuli ne forgesu
feliĉo hodiaŭ karesas, morgaŭ forgesas
karesi al iu la barbon
karesi kontraŭ la haroj
kiun la sorto karesas, al tiu ĉio sukcesas
kiun la sorto karesos, tiu sukcesos
ne karesu per mano, sed karesu per pano
se vi krudulon iom karesos, li al si ĉion permesos
selante ĉevalon, oni ĝin karesas
sinjoro karesas, sed baldaŭ ĉesas

**kareso**
fari al iu ursan kareson
ne ekzistas kareso sen intereso
neceso ne estas kareso
se devigas neceso, faru kun kareso

**karno**
tranĉi rekte en la karnon

**Karolo**
Petron kruro doloras, Karolo ne lamas

**karta**
pro karta preno perdiĝis bieno

**Kartago**
ne en unu tago elkreskis Kartago

**karto**
blindulo kartojn ludi ne devas
la vivo staras sur la karto

**kaso**
al kuko kaj kaso ĉiam venas amaso
kiu rompis la glason, ordigu la kason
plena kaso ŝteliston altiras
regna kaso - bona ĉaso
vivi de ŝparita kaso

**kastelo**
de malgranda kandelo forbrulis granda kastelo
kastel' en aero - malsato sur tero
konstrui kastelojn en aero
konstrui kastelon sur glacio

**kaŝebla**
tuso kaj amo ne estas kaŝeblaj

**kaŝi**
fremdan vundon kaŝas vesto
kaŝu kiom vi povos, mensogo sin elŝovos
kaŝu malbenon kaj faru bonan mienon
neĝo kaŝas nur ĝis printempo
vivon privatan kaŝu la muroj

**kaŝiĝi**
ne kaŝiĝas lia lango malantaŭ la vango

**kaŝisto**
ne ŝtelus ŝtelistoj, se ne ekzistus kaŝistoj

**kaŝita**
ĉiu havas sian kaŝitan mizeron
fremda medito estas kaŝita
malbone kaŝita ŝteliston incitas
rakonti ĉion faritan kaj kaŝitan

**kaŝite**
kio vendiĝas kaŝite, vendiĝas plej profite

**kateni**
kiu donacon prenas, tiu sin katenas
kiu sian langon katenas, Dio lin benas

**kateniĝo**
tro rapida edziĝo - porĉiama kateniĝo

**kateno**
aŭ ministran postenon, aŭ pundoman katenon

**katido**
plej juna katido musojn jam pelas

**kato**
danci kiel kato ĉirkaŭ poto
en unu sako du katoj, ĉiam mordoj kaj gratoj
kiam kato jam formanĝis, forpelado ne helpos

kiam kato promenas, la musoj festenas
kontentigi la katon kaj kune la raton
muso la katon ĉiam ofendis
ne venos rato mem al la kato
pro amo al la kandelo kato lekas la kandelingon
renkontiĝis la kato kun sentima rato
scias la kato, kies lardon ĝi manĝis
se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas
tro saltas la rato - ĝin kaptas la kato
vivi kun iu kiel hundo kun kato
volus kato fiŝojn, sed la akvon ĝi timas

**Katono**
vizaĝo de Katono, sed virto de fripono

**kaŭzi**
malgrandaj infanoj kaŭzas laboron, grandaj – doloron

**kaŭzo**
famo ne flugas, se kaŭzo ne estas
ofte de kaŭzo senenhava venas efiko plej grava

**kavo**
al kavo senfunda ŝtopado ne helpas
pelis pavon, falis kavon

**kelktempa**
kelktempa ĉeso ne estas forgeso

**kelo**
li havas nek ĉelon, nek kelon
malfermita kelo tentas al ŝtelo

**kesto**
formeti la aferon en la keston de forgeso
ofta festo - malplena kesto

**kia**
en infano vidiĝas, kia homo fariĝos
jen kiaj ni estas!
kia ago, tia pago
kia demando, tia respondo
kia domaĝo!
kia drapo, tia vesto
kia estas la homo, tia estas lia nomo
kia estas via laboro, tia estas via valoro
kia fripono, tia bastono
kia greno, tia pano

kia la birdo, tia la kaĝo
kia la homo, tia lia nomo
kia la kapo, tia la ĉapo
kia la poto, tia la kovrilo
kia la semo, tia la rikolto
kia naskiĝis, tia grandiĝis
kia naskinto, tiaj naskitoj
kia oni vin vidas, tia oni vin taksas
kia pago, tia ago
kia paroĥestro, tia paroĥo
kia patrino, tia filino
kia regalato, tia regalado
kia reganto, tia servanto
kia sono, tia resono
kia sufloro, tia aktoro
kia vivo, tia morto
kiaj kolegoj, tiaj kutimoj

**kial**
ĉiu "tial" havas sian "kial"

**kiam**
aperas prudento, kiam pasis la momento
ĉio dependas de "se" kaj "kiam"
eĉ malgranda muŝo ne estas sen buŝo
edzigu filon, kiam vi volas - edzinigu filinon, kiam vi povas
kara estas ovo, kiam venas la Pasko
kiam filino edziniĝis, multaj fianĉoj troviĝas
kiam filino edziniĝis, multaj fianĉoj troviĝis
kiam forto ordonas, leĝo pardonas
kiam fratoj batalas, fremdulo ne eniĝu
kiam havo malaperis, saĝo aperis
kiam kato jam formanĝis, forpelado ne helpos
kiam kato promenas, la musoj festenas
kiam kreskas honoro, kreskas humoro
kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas
kiam pasanto jam trinkis, li la puton insultas
kiam pasis la aĝo, aperas la saĝo
kiam sako mizeras, amo malaperas
kiam vorto eliris, vi ĝin jam ne retiros
kion ni havas, por ni ne valoras - kiam ni ĝin perdis, ni ploras
kiu ne akiras, kiam li povas, tiu poste deziras, sed jam ne retrovas
konsilojn ĉiu donas, sed ne kiam oni bezonas
kuraĝe li staras, kiam muro lin baras
la luno ne aŭskultas, kiam hundo ĝin insultas
najbaro ne ĝemas, kiam boto nin premas
ne valoras bofilo, kiam mortis filino
ne veku malfeliĉon, kiam ĝi dormas
nuksoj venis, kiam dentoj elfalis

ofte kantas la buŝo, kiam ploras la koro
ŝparu kiam bone, vi havos kiam bezone

**kie**
eĉ signo ne restis, kie urbo estis
fadeno iras, kien kudrilo ĝin tiras
kie ajn rano iras, ĝi ĉiam marĉon sopiras
kie dento doloras, tien iras la lango
kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas
kie estas harmonio, estas beno de Dio
kie estas mielo, tie muŝoj ne mankas
kie estas pano, ne mankas panpecetoj
kie estas sufero, estas ankaŭ espero
kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas
kie jukas, tie ni gratas
kie ĵuron vi aŭdas, malbonon suspektu
kie lumo ekzistas, ankaŭ ombro troviĝas
kie maldike, tie rompiĝas
kie mi disponas, tie mi ordonas
kie minaco, tie malpaco
kie ne estas konsileble, tie ne estas helpeble
kie pano estas, tie musoj ne mankas
kie regas konkordo, regas ordo
kie regas la forto, tie rajto silentas
kie regas virino, malbona estas la fino
kie sklav' regadon havas, tie mastro baldaŭ sklavas
kie timo, tie honto
kien ajn mi pafas, ĉio maltrafas
kien kudrilo iras, tien fadenon ĝi tiras
kien vi vin turnos, ĉie malbone
kiu aŭskultas, kie li ne devas, tiu aŭdas, kion li ne revas
leĝo estas cedema, kien vi deziras, ĝi iras
li loĝas tie, kien eĉ birdo ne flugas
li scias, kie la kankroj pasigas la vintron
liberulo iras, kien li deziras
Romo estas tie, kie estas la Papo
sonorado al li venas, sed de kie - li ne komprenas

**kiel**
al malriĉulo ovo kiel al riĉulo bovo
aŭskulti kiel ĥinan predikon
barakti kiel fiŝo ekster la akvo
batadi kiel fiŝo kontraŭ glacio
bojas hundido, kiel ĝi aŭdas de hundoj
certaĵo kaj leĝo, kiel amen en preĝo
certe, kiel duoble du kvar
ĉio estas por li kiel polvero sur la tero
ĉiu manĝas, kiel li aranĝas
ĉiu sin direktas, kiel la kap' al li diktas

ĉiu sin gvidas, kiel li vidas
danci kiel kato ĉirkaŭ poto
eksplodema kiel pulvo
eksplodis kiel pulvo
flamiĝema kiel ligno rezina
flugema kiel vento
gasto kiel fiŝo baldaŭ fariĝas malfreŝa
ĝi estas kiel mustardo post la manĝo
ĝi glitas de li kiel pizo de muro
ĝi helpos kiel hirud' al mortinto
ĝi ne estas tiel facila, kiel laboro argila
ĝi tuŝas lin, kiel akvo anseron
hejma dometo estas kiel patrineto
ili estas en akordo, kiel peto kaj mordo
juĝanto decidas, kiel li vidas
kaptu lin kiel forflugintan venton
kiel akirite, tiel perdite
kiel li meritis, tiel li profitis
kiel oni sternas, tiel oni dormas
kiel oni vin taksas, tiel oni vin regalas
kiel oni vin vidas, tiel oni vin taksas
kiel oni, tiel ĉe ni
kio min ne tuŝas, kuŝu kiel kuŝas
kolera kiel cento da diabloj
kolera kiel rabia hundo
kuradi kiel venenita muso
kurbiĝadi kiel diablo en akvo benita
li ekscitiĝas kiel bolanta lakto
li estas flamiĝema kiel rezina ligno
li estas kompetenta, kiel besto pri arĝento
li komprenas predikon, kiel bovo muzikon
li saltas gracie, kiel urso ebria
li tremas, kiel aŭtuna folio
li vivas sur la tero kiel en infero
li zorgas pri ĝi kiel pri neĝo pasintjara
malaperis kiel ŝtono en maron
malaperis kiel vaporo
malriĉa kiel muso preĝeja
malsaĝa kiel ŝtipo
malsaĝulo kiel tamburo - kiu pasas, lin batas
mensogas kiel funebra parolo
mensogas kiel gazeto
mensogas kiel kalendaro
mola kiel vakso
ne vivu kiel vi volas, vivu kiel vi povas
oni lin konas, kiel blankan lupon
oni lin konas, kiel makulharan hundon
oni lin konas, kiel malbonan moneron
prenu kiel vi volas, la poto ĉiam bolas

riĉeco sen gvido kiel ĉevalo sen brido
riĉulo kiel fajro proksime bruligas, malproksime ne varmigas
rigardaĉi kiel bovido
saltadi ĉirkaŭ afero, kiel blovata neĝero
se elsaltas la okazo, ĝi rompiĝas kiel vazo
sidi kiel muso sub balailo
sidi kiel sur pingloj
stari por iu kiel muro kaj turo
tro nutrata kapro fariĝas kiel apro
turniĝadi kiel serpento
tute libera, kiel birdo aera
vera kiel vorto de profeto
vivi kiel ĉe la brusto de Dio
vivi kiel kuko en butero
vivi kun iu kiel hundo kun kato
vorto donita estas kiel leĝo

**kies**
kies gasto mi estas, ties feston mi festas

**kiom**
birdo petolas, kiom ĝi volas
kaŝu kiom vi povos, mensogo sin elŝovos
kiom ajn oni penas, per forto plaĉo ne venas
kiom ajn vi penos, nenio elvenos
kiom da homoj, tiom da gustoj
kiom da juĝantoj, tiom da juĝoj
kiom da kapoj, tiom da opinioj
kiom da koroj, tiom da voloj
kiom la koro deziras
mensogu kiom vi volas, sed memoru kion vi parolas

**kisi**
batu malbonulon, li vin flatos - kisu, li vin batos
kiu mordi ne povas, kisi ekprovas

**kiso**
kiso antaŭ amaso estas kiso de Judaso
kiso malsincera estas danĝera
kiso publika estas kiso malamika
ordonita kiso havas guston maldolĉan

**klapo**
mankas klapo en lia kapo

**klara**
el klara ĉielo tondro ekbatis

**klarigo**
ni reciproke nin konas, klarigon ne bezonas

**klariĝi**
per insulto kaj kolero ne klariĝas afero

**klereco**
nun finiĝas mia klereco
sciencon oni ne mendas, klerecon oni ne vendas

**klini**
plena sako ĉiun mastron al vi klinos

**kliniĝinta**
sur arbon kliniĝintan saltas la kaproj

**klopodi**
ĉiu klopodu nur en sia metio, tiam al la urbo mankos nenio
klopodi pri ĉies favoro estas pleje malsaĝa laboro
klopodi sen limo per korpo kaj animo

**klopodo**
klopodo estas kun mono, sed sen ĝi pli malbone
li estas en klopodoj de l' kapo ĝis piedoj
mankis al Petro klopodoj, li aĉetis al si domon
pli da havo, pli da klopodoj

**knaba**
knaba gusto kun forto daŭras ĝis la morto

**knabeto**
venos knabeto ankaŭ kun peto

**knabino**
ne prediku knabino al via patrino
resti maljuna knabino

**knabo**
knabon senfortan ĉiuj batoj atingas

**knari**
rado malbona knaras plej multe

**kohorto**
kontraŭ tuta kohorto eĉ Herkulo estas malforta

**kojno**
oni elbatas kojnon per kojno

**kokido**
por malsanulo forto, por kokido la morto
se vulpo pentofaras, gardu la kokidojn
vulpo mienon ŝanĝas, sed plue kokidojn manĝas

**kokino**
al kokino la ovo lecionojn ne donu
eĉ blinda kokino povas trovi grajnon
eĉ ĉe kokino troviĝas propra inklino
ne volas kokin' al festeno, sed oni ĝin trenas perforte
ne trovante bovinon, oni ŝtelas kokinon
ovo kokinon ne instruas
senplumigi kokinon, ne vekante mastrinon

**koko**
al feliĉulo eĉ koko donas ovojn
bovo prenita, koko donita kaj - kvita
en sia korto ĉiu kok' estas forta
kiun favoras la sorto, por tiu eĉ koko estas ovoporta
koko krias fiere, sed ne danĝere

**kolego**
kiaj kolegoj, tiaj kutimoj
ne estas piediranto kolego al rajdanto

**kolekti**
kiu groŝon ne respektas, riĉecon ne kolektas
li kuraĝon kolekti ne bezonas

**kolera**
kolera kiel cento da diabloj
kolera kiel rabia hundo
virino kolera, pli ol hundo danĝera

**koleri**
kiu koleras, tiu ne prosperas
kiu koleras, tiu perdas
pri dolĉa vorto ne fieru, maldolĉan ne koleru

**kolerigi**
Dion kolerigis, homojn ridigis

**kolero**
elverŝi sur iun sian koleron
kolero montras malsaĝulon
kolero pravecon ne donas
pekinto pentas - kolero silentas
per insulto kaj kolero ne klariĝas afero
post kolero venas favoro
sen povo kolero estas ridinda afero

**kolo**
li havas la kapon fortike sur la kolo
mizero piedojn sanigas, kolon elastigas
ne iras hakilo al kolo humila
troa petolo estas danĝera por la kolo

**kolombeto**
rostita kolombeto ne flugas al buŝeto

**koloro**
de sama koloro, de sama valoro
kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas

**komandi**
ĉiun demandu, sed mem al vi komandu

**kombilo**
kiu kapon posedas, kombilon jam trovos

**komenca**
komenca inklino daŭras ĝis la fino

**komence**
disputu komence - vi ne malpacos en fino

**komenci**
antaŭe intencu kaj poste komencu
kiu komencas juĝon, iras sub jugon
kiu komencas tro frue, finas malfrue
kiu komencis kuiri, ne forkuru de l' fajro
komenci de Adamo
komenci per Dio kaj fini per diablo
komenci per flato kaj fini per bato
oni komencas per ŝteletoj kaj finas per ŝtelegoj

**komenciĝi**
putrado de fiŝo komenciĝas de l' kapo
komenciĝis mizero, ĝi venas per pordo kaj fenestroj
komenciĝis proceso, mono fluas sen ĉeso
kio komenciĝis, tio ankaŭ finiĝos

**komencita**
juĝo komencita paciĝon ne malhelpas

**komencite**
multe komencite, malmulte plenumite

**komenco**
ĉiu komenco estas malfacila
komenco aprila - trompo facila
komenco bona - laboro duona
plej granda potenco kuŝas en la komenco

**komerca**
ne taŭgas la vero por komerca afero

**komercaĵo**
kun vero severa komercaĵo forvelkos

**komerci**
kiu volas komerci, tiu saĝon bezonas

**komercisto**
komercisto estas ĉasisto, li rigardas, kiu sin ne gardas
malsaĝulo venas, komercisto festenas

**komerco**
ne ekzistas en komerco amikeco nek ŝerco

**kompanio**
en kompanio eĉ morto faciliĝas

**komparo**
komparo ne estas pruvo
surmeto rompas, komparo trompas

**kompatanto**
multaj kompatantoj, sed neniu helpanto

**kompatata**
pli feliĉa estas martelo insultata, ol amboso kompatata

**kompati**
Dio batas, Dio kompatas
Dio kompatu!

**kompatigi**
pli bone estas enviigi, ol kompatigi

**kompato**
bato de frato estas sen kompato
mi ne volas baton, mi ne volas kompaton

**kompetenta**
li estas kompetenta, kiel besto pri arĝento
pri laboroj maldiligenta, pri festoj plej kompetenta

**komplezema**
komplezema malsaĝulo estas pli danĝera ol malamiko

**komplezo**
por amiko komplezo neniam estas tro peza

**komplimento**
okaza komplimento ne iras al testamento

**kompreni**
batita komprenas aludon
diablo ŝercon ne komprenas, vokite li venas
estis la tempo, ni ne komprenis, pasis la tempo, la saĝ' al ni venis
kion saĝulo ne komprenas, ofte malsaĝa divenas
la morto ŝercon ne komprenas: oni ĝin vokas, ĝi venas
la tempo venos, ni ĉion komprenos
li komprenas predikon, kiel bovo muzikon
malsaĝulo diris vorteron, saĝulo komprenas la tutan aferon
saĝa kapo duonvorton komprenas
sonorado al li venas, sed de kie - li ne komprenas
sata malsatan ne povas kompreni

**komuna**
azenon komunan oni batas plej multe
malfeliĉo komuna estas malpli premanta
sango komuna reciproke sin altiras

**komune**
amo kaj puno loĝas komune

**konateco**
konateco ne estas hereda

**konato**
li estas preskaŭ mia frato: nepo de kuzo de onklo de konato

**kondamni**
ne aŭskultinte, ne kondamnu
ne juĝo kondamnas, sed juĝanto
ne kondamnu alian, oni vin ne kondamnos

**kondiĉo**
samaj kondiĉoj, samaj superstiĉoj

**konduki**
disputoj kondukas al malpaco
eĉ plej granda malbono al bono kondukas
espero kaj pacienco kondukas al potenco
fremda doloro ne kondukas al ploro
konduki la dancojn
laboro kaj pacienco kondukas al potenco
laboro kondukas al honoro kaj oro
malriĉeco ne estas krimo, tamen kondukas al malestimo
mensogo malproksimen ne kondukas
peto kaj demando kondukas tra l' tuta lando
petolado sen mezuro ne kondukas al plezuro
rekomendo kondukas al plendo
tro da konfido kondukas al perfido
tro da libero kondukas al mizero
tro grandaj kalkuloj kondukas al nuloj
tro rapida akcelo ne kondukas al celo
vivo sen modero kondukas al mizero

**konfesi**
filo konfesis - patro forgesis

**konfeso**
post konfeso venas forgeso

**konfidi**
kiu ne konfidas, tiu ne bedaŭras
konfidu, sed vidu

**konfido**
konfido naskas konfidon
kun konfido neniam rapidu
tro da konfido kondukas al perfido
vivi kun iu en fido kaj konfido

**koni**
feliĉo leĝon ne konas
kiu metion disponas, mizeron ne konas
kiu mizeron ne havis, mizeron ne konas
kiu panon donas, malsaton ne konas
kiu tro bezonas, tiu leĝon ne konas
mi konas miajn homojn
ne konante la profundecon, ne iru en la riveron
ni reciproke nin konas, klarigon ne bezonas
oni lin konas kiel blankan lupon
oni lin konas kiel makulharan hundon
oni lin konas kiel malbonan moneron
sako ne sonas - amiko ne konas
se ĉiu speson donos, malriĉulo malsaton ne konos
se edzino ordonas, domo ordon ne konas
ŝlosilo uzata ruston ne konas
virta virino straton ne konas
volo kaj deziro leĝojn ne konas

**koniĝi**
koniĝas birdo laŭ flugo kaj homo laŭ ago
koniĝas majstro laŭ sia verko

**konjekti**
Petro parolas sen direkto, sed Paŭlo konjektu

**konkorda**
pli valoras konkorda ovo, ol malkonkorda bovo

**konkordo**
kie regas konkordo, regas ordo
konkordo malgrandaĵon kreskigas, malkonkordo grandaĵon ruinigas

**konscie**
senkonscie vi agis - konscie vi pagos

**konscienco**
for konscienco, venos potenco
havi larĝan konsciencon
konscienco senmakula estas kuseno plej mola
konscienco trankvila estas bona dormilo
kovri la buŝon de sia konscienco

la konscienco lin ne turmentas
pli bona pura konscienco, ol malpura potenco
pura konscienco estas plej granda potenco

**konsenti**
kiu pri ŝtelo silentas, tiu ŝtelon konsentas
vane vi tentas, mi ne konsentos

**konsento**
konsento konstruas, malpaco detruas
silento estas konsento

**konservi**
kiu kaptas tro vaste, konservas malmulte
konservas eĉ karbo la strukturon de l' arbo

**konsideri**
malpli esperu, pli konsideru

**konsidero**
longa konsidero savas de sufero

**konsileble**
kie ne estas konsileble, tie ne estas helpeble
nek helpeble, nek konsileble

**konsili**
kiu konsilas kaj rezonas, tiu helpon ne donas
konsilu kiu povas
oni konsilas kaj konsolas, sed helpi ne volas

**konsilo**
konsilojn ĉiu donas, sed ne kiam oni bezonas
kontraŭ ĉiu malfacilo ekzistas konsilo
montroj kaj konsiloj estas facilaj
ne bezonas la kapo konsilon de kruroj
post dorma trankvilo venas bona konsilo
restas nek konsilo, nek konsolo
venos tempo, venos konsilo

**konsisti**
ĉiuj milionoj konsistas el milonoj

**konsoli**
kiu multe parolas, malamikon konsolas
oni konsilas kaj konsolas, sed helpi ne volas

**konsoliĝi**
konsoliĝas mizerulo, se li estas ne sola

**konsolo**
restas nek konsilo, nek konsolo

**konspiri**
kontraŭ vesto malbona konspiras ĉiu ŝtono

**konstante**
eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan
kalumniante konstante, oni eĉ anĝelon nigrigas
kiu konstante lokon ŝanĝas, neniam sin aranĝas
ne sama la vento blovas konstante

**konstrui**
al pec' pecon algluas, kiu neston konstruas
kiu ĉe l' vojo konstruas, tiun ĉiu instruas
konsento konstruas, malpaco detruas
konstrui kastelojn en aero
konstrui kastelon sur glacio

**konstruo**
nenia konstruo povas esti sen bruo

**konsumi**
konsumi sian antaŭan grason
konsumi sian grenon antaŭ ĝia maturiĝo

**kontenta**
pli valoras kontenta spirito, ol granda profito

**kontenteco**
kontenteco estas pli bona ol riĉeco

**kontentigi**
kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas
kontentigi la katon kaj kune la raton

**kontentulo**
kontentulo estas pli feliĉa, ol homo plej riĉa

**kontraŭ**
bataladi kontraŭ la sorto
brava batalanto kontraŭ plado bolanta
bravulo kontraŭ muŝo, sed muŝo kontraŭ bravulo
du kontraŭ unu prezentas armeon
dubo gardas kontraŭ risko

eĉ kontraŭ pastra prediko troviĝas kritiko
gardu min Dio kontraŭ amikoj, kontraŭ malamikoj mi gardos min mem
helpas krako kontraŭ atako
hundo povas boji eĉ kontraŭ la reĝo
karesi kontraŭ la haroj
kontraŭ bato senatenda ekzistas nenia defendo
kontraŭ ĉiu malfacilo ekzistas konsilo
kontraŭ ĉiu tedo ekzistas rimedo
kontraŭ doloro helpas bona humoro
kontraŭ faro farita ne helpas medito
kontraŭ forta mano la leĝo estas vana
kontraŭ homo fiera Dio estas severa
kontraŭ kalumnio helpas nenio
kontraŭ kalumnio ne povas batali eĉ Dio
kontraŭ lupo ne helpas kalkulo
kontraŭ malfeliĉo ne defendas eĉ riĉo
kontraŭ malfeliĉoj baro ne ekzistas
kontraŭ muŝoj bravulo, kontraŭ homoj timulo
kontraŭ neesto ne helpas protesto
kontraŭ nehavo eĉ juĝo silentas
kontraŭ peko batalu, sed pekanton ne tuŝu
kontraŭ peko prediku, sed pekinton pardonu
kontraŭ tuta kohorto eĉ Herkulo estas malforta
kontraŭ vesto malbona konspiras ĉiu ŝtono
kontraŭ volo de Dio helpos nenio
la “por” kaj la “kontraŭ”
ne batalu pot’ el tero kontraŭ kaldrono el fero
ne defendas oro kontraŭ doloro
ne ekzistas forto kontraŭ la morto
ne ekzistas savo kontraŭ malbona virino
ne helpas plendo nek ploro kontraŭ kreditoro

**kontraŭstari**
kontraŭstari per ĉiuj fortoj

**kontraŭvola**
neceseco kontraŭvola estas leĝo malmola

**kontroli**
drinku tutajn tagojn, sed kontrolu viajn agojn

**kontrolo**
ne kredu al parolo sen propra kontrolo
se vi sendis malsaĝulon, sendu kontrolon

**konveni**
al ĉiu konvenas, kio al li apartenas
inter kornikoj ne konvenas predikoj
kio konvenas al sciuro, ne konvenas al vulturo

**kora**
amo pli kora, disiĝo pli dolora

**korbo**
pano estas alportita, korbo estu forĵetita

**kore**
amu edzinon plej kore, sed tenu ŝin bonmore
preĝu kore kaj laboru fervore

**korekti**
pli facile estas malbonon eviti, ol korekti

**korniko**
korniko vundita propran voston timas
inter kornikoj ne konvenas predikoj
ne naskas porko leonidon, nek korniko aglidon
nigran kornikon sapo ne blankigos

**korno**
al porko Dio kornojn ne donas
li ne frapis al si ankoraŭ la kornojn
Petro kornojn tenas, Paŭlo lakton prenas
riĉulo havas kornojn, malriĉulo dornojn

**koro**
al koro penetro per okula fenestro
belecon taksas ne okulo sed koro
de l' koro spegulo estas la okulo
doto koron ne varmigas
eĉ pinglo povas koron trapiki
edziĝo laŭ koro, laŭ la kvanto da oro
en buŝo Biblio, en koro malpio
fajro provas la oron, mizero la koron
for de l' okuloj, for de la koro
granda doto kaj oro, sed mankas la koro
ĝentila kaj trankvila, kun koro el oro
kio en koro sidas, la vizaĝo perfidas
kio iras el koro, venas al koro
kiom da koroj, tiom da voloj
kiom la koro deziras
kion koro portas, vizaĝo raportas
kion koro sentas, lango prezentas
koro pleniĝas - lango moviĝas
koro tro plena - buŝo parolas
lango miela, sed koro kruela
lipharo de grandsinjoro, sed koro de leporo
malkovri antaŭ iu sian koron

mielo sur lango, kaj glacio en koro
ofte kantas la buŝo, kiam ploras la koro
por fremda koro ne ekzistas esploro
rusto manĝas feron, ĉagreno la koron
se en kor' io sidas, vizaĝo perfidas
se okulo ne vidas, koro ne avidas
tien okuloj iras, kion la koro deziras
vizaĝo sen kulpo, sed koro de vulpo

**korpo**
forsavis sian korpon kaj animon
fremda korpo ne doloras
juku la haŭto, sed ne sur mia korpo
klopodi sen limo per korpo kaj animo
kuri de sia propra korpo
ili vivas per unu animo en du korpoj

**korto**
balaaĵon el korto eksteren ne elportu
en sia korto ĉiu kok' estas forta
staras la morto jam en la korto

**korvo**
korvo al korvo okulon ne pikas

**kosti**
demando ne kostas, demando ne devigas
kio kostas malmulte, kostas plej kare
kio multe kostas, multe valoras
pli kostas la sako, ol la tuta pako
senpaga estas nur la morto, sed ĝi kostas la vivon

**kosto**
li havis viandon, mi havis nur oston - li havis la ĝuon, mi pagis la koston
ne valoras la faro la koston de l' preparo

**koti**
ne kotas besto en sia nesto

**kota**
kaldrono ridas pri poto kaj mem estas kota

**koto**
kiu ludas kun koto, malpurigas la manojn
trafi per la vizaĝo en koton

**kovri**
akvon senmovan kovras putraĵo
bedaŭro kaj ĉagreno ŝuldon ne kovras
difekton de naturo ne kovros veluro
kovri la buŝon de sia konscienco
ofte ĉapo de kampulo kovras kapon de saĝulo
vojon batitan herbo ne kovras

**kovrilo**
kia la poto, tia la kovrilo

**kovrita**
paroli per vortoj kovritaj
tablo kovrita faras amikojn
vivi inter forno hejtita kaj tablo kovrita

**kraĉi**
al Dio plaĉu, sed sur diablon ne kraĉu
en puton ne kraĉu, ĉar vi trinki bezonos
ne kraĉu en puton, ĉar vi trinki bezonos

**kraĉo**
kiu supren kraĉon ĵetas, sian barbon al ĝi submetas

**krakanta**
arbo krakanta venton ne timas

**kraki**
li mensogas tiel, ke la muroj krakas

**krako**
helpas krako kontraŭ atako

**kranio**
de tro multa scio krevas la kranio
en ĉiu kranio estas sia opinio
en ĉiu kranio regas aparta opinio
granda kranio, sed interne nenio
kapoj diferencas, kranioj egalas

**kredi**
al promeso oni ne kredas - kredu, kiu posedas
ne kredas ŝtelisto, ke honestaj ekzistas
ne kredu al orelo, kredu al okulo
ne kredu al parolo sen propra kontrolo
vi ne kredas, ne aŭskultu, sed min ne insultu

**kredigi**
disputo kredigas, sed ne certigas

**kredite**
hodiaŭ pagi vi devas, morgaŭ kredite ricevos

**krediti**
vilaĝano kreditas, vilaĝestro prunteprenas

**kredito**
havi ĉe iu krediton kaj meriton

**kreditoro**
kapricoj de grandsinjoroj kaj multego da kreditoroj
ne helpas plendo nek ploro kontraŭ kreditoro
ne sufiĉas ploro al kreditoro

**kredo**
famo kredon allogas, sed tre ofte mensogas
kiu mensogis per unu vorto, ne trovos kredon ĝis la morto
malpaco pro limo fariĝas kutimo, malpaco pro kredo fariĝas heredo

**krei**
ĉiu kreas sian forton, ĉiu forĝas sian sorton
okazo kreas ŝteliston

**kreski**
bone kreskas la herbo, sed ĉevalo jam mortis
en ĉiu aĝo devas kreski la saĝo
kiam kreskas honoro, kreskas humoro
malsaĝuloj kreskas mem, sen plugo kaj sem'

**kreskigi**
konkordo malgrandaĵon kreskigas, malkonkordo grandaĵon ruinigas
longa dormado ŝuldojn kreskigas

**kresko**
kresko mamuta, sed saĝo liliputa

**krevi**
de tro multa scio krevas la kranio
feliĉo vezike sin levas, sed baldaŭ falas kaj krevas
krevis la vazo antaŭ la nazo
maro ĉiujn riverojn ricevas kaj tamen ne krevas

**kribrilo**
ĉerpi akvon per kribrilo

**krii**
famo laŭte krias, ĉiuj ekscias
infano ne krias, patrino ne scias
inter lupoj kriu lupe
koko krias fiere, sed ne danĝere
krii el la tuta gorĝo
kriu eĉ raŭke, sed kanti ne ĉesu

**krimi**
kiu ne krimas, tiu ne timas
tajloro krimis, botisto pendas

**krimo**
malriĉeco ne estas krimo, tamen kondukas al malestimo

**krio**
ne atingos krio ĝis la trono de Dio

**kriplulo**
ĉiu familio havas sian kriplulon

**kritiki**
kiu kritikas kuraĝe, mem agas malsaĝe
kritiki estas facile, fari malfacile

**kritiko**
eĉ kontraŭ pastra prediko troviĝas kritiko
ju laboro pli publika, des pli granda la kritiko

**kroni**
la fino kronas la verkon

**krono**
unu floro ne estas krono, unu monero ne estas mono

**kruĉo**
longe ĉerpas la kruĉo, ĝis ĝi fine rompiĝas

**kruda**
nuda kaj kruda, sen groŝo en poŝo

**krudulo**
donu al krudulo plezuron, li ne scios mezuron
plej kuirita kampulo ĉiam restos krudulo
se vi krudulon iom karesos, li al si ĉion permesos
se vi krudulon salutos, li vin tutan englutos

**kruela**
inter fremdaj ŝi estas edzino-anĝelo, kun la edzo ŝi estas demono kruela
lango miela, sed koro kruela
plej kruela estas redono por farita bono

**kruele**
estintaj amikoj plej kruele malpacas

**kruro**
atakis teruro, ektremis la kruro
iras ĉiu kruro laŭ sia plezuro
ne bezonas la kapo konsilon de kruroj
Petron kruro doloras, Karolo ne lamas
pro kapo malsaĝa suferas la kruroj
veturi sur sia paro da kruroj
volanta kruro ne laciĝas de kuro

**kubuto**
proksima kubuto, sed ne por la buŝo

**kudri**
kudri per fluganta kudrilo

**kudrilo**
fadeno iras, kien kudrilo ĝin tiras
kien kudrilo iras, tien fadenon ĝi tiras
kudri per fluganta kudrilo
ne iru fadeno antaŭ kudrilo

**kuiri**
kiu kaĉon kuiris, tiu ĝin manĝu
kiu komencis kuiri, ne forkuru de l' fajro

**kuiristo**
kuiriston vaporo satigas
tro da kuiristoj kaĉon difektas

**kuirita**
al fiŝ' kuirita jam akvo ne helpos
plej kuirita kampulo ĉiam restos krudulo

**kuko**
al kuko kaj kaso ĉiam venas amaso
de pli da suko ne malboniĝas la kuko
eĉ per dolĉa kuko vi min ne allogos
mi panon ne esperis, subite kuko aperis
pli bona estas vorto afabla, ol kuko agrabla
pli bona pano sen butero, ol dolĉa kuko sen libero
tablon ornamas ne tuko, sed kuko
vivi kiel kuko en butero

**kulero**
el malplena telero vane ĉerpas kulero
granda telero, malplena kulero
pli allogas kulero da mielo, ol da vinagro barelo
por gasto ne petita mankas kulero
se vi donas mielon, donu ankaŭ kuleron

**kulo**
antaŭ tima okulo potenciĝas eĉ kulo
kulo nenion valoras, sed ĝia piko doloras

**kulpatesto**
sendemanda ekprotesto estas ofte kulpatesto

**kulpigi**
kiu tro sin pravigas, tiu mem sin kulpigas

**kulpo**
ĉiu eraro estas kulpo
de kiu la kulpo, por tiu la puno
ne ekzistas naiva vulpo, ne ekzistas homo sen kulpo
ricevos vulpo por sia kulpo
vizaĝo sen kulpo, sed koro de vulpo

**kulpulo**
lumo fariĝos, kulpulo troviĝos
pagas ne riĉulo, pagas kulpulo

**kune**
forfluu infano kune kun la bano
kontentigi la katon kaj kune la raton
kune kaptite, kune punite

**kunesido**
ne rapidu kun fido antaŭ longa kunesido

**kuniĝi**
kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas

**kuntreni**
malfeliĉo venas, malfeliĉon kuntrenas

**kunulo**
bonaj kalkuloj, bonaj kunuloj

**kura**
akvo kura - akvo pura

**kuraci**
ŝuldon tempo ne kuracas
unu vundo alian kuracas

**kuracilo**
post morto kuracilo jam estas sen utilo

**kuracisto**
plej bona kuracisto estas la tempo

**kuraco**
por longa malsano kurac' estas vana

**kuradi**
kuradi kiel venenita muso

**kuraĝa**
kuraĝa homo en sia domo
kuraĝa mieno antaŭ propra kameno

**kuraĝe**
kiu kritikas kuraĝe, mem agas malsaĝe
kuraĝe li staras, kiam muro lin baras
kiu kuraĝe aliras, facile akiras

**kuraĝo**
kuraĝo ĉion atingas
li kuraĝon kolekti ne bezonas
malantaŭ barilo kuraĝo estas facila
perdi la kuraĝon

**kuraĝulo**
post la fino de l' batalo estas multe da kuraĝuloj

**kuri**
akvo bolas, murmuras, sed fine ĝi kuras
bona famo sin trenas testude, malbona kuras rapide
kuri de sia propra korpo
mono kuras al mono
mordantaj hundoj kuras ĉiam kun vundoj
riĉulo veturas, malriĉulo kuras

**kurba**
kurba estas la ligno, sed rekte ĝi brulas

**kurbiĝadi**
kurbiĝadi kiel diablo en akvo benita

**kurbiĝi**
kurbiĝu hoko laŭ postuloj de l' loko

**kuri**
ankoraŭ multe vi kuros, ĝis vi alkuros

**kuriero**
atendi bonan veteron kaj laman kurieron

**kuro**
al la malamik' en kuro faru ponton kun plezuro
volanta kruro ne laciĝas de kuro

**kuseno**
aŭ kuseno sub ripo, aŭ bato per vipo
konscienco senmakula estas kuseno plej mola

**kuŝi**
kio min ne tuŝas, kuŝu kiel kuŝas
kio post la montoj kuŝas, tio nin neniom tuŝas
plej granda potenco kuŝas en la komenco

**kutime**
kiu mensogas kutime, mensogas sentime

**kutimi**
kiu kutimis ĉion juĝi, nenie povas rifuĝi

**kutimo**
kiaj kolegoj, tiaj kutimoj
kutimo estas dua naturo
malpaco pro limo fariĝas kutimo, malpaco pro kredo fariĝas heredo
popola kutimo havas valoron de leĝo

**kuzo**
li estas preskaŭ mia frato: nepo de kuzo de onklo de konato

**kvalito**
kvalito bona ne bezonas admonon
ne kvanto, sed kvalito decidas pri merito

**kvanto**
edziĝo laŭ koro, laŭ la kvanto da oro
ne kvanto, sed kvalito decidas pri merito
pago de ŝuldanto estas bona en ĉiu kvanto

**kvar**
certe, kiel duoble du kvar
eĉ kvar piedoj de ĉevalo ĝin ne savas de falo
unu, du, tri, kvar, kaj finita la far'

**kvazaŭ**
sinjoro petas, kvazaŭ dekretas
venas kvazaŭ vokita kaj petita

**kverko**
unu hako kverkon ne faligas

**kvina**
kvina rado ĉe veturado

**kvita**
bovo prenita, koko donita kaj – kvita

**kvitiĝi**
kvitiĝas servo per reservo

**laboremeco**
pli valoras senlaboreco, ol sensenca laboremeco

**labori**
al vi ne plaĉis sitelo, laboru per martelo
antaŭ la lango laboru la cerbo
ĝemu kaj ploru, sed ĝis fino laboru
kiu laboras kaj deziras, tiu akiras - kiu mem ne penas, nenio al li venas
kiu por ĉiuj laboras, pri si mem ne memoras
ni laboru kaj esperu
preĝu kore kaj laboru fervore
se stomako doloras, kapo laboras

**laborigi**
oni donacas por speso kaj laborigas por spesmilo

**laboro**
festotaga laboro estas sen valoro
ĝi ne estas tiel facila, kiel laboro argila
ilo el oro taŭgas por ĉiu laboro
laboro donas bonstaton, mallaboro malsaton
laboro finita - ripozo merita
laboro fortigas, ripozo putrigas
laboro homon nutras, sen laboro li putras
laboro kaj pacienco kondukas al potenco
laboro kondukas al honoro kaj oro
laboro lacigas, sed akiro ĝojigas
laboro ne estas leporo - ĝi haltos, ne forsaltos
ju laboro pli publika, des pli granda la kritiko
ju pli da honoro, des pli da laboro
kia estas via laboro, tia estas via valoro
kiu amas honoron, amu laboron
kiu laboron evitas, bonon ne vidas
klopodi pri ĉies favoro estas pleje malsaĝa laboro
komenco bona - laboro duona
lecionoj al profesoro estas vana laboro
malgrandaj infanoj kaŭzas laboron, grandaj - doloron
memori pri mezuro en laboro kaj plezuro
ne ekzistas honoro sen laboro
ne venas honoro sen laboro
per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro
plej certa laboro - laboro per oro
pri laboroj maldiligenta, pri festoj plej kompetenta
restu tajloro ĉe via laboro
sen laboro ne venas oro
sidi en laboroj ĝis super la oreloj
tro rapida laboro, tro malgranda valoro

**lacigi**
laboro lacigas, sed akiro ĝojigas
metio lacigas, metio vivigas
vespero lacigas, mateno freŝigas

**laciĝi**
ne laciĝos mano, ne fariĝos pano
ne laciĝu viaj manoj pri fremdaj infanoj
volanta kruro ne laciĝas de kuro

**lakto**
eĉ plej nigra bovino donas lakton nur blankan
ĝi estas nek lakto, nek selakto
li ekscitiĝas kiel bolanta lakto
li havas ankoraŭ la lakton sur la lipoj
melku bovon senfine, li lakton ne donos
nenia peno nek provo donos lakton de bovo
Petro kornojn tenas, Paŭlo lakton prenas
se Dio ordonos, eĉ ŝton' lakton donos

**lama**
atendi bonan veteron kaj laman kurieron

**lami**
Petron kruro doloras, Karolo ne lamas

**lamulo**
ridas blindulo pri lamulo

**lando**
en landoj transmaraj estas oraj arbaroj
peto kaj demando kondukas tra l' tuta lando
pri lando malproksima estas bone mensogi

**lanero**
de ŝafo senlana eĉ lanero taŭgas

**langa**
langa vundo plej profunda

**lango**
antaŭ la lango laboru la cerbo
babilas, muelas, kion lango elpelas
de bona vorto lango ne doloras
de vorto ĝentila ne doloras la lango
dentoj mordas la langon, tamen ambaŭ sin amas
ju cerbo pli prudenta, des lango pli silenta
kie dento doloras, tien iras la lango
kio en la kapo, tio sur la lango

kion koro sentas, lango prezentas
kiu langon ne tenas, mem sin malbenas
kiu sian langon katenas, dio lin benas
koro pleniĝas - lango moviĝas
la lango de virino estas ŝia glavo
lang' estas mola kaj laŭvole petola
lango miela, sed koro kruela
lango nenion atingas, se ĝin saĝo ne svingas
maldolĉa por la lango, sed saniga por la sango
mia lango - mia malamiko
mielo sur lango, kaj glacio en koro
ne kaŝiĝas lia lango malantaŭ la vango
per lango flatas, per mano batas
plej bona gvidilo estas la lango
sidu lango malantaŭ la vango
teni sian langon en la buŝo
virina lango buĉas sen sango
virino batas per lango, - aperas vundo plej sanga

**lano**
estas ŝafoj, estos lano
ŝafo donas sian lanon, por ke mastro havu panon

**lardo**
scias la kato, kies lardon ĝi manĝis

**larĝa**
havi larĝan konsciencon
promeso estas larĝa, plenumo estas ŝarĝa

**larĝe**
el fremda ledo oni tranĉas larĝe
vivi larĝe kaj lukse

**larmo**
ju pli malproksimen la vojo, des pli da larmoj
larmo virina baldaŭ sekiĝas
larmoj pravecon ne pruvas
larmoj ŝuldon ne pagas
ne servas larmo anstataŭ armo

**lasi**
lasi fali la manojn
se kalumnio eĉ pasas, ĝi ĉiam ion lasas
zorgu vivon vian kaj lasu vivi alian

**lasta**
la lastan el amaso atakas la hundo
la parto plej vasta venos la lasta
li faris sian lastan translokiĝon
li jam faras la lastan spiron

**laste**
plej bone ridas, kiu laste ridas

**latino**
venis fino al mia latino

**laŭ**
birdo kantas laŭ sia beko
ĉiu mezuras aliajn laŭ sia mezurilo
ĉiu vivas laŭ sia prudento kaj sento
danci laŭ ies fajfilo
Dio punas laŭ la fortoj
elektu edzinon laŭ deveno kaj ne laŭ mieno
estu ĉapo laŭ la kapo
iras ĉiu kruro laŭ sia plezuro
koniĝas birdo laŭ flugo kaj homo laŭ ago
koniĝas majstro laŭ sia verko
kurbiĝu hoko laŭ postuloj de l' loko
laŭ ĉiuj leĝoj de la arto
laŭ la agoj de l' homo estas lia nomo
laŭ la frukto oni arbon ekkonas
mezuri laŭ sia metro
ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero
oni akceptas laŭ vizaĝo, oni forlasas laŭ saĝo
oni ne povas sin movi laŭ ĉiu vento aparte
poton taksu laŭ sono, sinjoron laŭ tono
ricevis bandito laŭ sia merito
ŝatu amikon laŭ la dato de akiro
tio ĉi estas laŭ lia gusto
tute ĝuste laŭ lia gusto
vivi laŭ postuloj de la ĝustaj kalkuloj
vivu stomako laŭ stato de l' sako

**laŭdi**
ĉiu vulpo sian voston laŭdas
Dion laŭdu kaj diablon aplaŭdu
edzo edzinon laŭdas, edzino edzon aplaŭdas
kiu mem sin laŭdas, tiun neniu aplaŭdas
laŭdu belecon de l' maro, sed ĉe rando de arbaro
laŭdu la maron, sed restu sur tero
laŭdu tagon nur vespere
ne laŭdu la tagon antaŭ vespero

plena stomako laŭdas la faston

**laŭmerite**
prave punite laŭmerite

**laŭte**
barelo malplena sonas plej laŭte
famo laŭte krias, ĉiuj ekscias

**laŭvole**
lang' estas mola kaj laŭvole petola

**lavi**
lavu tutan jaron, negro ne blankiĝos
mano manon lavas
mi lavas al mi la manojn
sapo blankecon ne havas, tamen blanke ĝi lavas
tolaĵon malpuran lavu en la domo

**lavo**
fari al iu bonan lavon

leciono
al hundo bastono - al hom' leciono
por malsaĝulo bastono - por saĝulo leciono
lecionoj al profesoro estas vana laboro
al kokino la ovo lecionojn ne donu
doni lecionon de moroj

**ledo**
el fremda ledo oni tranĉas larĝe

**legado**
de legado sen atento ne riĉiĝas la prudento

**leĝa**
sur leĝa bazo

**leĝe**
leĝe kaj rajte

**leĝo**
certaĵo kaj leĝo, kiel amen en preĝo
feliĉo leĝon ne konas
feliĉo leĝon ne obeas, subite naskiĝas, subite pereas
kiam forto ordonas, leĝo pardonas
kion leĝo malpermesas, tio plaĉi ne ĉesas
kiu tro bezonas, tiu leĝon ne konas
kontraŭ forta mano la leĝo estas vana

laŭ ĉiuj leĝoj de la arto
leĝo estas bona, se advokato ĝin helpas
leĝo estas cedema: kien vi deziras, ĝi iras
leĝo malaperas, moro daŭras
leĝo mallertulon ligas, lertulon fortigas
leĝo pasintaĵon ne tuŝas
leĝo valoras por poste, sed ne por antaŭe
mono estas reĝo, mono estas leĝo
neceseco kontraŭvola estas leĝo malmola
nesciado de leĝo neniun pravigas
oni lekas la manon, sed celas la panon
pastro vivas de preĝoj, advokato de leĝoj
popola kutimo havas valoron de leĝo
por la mono pastra preĝo, por la mono romp' de leĝo
propra opinio ne estas leĝo por alia
respektu Dion kaj reĝon kaj obeu la leĝon
volo kaj deziro leĝojn ne konas
vorto donita estas kiel leĝo

**leki**
pro amo al la kandelo kato lekas la kandelingon

**leonido**
ne naskas porko leonidon, nek korniko aglidon

**leono**
kion rajtas leono, ne rajtas azeno

**lepora**
fortoj leporaj, kaj kapricoj sinjoraj

**leporo**
dormus leporo, se ĝi ĉason ne timus
kiu ĉasas du leporojn, kaptas neniun
laboro ne estas leporo - ĝi haltos, ne forsaltos
lipharo de grandsinjoro, sed koro de leporo

**lernado**
lernado havas maldolĉan radikon, sed bonan efikon
lernado sen fruktoj ne restas

**lerneja**
lerneja sekreto ne iru al gazeto

**lerni**
homo lernas la tutan vivon
kiu ripetas abunde, lernas plej funde
lernu juna, por esti saĝa maljuna
lernu juna - vi scios maljuna

rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo
sata stomako ne lernas volonte
se junulo ne lernis, maljunulo ne scias
taksi la sanon ni lernas en malsano
vivu, progresu, sed lerni ne ĉesu

**lerninto**
suferinto pli valoras, ol lerninto

**lernita**
kio estas lernita, ne estas perdita

**lerno**
por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno

**lerta**
li estas homo sperta kaj lerta
mizero faras lerta, mizero faras sperta
pasero sperta estas lerta
per lerta admono alfluas la mono
se juneco estus sperta, se maljuneco estus lerta!

**lerte**
ju pli frue, des pli certe, ju pli volonte, des pli lerte

**lerteco**
lerteco sorĉon ne bezonas

**lertulo**
leĝo mallertulon ligas, lertulon fortigas

**levi**
feliĉo vezike sin levas, sed baldaŭ falas kaj krevas
kiu levis la piedon, devas ekpaŝi

**leviĝi**
frue leviĝu kaj frue edziĝu
kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas
kiu frue leviĝas, facile riĉiĝas
kiu leviĝis fiere, baldaŭ falos al tero
leviĝu kun la suno, edziĝu dum juna
malfeliĉo kaj peko leviĝas sen veko

**li**
ĉiu “li” havas sian “ŝi”

**libera**
sola vojo libera al la fundo rivera
tute libera, kiel birdo aera

**libere**
deziru sincere, vi atingos libere
en sia afero ĉiu juĝu libere
pri propra afero neniu juĝas libere
vivu mizere, sed vivu libere!

**libereco**
seka panpeco, sed en libereco

**liberigi**
antaŭparolo liberigas de postparolo
mi lin liberigis, li min saĝigis

**libero**
pli bona pano sen butero, ol dolĉa kuko sen libero
tro da libero kondukas al mizero

**liberulo**
liberulo iras, kien li deziras

**ligi**
leĝo mallertulon ligas, lertulon fortigas
ofte ligis malsaĝulo kaj dek saĝuloj malligi ne povas

**ligiĝi**
fianĉiĝis - por ĉiam ligiĝis

**lignero**
en fremda okulo ni vidas ligneron, en nia ni trabon ne vidas
hakado de ligno donas lignerojn

**ligno**
fendita ligno facile ekbrulas
flamiĝema kiel ligno rezina
hakado de ligno donas lignerojn
kurba estas la ligno, sed rekte ĝi brulas
li estas flamiĝema kiel rezina ligno
ligno fendita facile flamiĝas
ne el ĉiu ligno oni faras violonon
trafis hakilo al ligno malmola
trafos hakilo al ligno malmola
vi povas eĉ haki lignon sur lia kapo

**liliputa**
kresko mamuta, sed saĝo liliputa

**limo**
fremda animo estas abismo sen limo
klopodi sen limo per korpo kaj animo
malpaco pro limo fariĝas kutimo, malpaco pro kredo fariĝas heredo
pensoj iras trans limo sen pago kaj timo
pro limoj kaj baroj malpacas najbaroj

**lipharo**
bruligi al si la lipharojn
li bruligis al si la lipharojn
lipharo de grandsinjoro, sed koro de leporo

**lipo**
de la manoj ĝis lipoj la sup' elverŝiĝis
dolĉe ŝmiri al iu la lipojn
fluis sur lipoj, sed en buŝon ne trafis
gardu vin du baroj: lipoj kaj dentaroj
inter pokalo kaj lipoj povas multe okazi
kio el la dentoj elsaltas, en la lipoj ne haltas
kio tra l' dentoj travenis, tion la lipoj ne retenos
la lipoj ne montru, kion manĝis la buŝo
li havas ankoraŭ la lakton sur la lipoj
plenblovi la lipojn
se lipo dikiĝas, ventro maldikiĝas

**lito**
kiu amas la liton, ne akiros profiton

**liveri**
liveru nur panon, manĝontoj sin trovos

**livero**
malnova afero en nova livero

**logi**
beleco logas, virto apogas
en juneco logas, en maljuneco tedas
espero logas, espero mensogas

**loĝejo**
mia loĝejo - mia reĝejo
se silentas draŝejo, malpacas loĝejo

**loĝi**
amo kaj puno loĝas komune
bona estas fremdlando, sed aliaj tie loĝu
en infero loĝante, kun diabloj ne disputu
li loĝas tie, kien eĉ birdo ne flugas

loĝi en la fino de la mondo

**loketo**
por paro amanta ĉiu loketo sufiĉas

**loko**
al loko dolora ni manon etendas - al loko ĉarma okulojn ni sendas
havi la orelojn sur ĝusta loko
havi orelojn sur ĝusta loko
havi varman lokon
kiu bone sidas, tiu lokon ne ŝanĝu
kiu konstante lokon ŝanĝas, neniam sin aranĝas
kiu pli frue venas, pli bonan lokon prenas
kurbiĝu hoko laŭ postuloj de l' loko
li havas la kapon sur la ĝusta loko
mi ankaŭ lokon sur la tero okupas
ne beligas loko homon, sed homo la lokon
okupi sen celo lokon sub ĉielo
piki al iu la vundan lokon
rangeto rangon respektu, modestan lokon elektu
vundan lokon protektis, alian difektis

**longa**
li foriris kun longa nazo
longa dormado ŝuldojn kreskigas
longa konsidero savas de sufero
ne rapidu kun fido antaŭ longa kunesido
por longa malsano kurac' estas vana
ŝuldo havas longan vivon
tro longa atendo ĝis fino de l' vendo
tro longa sufero - malgranda espero
virino havas haron longan kaj saĝon mallongan

**longapenta**
edziĝo tro momenta estas longapenta

**longe**
agrabla estas gasto, se ne longe li restas
bato de patrino ne longe doloras
bongusta peco longe ne atendas
Dio longe paciencas, sed severe rekompencas
eĉ ŝtono verdiĝas, se ĝi longe ne moviĝas
kiu dormas longe, vivas mallonge
longe ĉerpas la kruĉo, ĝis ĝi fine rompiĝas
longe ŝtelas ŝtelisto, tamen fine li pendos
ne longe sinjora daŭras favoro
nenia peketo restas longe sekreto
senfortuloj longe vivas
vazo rompita longe sin tenas

**loto**
la loto estas tirita

**ludi**
blindulo kartojn ludi ne devas
kiu ludas kun koto, malpurigas la manojn
ludi kun iu ludon de pugnoj
ludi ventobatadon

**ludo**
en ŝerco kaj ludo ofte sidas aludo
la ludo kandelon ne valoras
la tuta ludo ne valoras kandelon
li taŭgas nek por studo, nek por ludo
ludi kun iu ludon de pugnoj
ludo aparte, kaj afero aparte
mieno fiera al ludo mizera
pro vorta ludo li eĉ patron ne domaĝas

**luksa**
luksa la vesto, sed malplena la poŝo
pli bona branĉo sennuksa, ol kaĝo plej luksa

**lukse**
vivi larĝe kaj lukse

**luma**
en luma tago

**lumi**
post vetero malbela lumas suno plej hela

**lumo**
kie lumo ekzistas, ankaŭ ombro troviĝas
la lumo por vero ofte estas danĝero
lumo fariĝos, kulpulo troviĝos

**luno**
la luno ne aŭskultas, kiam hundo ĝin insultas
se forestas la suno, sufiĉas la luno
vespere ĝuu lunon, sed ne serĉu la sunon

**lupe**
inter lupoj kriu lupe

lupo
ankaŭ la lupon atingos la sorto
buĉas la lupo, oni ankaŭ ĝin buĉos
gardatan ŝafon eĉ lupo timas
inter lupoj kriu lupe
ke la lup' estu sata, kaj la ŝaf' ne tuŝata
kiu lupo naskiĝis, vulpo ne fariĝos
kontraŭ lupo ne helpas kalkulo
lupo dormanta ŝafon ne kaptas
lupo kaptas, sed li ankaŭ enfalas
lupo lupon ne manĝas
lupo sopiras, al arbaro sin tiras
lupo ŝanĝas la harojn, sed ne la farojn
ne ĉio griza estas lupo
ne elvoku lupon el la arbaro
ne por lupo estas supo
nutru lupon plej sate, li ĉiam serĉas arbaron
oni lin konas, kiel blankan lupon
pagos lupo por la ŝafo
por ŝafon formanĝi, lupo trovos pretekston
pri la lupo rakonto, kaj la lupo renkonte
se Dio ne aranĝos, lupo vin ne manĝos
se lupo ekpentis, ŝafo atentu
se malsato turmentas, lupo timon ne sentas
se vi faros vin ŝafo, la lupoj vin manĝos
se vi ŝafo fariĝos, lupoj ne mankos
ŝafaro harmonia lupon ne timas
timu lupon edukitan kaj malamikon repacigitan

**maĉi**
kiu amas okulaĉi, ne havas kion maĉi
maĉi kaj remaĉi

**magia**
magia rondo

**majesta**
de majesta ĝis ridinda estas nur unu paŝo
kapo majesta, sed cerbo modesta

**majstro**
koniĝas majstro laŭ sia verko

**makuli**
se kalumnio ne brulas, ĝi almenaŭ makulas
ŝuldo ne makulas, sed pagon postulas

**makulhara**
oni lin konas, kiel makulharan hundon

**makulo**
eĉ sur la suno troviĝas makuloj
ĝi estas por mi makulo en la okulo
neniu sanktulo estas sen makulo
oni metis makulon en mian kalkulon

**mala**
nomo egala, sed esenco mala

**malafable**
rigardi malafable

**malakceli**
kiu tro pelas, nur malakcelas

**malamanto**
malamanto de faro estas amanto de kalendaro

**malami**
sanktfigurojn ornamas kaj homojn malamas

**malamato**
venis mizero - helpu min, frato; pasis mizero - for, malamato

**malamika**
kiso publika estas kiso malamika

**malamiko**
al la malamik' en kuro faru ponton kun plezuro
amikon ŝatu, malamikon ne batu
estinta amiko estas plej danĝera malamiko
gardu min Dio kontraŭ amikoj - kontraŭ malamikoj mi gardos min mem
kiu multe parolas, malamikon konsolas
kiu neniun savis, malamikojn ne havas
komplezema malsaĝulo estas pli danĝera ol malamiko
mia lango - mia malamiko
pli bona - estas malamiko de bona
pli bona estas saĝa malamiko, ol malsaĝa amiko
plibono estas malamiko de bono
timu lupon edukitan kaj malamikon repacigitan
unu malamiko pli difektas, ol cent amikoj protektas

**malamo**
perforta amo estas plej forta malamo

**malantaŭ**
malantaŭ barilo kuraĝo estas facila
ne kaŝiĝas lia lango malantaŭ la vango

**malantaŭe**
danĝera estas bovo antaŭe, ĉevalo malantaŭe, kaj malsaĝulo de ĉiuj flankoj
malantaŭe mizero, antaŭe malespero

**malaperi**
kiam havo malaperis, saĝo aperis
kiam sako mizeras, amo malaperas
leĝo malaperas, moro daŭras
malaperis kiel ŝtono en maron
malaperis kiel vaporo
matenas, vesperas - kaj tago malaperas

**malapero**
post mia malapero renversiĝu la tero

**malavara**
pri havo najbara oni estas malavara

**malavarulo**
malavarulo kaj porko estas bonaj post la morto

**malbela**
por patrino ne ekzistas infano malbela
por virta orelo ne danĝeras vorto malbela
post vetero malbela lumas suno plej hela

**malbelulo**
ne helpas spegulo al malbelulo

**malbeni**
kiu langon ne tenas, mem sin malbenas

**malbeno**
du sinjoroj en unu bieno, du mastrinoj ĉe unu kameno - neniam vivas sen reciproka malbeno
kaŝu malbenon kaj faru bonan mienon

**malbona**
bona famo sin trenas testude, malbona kuras rapide
bona puno por malbona peno
bona stato saĝigas, malbona malsaĝigas
bonaj infanoj gepatrojn feliĉigas, malbonaj ilin entombigas
de elekto tro multa plej malbona rezulto
de malbona ŝafo estas bona eĉ tufo
eminenta ŝuldanto - malbona paganto
hazardo estas malbona gardo
infanon malbonigas ne petolado, sed malbona kamarado
kie regas virino, malbona estas la fino
kontraŭ vesto malbona konspiras ĉiu ŝtono
la plej danĝera homo - malbona in' en domo
malbona herbo froston ne timas
malbona virino diablon superas
ne ĉiam daŭras malbona vetero, ne ĉiam daŭras homa sufero
ne ekzistas savo kontraŭ malbona virino
oni lin konas, kiel malbonan moneron
pli valoras faro nenia, ol faro malbona
pli valoras paco malbona, ol malpaco plej bona
rado malbona knaras plej multe
unu ovo malbona tutan manĝon difektas

**malbone**
iele, iome, duone malbone
kien vi vin turnos, ĉie malbone
kiu mem sin gloras, malbone odoras
klopodo estas kun mono, sed sen ĝi pli malbone
malbone kaŝita ŝteliston incitas
tie ĉi malbone, tie nebone

**malbongusta**
sanigaĵo malbongusta, sed efiko plej ĝusta
sprit' en tempo ne ĝusta estas tre malbongusta

**malbonigi**
eĉ plej bonan ŝipon malbonigas la ventoj
infanon malbonigas ne petolado, sed malbona kamarado
tro multe da salo malbonigas la manĝon

**malboniĝi**
de pli da suko ne malboniĝas la kuko
de superfluo malboniĝas la ĝuo
muso satiĝis, faruno malboniĝis
per tro multa varto malboniĝas la farto

**malbono**
eĉ plej granda malbono al bono kondukas
el du malbonoj pli malgrandan elektu
en ĉiu malbono estas iom da bono
kie ĵuron vi aŭdas, malbonon suspektu
grandaj malbonoj - grandaj rimedoj
malbonon oni memori ne ĉesas, bonon oni baldaŭ forgesas
neevitebla malbono
oni bonon forgesos, malbonon memoras
pli facile estas malbonon eviti, ol korekti

**malbonspeca**
al farun' malbonspeca ne helpos la spico

**malbonulo**
batu malbonulon, li vin flatos - kisu, li vin batos
malbonulon diablo ne prenas
trovis malbonulo malbonulon pli grandan

**maldekstra**
mano dekstra ne sciu, kion faras la maldekstra
via dekstra mano ne sciu, kion faras la maldekstra

**maldike**
kie maldike, tie rompiĝas

**maldikiĝi**
se lipo dikiĝas, ventro maldikiĝas

**maldiligenta**
pri laboroj maldiligenta, pri festoj plej kompetenta

**maldolĉa**
lernado havas maldolĉan radikon, sed bonan efikon
maldolĉa por la lango, sed saniga por la sango
ordonita kiso havas guston maldolĉan
pri dolĉa vorto ne fieru, maldolĉan ne koleru

**malesperi**
hom' malesperas, Dio aperas

**malespero**
malantaŭe mizero, antaŭe malespero

**malestimo**
malriĉeco ne estas krimo, tamen kondukas al malestimo

**malfacila**
ĉiu komenco estas malfacila
en malfacila horo eĉ groŝ' estas valoro
vivon travivi estas art' malfacila

**malfacile**
kritiki estas facile, fari malfacile
ŝteli ĉe ŝtelisto estas malfacile

**malfacilo**
kontraŭ ĉiu malfacilo ekzistas konsilo

**malfeliĉa**
se ne la "se" malfeliĉa, mi estus nun homo plej riĉa

**malfeliĉo**
amikon montras malfeliĉo
en feliĉo ne fieru, en malfeliĉo esperu
feliĉo fierigas, malfeliĉo saĝigas
feliĉo venas gute, malfeliĉo venas flue
fremda malfeliĉo instruas
kontraŭ malfeliĉoj baro ne ekzistas
kontraŭ malfeliĉo ne defendas eĉ riĉo
malfeliĉo inviton ne atendas
malfeliĉo kaj peko leviĝas sen veko
malfeliĉo komuna estas malpli premanta
malfeliĉo malofte venas sole
malfeliĉo sin ne ĝenas, faru geston - ĝi tuj venas
malfeliĉo venas, malfeliĉon kuntrenas
malfeliĉo venas rajde, foriras piede
malfeliĉo venas sen alvoko
malfeliĉoj kaj batoj venas ĉiam kun fratoj
ne atendis, ne esperis - malfeliĉo aperis
ne veku malfeliĉon, kiam ĝi dormas

**malfermi**
kiu frapas, al tiu oni malfermas
ora ŝlosilo ĉion malfermas
ora ŝlosilo ĉiun pordon malfermas

**malfermita**
malfermita kelo tentas al ŝtelo
sukcesa venkanto de pordoj malfermitaj

**malforta**
kontraŭ tuta kohorto eĉ Herkulo estas malforta

**malfortigi**
malsato malfortigas, ŝuldo suferigas

**malfreŝa**
gasto kiel fiŝo baldaŭ fariĝas malfreŝa

**malfrua**
de edziĝo tro malfrua orfoj naskiĝas
por malfrua gasto restas nur osto

**malfrue**
kiu komencas tro frue, finas malfrue
pli bone malfrue, ol neniam
pli facile estas ne iri, ol tro malfrue reiri

**malgajno**
pli bona estas gajno malgranda, ol granda malgajno

**malgranda**
de malgranda kandelo forbrulis granda kastelo
eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan
eĉ malgranda muŝo ne estas sen buŝo
el du malbonoj pli malgrandan elektu
el malgrandaj akveroj fariĝas grandaj riveroj
fiŝo pli granda malgrandan englutas
granda frakaso en malgranda glaso
granda nubo, malgranda pluvo
granda parolisto, malgranda faristo
granda parolo, sed malgranda volo
guto malgranda, sed ŝtonon ĝi boras
havu poton malgrandan, sed mem estu granda
malgranda aspekte, sed granda intelekte
malgranda birdeto, sed akra ungeto
malgranda estas la flamo, tamen ne mankas la fumo
malgranda pezo, sed granda prezo
malgrandaj infanoj kaŭzas laboron, grandaj - doloron
pli bona estas gajno malgranda, ol granda malgajno
pli bona estas malgranda “jen prenu” ol granda “morgaŭ venu”
pli valoras malgranda reganto, ol granda servanto
sen gutoj malgrandaj maro ne ekzistus
tro longa sufero - malgranda espero

tro rapida laboro, tro malgranda valoro

**malgrandaĵo**
konkordo malgrandaĵon kreskigas, malkonkordo grandaĵon ruinigas

**malĝojo**
amiko en ĝojo kaj malĝojo
kiun malĝojo ne turmentis, tiu ĝojon ne sentas
nek ĝojo, nek malĝojo daŭras eterne

**malĝusta**
gast' en tempo malĝusta estas ŝtono sur brusto

**malhelpi**
juĝo komencita paciĝon ne malhelpas
parenc' al parenco ne malhelpas intence

**malhelpo**
fianĉon de l' sorto difinitan forpelos nenia malhelpo

**malhonesto**
pli bona ĉifona vesto, ol riĉeco en malhonesto

**malhonori**
vivanton ni malhonoras, mortinton ni adoras

**malhonoro**
manko de oro ne estas malhonoro

**malhumileco**
malhumileco estas kara plezuro

**malica**
en via malica regalo vin atendas ankaŭ pokalo
kiu havas malican celon, ofte perdas sian propran felon

**malico**
ne ekzistas juneco sen kapricoj, nek maljuneco sen malicoj

**maljuna**
aĝo maljuna ne estas oportuna
lernu juna, por esti saĝa maljuna
lernu juna - vi scios maljuna
resti maljuna knabino
maljunaj jaroj, sed ne saĝaj faroj
pagas maljunaj jaroj por junaj eraroj

**maljuneco**
en juneco logas, en maljuneco tedas
en juneco ni petas, en maljuneco forĵetas
juneco ne scias, maljuneco ne povas
juneco petolis, maljuneco malsatos
ne ekzistas juneco sen kapricoj, nek maljuneco sen malicoj
se juneco estus sperta, se maljuneco estus lerta!

**maljuniĝi**
se vi pri ĉio informiĝos, vi baldaŭ maljuniĝos

**maljunulo**
pekas junuloj kaj pekas maljunuloj
plej saĝa maljunulo ne estas tro saĝa
se junulo ne lernis, maljunulo ne scias

**malkara**
tro kara aranĝo por malkara tagmanĝo

**malkaresi**
oni batas, malkaresas, kaj eĉ plori ne permesas

**malkaŝi**
la tempo ĉiam malkaŝas la veron

**malklara**
en akvo malklara oni fiŝkaptas facile

**malkonkorda**
pli valoras konkorda ovo, ol malkonkorda bovo

**malkonkordo**
konkordo malgrandaĵon kreskigas, malkonkordo grandaĵon ruinigas

**malkovri**
malkovri antaŭ iu sian koron

**malkvieta**
manon malkvietan ĉiu muro atakas

**mallaboro**
laboro donas bonstaton, mallaboro malsaton

**mallaborulo**
morgaŭ estas la amata tago de mallaboruloj

**mallaŭdi**
alian ne mallaŭdu, vin mem ne aplaŭdu
kion Parizo aplaŭdas, Berlino mallaŭdas

**mallertulo**
leĝo mallertulon ligas, lertulon fortigas

**mallibera**
ne insultu mizeran, ne moku malliberan

**malligi**
ofte ligis malsaĝulo kaj dek saĝuloj malligi ne povas

**mallonga**
virino havas haron longan kaj saĝon mallongan

**mallonge**
kiu dormas longe, vivas mallonge

**malmola**
jugo propravola ne estas malmola
kun edzo plej malmola estas pli bone ol sola
neceseco kontraŭvola estas leĝo malmola
trafis hakilo al ligno malmola
trafos hakilo al ligno malmola

**malmulte**
kio kostas malmulte, kostas plej kare
kiu kaptas tro vaste, konservas malmulte
kiu malmulte deziras, feliĉon akiras
kiu multe babilas, pensas malmulte
multe komencite, malmulte plenumite
pli bone malmulte gajni, ol multe perdi
pli facile estas multe elspezi, ol malmulte enspezi

**malmulto**
kiu malmulton ne ŝatas, multon ne meritas
pli facile estas multon elspezi, ol malmulton enspezi

**malnova**
amu domon novan kaj amikon malnovan
bona estas domo nova kaj amiko malnova
ĉion novan oni ŝatas, malnovan oni forbatas
en la bona malnova tempo
malnova afero en nova livero
peko malnova perdas pekecon
unu amiko malnova pli valoras ol du novaj

**malofte**
malfeliĉo malofte venas sole

**malpaci**
disputu komence - vi ne malpacos en fino
estintaj amikoj plej kruele malpacas
pli bone estas havon fordoni, ol kun homoj malpaci
pro limoj kaj baroj malpacas najbaroj
se silentas draŝejo, malpacas loĝejo

**malpacigi**
malsaĝulo malpacigis kaj dek saĝuloj repacigi ne povas

**malpaco**
disputoj kondukas al malpaco
ĝi estas malpaco pri la reĝa palaco
kie minaco, tie malpaco
konsento konstruas, malpaco detruas
malpaco pro limo fariĝas kutimo, malpaco pro kredo fariĝas heredo
pli valoras paco malbona, ol malpaco plej bona
venas rido post minaco, kaj paciĝo post malpaco

**malpaculo**
malpaculon ĉiu batas

**malpermesi**
kion leĝo malpermesas, tio plaĉi ne ĉesas
voli aŭ ne voli neniu malpermesas

**malpermesita**
frukto malpermesita estas plej bongusta

**malpeza**
oro estas pli peza ol fero, pli malpeza ol aero

**malpio**
en buŝo Biblio, en koro malpio

**malplaĉi**
malplaĉas nenio, se taksas pasio

**malplena**
almozpetanto sinĝena restas kun sako malplena
barelo malplena sonas plej laŭte
ĉe tablo malplena babilo ne fluas
el malplena telero vane ĉerpas kulero
fiera mieno - kapo malplena
granda telero, malplena kulero
luksa la vesto, sed malplena la poŝo

malplena sako puŝas al peko
malplena sako tentas al peko
ne helpas glorkrono al malplena kaldrono
ofta festo - malplena kesto
sako malplena sin rekte ne tenas
spiko malplena plej alte sin tenas
tablo festena, sed telero malplena

**malplene**
aŭ festene, aŭ malplene
hodiaŭ festene, morgaŭ malplene

**malpli**
ju pli da bruo, des malpli da ĝuo
malfeliĉo komuna estas malpli premanta
malpli da havo, malpli da zorgoj
malpli da posedo, malpli da tedo
malpli esperu, pli konsideru

**malprava**
la forestanto ĉiam estas malprava

**malpravi**
kiu forton ne havas, ĉiam malpravas

**malprofito**
havi malprofiton

**malproksima**
bona estas Romo, sed tro malproksima de nia domo
ĝi ne eliris ankoraŭ el malproksima nebulo
pli bona amiko intima, ol parenco malproksima
por amiko intima ne ekzistas vojo malproksima
preĝejo proksima, sed Dio malproksima
pri lando malproksima estas bone mensogi

**malproksime**
de parolo ĝis faro estas tre malproksime
ĝi estas ankoraŭ malproksime en la kampo
ĝi staras ankoraŭ malproksime en la kampo
ju pli malproksimen la vojo, des pli da larmoj
malproksime vidas, antaŭ la nazo ne vidas
mensogo malproksimen ne kondukas
ne falas frukto malproksime de l' arbo
riĉulo kiel fajro proksime bruligas, malproksime ne varmigas
ŝtelu malproksime, edziĝu proksime

**malpura**
ne elverŝu la malpuran, antaŭ ol vi havas la puran
pli bona pura konscienco, ol malpura potenco
tolaĵon malpuran lavu en la domo

**malpurigi**
kiu ludas kun koto, malpurigas la manojn

**malrapide**
oni prenas avide, oni redonas malrapide
pripensu malrapide kaj agu decide
rapidu malrapide

**malriĉa**
malriĉa kiel muso preĝeja
riĉa zorgas pri ĉampano, malriĉa pri pano

**malriĉe**
ofte saĝulo vivas malriĉe kaj malsaĝulo feliĉe

**malriĉeco**
malriĉeco ne estas krimo, tamen kondukas al malestimo
malriĉeco ne estas malvirto

**malriĉigi**
almozoj ne malriĉigas
donado de almozoj neniam malriĉigas
malriĉigas ne nehavado, sed trogranda dezirado

**malriĉulo**
al malriĉulo infanoj ne mankas
al malriĉulo ovo kiel al riĉulo bovo
de malriĉula manĝo ni guston ne scias
de manĝo malriĉula ni guston ne scias
ĝoju kaj festenu, sed malriĉulojn subtenu
malriĉulo parencojn ne havas
malriĉulo rabiston ne timas
mono fluas al riĉulo, batoj al malriĉulo
por riĉulo fasto - por malriĉulo festo
riĉulo havas kornojn, malriĉulo dornojn
riĉulo veturas, malriĉulo kuras
se ĉiu speson donos, malriĉulo malsaton ne konos
se malriĉulo sukcesas, li ĉiujn forgesas

**malsaĝa**
atakis lin horo malsaĝa
en mizero eĉ saĝulo estas malsaĝa
forveturis malsaĝa, revenis nur pli aĝa

kapo malsaĝa ne griziĝas nek kalviĝas
kion saĝulo ne komprenas, ofte malsaĝa divenas
klopodi pri ĉies favoro estas pleje malsaĝa laboro
malsaĝa kiel ŝtipo
pli bona estas saĝa malamiko, ol malsaĝa amiko
pro kapo malsaĝa suferas la kruroj
saĝa scias, kion li diras - malsaĝa diras, kion li scias
saĝa tenas aferon, malsaĝa esperon

**malsaĝe**
kiu kritikas kuraĝe, mem agas malsaĝe

**malsaĝeco**
ebrieco pasas post dormo, malsaĝeco neniam

**malsaĝigi**
bona stato saĝigas, malbona malsaĝigas

**malsaĝo**
azen' al azeno riproĉas malsaĝon
malsaĝo estas najbaro de mizero

**malsaĝulo**
al malsaĝulo ne helpas admono, nur bastono
ebriulon kaj malsaĝulon oni ne juĝas
eĉ malsaĝulon sperto instruos
danĝera estas bovo antaŭe, ĉevalo malantaŭe, kaj malsaĝulo de ĉiuj flankoj
kolero montras malsaĝulon
komplezema malsaĝulo estas pli danĝera ol malamiko
malsaĝulo ĉie sian nomon skribas
malsaĝulo de ĉiuj flankoj
malsaĝulo diris vorteron, saĝulo komprenas la tutan aferon
malsaĝulo en foiro estas bona akiro
malsaĝulo kaj infano parolas la veron
malsaĝulo kiel tamburo - kiu pasas, lin batas
malsaĝulo malpacigis kaj dek saĝuloj repacigi ne povas
malsaĝulo ne griziĝas nek senhariĝas
malsaĝulo ofte estas profeto
malsaĝulo ŝtonon ĵetis, dek saĝuloj ĝin ne atingos
malsaĝulo venas, komercisto festenas
malsaĝuloj kreskas mem, sen plugo kaj sem'
malsaĝulon favoras feliĉo
malsaĝulon oni batas eĉ en la preĝejo
ofte ligis malsaĝulo kaj dek saĝuloj malligi ne povas
ofte saĝulo vivas malriĉe kaj malsaĝulo feliĉe
oni ekkonas bovon per la vido kaj malsaĝulon per lia rido
por malsaĝulo bastono - por saĝulo leciono
se vi sendis malsaĝulon, sendu kontrolon

**malsama**
paroloj kaj faroj estas malsamaj aferoj

**malsana**
malsanan demandu, al sana donu

**malsaniĝi**
de rigardo tro alta malsaniĝas okulo

**malsano**
de tro da pano venas malsano
malsano venas rapide, foriras rigide
plej danĝera malsano estas manko de saĝo
por longa malsano kurac' estas vana
taksi la sanon ni lernas en malsano

**malsanulo**
por malsanulo forto, por kokido la morto

**malsata**
ĉe stomako malsata ne kapricas palato
edzin' admirata - edzo malsata
en malsata familio mankas harmonio
estro ne malsatas
gasto tro petata foriras malsata
malsata stomako orelon ne havas
sata malsatan ne povas kompreni
se la gasto estas amata, eĉ lia servanto ne restas malsata
stomako malsata nur pri pano meditas
ventro malsata orelon ne havas

**malsati**
juneco petolis, maljuneco malsatos
kiu ĉion formanĝis en tago, malsatos vespere
tuta jam sata, sed okulo malsatas

**malsato**
aŭ plej riĉa stato, aŭ plena malsato
kastel' en aero - malsato sur tero
kiu panon donas, malsaton ne konas
laboro donas bonstaton, mallaboro malsaton
malsato donas spriton
malsato malfortigas, ŝuldo suferigas
malsato ne estas frato
malsato plej bone gustigas la manĝon
pli efike ol bato pelas malsato
se ĉiu speson donos, malriĉulo malsaton ne konos
se malsato turmentas, lupo timon ne sentas

**malsatulo**
malsatulon la fabloj ne nutros

**malsincera**
kiso malsincera estas danĝera

**malsukcesi**
la afero malsukcesis

**malsupre**
hodiaŭ supre, morgaŭ malsupre
per la kapo malsupren

**malŝpari**
avarulo avaras, heredantoj malŝparas
patroj avaras, infanoj malŝparas

**malŝparulo**
malŝparulo ĝuas nelonge, avarulo neniam

**maltrafe**
trafe aŭ maltrafe

**maltrafi**
eĉ kiu plej bone pafas, tamen iam maltrafas
kien ajn mi pafas, ĉio maltrafas
kiu rigardas ĉielon, maltrafas sian celon
pafi - maltrafi

**malutili**
ju pli oni babilas, des pli oni al si malutilas
kiu multe babilas, al si mem malutilas
kiu servas al ĉiu, al si mem malutilas

**malvarme**
se neĝas sur la monto, estas malvarme en la valo

**malvarmo**
el la sama buŝo li blovas varmon kaj malvarmon
sama buŝo blovas varmon kaj malvarmon

**malvaste**
butonumi iun malvaste

**malvero**
iom da malvero ne estas danĝero

**malvirto**
malriĉeco ne estas malvirto
senlaboreco estas patrino de ĉiuj malvirtoj

**mamuta**
kresko mamuta, sed saĝo liliputa

**manĝado**
dum la manĝado venas apetito

**manĝi**
ĉiu manĝas, kiel li aranĝas
instruas mizero manĝi panon sen butero
kiu kaĉon aranĝas, tiu ĝin manĝas
kiu kaĉon kuiris, tiu ĝin manĝu
la lipoj ne montru, kion manĝis la buŝo
lupo lupon ne manĝas
ne el unu forno li manĝis jam panon
rusto manĝas feron, ĉagreno la koron
rusto manĝas la feron, kaj zorgo la homon
scias la kato, kies lardon ĝi manĝis
se Dio ne aranĝos, lupo vin ne manĝos
se vi faros vin ŝafo, la lupoj vin manĝos
se vi sidos en branoj, vin manĝos la porkoj
stomako ne estas spegulo: kion ĝi manĝis, ne vidas okulo
vulpo mienon ŝanĝas, sed plue kokidojn manĝas

**manĝigi**
vi min manĝigos, mi vin trinkigos

**manĝo**
de lia vivo aranĝo estas trinko kaj manĝo
de malriĉula manĝo ni guston ne scias
de manĝo malriĉula ni guston ne scias
Dio donis buŝon, Dio donos manĝon
Dio donis tagon, Dio donos manĝon
Dio manĝon donacis, sed la dentoj agacas
fremda manĝo havas bonan guston
ĝi estas kiel mustardo post la manĝo
ĝi estas mustardo post la manĝo
kiu manĝon al mi donas, tiu al mi ordonas
kiu venis post la manĝo, restas sen manĝo
malsato plej bone gustigas la manĝon
metio manĝon ne bezonas kaj manĝon tamen donas
ne spiciĝas manĝo de mastrina beleco
por honoro ni dankas, se manĝ' al ni mankas
tro multe da salo malbonigas la manĝon
unu ovo malbona tutan manĝon difektas

**manĝonto**
liveru nur panon, manĝontoj sin trovos

**manĝota**
la manĝota fiŝo estas ankoraŭ en la rivero

**manĝotablo**
apud plena manĝotablo ĉiu estas tre afabla

**manki**
al la papero ne mankas tolero
al li ne mankas defendo kontraŭ ofendo
al malriĉulo infanoj ne mankas
al posedanto de metio mankas nenio
ĉe tro ĝentila ekstero mankas sincero
ĉiu klopodu nur en sia metio, tiam al la urbo mankos nenio
deziro tre granda, sed mankas la forto
eĉ inter piuloj ne mankas pekuloj
en malsata familio mankas harmonio
granda doto kaj oro, sed mankas la koro
kie estas mielo, tie muŝoj ne mankas
kie estas pano, ne mankas panpecetoj
kie pano estas, tie musoj ne mankas
la dorm' estas bona, se mankas la mono
malgranda estas la flamo, tamen ne mankas la fumo
mankas klapo en lia kapo
mankis al Petro klopodoj, li aĉetis al si domon
ne mankas tombo por mortinto nek pano por vivanto
nenio pli grandan mizeron prezentas, ol se sano mankas kaj ŝuldoj turmentas
por gasto ne petita mankas kulero
por honoro ni dankas, se manĝ' al ni mankas
se al hundo mankas nenio, ĝin atakas rabio
se homoj mankas, infano ankaŭ estas homo
se la sorto vin batas, mokantoj ne mankas
se vi ŝafo fariĝos, lupoj ne mankos
se haroj ne mankus, oni kalvon ne havus

**manko**
manko de oro ne estas malhonoro
nigro sur blanko pruvas sen manko
plej danĝera malsano estas manko de saĝo
sur ĉiu flanko nur manko kaj manko

**mano**
al loko dolora ni manon etendas - al loko ĉarma okulojn ni sendas
ankoraŭ la gajno ne estas en la mano
ĉiu mano al si altiras
danci antaŭ iu sur piedoj kaj manoj

de la buŝo ĝis la manoj estas granda interspaco
de la manoj ĝis lipoj la sup' elverŝiĝis
donu fingron al avidulo, li tutan manon postulas
du manoj faras ĉion, sed unu nenion
el lia mano ĉiu monero elglitas
falis el mano - prenu satano
for el la manoj - for el kalkulo
inter la mano ĝis la buŝo ofte disverŝiĝas la supo
kiu cedas al sia infano, ĝin pereigas per propra mano
kiu ludas kun koto, malpurigas la manojn
kiu tro forte la manon svingas, nenion atingas
kiu volas panon, ne dorlotu la manon
kontraŭ forta mano la leĝo estas vana
kun la peko en mano
la mano lin jukas
lasi fali la manojn
li donas peceton da pano kaj bategon per mano
mano dekstra ne sciu, kion faras la maldekstra
mano manon lavas
mano pekis, dorso pagas
manon malkvietan ĉiu muro atakas
mi lavas al mi la manojn
ne karesu per mano, sed karesu per pano
ne laciĝos mano, ne fariĝos pano
ne laciĝu viaj manoj pri fremdaj infanoj
ofte mano forgesas, kion buŝo promesas
oni lekas la manon, sed celas la panon
oni prenas per manoj, redonas per piedoj
per lango flatas, per mano batas
per mono, ne per mano punu vilaĝanon
pli da infanoj, pli da manoj
sklavo kun forta mano estas plej granda tirano
sperta mano ne restas sen pano
teni iun per fera mano
via dekstra mano ne sciu, kion faras la maldekstra
vidas okulo, sed mano ne trafas
vivi per sistemo de "el mano al buŝo"

**manplato**
li havas truon en la manplato

**marcipano**
kiu serĉas marcipanon, perdas sian panon

**marĉandado**
marĉandado aĉeti ne devigas

**marĉando**
marĉando aĉeti ne devigas

**marĉo**
li pasis akvon kaj fajron kaj marĉojn kaj marojn
kie ajn rano iras, ĝi ĉiam marĉon sopiras
rano eĉ en palaco sopiras pri marĉo

**maro**
laŭdu belecon de l' maro, sed ĉe rando de arbaro
laŭdu la maron, sed restu sur tero
li jam estas trans montoj kaj maro
li pasis akvon kaj fajron kaj marĉojn kaj marojn
malaperis kiel ŝtono en maron
maro ĉiujn riverojn ricevas kaj tamen ne krevas
maro da mizeroj
ne maro dronigas ŝipon, sed la ventoj
oni maron admiras, se oni maron ne iras
se gut' al guto aliĝas, maro fariĝas
sen gutoj malgrandaj maro ne ekzistus

**martelo**
al vi ne plaĉis sitelo, laboru per martelo
esti inter martelo kaj amboso
pli feliĉa estas martelo insultata, ol amboso kompatata

**mastrina**
ne spiciĝas manĝo de mastrina beleco

**mastrino**
du sinjoroj en unu bieno, du mastrinoj ĉe unu kameno - neniam vivas sen reciproka malbeno
li estas sia propra mastrino
rol' de virino - bona mastrino
senplumigi kokinon, ne vekante mastrinon

**mastro**
ĉe mastro ŝtelisto la servantoj ne ŝtelas
kie sklav' regadon havas, tie mastro baldaŭ sklavas
mastro elbabilis, gastoj ne silentos
mastro en vojo - servantoj en ĝojo
ne faru kalkulon sen la mastro
okulo de mastro pli ol beno de pastro
plena sako ĉiun mastron al vi klinos
ŝafo donas sian lanon, por ke mastro havu panon

**maŝine**
li mensogas maŝine

**matena**
horo matena estas horo bena
matena horo estas plena de oro

**matene**
rido matene - ploro vespere

**mateni**
matenas, vesperas - kaj tago malaperas

**mateno**
peli tagojn sen afero de mateno al vespero
vespero lacigas, mateno freŝigas

**mato**
tapiŝon ne deziris, maton akiris

**matura**
aĝo tro matura ne estas plezura
matura aĝo

**matureco**
atesto de matureco

**maturiĝo**
konsumi sian grenon antaŭ ĝia maturiĝo

**medalo**
ĉiu medalo du flankojn posedas

**mediti**
atendis, meditis, ĝis en tombon englitis
stomako malsata nur pri pano meditas
vero ne bezonas mediti nek spriti

**medito**
fremda medito estas kaŝita
kontraŭ faro farita ne helpas medito

**melki**
melki kaproviron
melku bovon senfine, li lakton ne donos

**mem**
al bona ĉasisto iras mem la besto
aliajn gvidas kaj mem ne vidas
alian ne mallaŭdu, vin mem ne aplaŭdu
amiko estas kara, sed mi mem estas pli kara

ĉiun demandu, sed mem al vi komandu
havu poton malgrandan, sed mem estu granda
kaldrono ridas pri poto kaj mem estas kota
kio mem ne venas, li per la dentoj ĝin prenas
kion mem mi faras, tion ĉie mi flaras
kiu batas edzinon, tiu vundas sin mem
kiu fosas sub alia, falos mem en la foson
kiu hundon mian batas, min mem ne tre ŝatas
kiu kritikas kuraĝe, mem agas malsaĝe
kiu laboras kaj deziras, tiu akiras - kiu mem ne penas, nenio al li venas
kiu langon ne tenas, mem sin malbenas
kiu mem sin adoras, nenion valoras
kiu mem sin gloras, malbone odoras
kiu mem sin laŭdas, tiun neniu aplaŭdas
kiu multe babilas, al si mem malutilas
kiu por ĉiuj laboras, pri si mem ne memoras
kiu servas al ĉiu, al si mem malutilas
kiu ŝteliston regalas, mem ŝteliston egalas
kiu tro sin pravigas, tiu mem sin kulpigas
kiun feliĉo subtenas, al tiu mem ĉio venas
li mem estas patrono por sia persono
malsaĝuloj kreskas mem, sen plugo kaj sem'
ne pelu tiun, kiu mem forkuras
ne venas rato mem al kato
ne venos rato mem al kato
ne venos rato mem al la kato
sonorilo vokas al preĝejo kaj mem neniam eniras
ŝtelaĵokaŝisto mem estas ŝtelisto

**memori**
ĉe plej granda fido memoru pri perfido
kiu por ĉiuj laboras, pri si mem ne memoras
kiu volas mensogi, devas bone memori
ni forgesas averton, ni memoras la sperton
malbonon oni memori ne ĉesas, bonon oni baldaŭ forgesas
memori pri mezuro en laboro kaj plezuro
mensogu kiom vi volas, sed memoru kion vi parolas
oni bonon forgesos, malbonon memoras
uzu tempon estantan, antaŭvidu estontan, memoru estintan

**memorigi**
tondro kampulon memorigas pri Dio

**memoro**
enskribu en vian memoron
mensoganto devas havi bonan memoron
pasinta doloro for el memoro

**mendi**
sciencon oni ne mendas, klerecon oni ne vendas

**mensoga**
sen mensoga rekomendo ne iros la vendo

**mensoganto**
mensoganto devas havi bonan memoron

**mensogi**
espero logas, espero mensogas
famo kredon allogas, sed tre ofte mensogas
kiu mensogas kutime, mensogas sentime
kiu mensogis per unu vorto, ne trovos kredon ĝis la morto
kiu ne mensogas, tiu ne vendas
kiu volas mensogi, devas bone memori
li mensogas maŝine
li mensogas tiel, ke la muroj krakas
mensogas kiel gazeto
mensogas kiel kalendaro
mensogas kiel funebra parolo
mensogu kiom vi volas, sed memoru kion vi parolas
por glate mensogi, oni spriton bezonas
pri lando malproksima estas bone mensogi
se vendisto ne mensogas, li aĉetanton ne allogas

**mensogo**
kaŝu kiom vi povos, mensogo sin elŝovos
mensogo kaj ŝtelo estas du fratoj
mensogo malproksimen ne kondukas
por vendisto mensogo estas necesa apogo

**merita**
laboro finita - ripozo merita
servo ne petita ne estas merita

**meriti**
kiel li meritis, tiel li profitis
kiu malmulton ne ŝatas, multon ne meritas
se la gasto meritas, eĉ lia hundo profitas

**merito**
ĉiuj enterigitoj estas plenaj de meritoj
havi ĉe iu krediton kaj meriton
ne kvanto, sed kvalito decidas pri merito
ricevis bandito laŭ sia merito
venas profito - venas merito

**merkredo**
formanĝis en merkredo, ne serĉu en vendredo

**meti**
meti trabojn sur la vojon
oni metis makulon en mian kalkulon
se mi scius, kie mi falos, mi tien metus tapiŝon

**metio**
al posedanto de metio mankas nenio
ĉiu klopodu nur en sia metio, tiam al la urbo mankos nenio
kiu metion disponas, mizeron ne konas
liaj dentoj povas forgesi sian metion
metio lacigas, metio vivigas
metio manĝon ne bezonas kaj manĝon tamen donas
ne rezonu pri tio, kio estas ekster via metio
tro da metioj, - profitoj neniaj
zorgu vian metion kaj ne miksu vin en alian

**metita**
la sigelo ankoraŭ ne estas metita

**metro**
mezuri laŭ sia metro

**meze**
inter faro kaj rakonto staras meze granda monto

**mezuri**
ĉiu mezuras aliajn laŭ sia mezurilo
dek fojojn mezuru, unu fojon detranĉu
mezuri laŭ sia metro

**mezuriĝi**
ne ĉiam per aĝo mezuriĝas la saĝo

**mezurilo**
ĉiu mezuras aliajn laŭ sia mezurilo

mezuro
donu al krudulo plezuron, li ne scios mezuron
memori pri mezuro en laboro kaj plezuro
per mezuro kaj peso akiriĝas sukceso
petolado sen mezuro ne kondukas al plezuro
por ĉiu plezuro devas esti mezuro
tra vitro de teruro pligrandiĝas la mezuro

**mi**
pronomoj “mia” “min” kaj “mi” en mondo reĝas ĉiam tri

**mia**
kio mia, tio bona
ne mia estas la ĉevalo, min ne tuŝas ĝia falo
por mia mono mi ankaŭ estas barono
pronomoj “mia” “min” kaj “mi” en mondo reĝas ĉiam tri

**miela**
lango miela, sed koro kruela

**mielo**
elmetu mielon, muŝoj alflugos
kie estas mielo, tie muŝoj ne mankas
kiu havas abelojn, havas mielon
mielo sur lango, kaj glacio en koro
ne gutas mielo el la ĉielo
pli allogas kulero da mielo, ol da vinagro barelo
se vi donas mielon, donu ankaŭ kuleron
urson al mielo oni ne tiras per orelo

**mieno**
elektu edzinon laŭ deveno kaj ne laŭ mieno
fiera mieno - kapo malplena
havi vinagron en la mieno
kuraĝa mieno antaŭ propra kameno
kaŝu malbenon kaj faru bonan mienon
mieno fiera al ludo mizera
vulpo mienon ŝanĝas, sed plue kokidojn manĝas

**miksi**
zorgu vian metion kaj ne miksu vin en alian

**miliono**
ĉiuj milionoj konsistas el milonoj
el multaj milonoj fariĝas milionoj

**militi**
du militas - tria profitas

**milito**
unu soldato militon ne faras

**miljaro**
miljaroj ne povis - minuto elŝovis

**milo**
groŝon ŝtelis - ho, ŝtelisto! milojn ŝtelis – financisto

**milono**
ĉiuj milionoj konsistas el milonoj
el multaj milonoj fariĝas milionoj

**minaci**
kiu minacas, tiu avertas
kiu multe minacas, ne estas danĝera
li minacas per fingro en la poŝo
minacas dento al la vento
minaci per pugno en la poŝo
reĝo donacis, sed polico minacas

**minaco**
kie minaco, tie malpaco
minacoj ne mortigas
venas rido post minaco, kaj paciĝo post malpaco

**ministra**
aŭ ministran postenon, aŭ pundoman katenon

**ministro**
kiun reĝo protektas, tiun ministro elektas
li ne havas kapon de ministro

**minuto**
kara estas dono en minuto de bezono
kion jaroj ne donis, ofte minuto alportas
miljaroj ne povis - minuto elŝovis
sidas gasto minuton, sed vidas la tuton

**miraklo**
miraklo inter mirakloj

**mizera**
mieno fiera al ludo mizera
ne insultu mizeran, ne moku malliberan

**mizere**
vivu mizere, sed vivu libere!

**mizeri**
kiam sako mizeras, amo malaperas

**mizero**
ĉiu havas sian kaŝitan mizeron
de peko kaj mizero estas plena la tero
el la mizero oni devas fari virton
en mizero eĉ saĝulo estas malsaĝa
en plej alta mizero al Dio esperu
fajro provas la oron, mizero la koron
fremda mizero ne estas sufero
fremda mizero - ridinda afero
instruas mizero manĝi panon sen butero
kiu metion disponas, mizeron ne konas
kiu mizeron ne havis, mizeron ne konas
komenciĝis mizero, ĝi venas per pordo kaj fenestroj
malantaŭe mizero, antaŭe malespero
malsaĝo estas najbaro de mizero
maro da mizeroj
mizero faras lerta, mizero faras sperta
mizero faras viziton, ne atendante inviton
mizero havas talentan kapon
mizero instruas
mizero piedojn sanigas, kolon elastigas
mizero plej ekstreme, Dio plej proksime
mizero saltas, mizero haltas
mizero sur mizero
ne moku mizeron de alia, ĉar baldaŭ venos via
nenio pli grandan mizeron prezentas, ol se sano mankas kaj ŝuldoj turmentas
pelu mizeron tra l' pordo, ĝi revenos tra l' fenestro
sen atendo, sen espero venis mizero
ŝuldo kaj mizero estas najbaroj
ŝuldoj kaj mizero estas najbaroj
treni sian vivon de mizero al mizero
tro da libero kondukas al mizero
venis mizero - helpu min, frato; pasis mizero - for, malamato
vivo sen modero kondukas al mizero

**mizerulo**
konsoliĝas mizerulo, se li estas ne sola

**modera**
vivo modera estas vivo sendanĝera

**modere**
vivi modere, ne tro interne nek tro ekstere

**moderigi**
por ŝafo tondita Dio venton moderigas

**modero**
vivo sen modero kondukas al mizero

**modesta**
kapo majesta, sed cerbo modesta
rangeto rangon respektu, modestan lokon elektu

**mokanto**
se la sorto vin batas, mokantoj ne mankas

**moki**
ne insultu mizeran, ne moku malliberan
ne moku mizeron de alia, ĉar baldaŭ venos via
ne moku riveron, ne atinginte la teron
suferoj sufokas kaj homoj mokas

**moko**
envia moko sukceson ne detruas

**mola**
konscienco senmakula estas kuseno plej mola
lang' estas mola kaj laŭvole petola
mola kiel vakso

**momenta**
edziĝo tro momenta estas longapenta

**momento**
aperas prudento, kiam pasis la momento
venas prudento post la ĝusta momento
vort' en ĝusta momento faras pli ol arĝento

**monaĥo**
kapuĉo monaĥon ne faras

**mondo**
elpeli iun el la mondo de la vivuloj
granda estas la mondo, sed rifuĝon ne donas
li diris adiaŭ al la mondo surtera
loĝi en la fino de la mondo
mono mondon regas
pronomoj "mia" "min" kaj "mi" en mondo reĝas ĉiam tri
ŝiru vin en du partojn, la mondo trian postulos
troviĝas bonaj homoj en la mondo
vi sekrete vorton diros, ĝi tra l' tuta mondo iros
virino scias - tuta mondo scias
vorto dirita al la mondo apartenas kaj neniam revenas

**monero**
el lia mano ĉiu monero elglitas
montru moneron, ĉio fariĝos
oni lin konas, kiel malbonan moneron
unu floro ne estas krono, unu monero ne estas mono

**mono**
al mono kaj forto humiliĝas la sorto
al sklavo mon' ne estas savo - li ĉiam restas sklavo
al tiu ĉio cedas, kiu monon posedas
amu Antonon, sed gardu vian monon
amaso da mono kaj titolo de barono
amo estas forta, sed mono pli forta
amo faras ion, mono ĉion
deziri al iu amason da mono kaj titolon de barono
interkonsento estas pli bona ol mono
klopodo estas kun mono, sed sen ĝi pli malbone
komenciĝis proceso, mono fluas sen ĉeso
la dorm' estas bona, se mankas la mono
li havas pli da mono ol da bezono
li havas pli da mono, ol li povas kalkuli
mono amas kalkulon
mono estas reĝo, mono estas leĝo
mono fluas al riĉulo, batoj al malriĉulo
mono kuras al mono
mono mondon regas
mono monon naskas
mono odoron ne havas, sian devenon ne diras
mono perdita, nenio perdita - honoro perdita, ĉio perdita
mono plenumas ĉiujn oficojn
mono publika estu fortika
naskiĝu, edziĝu kaj mortu - ĉiam monon alportu
ne ekzistas mono, ne ekzistas dono
ne prenis pastro la donon - rekaŝu sako la monon
ne ŝpari monon nek penon
oni vivas ne kun mono, sed kun persono
per bezono venas mono
per lerta admono alfluas la mono
per mono eĉ silento fariĝas elokvento
per mono, ne per mano punu vilaĝanon
perdiĝas per pruntedono amiko kaj mono
pli bona homo sen mono, ol mono sen homo
pli da mono, pli da zorgo
por la mono pastra preĝo, por la mono romp' de leĝo
por mia mono mi ankaŭ estas barono
sen mono en urbon ne iru
sen mono oni estas nulo, kun mono - saĝulo
temp' estas mono
titolo sen mono - sensignifa sono

unu floro ne estas krono, unu monero ne estas mono
uzi monon kaj admonon kaj flaton kaj baton

**monstro**
eĉ monstron admiras, kiu ame deliras
nokte eĉ monstro estas belulo

**monto**
belaj rakontoj el trans la montoj
eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan
inter faro kaj rakonto staras meze granda monto
jen staras la bovoj antaŭ la monto!
kio post la montoj kuŝas, tio nin neniom tuŝas
li jam estas trans montoj kaj maro
monto gravediĝis, muso naskiĝis
ne venas mont' al monto, sed homo homon renkontas
promesi orajn montojn
se neĝas sur la monto, estas malvarme en la valo

**montradi**
montradi al si reciproke la dentojn

**montri**
amikon montras malfeliĉo
kolero montras malsaĝulon
la lipoj ne montru, kion manĝis la buŝo
montras parolo, kion cerbo valoras
montru moneron, ĉio fariĝos

**montriĝi**
vera opinio montriĝas en ebrio

**montro**
montroj kaj konsiloj estas facilaj

**mordanta**
mordantaj hundoj kuras ĉiam kun vundoj
ne ĉiu hundo bojanta estas hundo mordanta

**mordi**
dentoj mordas la langon, tamen ambaŭ sin amas
kiu bojas, ne mordas
kiu mordi ne povas, kisi ekprovas
li salutas profunde kaj mordas hunde
ne unu hundo lin mordis, ne unu vento lin tordis
restis nenio absolute, nek por mordi, nek por gluti

**mordo**
en unu sako du katoj, ĉiam mordoj kaj gratoj
ili estas en akordo, kiel peto kaj mordo

**morgaŭ**
beleco hodiaŭ estas, morgaŭ ne restas
ĉiu morgaŭ havas sian zorgon
morgaŭ estas la amata tago de mallaboruloj
morgaŭ frue venos plue
faru hodiaŭ, kion vi povas, - morgaŭ vi eble okazon ne trovos
feliĉo hodiaŭ karesas, morgaŭ forgesas
hodiaŭ al mi, morgaŭ al vi
hodiaŭ festene, morgaŭ malplene
hodiaŭ forto, morgaŭ morto
hodiaŭ pagi vi devas, morgaŭ kredite ricevos
hodiaŭ supre, morgaŭ malsupre
ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ
neniu scias, kio morgaŭ lin trafos

**morgaŭa**
ne bedaŭru hieraŭan, ne atendu morgaŭan, ne forlasu hodiaŭan

**moro**
alia tempo, aliaj moroj
alia urbo, alia moro
aliaj tempoj, aliaj moroj
doni lecionon de moroj
fari al iu predikon pri moroj
leĝo malaperas, moro daŭras
li havas ĉiun horon alian moron
novaj sinjoroj - novaj moroj

**morti**
bone kreskas la herbo, sed ĉevalo jam mortis
naskiĝu, edziĝu kaj mortu - ĉiam monon alportu
ne valoras bofilo, kiam mortis filino
vivis puninde, mortis ridinde

**mortigi**
minacoj ne mortigas
por muŝon mortigi, oni pafilegon ne uzas

**mortigo**
antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon

**mortiĝi**
ŝuldo ne rustiĝas, ŝuldo ne mortiĝas

**mortinta**
mortinta serĉu ĉielon, vivanta ian celon

**mortinto**
ĝi helpos kiel hirud' al mortinto
ne mankas tombo por mortinto nek pano por vivanto
vivanton ni malhonoras, mortinton ni adoras

**morto**
doni al iu la baton de morto
du mortojn vi ne havos, de unu vi vin ne savos
en amaso eĉ morto estas pli gaja
en kompanio eĉ morto faciliĝas
fidanta al vorto atendas ĝis morto
ĝibulo ĝis morto restos ĝibulo
hodiaŭ forto, morgaŭ morto
homo esperas - morto aperas
kia vivo, tia morto
kio al unu donas forton, al alia donas morton
kiu mensogis per unu vorto, ne trovos kredon ĝis la morto
knaba gusto kun forto daŭras ĝis la morto
la morto ne distingas, ĉiujn egale atingas
la morto ŝercon ne komprenas, oni ĝin vokas, ĝi venas
malavarulo kaj porko estas bonaj post la morto
ne ekzistas forto kontraŭ la morto
por malsanulo forto, por kokido la morto
post morto kuracilo jam estas sen utilo
senpaga estas nur la morto, sed ĝi kostas la vivon
staras la morto jam en la korto

**movi**
ne movi la buŝon!
oni ne povas sin movi laŭ ĉiu vento aparte

**moviĝi**
eĉ ŝtono verdiĝas, se ĝi longe ne moviĝas
koro pleniĝas - lango moviĝas

**muele**
muele sencele

**mueli**
babilas, muelas, kion lango elpelas
kiu pli frue venas, pli frue muelas
kiu venis unue, muelas pli frue

**muelilo**
ĝi estas akvo al lia muelilo
muelilo haltas, muelisto eksaltas

**muelisto**
muelilo haltas, muelisto eksaltas

**multa**
de atendo kaj espero pereis multaj sur la tero
de elekto tro multa plej malbona rezulto
de tro multa scio krevas la kranio
el la buŝ' multaj vortoj eliras, sed ne ĉiuj ion diras
el multaj milonoj fariĝas milionoj
ju disputo pli forta, des pli multaj la vortoj
kiam filino edziniĝis, multaj fianĉoj troviĝis
multaj kompatantoj, sed neniu helpanto
multaj svatiĝas, feliĉulo edziĝas
multaj vokitoj, sed ne multaj elektitoj
per tro multa varto malboniĝas la farto

**multe**
ankoraŭ multe vi kuros, ĝis vi alkuros
azenon komunan oni batas plej multe
inter pokalo kaj lipoj povas multe okazi
kio multe kostas, multe valoras
kiu elektas tro multe, ricevas nenion
kiu glutis tro multe, tiu agas tro stulte
kiu multe babilas, al si mem malutilas
kiu multe babilas, pensas malmulte
kiu multe minacas, ne estas danĝera
kiu multe parolas, malamikon konsolas
kiu multe parolas, ne multe faras
kiu multe profitas, ankaŭ perdon ne evitas
kiu nenion valoras, plej multe sin gloras
kiu tro multe deziras, nenion akiras
la "tuj" de sinjoroj estas multe da horoj
li havas en la cerbo tro multe da herbo
multe da fianĉoj, sed la ĝusta ne venas
multe da peno, neniom da pano
multe da sprito, sed neniom da profito
multe en kapo, sed nenio en poŝo
multe entreprenis, sed ne multe eltenis
multe komencite, malmulte plenumite
pli bone malmulte gajni, ol multe perdi
pli bone ne sali, ol sali tro multe
pli facile estas multe elspezi, ol malmulte enspezi
post la fino de l' batalo estas multe da kuraĝuloj
rado malbona knaras plej multe

tro multe da salo malbonigas la manĝon
vundo sekreta doloras plej multe

**multego**
kapricoj de grandsinjoroj kaj multego da kreditoroj

**multo**
kiu malmulton ne ŝatas, multon ne meritas
kiu multon deziras, nenion akiras
pli facile estas multon elspezi, ol malmulton enspezi
pro multo da arboj li arbaron ne vidas

**murmuregi**
murmuregas la urso, sed danci ĝi devas

**murmuri**
akvo bolas, murmuras, sed fine ĝi kuras
murmuri tra la dentoj
sur la ventro veluro, en la ventro murmuro

**muro**
alpremi iun al muro
ĝi glitas de li kiel pizo de muro
inter miaj muroj estu miaj plezuroj
kiu trans muro aŭskultas, tiun la muro insultas
kuraĝe li staras, kiam muro lin baras
la muro havas orelojn
li mensogas tiel, ke la muroj krakas
li ne toleras eĉ muŝon sur la muro
manon malkvietan ĉiu muro atakas
ne pentru diablon sur la muro
stari por iu kiel muro kaj turo
vivon privatan kaŝu la muroj

**muso**
kiam kato promenas, la musoj festenas
kie pano estas, tie musoj ne mankas
kuradi kiel venenita muso
malriĉa kiel muso preĝeja
monto gravediĝis, muso naskiĝis
muso la katon ĉiam ofendis
muso satiĝis, faruno malboniĝis
plej juna katido musojn jam pelas
por li eĉ la muso ne estas sen felo
se muso nur unu truon disponas, ĝi baldaŭ la vivon fordonas
sidi kiel muso sub balailo

**mustardo**
ĝi estas kiel mustardo post la manĝo
ĝi estas mustardo post la manĝo

**muŝo**
bravulo kontraŭ muŝo, sed muŝo kontraŭ bravulo
eĉ malgranda muŝo ne estas sen buŝo
eĉ muŝo sentas, kiam vi ĝin turmentas
elmetu mielon, muŝoj alflugos
fari el muŝo elefanton
kalkuli muŝojn
kie estas mielo, tie muŝoj ne mankas
kontraŭ muŝoj bravulo, kontraŭ homoj timulo
li havas muŝon en la kapo
li ne toleras eĉ muŝon sur la muro
por muŝon mortigi, oni pafilegon ne uzas
ricevi muŝon en la cerbon

**muta**
virino bonorda estas muta kaj surda

**muziko**
li komprenas predikon, kiel bovo muzikon

**muzo**
post nokta ripozo helpas la muzo

**naĝarto**
al la fiŝo ne instruu naĝarton

**naĝi**
fiŝo granda naĝas profunde
fiŝo volas naĝi

**naĝo**
fiŝo scias pri naĝo ankaŭ sen via saĝo

**naiva**
ne ekzistas naiva vulpo, ne ekzistas homo sen kulpo

**naivulo**
naivuloj jam ne ekzistas

**najbara**
edziĝo najbara garantias de eraro
pri havo najbara oni estas malavara
sia estas kara pli ol la najbara

**najbaro**
kiu havas bonan najbaron, havas bonan tagon
li ŝtelas de najbaro, por doni al altaro
malsaĝo estas najbaro de mizero
najbaro ne ĝemas, kiam boto nin premas
ne serĉu bonan arbaron, serĉu bonan najbaron
nin instruas eraro, kiun faras najbaro
pli bona apude najbaro, ol frato post arbaro
por pot' argila poto fera estas najbaro danĝera
pro limoj kaj baroj malpacas najbaroj
se ne plaĉas la najbaro, ne plaĉas lia faro
sur ĉeval' de najbaro la ŝarĝo ne pezas
ŝuldo kaj mizero estas najbaroj
ŝuldoj kaj mizero estas najbaroj

**najleto**
pro najleto bagatela pereis ĉevalo plej bela

**najtintgalo**
eĉ najtingalo ne estas sen galo

**naski**
barbo elkreskis, sed saĝon ne naskis
konfido naskas konfidon
mono monon naskas
ne naskas porko leonidon, nek korniko aglidon

**naskiĝi**
ĉe vulpoj ĉiam naskiĝas nur vulpoj
de edziĝo tro malfrua orfoj naskiĝas
feliĉo leĝon ne obeas, subite naskiĝas, subite pereas
kia naskiĝis, tia grandiĝis
kiu lupo naskiĝis, vulpo ne fariĝos
kiu naskiĝis sciuro, ne fariĝos vulturo
monto gravediĝis, muso naskiĝis
naskiĝas fianĉino por sia fianĉo
naskiĝu, edziĝu kaj mortu - ĉiam monon alportu
ne naskiĝu riĉa, naskiĝu feliĉa

**naskinto**
kia naskinto, tiaj naskitoj

**naskito**
kia naskinto, tiaj naskitoj

**naturo**
difekton de naturo ne kovros veluro
kutimo estas dua naturo

**nazo**
en fremdan vazon ne ŝovu la nazon
krevis la vazo antaŭ la nazo
li atendas, ke la okazo venu al lia nazo
li foriris kun longa nazo
li tenas la nazon supren
li vidas nur ĝis la pinto de sia nazo
malproksime vidas, antaŭ la nazo ne vidas
nazo supren, vento antaŭen
ne ekzistas terno sen nazo nek fakto sen bazo
ne ŝovu la nazon en fremdan vazon
ne ŝovu nazon en fremdan vazon

**ne**
abelujon ne incitu, amason ne spitu
agrabla estas gasto, se ne longe li restas
aĝo maljuna ne estas oportuna
aĝo tro matura ne estas plezura
al amiko nova ne fidu sen provo
al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras
al du sinjoroj samtempe oni servi ne povas
al farun' malbonspeca ne helpos la spico
al fiŝ' kuirita jam akvo ne helpos
al glacio printempa kaj al amiko tro nova ne fidu
al kavo senfunda ŝtopado ne helpas
al kokino la ovo lecionojn ne donu
al la fiŝo ne instruu naĝarton

al la papero ne mankas tolero
al li ne mankas defendo kontraŭ ofendo
al malriĉulo infanoj ne mankas
al malsaĝulo ne helpas admono, nur bastono
al porko Dio kornojn ne donas
al promeso oni ne kredas - kredu, kiu posedas
al sklavo mon' ne estas savo, li ĉiam restas sklavo
al vi ne plaĉis sitelo, laboru per martelo
aliajn gvidas kaj mem ne vidas
alian ne mallaŭdu, vin mem ne aplaŭdu
almozoj ne malriĉigas
ameno diablon ne forpelas
amikon ŝatu, malamikon ne batu
amo supermezura ne estas plezura
antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon
antaŭ okuloj ne staras, doloron ne faras
antaŭ vespero ne estu fiera
arbo krakanta venton ne timas
balaaĵon el korto eksteren ne elportu
barbo elkreskis, sed saĝon ne naskis
bato de patrino ne longe doloras
bedaŭro kaj ĉagreno ŝuldon ne kovras
bela per vizaĝo, sed ne bela per saĝo
bela vizaĝo, sed ne bela la saĝo
beleco hodiaŭ estas, morgaŭ ne restas
belecon taksas ne okulo sed koro
blindulo kartojn ludi ne devas
bone sukcesu, sed ankaŭ nin ne forgesu
bongusta peco longe ne atendas
bono farita ne estas perdita
bono posedata ne estas ŝatata
ĉasaĵo ĉasanton ne atendas
ĉe mastro ŝtelisto la servantoj ne ŝtelas
ĉe stomako malsata ne kapricas palato
ĉe tablo malplena babilo ne fluas
ĉesis esti vino, sed vinagro ne fariĝis
dancu diabloj, sed ne en mia arbaro
de bona vorto lango ne doloras
de fremda dento ni doloron ne sentas
de legado sen atento ne riĉiĝas la prudento
de malriĉula manĝo ni guston ne scias
de manĝo malriĉula ni guston ne scias
de plendo kaj ploro ne foriĝas doloro
de pli da suko ne malboniĝas la kuko
de semo putra venas frukto ne nutra
de unu bovo oni du felojn ne deŝiras
de unu bovo oni du felojn ne ŝiras
de vorto ĝentila ne doloras la lango
de zorgoj, ne de jaroj, blankiĝas la haroj

demando ne kostas, demando ne devigas
deziro kaj inklino ordonon ne obeas
deziru, ne deziru - ordon' estas, iru!
diablo ne ĉiam unu pordon sieĝas
diablo ŝercon ne komprenas, vokite li venas
difekton de naturo ne kovros veluro
Dio ne perfidas, se homo lin fidas
Dio ne ricevis, diablo forlevis
Dio orfojn ne forgesas
Dion fidu, sed senfare ne sidu
diron oni neas, skribo ne pereas
disputo kredigas, sed ne certigas
disputu komence - vi ne malpacos en fino
donacon reprenu kaj mian vivon ne venenu
donu al krudulo plezuron, li ne scios mezuron
dormus leporo, se ĝi ĉason ne timus
doto koron ne varmigas
du mortojn vi ne havos, de unu vi vin ne savos
ebriulon kaj malsaĝulon oni ne juĝas
eĉ en Parizo herbo ne fariĝas cerbo
eĉ inter piuloj ne mankas pekuloj
eĉ kvar piedoj de ĉevalo ĝin ne savas de falo
eĉ malgranda muŝo ne estas sen buŝo
eĉ najtingalo ne estas sen galo
eĉ per dolĉa kuko vi min ne allogos
eĉ signo ne restis, kie urbo estis
eĉ ŝtono verdiĝas, se ĝi longe ne moviĝas
ekzameni ne devigas preni
ekzemplo proponas, sed ne ordonas
ekzistas ezoko, ke fiŝetoj ne dormu
ekzistas ezoko, por ke fiŝetoj ne dormu
el kanto oni vortojn ne elĵetas
el la buŝ' multaj vortoj eliras, sed ne ĉiuj ion diras
elektu edzinon laŭ deveno kaj ne laŭ mieno
en arbaro sidas kaj arbojn ne vidas
en arbaro sidis kaj arbojn ne vidis
en dom' de pendigito pri ŝnuro ne parolu
en feliĉo ne fieru, en malfeliĉo esperu
en fremda okulo ni vidas ligneron, en nia ni trabon ne vidas
en fremda tegmento li flikas truon kaj en propra ne vidas la fluon
en fremdan vazon ne ŝovu la nazon
en infero loĝante, kun diabloj ne disputu
en puton ne kraĉu, ĉar vi trinki bezonos
envia moko sukceson ne detruas
espero panon ne donas
esti en Romo kaj ne vidi la papon
estis la tempo, ni ne komprenis, pasis la tempo, la saĝ' al ni venis
estro ne malsatas
famo ne flugas, se kaŭzo ne estas

farita ne refariĝos
faru hodiaŭ, kion vi povas, morgaŭ vi eble okazon ne trovos
fasto kaj preĝo riĉecon ne donas
feliĉo leĝon ne konas
feliĉo leĝon ne obeas, subite naskiĝas, subite pereas
feliĉon oni ne heredas nek cedas
fianĉiĝo ne estas edziĝo
fiŝo ne iras, sed hoko ĝin tiras
fluis sur lipoj, sed en buŝon ne trafis
formanĝis en merkredo, ne serĉu en vendredo
fremda doloro ne kondukas al ploro
fremda korpo ne doloras
fremda mizero ne estas sufero
granda estas la mondo, sed rifuĝon ne donas
griza barbo saĝon ne atestas
ĝi eĉ ne tuŝas lian orelon
ĝi ne eliris ankoraŭ el malproksima nebulo
hakilo estas tranĉa, sed ne cedas la branĉo
honoro ne donas, kion stomako bezonas
infano ne krias, patrino ne scias
infanoj kaj fiŝoj voĉon ne havas
infanon malbonigas ne petolado, sed malbona kamarado
insulto ne algluiĝas
inter kornikoj ne konvenas predikoj
iom da malvero ne estas danĝero
jugo propravola ne estas malmola
juĝo komencita paciĝon ne malhelpas
juku la haŭto, sed ne sur mia korpo
juneco ne scias, maljuneco ne povas
kapo malsaĝa ne griziĝas nek kalviĝas
kapuĉo monaĥon ne faras
kiam fratoj batalas, fremdulo ne eniĝu
kiam kato jam formanĝis, forpelado ne helpos
kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas
kie estas mielo, tie muŝoj ne mankas
kie estas pano, ne mankas panpecetoj
kie ne estas konsileble, tie ne estas helpeble
kie pano estas, tie musoj ne mankas
kio akorde ne sonas, tio rimon ne donas
kio estas lernita, ne estas perdita
kio fariĝis, jam ne refariĝos
kio mem ne venas, li per la dentoj ĝin prenas
kio min ne tuŝas, kuŝu kiel kuŝas
kio pasis, ne revenos
kio post ni aperos, ni de ĝi ne suferos
kiom ajn oni penas, per forto plaĉo ne venas
kion Dio ne donis, perforte ne postulu
kion Dio ne donis, tion perforte ne serĉu
kion jaroj ne donis, ofte minuto alportas

kion leĝo malpermesas, tio plaĉi ne ĉesas
kion mi ne scias, tion mi ne envias
kion mi ne sentas, pri tio mi silentas
kion ni havas, por ni ne valoras - kiam ni ĝin perdis, ni ploras
kion rajtas leono, ne rajtas azeno
kion saĝulo ne komprenas, ofte malsaĝa divenas
kion vi ne perdis, tion ne serĉu
kiu akvon evitas, droni ne timas
kiu amas la liton, ne akiros profiton
kiu amas okulaĉi, ne havas kion maĉi
kiu aŭskultas, kie li ne devas, tiu aŭdas, kion li ne revas
kiu bojas, ne mordas
kiu bone agas, timi ne bezonas
kiu bone sidas, tiu lokon ne ŝanĝu
kiu ĉion senpripense parolas, aŭdos tion, kion li ne volas
kiu demandas, tiu ne eraras
kiu devas, tiu elekti ne povas
kiu forton ne havas, ĉiam malpravas
kiu garantias, trankvilon ne scias
kiu groŝon ne honoras, eĉ duongroŝon ne valoras
kiu groŝon ne respektas, riĉecon ne kolektas
kiu hontas nenion, ne timas Dion
kiu hundon mian batas, min mem ne tre ŝatas
kiu koleras, tiu ne prosperas
kiu komencis kuiri, ne forkuru de l' fajro
kiu konsilas kaj rezonas, tiu helpon ne donas
kiu laboras kaj deziras, tiu akiras - kiu mem ne penas, nenio al li venas
kiu laboron evitas, bonon ne vidas
kiu langon ne tenas, mem sin malbenas
kiu lupo naskiĝis, vulpo ne fariĝos
kiu malmulton ne ŝatas, multon ne meritas
kiu mensogis per unu vorto, ne trovos kredon ĝis la morto
kiu metion disponas, mizeron ne konas
kiu mizeron ne havis, mizeron ne konas
kiu mordi ne povas, kisi ekprovas
kiu multe minacas, ne estas danĝera
kiu multe parolas, ne multe faras
kiu multe profitas, ankaŭ perdon ne evitas
kiu naskiĝis sciuro, ne fariĝos vulturo
kiu ne akiras, kiam li povas, tiu poste deziras, sed jam ne retrovas
kiu ne atentas la "se", tiu sentas la "ve"
kiu ne estis kaporalo, ne estos generalo
kiu ne konfidas, tiu ne bedaŭras
kiu ne krimas, tiu ne timas
kiu ne mensogas, tiu ne vendas
kiu ne pekis, kiu ne eraris?
kiu ne petas, tiu ne ricevas
kiu ne riskas, tiu ne gajnas
kiu ne riskas, tiu ne havas

kiu neniun savis, malamikojn ne havas
kiu neniun savis, malamikon ne havas
kiu okazon forŝovas, ĝin jam ne retrovas
kiu panon donas, malsaton ne konas
kiu perdis la kapon, ne bezonas jam ĉapon
kiu por ĉiuj laboras, pri si mem ne memoras
kiu prudenton ne havas, tiun saĝo ne savas
kiu saĝon ne havas, Dio lin savas
kiu speson ne tenas, tiu al spesmilo ne venas
kiu timas bestaron, ne iru arbaron
kiu tro bezonas, tiu leĝon ne konas
kiu volas panon, ne dorlotu la manon
kiun malĝojo ne turmentis, tiu ĝojon ne sentas
koko krias fiere, sed ne danĝere
kolero pravecon ne donas
komercisto estas ĉasisto, li rigardas, kiu sin ne gardas
komparo ne estas pruvo
konateco ne estas hereda
konsilojn ĉiu donas, sed ne kiam oni bezonas
konsoliĝas mizerulo, se li estas ne sola
kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas
kontraŭ faro farita ne helpas medito
kontraŭ kalumnio ne povas batali eĉ Dio
kontraŭ lupo ne helpas kalkulo
kontraŭ malfeliĉo ne defendas eĉ riĉo
kontraŭ malfeliĉoj baro ne ekzistas
kontraŭ neesto ne helpas protesto
kontraŭ peko batalu, sed pekanton ne tuŝu
korvo al korvo okulon ne pikas
kriu eĉ raŭke, sed kanti ne ĉesu
kvalito bona ne bezonas admonon
la afero ne brulas
la afero ne iras glate
la afero ne staras sur pinto de ponto
la afero ne urĝas
la felo tanadon ne valoras
la konscienco lin ne turmentas
la lipoj ne montru, kion manĝis la buŝo
la ludo kandelon ne valoras
la luno ne aŭskultas, kiam hundo ĝin insultas
la morto ne distingas, ĉiujn egale atingas
la morto ŝercon ne komprenas, oni ĝin vokas, ĝi venas
la sigelo ankoraŭ ne estas metita
la tuta ludo ne valoras kandelon
laboro ne estas leporo, ĝi haltos, ne forsaltos
lango nenion atingas, se ĝin saĝo ne svingas
larmoj pravecon ne pruvas
larmoj ŝuldon ne pagas
lavu tutan jaron, negro ne blankiĝos

leĝo pasintaĵon ne tuŝas
leĝo valoras por poste, sed ne por antaŭe
lernado sen fruktoj ne restas
lerneja sekreto ne iru al gazeto
lerteco sorĉon ne bezonas
li dentojn prunti ne bezonas
li faras princan promeson, sed ne havas eĉ speson
li havas cerbon ne tro potencan
li havas dentojn ne por parado
li kuraĝon kolekti ne bezonas
li loĝas tie, kien eĉ birdo ne flugas
li ne elpensis la filozofian ŝtonon
li ne elrampis ankoraŭ el la vindoj
li ne enlasas puŝon en sian buŝon
li ne estas el la grandaj saĝuloj
li ne estas el la regimento de timuloj
li ne frapis al si ankoraŭ la kornojn
li ne havas kapon de ministro
li ne toleras eĉ muŝon sur la muro
li pulvon ne elpensis
li vorton en la poŝo ne serĉas
lupo dormanta ŝafon ne kaptas
lupo lupon ne manĝas
lupo ŝanĝas la harojn, sed ne la farojn
malbona herbo froston ne timas
malbonon oni memori ne ĉesas, bonon oni baldaŭ forgesas
malbonulon diablo ne prenas
malfeliĉo inviton ne atendas
malfeliĉo sin ne ĝenas, faru geston - ĝi tuj venas
malgranda estas la flamo, tamen ne mankas la fumo
maljunaj jaroj, sed ne saĝaj faroj
malproksime vidas, antaŭ la nazo ne vidas
malriĉeco ne estas krimo, tamen kondukas al malestimo
malriĉeco ne estas malvirto
malriĉigas ne nehavado, sed trogranda dezirado
malriĉulo parencojn ne havas
malriĉulo rabiston ne timas
malsaĝulo malpacigis kaj dek saĝuloj repacigi ne povas
malsaĝulo ne griziĝas nek senhariĝas
malsaĝulo ŝtonon ĵetis, dek saĝuloj ĝin ne atingos
malsata stomako orelon ne havas
malsato ne estas frato
malsatulon la fabloj ne nutros
manko de oro ne estas malhonoro
mano dekstra ne sciu, kion faras la maldekstra
marĉandado aĉeti ne devigas
marĉando aĉeti ne devigas
maro ĉiujn riverojn ricevas kaj tamen ne krevas
mastro elbabilis, gastoj ne silentos

melku bovon senfine, li lakton ne donos
mensogo malproksimen ne kondukas
metio manĝon ne bezonas kaj manĝon tamen donas
mi flanke sidis, mi ne aŭdis nek vidis
mi ne povas kapti en ĝi la sencon
mi ne volas baton, mi ne volas kompaton
mi ne volas tion ĉi scii
mi panon ne esperis, subite kuko aperis
min ne tuŝas la afero, mi staras ekstere
minacoj ne mortigas
mizero faras viziton, ne atendante inviton
mono odoron ne havas, sian devenon ne diras
multaj vokitoj, sed ne multaj elektitoj
multe da fianĉoj, sed la ĝusta ne venas
multe entreprenis, sed ne multe eltenis
naivuloj jam ne ekzistas
najbaro ne ĝemas, kiam boto nin premas
ne atendis, ne esperis - malfeliĉo aperis
ne atendita, ne esperita ofte venas subite
ne atingos krio ĝis la trono de Dio
ne aŭskultinte, ne kondamnu
ne batalu pot' el tero kontraŭ kaldrono el fero
ne batas bastono sen persono
ne bedaŭru hieraŭan, ne atendu morgaŭan, ne forlasu hodiaŭan
ne bela estas amata, sed amata estas bela
ne bela estas kara, sed kara estas bela
ne beligas loko homon, sed homo la lokon
ne bezonas la kapo konsilon de kruroj
ne ĉiam daŭras malbona vetero, ne ĉiam daŭras homa sufero
ne ĉiam estas sankta Johano
ne ĉiam per aĝo mezuriĝas la saĝo
ne ĉio batas, kio tondras
ne ĉio brilanta estas diamanto
ne ĉio griza estas lupo
ne ĉio utilas, kio brilas
ne ĉion oni devas severe ekzameni
ne ĉiu aspiranto devas esti prenanto
ne ĉiu bojato estas ŝtelisto
ne ĉiu fianĉiĝas, kiu svatiĝas
ne ĉiu ĝibulo estas sanktulo
ne ĉiu havas egalan feliĉon
ne ĉiu hundo bojanta estas hundo mordanta
ne ĉiu papereto estas banka bileto
ne ĉiu raporto estas vera vorto
ne ĉiuj havas egalan feliĉon
ne defendas oro kontraŭ doloro
ne demandu scienculon, demandu spertulon
ne diru "hop" antaŭ la salto
ne doloras frapo sur fremda kapo

ne donu kaj ne boju
ne ekpepi!
ne ekzistas en komerco amikeco nek ŝerco
ne ekzistas forto kontraŭ la morto
ne ekzistas fumo sen brulo
ne ekzistas fumo sen fajro
ne ekzistas honoro sen laboro
ne ekzistas juneco sen kapricoj, nek maljuneco sen malicoj
ne ekzistas kareso sen intereso
ne ekzistas mono, ne ekzistas dono
ne ekzistas naiva vulpo, ne ekzistas homo sen kulpo
ne ekzistas ofico sen benefico
ne ekzistas regulo sen escepto
ne ekzistas savo kontraŭ malbona virino
ne ekzistas terno sen nazo nek fakto sen bazo
ne el ĉiu ligno oni faras violonon
ne el unu forno li manĝis jam panon
ne elverŝu la malpuran, antaŭ ol vi havas la puran
ne elvoku lupon el la arbaro
ne en ĉiu afero estu severa
ne en unu tago elkreskis Kartago
ne esperite, ne sonĝite
ne estas piediranto kolego al rajdanto
ne estingu la fajron, kiu vin ne bruligas
ne falas frukto malproksime de l' arbo
ne fanfaronu irante, fanfaronu revenante
ne faru kalkulon sen la mastro
ne fidu amikon, kiu havas jam flikon
ne fidu fidelulon, fidu propran okulon
ne fidu heredon, fidu posedon
ne gutas mielo el la ĉielo
ne havante, oni petas, ricevinte, forĵetas
ne helpas glorkrono al malplena kaldrono
ne helpas plendo nek ploro kontraŭ kreditoro
ne helpas ploro al doloro
ne helpas spegulo al malbelulo
ne hontu penti pri faro, hontu persisti en eraro
ne insultu mizeran, ne moku malliberan
ne iras hakilo al kolo humila
ne iru al fremda anaro kun via regularo
ne iru fadeno antaŭ kudrilo
ne iru okuloj super la frunton
ne juĝo kondamnas, sed juĝanto
ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero
ne kaptita - ne punita
ne karesu per mano, sed karesu per pano
ne kaŝiĝas lia lango malantaŭ la vango
ne konante la profundecon, ne iru en la riveron
ne kondamnu alian, oni vin ne kondamnos

ne kotas besto en sia nesto
ne kraĉu en puton, ĉar vi trinki bezonos
ne kredas ŝtelisto, ke honestaj ekzistas
ne kredu al orelo, kredu al okulo
ne kredu al parolo sen propra kontrolo
ne kvanto, sed kvalito decidas pri merito
ne laciĝos mano, ne fariĝos pano
ne laciĝu viaj manoj pri fremdaj infanoj
ne laŭdu la tagon antaŭ vespero
ne longe sinjora daŭras favoro
ne mankas tombo por mortinto nek pano por vivanto
ne maro dronigas ŝipon, sed la ventoj
ne mia estas la ĉevalo, min ne tuŝas ĝia falo
ne moku mizeron de alia, ĉar baldaŭ venos via
ne moku riveron, ne atinginte la teron
ne movi la buŝon!
ne naskas porko leonidon, nek korniko aglidon
ne naskiĝu riĉa, naskiĝu feliĉa
ne pekas drinkulo, pekas ebriulo
ne pelu tiun, kiu mem forkuras
ne pentru diablon sur la muro
ne por lupo estas supo
ne povas ĉiu homo esti pap' en Romo
ne prediku knabino al via patrino
ne prenis pastro la donon - rekaŝu sako la monon
ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ
ne punu edzinon antaŭ infanaj okuloj, ne punu infanojn antaŭ fremduloj
ne puŝu vian regularon en fremdan anaron
ne rapidu insulti, volu aŭskulti
ne rapidu kun fido antaŭ longa kunesido
ne rapidu kun vortoj, rapidu kun faroj
ne rapidu, trankvile decidu
ne rezonu pri tio, kio estas ekster via metio
ne sama la vento blovas konstante
ne sanktuloj potojn faras
ne serĉu bonan arbaron, serĉu bonan najbaron
ne servas larmo anstataŭ armo
ne spiciĝas manĝo de mastrina beleco
ne sufiĉas ploro al kreditoro
ne ŝovu la nazon en fremdan vazon
ne ŝovu nazon en fremdan vazon
ne ŝpari monon nek penon
ne ŝtelus ŝtelistoj, se ne ekzistus kaŝistoj
ne taŭgas du ursoj por unu nesto
ne taŭgas la vero por komerca afero
ne timu hundon bojantan, timu hundon silentan
ne timu tranĉilon, timu babilon
ne trovante bovinon, oni ŝtelas kokinon
ne unu fajron li pasis, ne unu hundo lin ĉasis

ne unu hundo lin mordis, ne unu vento lin tordis
ne valoranto plaĉas, sed plaĉanto valoras
ne valoras bofilo, kiam mortis filino
ne valoras la akiro eĉ la penon de l' deziro
ne valoras la faro la koston de l' preparo
ne veku malfeliĉon, kiam ĝi dormas
ne venas honoro sen laboro
ne venas mont' al monto, sed homo homon renkontas
ne venas rato mem al kato
ne venos rato mem al kato
ne venos rato mem al la kato
ne vivu kiel vi volas, vivu kiel vi povas
ne voku diablon, ĉar li povas aperi
ne volas kokin' al festeno, sed oni ĝin trenas perforte
ne volis rajdi sur ĉevalo, ekrajdis sur azeno
ne zorgu pri tio, kio estas ekster via scio
neceso ne estas kareso
neleĝe akirita ne estas profita
nigran kornikon sapo ne blankigos
nin ĉiam ravas, kion ni ne havas
nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras
ofte ligis malsaĝulo kaj dek saĝuloj malligi ne povas
ofte ligis malsaĝulo kaj saĝuloj malligi ne povas
okaza komplimento ne iras al testamento
okulo ne atentas, dorso eksentas
okulo ne vidis - pagu la sako
oni batas, malkaresas, kaj eĉ plori ne permesas
oni batas ne la aĝon, sed la vizaĝon
oni konsilas kaj konsolas, sed helpi ne volas
oni maron admiras, se oni maron ne iras
oni ne pagas per gloro al sia tajloro
oni ne povas sin movi laŭ ĉiu vento aparte
oni priŝtelas ne riĉulon, sed sengardulon
oni vivas ne kun mono, sed kun persono
oni vokas la bovon ne festeni, sed treni
ovo kokinon ne instruas
paca silento, ke ne blovas eĉ vento
pagas ne riĉulo, pagas kulpulo
pano buŝon ne serĉas
parenc' al parenco ne malhelpas intence
pasero sperta ne bezonas averton
pastro ŝafon ne prenas, ĝi hejmen revenas
pecon detranĉitan al la pano ne regluu
peke akirita ne estas profita
pekon serĉi oni ne bezonas
pendonto ne dronos
per eraro ne praviĝas la faro
per insulto kaj kolero ne klariĝas afero
per mono, ne per mano punu vilaĝanon

per oreloj, ne per okuloj, edzinon elektu
per unu ŝtono oni du ĵetojn ne faras
perdinta la kapon pri haroj ne ploras
petolado sen mezuro ne kondukas al plezuro
petolu, diboĉu, sed poste sorton ne riproĉu
Petron kruro doloras, Karolo ne lamas
piedo ne atentis, kapo eksentis
plej saĝa maljunulo ne estas tro saĝa
plendoj stomakon ne plenigas
pli bone ne fari, ol erari
pli bone ne sali, ol sali tro multe
pli facile estas ne iri, ol tro malfrue reiri
plumo ne sentas, papero silentas
por amiko intima ne ekzistas vojo malproksima
por ebriulo ne ekzistas danĝero
por fremda koro ne ekzistas esploro
por gasto ne petita mankas kulero
por li eĉ la muso ne estas sen felo
por muŝon mortigi, oni pafilegon ne uzas
por parolo delira ne ekzistas rediro
por patrino ne ekzistas infano malbela
por regna speso ne ekzistas forgeso
por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno
por virta orelo ne danĝeras vorto malbela
post la batalo preĝo ne helpas
postulo ne pretendas, rifuzo ne ofendas
preĝu al la Eternulo, ne al lia sanktulo
pri dolĉa vorto ne fieru, maldolĉan ne koleru
pri gustoj oni disputi ne devas
pro eraro ne praviĝas la faro
pro multo da arboj li arbaron ne vidas
pro vorta ludo li eĉ patron ne domaĝas
profiton celu, sed aliajn ne pelu
prokrastita ne estas perdita
proksima kubuto, sed ne por la buŝo
promeso ne satigas
propra opinio ne estas leĝo por alia
pura ĉielo fulmon ne timas
rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo
rapide iras la vortoj, sed ne rapide la faroj
rezonado kaj filozofado panon ne donas
ricevi grizan haron, ne vidinte altaron
riĉigas ne enspezo, sed prudenta elspezo
riĉulo kiel fajro proksime bruligas, malproksime ne varmigas
rigardi kaj aspiri ne devigas akiri
rostita kolombeto ne flugas al buŝeto
saĝo abunda, sed ne profunda
saĝo barbon ne atendas
sako alenon ne tenas, ĝi baldaŭ elvenas

sako malplena sin rekte ne tenas
sako ne sonas, amiko ne konas
sango ne silentas, sian sangon ĝi sentas
sapo blankecon ne havas, tamen blanke ĝi lavas
sata malsatan ne povas kompreni
sata stomako ne lernas volonte
sciencon oni ne mendas, klerecon oni ne vendas
scion akiru, sed ne ĉion eldiru
se brulas nenio, fumo ne iras
se ĉiu speson donos, malriĉulo malsaton ne konos
se Dio ne aranĝos, lupo vin ne manĝos
se Dio ne volas, sanktulo ne helpos
se edzino ordonas, domo ordon ne konas
se ezoko piiĝis, gobio ne dormu
se haroj ne mankus, oni kalvon ne havus
se io venas al buŝo, buŝon ne fermu
se junulo ne lernis, maljunulo ne scias
se kalumnio ne brulas, ĝi almenaŭ makulas
se la gasto estas amata, eĉ lia servanto ne restas malsata
se la sorto vin batas, mokantoj ne mankas
se malsato turmentas, lupo timon ne sentas
se mi scius, kion mi ne scias, ĉiuj saĝuloj min envius
se ne estus “se” kaj “tamen”, mi al ĉio dirus amen
se ne la “se” malfeliĉa, mi estus nun homo plej riĉa
se ne plaĉas la najbaro, ne plaĉas lia faro
se ne venas per bona vorto, oni prenas per forto
se okulo ne atentas, dorso eksentas
se okulo ne vidas, koro ne avidas
se okulo ne vidis, pagas la poŝo
se Peĉjo ne semos, Petro ne rikoltos
se unu ne venis, dek ne atendas
se vendisto ne mensogas, li aĉetanton ne allogas
se vi senfine parolos, de ĝi la poto ne bolos
se vi ŝafo fariĝos, lupoj ne mankos
sen fajro ne brulas eĉ pajlo
sen gutoj malgrandaj maro ne ekzistus
sen laboro ne venas oro
sen mensoga rekomendo ne iros la vendo
sen mono en urbon ne iru
sen ordo en afero ne ekzistas prospero
sen regalo ne estas balo
sen speso unua ne ekzistas la dua
senditon oni aŭskultas aŭ ne aŭskultas, sed ne punas nek insultas
senfara plendo ne estas defendo
senlanigu, sed ne senfeligu
senlanigu, sed ne senhaŭtigu
senplumigi kokinon, ne vekante mastrinon
servo al Dio vana ne restas
servo ne petita ne estas merita

sonorado al li venas, sed de kie - li ne komprenas
sorto ofte alsendas, kion oni ne atendas
sperta mano ne restas sen pano
spesmilo superflua poŝon ne ŝiras
sprit' en tempo ne ĝusta estas tre malbongusta
stomako ne estas spegulo, kion ĝi manĝis, ne vidas okulo
sub seruro promesojn tenu, sed doninte ne reprenu
sub tero sklavo kaj sinjoro ne diferencas per valoro
sur ĉeval' de najbaro la ŝarĝo ne pezas
suspekto pruvon ne egalas
ŝafaro harmonia lupon ne timas
ŝafo kalkulita ne estas savita
ŝajnon ne fidu, juĝi ne rapidu
ŝiru rozojn en somero, ĉar en vintro ili ne estas
ŝiru rozojn en somero, ĉar en vintro ili ne estos
ŝlosilo uzata ruston ne konas
ŝtelisto ŝteliston evitas, ĉar li tie ne profitas
ŝtelisto ŝteliston ne perfidas
ŝuldo ne bruas, tamen dormon detruas
ŝuldo ne makulas, sed pagon postulas
ŝuldo ne rustiĝas, ŝuldo ne mortiĝas
ŝuldon tempo ne kuracas
tablon ornamas ne tuko, sed kuko
tago tagon sekvas, sed ne similas
tapiŝon ne deziris, maton akiris
tro alta postulo aĉetanton ne ŝarĝas
tro da bono ne turmentas
tro da enspezo ne estas tro da pezo
tro forta ĵuro - la afero ne pura
tro rapida akcelo ne kondukas al celo
tuso kaj amo ne estas kaŝeblaj
unu floro ne estas krono, unu monero ne estas mono
unu hako kverkon ne faligas
unu hirundo printempon ne alportas
unu similas nulon, ne prezentas kalkulon
unu soldato militon ne faras
urson al mielo oni ne tiras per orelo
urson evitu, duonpatrinon ne incitu
urtikon frosto ne difektas
valoras ne la vesto, valoras la enesto
vane vi tentas, mi ne konsentos
venkas ne forto, venkas la sorto
venkiton oni ne batas
ventro malsata orelon ne havas
vero ne bezonas mediti nek spriti
vespere ĝuu lunon, sed ne serĉu la sunon
vi ne kredas, ne aŭskultu, sed min ne insultu
via dekstra mano ne sciu, kion faras la maldekstra
vian vivon ĝuu, sed fremdan ne detruu

vidas okulo, sed mano ne trafas
virta virino straton ne konas
vitro kaj feliĉo ne estas fortikaj
vivi modere, ne tro interne nek tro ekstere
vivo glate ne fluas, ĉiam batas kaj skuas
vivu, progresu, sed lerni ne ĉesu
vojon batitan herbo ne kovras
volanta kruro ne laciĝas de kuro
voli aŭ ne voli neniu malpermesas
volo kaj deziro leĝojn ne konas
volu-ne-volu, elekto ne ekzistas
vortoj sakon ne plenigas
zorgu vian metion kaj ne miksu vin en alian

**nebone**
tie ĉi malbone, tie nebone

**nebuligi**
nebuligi al iu la okulojn
nebuligi la okulojn

**nebulo**
ĝi ne eliris ankoraŭ el malproksima nebulo

**necesa**
por vendisto mensogo estas necesa apogo

**neceseco**
el la neceseco oni devas fari virton
neceseco kontraŭvola estas leĝo malmola

**neceso**
neceso ne estas kareso
se devigas neceso, faru kun kareso

**neesto**
kontraŭ neesto ne helpas protesto

**neevitebla**
neevitebla malbono

**negoca**
negocaj aferoj estas severaj

**negro**
lavu tutan jaron, negro ne blankiĝos

**neĝero**
saltadi ĉirkaŭ afero, kiel blovata neĝero

**neĝi**
se neĝas sur la monto, estas malvarme en la valo

**neĝo**
li zorgas pri ĝi kiel pri neĝo pasintjara
neĝo kaŝas nur ĝis printempo

**nehavado**
malriĉigas ne nehavado, sed trogranda dezirado

**nehavanto**
de nehavanto eĉ reĝo nenion ricevos

**nehavo**
kontraŭ nehavo eĉ juĝo silentas

**nei**
diron oni neas, skribo ne pereas

**nek**
feliĉon oni ne heredas nek cedas
fluidaĵo sen difino, nek vinagro nek vino
ĝi estas nek lakto, nek selakto
ĝi estas nek viando, nek fiŝo
kapo malsaĝa ne griziĝas nek kalviĝas
li havas nek ĉelon, nek kelon
li taŭgas nek por studo, nek por ludo
lin tuŝas nek admono, nek ordono
malsaĝulo ne griziĝas nek senhariĝas
mi flanke sidis, mi ne aŭdis nek vidis
mi havas pri tio nek scion nek supozon
ne ekzistas en komerco amikeco nek ŝerco
ne ekzistas juneco sen kapricoj, nek maljuneco sen malicoj
ne helpas plendo nek ploro kontraŭ kreditoro
ne mankas tombo por mortinto nek pano por vivanto
ne naskas porko leonidon, nek korniko aglidon
ne ŝpari monon nek penon
nek al teksto, nek al preteksto
nek al temo, nek al celo
nek eniro, nek eliro
nek ĝojo, nek malĝojo daŭras eterne
nek helpeble, nek konsileble
nek io, nek alio
nek pikite, nek hakite
nek pio por Dio, nek kapablo por diablo

nek por baki, nek por haki
nek transnaĝeble, nek transireble
nenia peno nek provo donos lakton de bovo
restas nek konsilo, nek konsolo
restis nenio absolute, nek por mordi, nek por gluti
senditon oni aŭskultas aŭ ne aŭskultas, sed ne punas nek insultas
vero ne bezonas mediti nek spriti
vivi modere, ne tro interne nek tro ekstere

**neleĝe**
neleĝe akirita ne estas profita

**nelonge**
malŝparulo ĝuas nelonge, avarulo neniam

**nememorebla**
depost tempo nememorebla

**nenia**
fianĉon de l' sorto difinitan forpelos nenia malhelpo
kontraŭ bato senatenda ekzistas nenia defendo
nenia ago fariĝas sen pago
nenia konstruo povas esti sen bruo
nenia peketo restas longe sekreto
nenia peno nek provo donos lakton de bovo
pli valoras faro nenia, ol faro malbona
por peko senkonscia puno nenia
se decidos la sorto, helpos nenia forto
tro da metioj, profitoj neniaj

**neniam**
Dio ĝuste faras, neniam eraras
donado de almozoj neniam malriĉigas
du sinjoroj en unu bieno, du mastrinoj ĉe unu kameno - neniam vivas sen reciproka malbeno
ebrieco pasas post dormo, malsaĝeco neniam
groŝo ŝparita neniam perdiĝas
homo senpeka neniam ekzistis
kiu konstante lokon ŝanĝas, neniam sin aranĝas
kun konfido neniam rapidu
li neniam venkis la alfabeton
malŝparulo ĝuas nelonge, avarulo neniam
neniam atendita ofte venas subite
nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras
oni estas riĉa neniam sufiĉe
pli bone malfrue, ol neniam
por amiko komplezo neniam estas tro peza
sakon kun truo vi neniam plenigos
se amiko petas, li neniam ripetas

serpenton oni povas eviti, sed kalumnion neniam
sonorilo vokas al preĝejo kaj mem neniam eniras
vorto dirita al la mondo apartenas kaj neniam revenas

**Neniamo**
en la tago de la sankta Neniamo

**nenie**
kiu kutimis ĉion juĝi, nenie povas rifuĝi
kun Dio vi iros ĉien, sen Dio nenien
nenie semata, ĉie trovata

**nenio**
al posedanto de metio mankas nenio
aŭ ĉio, aŭ nenio
ĉiu klopodu nur en sia metio, tiam al la urbo mankos nenio
de nehavanto eĉ reĝo nenion ricevos
du manoj faras ĉion, sed unu nenion
kio servas por ĉio, taŭgas por nenio
kiom ajn vi penos, nenio elvenos
kiu elektas tro multe, ricevas nenion
kiu havas nenion, estas nenio
kiu hontas nenion, ne timas Dion
kiu laboras kaj deziras, tiu akiras - kiu mem ne penas, nenio al li venas
kiu mem sin adoras, nenion valoras
kiu multon deziras, nenion akiras
kiu nenion valoras, plej multe sin gloras
kiu tro alte svingas, nenion atingas
kiu tro forte la manon svingas, nenion atingas
kiu tro multe deziras, nenion akiras
kontraŭ kalumnio helpas nenio
kontraŭ volo de Dio helpos nenio
kulo nenion valoras, sed ĝia piko doloras
lango nenion atingas, se ĝin saĝo ne svingas
malplaĉas nenio, se taksas pasio
mi hejme sidis, nenion vidis
mono perdita, nenio perdita, honoro perdita, ĉio perdita
multe en kapo, sed nenio en poŝo
nenio pli grandan mizeron prezentas, ol se sano mankas kaj ŝuldoj turmentas
pli bona estas io, ol nenio
pli bona io, ol nenio
por nenio oni faras nenion
restis nenio absolute, nek por mordi, nek por gluti
se al hundo mankas nenio, ĝin atakas rabio
se brulas nenio, fumo ne iras
sprita vorto tentas, nenion atentas
tie vi petos, vi tiros, vi nenion akiros
tro elektema ricevas nenion
zorgu pri vi, kaj nenion pli

**neniom**
kio post la montoj kuŝas, tio nin neniom tuŝas
multe da peno, neniom da pano
multe da sprito, sed neniom da profito
neniom da oro, sed bona gloro

**neniu**
al la buŝo de “oni” neniu povas ordoni
ankoraŭ neniu evitis la sorton
ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu
kiu ĉasas du leporojn, kaptas neniun
kiu flatas al ĉiu, plaĉas al neniu
kiu mem sin laŭdas, tiun neniu aplaŭdas
kiu neniun savis, malamikojn ne havas
kiu neniun savis, malamikon ne havas
multaj kompatantoj, sed neniu helpant
neniu estas profeto en sia urbeto
neniu sanktulo estas sen makulo
neniu scias, kio morgaŭ lin trafos
neniu vidas, kio lin insidas
nesciado de leĝo neniun pravigas
ni facile forgesas, kio nin ne interesas
ni reciproke nin konas, klarigon ne bezonas
ni vidas, kiu ridas - kiu ploras, ni ne vidas
pri propra afero neniu juĝas libere
propran ĝibon neniu vidas
propran vangon neniu batas
saĝulo scias ion, sed neniu scias ĉion
se neniu plendas, neniu defendas
sian sorton neniu evitos
truon de l’ honoro flikos neniu tajloro
voli aŭ ne voli neniu malpermesas

**nepo**
li estas preskaŭ mia frato: nepo de kuzo de onklo de konato

**nesciado**
nesciado de leĝo neniun pravigas

**nesincera**
donaco nesincera estas donaco infera

**nesto**
al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto
al pec’ pecon algluas, kiu neston konstruas
ankaŭ al nia nesto venos iam la festo
ĉiu besto zorgas pri sia nesto
ne kotas besto en sia nesto

ne taŭgas du ursoj por unu nesto

**nevo**
nevo de Papo facile fariĝas kardinalo

**nigra**
eĉ plej nigra bovino donas lakton nur blankan
nigran kornikon sapo ne blankigos

**nigrigi**
kalumniante konstante, oni eĉ anĝelon nigrigas

**nigro**
nigro sur blanko pruvas sen manko

**nobelo**
nobelo promesojn disdonas, kampulo promesojn plenumas

**nokta**
post nokta ripozo helpas la muzo

**nokte**
nokte eĉ monstro estas belulo

**nokto**
gardu kandelon por la nokto
kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas

**nomi**
por hundon dronigi, oni nomas ĝin rabia

**nomo**
en nomo de l' ĉielo, sed pro bono de l' felo
kia estas la homo, tia estas lia nomo
kia la homo, tia lia nomo
laŭ la agoj de l' homo estas lia nomo
malsaĝulo ĉie sian nomon skribas
nomo egala, sed esenco mala
unu fojon ŝtelis pomon kaj perdis por ĉiam honestan nomon

**noti**
notu en la kamentubo

**nova**
al amiko nova ne fidu sen provo
al glacio printempa kaj al amiko tro nova ne fidu
amu domon novan kaj amikon malnovan
bona estas domo nova kaj amiko malnova
ĉion novan oni ŝatas, malnovan oni forbatas

malnova afero en nova livero
nova balailo bone balaas
nova stato - nova vivo
novaj sinjoroj - novaj moroj
unu amiko malnova pli valoras ol du novaj

**nuanco**
raporti pri ĉiuj cirkonstancoj kaj nuancoj

**nubo**
granda nubo, eta pluvo
granda nubo, malgranda pluvo
tie iras fumo per densaj nuboj

**nuda**
diri al iu nudan veron
kiu rabi eliras, ofte nuda revenas
nuda kaj kruda, sen groŝo en poŝo

**nuko**
sur lia nuko sidas pli ol peruko

**nukso**
nuksoj venis, kiam dentoj elfalis

**nula**
bruo potenca, nula esenco

**nulo**
elmeti la okulon kaj vidi nulon
sen mono oni estas nulo, kun mono - saĝulo
tro grandaj kalkuloj kondukas al nuloj
unu similas nulon, ne prezentas kalkulon

**nun**
farita via faro, nun adiaŭ, mia kara!
nun finiĝas mia klereco
plenumita via ofico, nun pasis via vico!
se ne la “se” malfeliĉa, mi estus nun homo plej riĉa

**nur**
al malsaĝulo ne helpas admono, nur bastono
ĉe vulpoj ĉiam naskiĝas nur vulpoj
ĉiu klopodu nur en sia metio, tiam al la urbo mankos nenio
de majesta ĝis ridinda estas nur unu paŝo
eĉ plej nigra bovino donas lakton nur blankan
edzo kaj edzino estas nur unu
forveturis malsaĝa, revenis nur pli aĝa
kiu sentas - ploras, kiu vidas - nur ridas

kiu tro pelas, nur malakcelas
laŭdu tagon nur vespere
li havis viandon, mi havis nur oston - li havis la ĝuon, mi pagis la koston
li vidas nur ĝis la pinto de sia nazo
liveru nur panon, manĝontoj sin trovos
neĝo kaŝas nur ĝis printempo
nur pano kun fromaĝo, sed afabla vizaĝo
nur suferinto ŝatas feliĉon
nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras
oro nur fingron eksvingas kaj ĉion atingas
por malfrua gasto restas nur osto
pri la ŝtrumpa truo scias nur la ŝuo
se muso nur unu truon disponas, ĝi baldaŭ la vivon fordonas
sendito nur portas, kion oni ordonis, li raportas
senpaga estas nur la morto, sed ĝi kostas la vivon
stomako malsata nur pri pano meditas
superpinte - nur tuŝinte
sur ĉiu flanko nur manko kaj manko
tro rapida faro estas nur baro

**nutra**
de semo putra venas frukto ne nutra

**nutrata**
tro nutrata kapro fariĝas kiel apro

**nutri**
laboro homon nutras, sen laboro li putras
malsatulon la fabloj ne nutros
nutri per promesoj
nutru lupon plej sate, li ĉiam serĉas arbaron
pastron nutras preĝejo

**obei**
deziro kaj inklino ordonon ne obeas
feliĉo leĝon ne obeas, subite naskiĝas, subite pereas
respektu Dion kaj reĝon kaj obeu la leĝon

**objekto**
en ĉiu objekto troviĝas difekto
fremdlando objekton por speso donas, sed por ĝin venigi, oni spesmilon bezonas
valoron de objekto ni ekkonas post difekto

**obstina**
obstina kiel kapro

**obstine**
stariĝi obstine

**odori**
kiu mem sin gloras, malbone odoras

**odoro**
mono odoron ne havas, sian devenon ne diras

**ofendi**
muso la katon ĉiam ofendis
postulo ne pretendas, rifuzo ne ofendas

**ofendo**
al li ne mankas defendo kontraŭ ofendo
foresto de ofendo estas plej bona defendo

**oferi**
faras rabon kaj ŝtelon, por oferi al Dio kandelon

**ofero**
espero postulas oferon
vulpo faras oferon - atendu danĝeron

**ofico**
amikeco aparte, ofico aparte
antaŭ ĉio zorgu oficon - plezuro atendos sian vicon
Dio donis oficon, Dio donas kapablon
Dio donis oficon, Dio donas prudenton
ekster via ofico estas ekster via vico
granda ofico - grandaj zorgoj
mono plenumas ĉiujn oficojn
ne ekzistas ofico sen benefico
plenumita via ofico, nun pasis via vico!

**ofta**
ofta festo - malplena kesto

**ofte**
en ŝerco kaj ludo ofte sidas aludo
famo kredon allogas, sed tre ofte mensogas
inter la mano ĝis la buŝo ofte disverŝiĝas la supo
kion jaroj ne donis, ofte minuto alportas
kion saĝulo ne komprenas, ofte malsaĝa divenas
kiu havas malican celon, ofte perdas sian propran felon
kiu rabi eliras, ofte nuda revenas
la lumo por vero ofte estas danĝero
malsaĝulo ofte estas profeto
ne atendita, ne esperita ofte venas subite
neniam atendita ofte venas subite
ofte ĉapo de kampulo kovras kapon de saĝulo
ofte de kaŭzo senenhava venas efiko plej grava
ofte kantas la buŝo, kiam ploras la koro
ofte ligis malsaĝulo kaj dek saĝuloj malligi ne povas
ofte mano forgesas, kion buŝo promesas
ofte saĝulo vivas malriĉe kaj malsaĝulo feliĉe
pro vorta piko ofte perdiĝas amiko
sendemanda ekprotesto estas ofte kulpatesto
sorto ofte alsendas, kion oni ne atendas

**okaza**
okaza komplimento ne iras al testamento

**okazi**
inter pokalo kaj lipoj povas multe okazi

**okazo**
faru hodiaŭ, kion vi povas - morgaŭ vi eble okazon ne trovos
fordormi la okazon
kiu okazon forŝovas, ĝin jam ne retrovas
li atendas, ke la okazo venu al lia nazo
okazo faras ŝteliston
okazo kreas ŝteliston
okazon kaptu ĉe l' kapo, ĉar la vosto estas glita
se elsaltas la okazo, ĝi rompiĝas kiel vazo

**okcidente**
unu orienten, alia okcidenten

**okula**
al koro penetro per okula fenestro

**okulaĉi**
kiu amas okulaĉi, ne havas kion maĉi

**okulo**
al loko dolora ni manon etendas - al loko ĉarma okulojn ni sendas
antaŭ okuloj ne staras, doloron ne faras
antaŭ tima okulo potenciĝas eĉ kulo
belecon taksas ne okulo sed koro
de l' koro spegulo estas la okulo
de rigardo tro alta malsaniĝas okulo
elmeti la okulon kaj vidi nulon
en fremda okulo ni vidas ligneron, en nia ni trabon ne vidas
for de l' okuloj, for de la koro
gasto havas akrajn okulojn
ĝi estas por mi makulo en la okulo
iafoje oni devas okulon fermeti
ĵeti polvon en la okulojn
kiu tro alten rigardon direktas, tiu tre baldaŭ okulojn difektas
korvo al korvo okulon ne pikas
ne fidu fidelulon, fidu propran okulon
ne kredu al orelo, kredu al okulo
ne iru okuloj super la frunton
ne punu edzinon antaŭ infanaj okuloj, ne punu infanojn antaŭ fremduloj
nebuligi al iu la okulojn
nebuligi la okulojn
okulo avidas ĉion kion vidas
okulo de mastro pli ol beno de pastro
okulo ne atentas - dorso eksentas
okulo ne vidis - pagu la sako
okuloj estas pli grandaj ol la ventro
per oreloj, ne per okuloj, edzinon elektu
pli da okuloj, pli da certeco
rigardu per ambaŭ okuloj!
sapumi la okulojn
se okulo ne atentas, dorso eksentas
se okulo ne vidas, koro ne avidas
se okulo ne vidis, pagas la poŝo
stomako ne estas spegulo: kion ĝi manĝis, ne vidas okulo
streĉu la okulojn!
ŝuti polvon en la okulojn
teni la okulojn en streĉo
tien okuloj iras, kion la koro deziras
timo havas grandajn okulojn
tuta jam sata, sed okulo malsatas
vidas okulo, sed mano ne trafas

**okupi**
mi ankaŭ lokon sur la tero okupas
okupi sen celo lokon sub ĉielo

**olea**
karaktero olea

**ombro**
kie lumo ekzistas, ankaŭ ombro troviĝas
timi sian propran ombron

**oni**
al la buŝo de “oni” neniu povas ordoni

**onklo**
li estas preskaŭ mia frato: nepo de kuzo de onklo de konato

**opinio**
en ĉiu kranio estas sia opinio
en ĉiu kranio regas aparta opinio
kiom da kapoj, tiom da opinioj
propra opinio ne estas leĝo por alia
vera opinio montriĝas en ebrio

**oportuna**
aĝo maljuna ne estas oportuna

**ora**
en landoj transmaraj estas oraj arbaroj
ora ŝlosilo ĉion malfermas
ora ŝlosilo ĉiun pordon malfermas
promesi orajn montojn

**orakolo**
ĝi estas ankoraŭ vortoj de orakolo

**ordigi**
kiu rompis la glason, ordigu la kason
ordigi al iu la kapon

**ordigite**
aranĝite, ordigite

**ordo**
en bona ordo tra la pordo!
kie regas konkordo, regas ordo
ordo estas beno por ĉiu entrepreno
se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo
se edzino ordonas, domo ordon ne konas
sen ordo en afero ne ekzistas prospero

**ordoni**
al la buŝo de “oni” neniu povas ordoni
ekzemplo proponas, sed ne ordonas
kiam forto ordonas, leĝo pardonas
kie mi disponas, tie mi ordonas
kiu manĝon al mi donas, tiu al mi ordonas
se Dio ordonos, eĉ ŝton’ lakton donos
se edzino ordonas, domo ordon ne konas
sendito nur portas; kion oni ordonis, li raportas

**ordonita**
ordonita kiso havas guston maldolĉan

**ordono**
bezono estas plej forta ordono
de la volo la ordono pli efikas ol bastono
deziro kaj inklino ordonon ne obeas
deziru, ne deziru - ordon’ estas, iru!
lin tuŝas nek admono, nek ordono
peto de barono estas ordono
propra volo ordonon superas

**orelo**
ĝi eĉ ne tuŝas lian orelon
havi la orelojn sur ĝusta loko
havi orelojn sur ĝusta loko
juĝanto devas havi du orelojn
la muro havas orelojn
malsata stomako orelon ne havas
ne kredu al orelo, kredu al okulo
paroli dolĉe en la orelon
per oreloj, ne per okuloj, edzinon elektu
por virta orelo ne danĝeras vorto malbela
sidi en laboroj ĝis super la oreloj
streĉi la orelojn
tra unu orelo eniras, tra la dua eliras
traflugis anĝelo preter orelo
urson al mielo oni ne tiras per orelo
ventro malsata orelon ne havas

**orfo**
de edziĝo tro malfrua orfoj naskiĝas
Dio orfojn ne forgesas

**oriente**
unu orienten, alia okcidenten

**ornami**
eĉ ŝtipo estos bela, se vi ĝin ornamos
kiun vesto ornamas, tiun homoj ekamas
sanktfigurojn ornamas kaj homojn malamas
tablon ornamas ne tuko, sed kuko

**oro**
bona gloro pli valoras ol oro
edziĝo laŭ koro, laŭ la kvanto da oro
fajro provas la oron, mizero la koron
ĝentila kaj trankvila, kun koro el oro
granda doto kaj oro, sed mankas la koro
ilo el oro taŭgas por ĉiu laboro
imiti grandsinjoron - perdi baldaŭ la oron
kiu havas oron, havas honoron
laboro kondukas al honoro kaj oro
manko de oro ne estas malhonoro
matena horo estas plena de oro
ne defendas oro kontraŭ doloro
neniom da oro, sed bona gloro
oni batas la oron, por provi ĝian valoron
oro estas pli peza ol fero, pli malpeza ol aero
oro nur fingron eksvingas kaj ĉion atingas
parolo estas arĝento, oron similas silento
plej certa laboro - laboro per oro
pli bona estas virto sen oro, ol oro sen honoro
pli bona virto sen oro, ol oro sen honoro
por sia oro ĉiu estas sinjoro
sen laboro ne venas oro
temp' estas valoro simile al oro

**osto**
ĝi fariĝis por mi osto en la gorĝo
li havis viandon, mi havis nur oston - li havis la ĝuon, mi pagis la koston
por malfrua gasto restas nur osto

**ova**
li ĵus elrampis el la ova ŝelo

**ovo**
al feliĉulo eĉ koko donas ovojn
al kokino la ovo lecionojn ne donu
al malriĉulo ovo kiel al riĉulo bovo
doni ovon, por ricevi bovon
infano ŝtelas ovon, grandaĝulo ŝtelas bovon
kara estas ovo, kiam venas la Pasko
kiun favoras la sorto, por tiu eĉ koko estas ovoporta
ovo kokinon ne instruas

pli valoras konkorda ovo, ol malkonkorda bovo
pli valoras tuj ovo, ol poste bovo
unu ovo malbona tutan manĝon difektas

**paca**
paca silento, ke ne blovas eĉ vento

**pacienci**
Dio longe paciencas, sed severe rekompencas

**pacienco**
espero kaj pacienco kondukas al potenco
laboro kaj pacienco kondukas al potenco
per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro
per pacienco venas scienco

**paciĝo**
juĝo komencita paciĝon ne malhelpas
venas rido post minaco, kaj paciĝo post malpaco

**paco**
paco al lia cindro!
geedzoj en paco vivas en reĝa palaco
kiu akceptas donacon, perdas la pacon
pli bona estas paco feliĉa, ol havo plej riĉa
pli valoras paco malbona, ol malpaco plej bona

**pafi**
eĉ kiu plej bone pafas, tamen iam maltrafas
homo pafas, Dio trafas
kien ajn mi pafas, ĉio maltrafas
li pafis sin for
mi blinde pafos, eble trafos
pafi – maltrafi

**pafilego**
por muŝon mortigi, oni pafilegon ne uzas

**pafilo**
kun urso promenu, sed pafilon prete tenu

**paganto**
eminenta ŝuldanto - malbona paganto

**pagi**
avarulo pagas duoble
el fremda poŝo oni pagas facile
hodiaŭ pagi vi devas, morgaŭ kredite ricevos
kiu donis garantion, tiu pagu la ŝuldon
kiu pekis, tiu pagas
kiu rompis, tiu pagu
larmoj ŝuldon ne pagas

li havis viandon, mi havis nur oston - li havis la ĝuon, mi pagis la koston
mano pekis, dorso pagas
okulo ne vidis - pagu la sako
oni ne pagas per gloro al sia tajloro
pagas maljunaj jaroj por junaj eraroj
pagas ne riĉulo, pagas kulpulo
pagi por fremda festeno
pagi sen partopreno por fremda festeno
pagos lupo por la ŝafo
se okulo ne vidis, pagas la poŝo
senkonscie vi agis - konscie vi pagos
tempo prenas, tempo pagas

**pago**
kia ago, tia pago
kia pago, tia ago
nenia ago fariĝas sen pago
pago de ŝuldanto estas bona en ĉiu kvanto
pensoj iras trans limo sen pago kaj timo
por ĉiu ago venas la tempo de pago
ŝuldo ne makulas, sed pagon postulas

**pajlo**
sen fajro ne brulas eĉ pajlo

**pakaĵo**
forportu vian pakaĵon kaj havaĵon!

**pako**
pli kostas la sako, ol la tuta pako

**palaco**
geedzoj en paco vivas en reĝa palaco
ĝi estas malpaco pri la reĝa palaco
rano eĉ en palaco sopiras pri marĉo

**palato**
ĉe stomako malsata ne kapricas palato

**palpi**
palpi al iu la pulson

**pano**
akvo kaj pano servas al sano
de tro da pano venas malsano
Dio donis infanon, Dio donos por ĝi panon
espero panon ne donas
instruas mizero manĝi panon sen butero
kia greno, tia pano

kie estas pano, ne mankas panpecetoj
kie pano estas, tie musoj ne mankas
kiu panon donas, malsaton ne konas
kiu serĉas marcipanon, perdas sian panon
kiu volas panon, ne dorlotu la manon
li donas peceton da pano kaj bategon per mano
liveru nur panon, manĝontoj sin trovos
mi panon ne esperis, subite kuko aperis
multe da peno, neniom da pano
ne el unu forno li manĝis jam panon
ne karesu per mano, sed karesu per pano
ne laciĝos mano, ne fariĝos pano
ne mankas tombo por mortinto nek pano por vivanto
nur pano kun fromaĝo, sed afabla vizaĝo
oni lekas la manon, sed celas la panon
pano buŝon ne serĉas
pano estas alportita, korbo estu forĵetita
pecon detranĉitan al la pano ne regluu
pli bona pano sen butero, ol dolĉa kuko sen libero
rezonado kaj filozofado panon ne donas
riĉa zorgas pri ĉampano, malriĉa pri pano
sperta mano ne restas sen pano
stomako malsata nur pri pano meditas
ŝafo donas sian lanon, por ke mastro havu panon

**panpeceto**
kie estas pano, ne mankas panpecetoj

**panpeco**
seka panpeco, sed en libereco

**papereto**
ne ĉiu papereto estas banka bileto

**papero**
al la papero ne mankas tolero
plumo ne sentas, papero silentas

**Papo**
esti en Romo kaj ne vidi la Papon
ne povas ĉiu homo esti Pap' en Romo
nevo de Papo facile fariĝas kardinalo
Romo estas tie, kie estas la Papo

**paradizo**
animo al paradizo deziras, sed pekoj retiras

**parado**
li havas dentojn ne por parado

**paraliziĝi**
liaj flugiloj paraliziĝis

**pardonemeco**
pardonemeco superas justecon

**pardoni**
kiam forto ordonas, leĝo pardonas
kontraŭ peko prediku, sed pekinton pardonu

**pardono**
fajron estingas akvo, pekon pardono

**parencaro**
riĉulo havas grandan parencaron

**parenco**
malriĉulo parencojn ne havas
parenc' al parenco ne malhelpas intence
parenco per Adamo
pli bona amiko intima, ol parenco malproksima

**Parizo**
eĉ en Parizo herbo ne fariĝas cerbo
kion Parizo aplaŭdas, Berlino mallaŭdas

**paro**
du botoj faras paron
bela paro por altaro
pli tiras virina haro, ol ĉevala paro
por paro amanta ĉiu loketo sufiĉas
veturi sur sia paro da kruroj

**paroĥestro**
kia paroĥestro, tia paroĥo

**paroĥo**
kia paroĥestro, tia paroĥo

**parolanto**
parolanto semas, aŭdanto rikoltas

**paroli**
en dom' de pendigito pri ŝnuro ne parolu
inter generaloj parolu pri bataloj
kiu ĉion senpripense parolas, aŭdos tion, kion li ne volas
kiu multe parolas, malamikon konsolas
kiu multe parolas, ne multe faras
koro tro plena - buŝo parolas

li parolas sen senco kaj sen interligo
malsaĝulo kaj infano parolas la veron
mensogu kiom vi volas, sed memoru kion vi parolas
paroli dolĉe en la orelon
paroli per vortoj kovritaj
paroli sensencaĵon
Petro parolas sen direkto, sed Paŭlo konjektu
se vi senfine parolos, de ĝi la poto ne bolos
silentu donante, parolu ricevante

**parolisto**
granda parolisto estas duba faristo
granda parolisto, malgranda fariseo

**parolo**
de parolo ĝis faro estas tre malproksime
granda parolo, sed malgranda volo
mensogas kiel funebra parolo
montras parolo, kion cerbo valoras
ne kredu al parolo sen propra kontrolo
parolo anĝela, sed penso pri ŝtelo
parolo estas arĝento, oron similas silento
paroloj kaj faroj estas malsamaj aferoj
per paroloj li bruas, tutan urbon detruas
por parolo delira ne ekzistas rediro
ripetata parolo pri la sama titolo
trafi per la parolo rekte en la vizaĝon

**parto**
al ĉiu frato lian parton
en ĉiu transloĝiĝo estas parto de ruiniĝo
la parto plej vasta venos la lasta
ŝiru vin en du partojn, la mondo trian postulos

**partopreno**
pagi sen partopreno por fremda festeno

**pasanto**
hundo bojas, pasanto vojas
kiam pasanto jam trinkis, li la puton insultas

**pasero**
celis paseron, trafis anseron
fordoni anseron, por ricevi paseron
ĝi estas ankoraŭ pasero en aero
pasero sperta estas lerta
pasero sperta ne bezonas averton
pri tio jam ĉiuj paseroj babilas
unu pasero alian valoras

**pasi**
aperas prudento, kiam pasis la momento
ebrieco pasas post dormo, malsaĝeco neniam
estis la tempo, ni ne komprenis - pasis la tempo, la saĝ' al ni venis
kiam pasis la aĝo, aperas la saĝo
kio estis kaj pasis, tion tempo frakasis
kio pasis, ne revenos
kio pasis, nin forlasis
li pasis akvon kaj fajron kaj marĉojn kaj marojn
malsaĝulo kiel tamburo - kiu pasas, lin batas
ne unu fajron li pasis, ne unu hundo lin ĉasis
plenumita via ofico, nun pasis via vico!
se kalumnio eĉ pasas, ĝi ĉiam ion lasas
venis mizero - helpu min, frato; pasis mizero - for, malamato
vundo pasas, vorto restas

**pasigi**
li scias, kie la kankroj pasigas la vintron

**pasinta**
pasinta doloro for el memoro
serĉi la tagon pasintan

**pasintaĵo**
leĝo pasintaĵon ne tuŝas

**pasintjara**
li zorgas pri ĝi kiel pri neĝo pasintjara

**pasio**
malplaĉas nenio, se taksas pasio

**Pasko**
kara estas ovo, kiam venas la Pasko

**pasto**
se oni amas la gaston, oni zorgas la paston

**pastra**
eĉ kontraŭ pastra prediko troviĝas kritiko
por la mono pastra preĝo, por la mono romp' de leĝo

**pastro**
ne prenis pastro la donon - rekaŝu sako la monon
okulo de mastro pli ol beno de pastro
pastro ŝafon ne prenas, ĝi hejmen revenas
pastro vivas de preĝoj, advokato de leĝoj
pastron nutras preĝejo

**paŝo**
de majesta ĝis ridinda estas nur unu paŝo
unua paŝo iron direktas

**patrineto**
hejma dometo estas kiel patrineto

**patrino**
bato de patrino ne longe doloras
infano ne krias, patrino ne scias
kia patrino, tia filino
ne prediku knabino al via patrino
pli zorgas unu patrino pri dek infanoj, ol dek infanoj pri unu patrino
por patrino ne ekzistas infano malbela
se vi volas filinon, flatu la patrinon
senlaboreco estas patrino de ĉiuj malvirtoj

**patro**
filo konfesis - patro forgesis
li estas la portreto de sia patro
li estas portreto de sia patro
patroj avaras, infanoj malŝparas
pro vorta ludo li eĉ patron ne domaĝas

**patrono**
li mem estas patrono por sia persono

**Paŭlo**
Petro kornojn tenas, Paŭlo lakton prenas
Petro parolas sen direkto, sed Paŭlo konjektu
Petro rifuzas, Paŭlo ekuzas
por Paŭlo sperto - por Petro averto

**pavimita**
per promesoj estas pavimita la infero

**pavo**
pelis pavon, falis kavon

**peceto**
li donas peceton da pano kaj bategon per mano

**peco**
al pec' pecon algluas, kiu neston konstruas
bongusta peco longe ne atendas
pecon detranĉitan al la pano ne regluu

**Peĉjo**
se Peĉjo ne semos, Petro ne rikoltos

**pekado**
ju pli da babilado, des pli da pekado

**pekanto**
kontraŭ peko batalu, sed pekanton ne tuŝu

**peke**
peke akirita ne estas profita

**pekeco**
peko malnova perdas pekecon

**peketo**
nenia peketo restas longe sekreto

**peki**
kapo pekas, piedoj suferas
kiu ne pekis, kiu ne eraris?
kiu pekis, tiu pagas
mano pekis, dorso pagas
ne pekas drinkulo, pekas ebriulo
pekas junuloj kaj pekas maljunuloj

**pekinto**
pekinto pentas - kolero silentas
kontraŭ peko prediku, sed pekinton pardonu

**peko**
animo al paradizo deziras, sed pekoj retiras
de peko kaj mizero estas plena la tero
deko da pekoj - unu la puno
fajron estingas akvo, pekon pardono
kontraŭ peko batalu, sed pekanton ne tuŝu
kontraŭ peko prediku, sed pekinton pardonu
kun la peko en mano
malfeliĉo kaj peko leviĝas sen veko
malplena sako puŝas al peko
malplena sako tentas al peko
peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro
peko malnova perdas pekecon
pekon serĉi oni ne bezonas
por peko senkonscia puno nenia
puno pekon svingas, favorkoreco ĝin estingas
se peko trafas, eĉ bastono ekpafas

**pekulo**
ĉiu estis junulo, ĉiu estis pekulo
eĉ inter piuloj ne mankas pekuloj

**peli**
kiu tro pelas, nur malakcelas
plej juna katido musojn jam pelas
pli efike ol bato pelas malsato
peli tagojn sen afero de mateno al vespero
pelis pavon, falis kavon
pelu mizeron tra l' pordo, ĝi revenos tra l' fenestro
ne pelu tiun, kiu mem forkuras
profiton celu, sed aliajn ne pelu

**pendi**
longe ŝtelas ŝtelisto, tamen fine li pendos
tajloro krimis, botisto pendas

**pendigi**
por pendigi ŝteliston, antaŭe lin kaptu

**pendigito**
en dom' de pendigito pri ŝnuro ne parolu

**pendonto**
pendonto ne dronos

**penetro**
al koro penetro per okula fenestro

**peni**
kiom ajn oni penas, per forto plaĉo ne venas
kiom ajn vi penos, nenio elvenos
kiu laboras kaj deziras, tiu akiras - kiu mem ne penas, nenio al li venas

**peno**
bona puno por malbona peno
multe da peno, neniom da pano
ne ŝpari monon nek penon
ne valoras la akiro eĉ la penon de l' deziro
nenia peno nek provo donos lakton de bovo
venas ĉagreno sen granda peno

**pensi**
kiu multe babilas, pensas malmulte

**pensite**
ŝerce dirite, cele pensite

**penso**
parolo anĝela, sed penso pri ŝtelo
pensoj iras trans limo sen pago kaj timo

**penti**
ne hontu penti pri faro, hontu persisti en eraro
pekinto pentas - kolero silentas

**pentofari**
se vulpo pentofaras, gardu la kokidojn

**pentri**
ne pentru diablon sur la muro

**perdi**
imiti grandsinjoron - perdi baldaŭ la oron
kion ni havas, por ni ne valoras - kiam ni ĝin perdis, ni ploras
kion vi ne perdis, tion ne serĉu
kiu akceptas donacon, perdas la pacon
kiu avidas pli bonan, perdas plej bezonan
kiu domaĝas groŝon, perdas la tutan poŝon
kiu havas malican celon, ofte perdas sian propran felon
kiu koleras, tiu perdas
kiu perdis la kapon, ne bezonas jam ĉapon
kiu serĉas marcipanon, perdas sian panon
peko malnova perdas pekecon
perdi la kandelon el la kapo
perdi la kuraĝon
perdi la saĝon
pli bone estas reiri, ol perdi la vojon
pli bone malmulte gajni, ol multe perdi
pli facile estas perdi vilaĝon, ol akiri domon
pli facile estas vilaĝon perdi, ol domon akiri
unu fojon ŝtelis pomon kaj perdis por ĉiam honestan nomon

**perdiĝi**
groŝo ŝparita neniam perdiĝas
perdiĝas per pruntedono amiko kaj mono
pro karta preno perdiĝis bieno
pro vorta piko ofte perdiĝas amiko

**perdinta**
perdinta la kapon pri haroj ne ploras

**perdita**
bono farita ne estas perdita
kio estas lernita, ne estas perdita
mono perdita, nenio perdita - honoro perdita, ĉio perdita

prokrastita ne estas perdita

**perdite**
kiel akirite, tiel perdite

**perdo**
akiro kaj perdo rajdas duope
kiu multe profitas, ankaŭ perdon ne evitas

**perei**
de atendo kaj espero pereis multaj sur la tero
diron oni neas, skribo ne pereas
feliĉo leĝon ne obeas, subite naskiĝas, subite pereas
pereis ŝafino, pereu ankaŭ la ŝafido
pro najleto bagatela pereis ĉevalo plej bela

**pereigi**
kiu cedas al sia infano, ĝin pereigas per propra mano

**pereo**
bona ideo venas post la pereo

**perfidi**
Dio ne perfidas, se homo lin fidas
kio en koro sidas, la vizaĝo perfidas
se en kor' io sidas, vizaĝo perfidas
ŝtelisto ŝteliston ne perfidas

**perfido**
ĉe plej granda fido memoru pri perfido
oni perfidon prenas, sed perfidulon abomenas
tro da konfido kondukas al perfido

**perforta**
perforta amo estas plej forta malamo

**perforte**
kion Dio ne donis, perforte ne postulu
kion Dio ne donis, tion perforte ne serĉu
ne volas kokin' al festeno, sed oni ĝin trenas perforte

**perlo**
ĵeti perlojn antaŭ la porkojn

**permesi**
oni batas, malkaresas, kaj eĉ plori ne permesas
se vi krudulon iom karesos, li al si ĉion permesos

**persisti**
ne hontu penti pri faro, hontu persisti en eraro

**persona**
ĉion rigardi tra sia persona vitro

**persono**
ĉiu persono kun sia bezono
li mem estas patrono por sia persono
ne batas bastono sen persono
oni vivas ne kun mono, sed kun persono

**peruko**
sur lia nuko sidas pli ol peruko

**peso**
per mezuro kaj peso akiriĝas sukceso

**petata**
gasto tro petata foriras malsata

**peti**
en juneco ni petas, en maljuneco forĵetas
kiu ne petas, tiu ne ricevas
ne havante, oni petas; ricevinte, forĵetas
pri kio amikoj sekretas, ili vian juĝon ne petas
se amiko petas, li neniam ripetas
sinjoro petas, kvazaŭ dekretas
tie vi petos, vi tiros, vi nenion akiros

**petita**
por gasto ne petita mankas kulero
servo ne petita ne estas merita
venas kvazaŭ vokita kaj petita

**peto**
ili estas en akordo, kiel peto kaj mordo
peto de barono estas ordono
peto kaj demando kondukas tra l' tuta lando
venos knabeto ankaŭ kun peto

**petola**
lang' estas mola kaj laŭvole petola

**petolado**
infanon malbonigas ne petolado, sed malbona kamarado
petolado sen mezuro ne kondukas al plezuro

**petoli**
birdo petolas, kiom ĝi volas
juneco petolis, maljuneco malsatos
petolu, diboĉu, sed poste sorton ne riproĉu
sango bolas, juneco petolas

**petolo**
troa petolo estas danĝera por la kolo

**Petro**
mankis al Petro klopodoj, li aĉetis al si domon
Petro kornojn tenas, Paŭlo lakton prenas
Petro parolas sen direkto, sed Paŭlo konjektu
Petro rifuzas, Paŭlo ekuzas
Petron kruro doloras, Karolo ne lamas
por Paŭlo sperto - por Petro averto
se Peĉjo ne semos, Petro ne rikoltos

**peza**
oro estas pli peza ol fero, pli malpeza ol aero
por amiko komplezo neniam estas tro peza

**pezi**
sur ĉeval' de najbaro la ŝarĝo ne pezas

**pezo**
malgranda pezo, sed granda prezo
tro da enspezo ne estas tro da pezo

**pia**
piaj deziroj

**piede**
malfeliĉo venas rajde, foriras piede

**piediranto**
ne estas piediranto kolego al rajdanto

**piedo**
danci antaŭ iu sur piedoj kaj manoj
eĉ kvar piedoj de ĉevalo ĝin ne savas de falo
kapo pekas, piedoj suferas
kiu levis la piedon, devas ekpaŝi
li estas en klopodoj de l' kapo ĝis piedoj
li forpelis siajn piedojn
lia animo forkuris en la pinton de la piedo
mizero piedojn sanigas, kolon elastigas
oni prenas per manoj, redonas per piedoj
piedo ne atentis, kapo eksentis

stari per unu piedo en la tombo

**piiĝi**
se ezoko piiĝis, gobio ne dormu

**piki**
al vi oni predikas kaj nin oni pikas
geamantoj sin pikas
korvo al korvo okulon ne pikas
piki al iu la vundan lokon

**pikite**
nek pikite, nek hakite

**piko**
kulo nenion valoras, sed ĝia piko doloras
pro vorta piko ofte perdiĝas amiko

**pinglo**
eĉ pinglo povas koron trapiki
sidi kiel sur pingloj
sidi sur pingloj

**pinto**
la afero ne staras sur pinto de ponto
li vidas nur ĝis la pinto de sia nazo
lia animo forkuris en la pinton de la piedo

**pio**
nek pio por Dio, nek kapablo por diablo

**piulo**
eĉ inter piuloj ne mankas pekuloj

**pizo**
ĝi glitas de li kiel pizo de muro

**plaĉanto**
ne valoranto plaĉas, sed plaĉanto valoras

**plaĉi**
al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto
al Dio plaĉu, sed sur diablon ne kraĉu
al vi ne plaĉis sitelo, laboru per martelo
ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu
eĉ kaprino plaĉas, se la doto sufiĉas
kion leĝo malpermesas, tio plaĉi ne ĉesas
kiu flatas al ĉiu, plaĉas al neniu
ne valoranto plaĉas, sed plaĉanto valoras

se ne plaĉas la najbaro, ne plaĉas lia faro
simio al simio plaĉas pli ol ĉio
trio plaĉas al Dio

**plaĉo**
kiom ajn oni penas, per forto plaĉo ne venas

**plado**
brava batalanto kontraŭ plado bolanta

**plej**
amiko fidela estas trezoro plej bela
amu edzinon plej kore, sed tenu ŝin bonmore
aŭ plej riĉa stato, aŭ plena malsato
azenon komunan oni batas plej multe
barelo malplena sonas plej laŭte
bezono estas plej forta ordono
ĉe plej granda fido memoru pri perfido
ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme
ĉio sia estas plej ĉarma
ĉiu por si mem estas la plej kara
de elekto tro multa plej malbona rezulto
eĉ kiu plej bone pafas, tamen iam maltrafas
eĉ plej bonan ŝipon malbonigas la ventoj
eĉ plej granda malbono al bono kondukas
eĉ plej nigra bovino donas lakton nur blankan
eĉ plej ruza vulpo en kaptilon falas
eĉ por plej terura tago venas vespero
eĉ vulpo plej ruza fine estas kaptata
en plej alta mizero al Dio esperu
estinta amiko estas plej danĝera malamiko
estintaj amikoj plej kruele malpacas
foresto de ofendo estas plej bona defendo
frukto malpermesita estas plej bongusta
hako post hako estas la plej efika atako
kio kostas malmulte, kostas plej kare
kio vendiĝas kaŝite, vendiĝas plej profite
kiu avidas pli bonan, perdas plej bezonan
kiu nenion valoras, plej multe sin gloras
kiu ripetas abunde, lernas plej funde
kiu venas plej frue, sidas plej ĝue
konscienco senmakula estas kuseno plej mola
kontentulo estas pli feliĉa, ol homo plej riĉa
kun edzo plej malmola estas pli bone ol sola
la parto plej vasta venos la lasta
la plej danĝera homo - malbona in’ en domo
langa vundo plej profunda
malsato plej bone gustigas la manĝon
mizero plej ekstreme, Dio plej proksime

nutru lupon plej sate, li ĉiam serĉas arbaron
ofte de kaŭzo senenhava venas efiko plej grava
perforta amo estas plej forta malamo
plej bona gvidilo estas la lango
plej bona kuracisto estas la tempo
plej bona sprito estas silento
plej bone ridas, kiu laste ridas
plej certa laboro - laboro per oro
plej danĝera malsano estas manko de saĝo
plej facile promeso rimiĝas kun forgeso
plej granda potenco kuŝas en la komenco
plej juna katido musojn jam pelas
plej kruela estas redono por farita bono
plej kuirita kampulo ĉiam restos krudulo
plej saĝa maljunulo ne estas tro saĝa
pli bona branĉo sennuksa, ol kaĝo plej luksa
pli bona estas paco feliĉa, ol havo plej riĉa
pli valoras paco malbona, ol malpaco plej bona
post vetero malbela lumas suno plej hela
pri laboroj maldiligenta, pri festoj plej kompetenta
pro najleto bagatela pereis ĉevalo plej bela
propra sufero - plej granda sur tero
pura konscienco estas plej granda potenco
rado malbona knaras plej multe
ripetado estas plej bona lernado
sanigaĵo malbongusta, sed efiko plej ĝusta
se ne la "se" malfeliĉa, mi estus nun homo plej riĉa
sklavo kun forta mano estas plej granda tirano
spiko malplena plej alte sin tenas
virino batas per lango, aperas vundo plej sanga
vorto sona estas plej admona
vundo sekreta doloras plej multe

**pleje**
klopodi pri ĉies favoro estas pleje malsaĝa laboro

**plena**
apud plena manĝotablo ĉiu estas tre afabla
aŭ plej riĉa stato, aŭ plena malsato
ĉiuj enterigitoj estas plenaj de meritoj
de peko kaj mizero estas plena la tero
koro tro plena - buŝo parolas
matena horo estas plena de oro
plena estas la infero de promesitaj aferoj
plena glaso da vino, sed kun guto da veneno
plena kaso ŝteliston altiras
plena sako ĉiun mastron al vi klinos
plena stomako laŭdas la faston
pli valoras propra ĉemizo, ol fremda plena valizo

ŝparu groŝon - vi havos plenan poŝon

**plenblovi**
plenblovi la lipojn

**plendi**
li atendas kaj plendas kaj denove atendas
se neniu plendas, neniu defendas

**plendo**
de plendo kaj ploro ne foriĝas doloro
de senpripensa rekomendo venas ploro kaj plendo
ne helpas plendo nek ploro kontraŭ kreditoro
plendoj stomakon ne plenigas
rekomendo kondukas al plendo
senfara plendo ne estas defendo

**plenigi**
sakon kun truo vi neniam plenigos
unu guto plenigas la glason
unu sola guto la glason plenigas
vortoj sakon ne plenigas

**pleniĝi**
koro pleniĝas - lango moviĝas
se la kaliko tro pleniĝas, la vino elverŝiĝas
se sako tro pleniĝas, ĝi baldaŭ disŝiriĝas

**plenumi**
mono plenumas ĉiujn oficojn
nobelo promesojn disdonas, kampulo promesojn plenumas

**plenumiĝi**
plenumiĝis la tasko per granda fiasko

**plenumita**
la afero estas plenumita
plenumita via ofico, nun pasis via vico!

**plenumite**
multe komencite, malmulte plenumite

**plenumo**
promeso estas larĝa, plenumo estas ŝarĝa

**plezura**
aĝo tro matura ne estas plezura
amo supermezura ne estas plezura

**plezuro**
al la malamik' en kuro faru ponton kun plezuro
antaŭ ĉio zorgu oficon, plezuro atendos sian vicon
donu al krudulo plezuron, li ne scios mezuron
inter miaj muroj estu miaj plezuroj
iras ĉiu kruro laŭ sia plezuro
malhumileco estas kara plezuro
memori pri mezuro en laboro kaj plezuro
petolado sen mezuro ne kondukas al plezuro
por ĉiu plezuro devas esti mezuro
vivi en silko kaj veluro, en ĝojo kaj plezuro

**pli**
afabla vorto pli atingas ol forto
amiko estas kara, sed mi mem estas pli kara
amiko estas kara, sed vero pli kara
amo estas forta, sed mono pli forta
amo pli kora, disiĝo pli dolora
bona gloro pli valoras ol oro
de la volo la ordono pli efikas ol bastono
de pli da suko ne malboniĝas la kuko
edzino pli elverŝas per funelo, ol edzo enverŝas per sitelo
el du malbonoj pli malgrandan elektu
en amaso eĉ morto estas pli gaja
fiŝo pli granda malgrandan englutas
forveturis malsaĝa, revenis nur pli aĝa
interkonsento estas pli bona ol mono
ju cerbo pli prudenta, des lango pli silenta
ju disputo pli forta, des pli multaj la vortoj
ju homo pli fiera, des puno pli severa
ju laboro pli publika, des pli granda la kritiko
ju pli da aĉetantoj, des pli alta la prezo
ju pli da babilado, des pli da pekado
ju pli da bruo, des malpli da ĝuo
ju pli da donoj, des pli da amikoj
ju pli da havo, des pli da pravo
ju pli da honoro, des pli da laboro
ju pli da ĵuroj, des pli da suspekto
ju pli frue, des pli certe - ju pli volonte, des pli lerte
ju pli granda bezono, des pli granda la prezo
ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro
ju pli la infanoj bezonas, des pli Dio al vi donas
ju pli malproksimen la vojo, des pli da larmoj
ju pli oni babilas, des pli oni al si malutilas
ju pli oni posedas, des pli oni avidas
ju pli precizaj la kalkuloj, des pli fortika la amikeco
kiu avidas pli bonan, perdas plej bezonan
kiu pli frue venas, pli bonan lokon prenas
kiu pli frue venas, pli frue muelas

kiu venis unue, muelas pli frue
klopodo estas kun mono, sed sen ĝi pli malbone
komplezema malsaĝulo estas pli danĝera ol malamiko
kontenteco estas pli bona ol riĉeco
kontentulo estas pli feliĉa, ol homo plej riĉa
kun edzo plej malmola estas pli bone ol sola
li havas pli da mono ol da bezono
li havas pli da mono, ol li povas kalkuli
li havas pli da ŝuldoj en la urbo, ol da haroj en la barbo
malpli esperu, pli konsideru
nenio pli grandan mizeron prezentas, ol se sano mankas kaj ŝuldoj turmentas
okulo de mastro pli ol beno de pastro
okuloj estas pli grandaj ol la ventro
oro estas pli peza ol fero, pli malpeza ol aero
pli allogas kulero da mielo, ol da vinagro barelo
pli bona amiko intima, ol parenco malproksima
pli bona apude najbaro, ol frato post arbaro
pli bona branĉo sennuksa, ol kaĝo plej luksa
pli bona ĉifona vesto, ol riĉeco en malhonesto
pli bona estas gajno malgranda, ol granda malgajno
pli bona estas io, ol nenio
pli bona - estas malamiko de bona
pli bona estas paco feliĉa, ol havo plej riĉa
pli bona estas saĝa malamiko, ol malsaĝa amiko
pli bona estas virto sen oro, ol oro sen honoro
pli bona estas vorto afabla, ol kuko agrabla
pli bona homo sen mono, ol mono sen homo
pli bona io, ol nenio
pli bona pano sen butero, ol dolĉa kuko sen libero
pli bona pano sen butero, ol kuko sen libero
pli bona pura konscienco, ol malpura potenco
pli bona virto sen oro, ol oro sen honoro
pli bone estas enviigi, ol kompatigi
pli bone estas havon fordoni, ol kun homoj malpaci
pli bone estas reiri, ol perdi la vojon
pli bone estas sensale, ol tro sale
pli bone estas ŝviti, ol tremi
pli bone fleksiĝi, ol rompiĝi
pli bone malfrue, ol neniam
pli bone malmulte gajni, ol multe perdi
pli bone ne fari, ol erari
pli bone ne sali, ol sali tro multe
pli da bruo, ol da faro
pli da havo, pli da klopodoj
pli da infanoj, pli da beno
pli da infanoj, pli da manoj
pli da mono, pli da zorgo
pli da okuloj, pli da certeco
pli efike ol bato pelas malsato

pli facile estas eviti ol spiti
pli facile estas malbonon eviti, ol korekti
pli facile estas multe elspezi, ol malmulte enspezi
pli facile estas multon elspezi, ol malmulton enspezi
pli facile estas ne iri, ol tro malfrue reiri
pli facile estas perdi vilaĝon, ol akiri domon
pli facile estas regi ol agi
pli facile estas vilaĝon perdi, ol domon akiri
pli feliĉa estas donanto ol prenanto
pli feliĉa estas martelo insultata, ol amboso kompatata
pli feliĉa sinjoro sen havo, ol riĉulo sed sklavo
pli helpas guto da feliĉo, ol barelo da saĝo
pli kara estas kap' ol ĉapo
pli kara estas kapo ol ĉapo
pli kara kapo ol ĉapo
pli kostas la sako, ol la tuta pako
pli tiras virina haro, ol ĉevala paro
pli valoras faro nenia, ol faro malbona
pli valoras interkonsento, ol juĝa dokumento
pli valoras konkorda ovo, ol malkonkorda bovo
pli valoras kontenta spirito, ol granda profito
pli valoras malgranda reganto, ol granda servanto
pli valoras paco malbona, ol malpaco plej bona
pli valoras propra ĉemizo, ol fremda plena valizo
pli valoras senlaboreco, ol sensenca laboremeco
pli valoras tuj ovo, ol poste bovo
pli valoras vinagro donacita, ol vino aĉetita
pli zorgas unu patrino pri dek infanoj, ol dek infanoj pri unu patrino
sia estas kara pli ol la najbara
sia estas kara pli ol najbara
simio al simio plaĉas pli ol ĉio
suferinto pli valoras, ol lerninto
sur lia nuko sidas pli ol peruko
trovis malbonulo malbonulon pli grandan
unu amiko malnova pli valoras ol du novaj
unu malamiko pli difektas, ol cent amikoj protektas
unu saĝo estas bona, du estas pli bonaj
unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj
virina rideto pli kaptas ol reto
virino kolera pli ol hundo danĝera
volo kaj sento faras pli ol prudento
vort' en ĝusta momento faras pli ol arĝento
zorgu pri vi, kaj nenion pli

**plibono**
plibono estas malamiko de bono

**pligrandiĝi**
tra vitro de teruro pligrandiĝas la mezuro

**ploranto**
ploranton ni evitas, ridanton ni imitas

**plori**
ĝemu kaj ploru, sed ĝis fino laboru
kio doloras, pri tio ni ploras
kion ni havas, por ni ne valoras, - kiam ni ĝin perdis, ni ploras
kiu sentas - ploras, kiu vidas - nur ridas
ni vidas, kiu ridas, - kiu ploras, ni ne vidas
ofte kantas la buŝo, kiam ploras la koro
oni batas, malkaresas, kaj eĉ plori ne permesas
perdinta la kapon pri haroj ne ploras
unu floras, alia ploras

**ploro**
amiko en ĝojo kaj ploro
de plendo kaj ploro ne foriĝas doloro
de senpripensa rekomendo venas ploro kaj plendo
fremda doloro ne kondukas al ploro
ne helpas plendo nek ploro kontraŭ kreditoro
ne helpas ploro al doloro
ne sufiĉas ploro al kreditoro
rido matene - ploro vespere
virina ploro sen valoro

**plue**
morgaŭ frue venos plue
vulpo mienon ŝanĝas, sed plue kokidojn manĝas

**plugo**
malsaĝuloj kreskas mem, sen plugo kaj sem'

**plumo**
plumo ne sentas, papero silentas

**pluvo**
granda nubo, eta pluvo
granda nubo, malgranda pluvo
li trafis el sub pluvo en riveron
pluvo en aprilo - por la tero utilo

**pokalo**
en via malica regalo vin atendas ankaŭ pokalo
inter pokalo kaj lipoj povas multe okazi

**polico**
reĝo donacis, sed polico minacas

**polurita**
li estas frotita kaj polurita

**polvero**
ĉio estas por li kiel polvero sur la tero

**polvo**
ĵeti polvon en la okulojn
ŝuti polvon en la okulojn

**pomo**
eĉ por pomo putranta troviĝas amanto
unu fojon ŝtelis pomon kaj perdis por ĉiam honestan nomon

**ponto**
al la malamik' en kuro faru ponton kun plezuro
la afero ne staras sur pinto de ponto

**popola**
popola kutimo havas valoron de leĝo
venas proverbo el popola la cerbo

**popolo**
popolo diras, Dio diras

**por**
la "por" kaj la "kontraŭ"

**porĉiama**
tro rapida edziĝo - porĉiama kateniĝo

**pordo**
diablo ne ĉiam unu pordon sieĝas
en bona ordo tra la pordo!
komenciĝis mizero, ĝi venas per pordo kaj fenestroj
ora ŝlosilo ĉiun pordon malfermas
pelu mizeron tra l' pordo, ĝi revenos tra l' fenestro
se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo
sieĝi ies pordon
sukcesa venkanto de pordoj malfermitaj

**por ke**
oni batas per vipo, por ke sentu la ripo

**porkino**
elektadis sen fino, edziĝis kun porkino

**porko**
al porko Dio kornojn ne donas
ĵeti perlojn antaŭ la porkojn
malavarulo kaj porko estas bonaj post la morto
ne naskas porko leonidon, nek korniko aglidon
se vi sidos en branoj, vin manĝos la porkoj

**porti**
hundo bojas la vojon, vento portas la bojon
kion koro portas, vizaĝo raportas
sendito nur portas - kion oni ordonis, li raportas

**portreto**
li estas la portreto de sia patro
li estas portreto de sia patro

**posedanto**
al posedanto de metio mankas nenio

**posedata**
bono posedata ne estas ŝatata

**posedi**
al promeso oni ne kredas - kredu, kiu posedas
al tiu ĉio cedas, kiu monon posedas
ĉiu medalo du flankojn posedas
ĉiu propran saĝon posedas
ju pli oni posedas, des pli oni avidas
kiu kapon posedas, kombilon jam trovos

**posedo**
kun sia tuta posedo kaj heredo
malpli da posedo, malpli da tedo
ne fidu heredon, fidu posedon

**post**
bona ideo venas post la pereo
de guto post guto disfalas granito
ebrieco pasas post dormo, malsaĝeco neniam
el post la arbo li estas bravulo
ĝi estas kiel mustardo post la manĝo
ĝi estas mustardo post la manĝo
hako post hako estas la plej efika atako
kio post la montoj kuŝas, tio nin neniom tuŝas
kio post ni aperos, ni de ĝi ne suferos
kiu venis post la manĝo, restas sen manĝo
malavarulo kaj porko estas bonaj post la morto
pli bona apude najbaro, ol frato post arbaro

post alkutimiĝo doloras disiĝo
post brua vento subita silento
post dolĉa vino restas acida vinagro
post domaĝo venas saĝo
post dorma trankvilo venas bona konsilo
post kolero venas favoro
post konfeso venas forgeso
post la batalo preĝo ne helpas
post la falo oni fariĝas singarda
post la fasto venas festo
post la fino de l' batalo estas multe da kuraĝuloj
post mia malapero renversiĝu la tero
post morto kuracilo jam estas sen utilo
post nokta ripozo helpas la muzo
post sufero venas prospero
post vetero malbela lumas suno plej hela
saĝa estas la frato post ricevo de l' bato
saĝa estas la hundo post ricevo de l' vundo
saĝa hundo post la vundo
valoron de objekto ni ekkonas post difekto
venas prudento post la ĝusta momento
venas rido post minaco, kaj paciĝo post malpaco

**poste**
antaŭe intencu kaj poste komencu
antaŭe kion vi devas, poste kion vi volas
kiu ne akiras, kiam li povas, tiu poste deziras, sed jam ne retrovas
leĝo valoras por poste, sed ne por antaŭe
petolu, diboĉu, sed poste sorton ne riproĉu
pli valoras tuj ovo, ol poste bovo

**posteno**
aŭ ministran postenon, aŭ pundoman katenon

**postparolo**
antaŭparolo liberigas de postparolo

**postuli**
donu fingron al avidulo, li tutan manon postulas
enspezo postulas elspezon
espero postulas oferon
kion Dio ne donis, perforte ne postulu
servo postulas reservon
ŝiru vin en du partojn, la mondo trian postulos
ŝuldo ne makulas, sed pagon postulas

**postulo**
en ĉiu angulo alia postulo
kurbiĝu hoko laŭ postuloj de l' loko

postulo ne pretendas, rifuzo ne ofendas
tro alta postulo aĉetanton ne ŝarĝas
vivi laŭ postuloj de la ĝustaj kalkuloj

**poŝo**
de fremda groŝo ŝiriĝas la poŝo
el fremda poŝo oni pagas facile
el la poŝo al la buŝo
kiu domaĝas groŝon, perdas la tutan poŝon
li minacas per fingro en la poŝo
li vorton en la poŝo ne serĉas
luksa la vesto, sed malplena la poŝo
minaci per pugno en la poŝo
multe en kapo, sed nenio en poŝo
nuda kaj kruda, sen groŝo en poŝo
se okulo ne vidis, pagas la poŝo
sin turni al la poŝo
spesmilo superflua poŝon ne ŝiras
ŝparu groŝon - vi havos plenan poŝon

**potenca**
barbo potenca, sed kapo sensenca
bruo potenca, nula esenco
li havas cerbon ne tro potencan

**potenciĝi**
antaŭ tima okulo potenciĝas eĉ kulo

**potenco**
espero kaj pacienco kondukas al potenco
for konscienco, venos potenco
laboro kaj pacienco kondukas al potenco
plej granda potenco kuŝas en la komenco
pli bona pura konscienco, ol malpura potenco
pura konscienco estas plej granda potenco
se mi faru riverencon, mi elektas potencon

**poto**
danci kiel kato ĉirkaŭ poto
havu poton malgrandan, sed mem estu granda
kaldrono ridas pri poto kaj mem estas kota
kia la poto, tia la kovrilo
ne batalu pot' el tero kontraŭ kaldrono el fero
ne sanktuloj potojn faras
por pot' argila poto fera estas najbaro danĝera
poton taksu laŭ sono, sinjoron laŭ tono
prenu kiel vi volas, la poto ĉiam bolas
se vi senfine parolos, de ĝi la poto ne bolos

**povi**
al du sinjoroj samtempe oni servi ne povas
al la buŝo de “oni” neniu povas ordoni
batanto povas argumenti, batato devas silenti
ĉiu provas, kion li povas
Dio al vi donis, por ke vi povu doni
eĉ bagatelo povas servi al celo
eĉ blinda kokino povas trovi grajnon
eĉ pinglo povas koron trapiki
edzigu filon, kiam vi volas - edzinigu filinon, kiam vi povas
faru hodiaŭ, kion vi povas - morgaŭ vi eble okazon ne trovos
hundo povas boji eĉ kontraŭ la reĝo
inter pokalo kaj lipoj povas multe okazi
juneco ne scias, maljuneco ne povas
kaŝu kiom vi povos, mensogo sin elŝovos
kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas
kion mi povas, tion mi elŝovas
kion oni volas, tion oni povas
kiu devas, tiu elekti ne povas
kiu devas, tiu povas
kiu kutimis ĉion juĝi, nenie povas rifuĝi
kiu mordi ne povas, kisi ekprovas
kiu ne akiras, kiam li povas, tiu poste deziras, sed jam ne retrovas
kiu povas antaŭvidi!
konsilu kiu povas
kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas
kontraŭ kalumnio ne povas batali eĉ Dio
li havas pli da mono, ol li povas kalkuli
liaj dentoj povas festi sabaton
liaj dentoj povas forgesi sian metion
malsaĝulo malpacigis kaj dek saĝuloj repacigi ne povas
mi ne povas kapti en ĝi la sencon
miljaroj ne povis - minuto elŝovis
ne povas ĉiu homo esti pap’ en Romo
ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ
ne vivu kiel vi volas, vivu kiel vi povas
ne voku diablon, ĉar li povas aperi
nenia konstruo povas esti sen bruo
ofte ligis malsaĝulo kaj dek saĝuloj malligi ne povas
oni ne povas sin movi laŭ ĉiu vento aparte
pri nenio oni povas ĵuri
sata malsatan ne povas kompreni
se la tempo forblovis, ni jam helpi ne povas
se vi povas, profitu, sed aliajn ne incitu
serpenton oni povas eviti, sed kalumnion neniam
vi povas eĉ haki lignon sur lia kapo

**povo**
riĉa preparo, sed povo avara
sen povo kolero estas ridinda afero

**pranepo**
atendu min antaŭ la domo de mia pranepo

**prave**
prave li ricevas
prave punite laŭmerite

**praveco**
kolero pravecon ne donas
larmoj pravecon ne pruvas

**pravi**
kiu jam havas, tiu pravas

**pravigi**
kiu tro sin pravigas, tiu mem sin kulpigas
nesciado de leĝo neniun pravigas

**praviĝi**
per eraro ne praviĝas la faro
pro eraro ne praviĝas la faro

**pravo**
ju pli da havo, des pli da pravo

**preciza**
ju pli precizaj la kalkuloj, des pli fortika la amikeco

**prediki**
al vi oni predikas kaj nin oni pikas
kontraŭ peko prediku, sed pekinton pardonu
ne prediku knabino al via patrino
prediki al surduloj

**prediko**
aŭskulti kiel ĥinan predikon
eĉ kontraŭ pastra prediko troviĝas kritiko
fari al iu predikon pri moroj
inter kornikoj ne konvenas predikoj
li komprenas predikon, kiel bovo muzikon

**preĝeja**
malriĉa kiel muso preĝeja

**preĝejo**
malsaĝulon oni batas eĉ en la preĝejo
pastron nutras preĝejo
preĝejo proksima, sed Dio malproksima
sonorilo vokas al preĝejo kaj mem neniam eniras

**preĝi**
danĝero sieĝas, al Dio ni preĝas - danĝero ĉesas, ni Dion forgesas
preĝu al la Eternulo, ne al lia sanktulo
preĝu kore kaj laboru fervore

**preĝo**
certaĵo kaj leĝo, kiel amen en preĝo
fasto kaj preĝo riĉecon ne donas
pastro vivas de preĝoj, advokato de leĝoj
por la mono pastra preĝo, por la mono romp' de leĝo
post la batalo preĝo ne helpas
preĝon faru, sed farunon preparu

**premanta**
malfeliĉo komuna estas malpli premanta

**premi**
najbaro ne ĝemas, kiam boto nin premas

**prenanto**
ne ĉiu aspiranto devas esti prenanto
pli feliĉa estas donanto ol prenanto

**preni**
Dio donis, Dio prenis
ekzameni ne devigas preni
falis el mano - prenu satano
kio mem ne venas, li per la dentoj ĝin prenas
kiu donacon prenas, tiu sin katenas
kiu pli frue venas, pli bonan lokon prenas
li prenos kaj benos
malbonulon diablo ne prenas
ne prenis pastro la donon - rekaŝu sako la monon
oni invitas - venu, oni donacas - prenu
oni perfidon prenas, sed perfidulon abomenas
oni prenas avide, oni redonas malrapide
oni prenas per manoj, redonas per piedoj
pastro ŝafon ne prenas, ĝi hejmen revenas
Petro kornojn tenas, Paŭlo lakton prenas

preni iun sur la dentojn
prenu kiel vi volas, la poto ĉiam bolas
se ne venas per bona vorto, oni prenas per forto
se vi prenis la violonon, prenu ankaŭ la arĉon
tempo prenas, tempo pagas
tempo venos, zorgon prenos
unua venis, unua prenis
vi amas preni, amu redoni

**prenita**
bovo prenita, koko donita kaj - kvita

**preno**
pro karta preno perdiĝis bieno

**prepari**
preĝon faru, sed farunon preparu

**preparo**
ne valoras la faro la koston de l' preparo
riĉa preparo, sed povo avara

**prete**
kun urso promenu, sed pafilon prete tenu

**preteksto**
nek al teksto, nek al preteksto
por ŝafon formanĝi, lupo trovos pretekston

**pretendi**
postulo ne pretendas, rifuzo ne ofendas

**preter**
ĝi iris al li preter la buŝon
traflugis anĝelo preter orelo

**prezenti**
cent jarojn silentis kaj subite sin prezentis
du kontraŭ unu prezentas armeon
kion koro sentas, lango prezentas
nenio pli grandan mizeron prezentas, ol se sano mankas kaj ŝuldoj turmentas
unu similas nulon, ne prezentas kalkulon
vesto homon prezentas

**prezo**
ju pli da aĉetantoj, des pli alta la prezo
ju pli granda bezono, des pli granda la prezo
malgranda pezo, sed granda prezo

**pri**
ĉe plej granda fido memoru pri perfido
ĉiu besto zorgas pri sia nesto
Dio scias bone pri niaj bezonoj
disputu pri ĉio, sed sen garantio
en dom' de pendigito pri ŝnuro ne parolu
fari al iu predikon pri moroj
fiŝo scias pri naĝo ankaŭ sen via saĝo
ĝi estas malpaco pri la reĝa palaco
inter generaloj parolu pri bataloj
kaldrono ridas pri poto kaj mem estas kota
kapo estas por tio, ke ĝi zorgu pri ĉio
kio doloras, pri tio ni ploras
kion mi ne sentas, pri tio mi silentas
kiu por ĉiuj laboras, pri si mem ne memoras
kiu pri ŝtelo silentas, tiu ŝtelon konsentas
klopodi pri ĉies favoro estas pleje malsaĝa laboro
li estas kompetenta, kiel besto pri arĝento
li zorgas pri ĝi kiel pri neĝo pasintjara
memori pri mezuro en laboro kaj plezuro
mi havas pri tio nek scion nek supozon
ne hontu penti pri faro, hontu persisti en eraro
ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero
ne kvanto, sed kvalito decidas pri merito
ne laciĝu viaj manoj pri fremdaj infanoj
ne rezonu pri tio, kio estas ekster via metio
ne zorgu pri tio, kio estas ekster via scio
parolo anĝela, sed penso pri ŝtelo
perdinta la kapon pri haroj ne ploras
pli zorgas unu patrino pri dek infanoj, ol dek infanoj pri unu patrino
pri dolĉa vorto ne fieru, maldolĉan ne koleru
pri gustoj oni disputi ne devas
pri havo najbara oni estas malavara
pri kio amikoj sekretas, ili vian juĝon ne petas
pri kio estas la afero?
pri la lupo rakonto, kaj la lupo renkonte
pri la ŝtrumpa truo scias nur la ŝuo
pri laboroj maldiligenta, pri festoj plej kompetenta
pri lando malproksima estas bone mensogi
pri nenio oni povas ĵuri
pri propra afero neniu juĝas libere
pri tio jam ĉiuj paseroj babilas
rano eĉ en palaco sopiras pri marĉo
raporti pri ĉiuj cirkonstancoj kaj nuancoj
riĉa zorgas pri ĉampano, malriĉa pri pano
ridas blindulo pri lamulo
ripetata parolo pri la sama titolo
se vi pri ĉio informiĝos, vi baldaŭ maljuniĝos
stomako malsata nur pri pano meditas

tondro kampulon memorigas pri Dio
zorgu pri vi, kaj nenion pli

**princa**
li faras princan promeson, sed ne havas eĉ speson

**printempa**
al glacio printempa kaj al amiko tro nova ne fidu

**printempo**
li havas ankoraŭ printempon en kapo
neĝo kaŝas nur ĝis printempo
printempo semas, aŭtuno rikoltas
unu hirundo printempon ne alportas

**pripeni**
kion vi pripenas, tio al vi venas

**pripensi**
pripensu malrapide kaj agu decide

**priŝteli**
oni priŝtelas ne riĉulon, sed sengardulon

**privata**
vivon privatan kaŝu la muroj

**proceso**
komenciĝis proceso, mono fluas sen ĉeso

**profesoro**
lecionoj al profesoro estas vana laboro

**profeto**
ĵuri per la barbo de l' Profeto
malsaĝulo ofte estas profeto
neniu estas profeto en sia urbeto
vera kiel vorto de profeto

**profita**
neleĝe akirita ne estas profita
peke akirita ne estas profita

**profite**
kio vendiĝas kaŝite, vendiĝas plej profite

**profiti**
du militas - tria profitas
kiel li meritis, tiel li profitis

kiu multe profitas, ankaŭ perdon ne evitas
kiu ŝvitas, tiu profitas
se la gasto meritas, eĉ lia hundo profitas
se vi povas, profitu, sed aliajn ne incitu
ŝtelisto ŝteliston evitas, ĉar li tie ne profitas

**profito**
kiu amas la liton, ne akiros profiton
multe da sprito, sed neniom da profito
pli valoras kontenta spirito, ol granda profito
profiton celu, sed aliajn ne pelu
tro da metioj - profitoj neniaj
venas profito - venas merito

**profunda**
langa vundo plej profunda
saĝo abunda, sed ne profunda

**profunde**
fiŝo granda naĝas profunde
li salutas profunde kaj mordas hunde
sciu funde, sed tenu profunde

**profundeco**
ne konante la profundecon, ne iru en la riveron

**profundo**
fiŝo serĉas profundon, homo serĉas abundon
granda ŝipo bezonas profundon

**progresi**
vivu, progresu, sed lerni ne ĉesu

**prokrasti**
ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ

**prokrastita**
prokrastita ne estas perdita

**proksima**
preĝejo proksima, sed Dio malproksima
proksima kubuto, sed ne por la buŝo

**proksime**
mizero plej ekstreme, Dio plej proksime
riĉulo kiel fajro proksime bruligas, malproksime ne varmigas
ŝtelu malproksime, edziĝu proksime

**promenadi**
vi sekretos al edzino, ŝi sekretos al fratino, kaj tiel la sekreto promenados sen fino

**promeni**
kiam kato promenas, la musoj festenas
kio aliloke promenos, al ni ankaŭ ĝi venos
kun urso promenu, sed pafilon prete tenu
lia cerbo iris promeni

**promesi**
ofte mano forgesas, kion buŝo promesas
promesi orajn montojn

**promesita**
plena estas la infero de promesitaj aferoj
promesita trezoro estas sen valoro

**promeso**
al promeso oni ne kredas - kredu, kiu posedas
kiu promesojn faras, tiu ne avaras
li faras princan promeson, sed ne havas eĉ speson
nobelo promesojn disdonas, kampulo promesojn plenumas
nutri per promesoj
per promesoj estas pavimita la infero
plej facile promeso rimiĝas kun forgeso
promeso estas larĝa, plenumo estas ŝarĝa
promeso ne satigas
sub seruro promesojn tenu, sed doninte ne reprenu

**pronomo**
pronomoj "mia" "min" kaj "mi" en mondo reĝas ĉiam tri

**propeka**
propeka kapro

**proponi**
dronanto domon proponas, savito eĉ brikon ne donas
ekzemplo proponas, sed ne ordonas
homo proponas, Dio disponas

**propra**
al ĉiu sia propra estas ĉarma kaj kara
apud propra domo ŝtelisto ne ŝtelas
ĉiu havas sian propran guston
ĉiu propran saĝon posedas
eĉ ĉe kokino troviĝas propra inklino
en fremda tegmento li flikas truon kaj en propra ne vidas la fluon
en la propra sia domo ĉiu estas granda homo

en propra angulo ĉiu estas fortulo
estu saĝa homo en via propra domo
kiu cedas al sia infano, ĝin pereigas per propra mano
kiu fremdan avidas, propran forperdas
kiu havas malican celon, ofte perdas sian propran felon
korniko vundita propran voston timas
kuraĝa mieno antaŭ propra kameno
kuri de sia propra korpo
li estas sia propra mastrino
ne fidu fidelulon, fidu propran okulon
ne kredu al parolo sen propra kontrolo
pli valoras propra ĉemizo, ol fremda plena valizo
pri propra afero neniu juĝas libere
propra opinio ne estas leĝo por alia
propra sufero - plej granda sur tero
propra supo brogas, fremda allogas
propra volo ordonon superas
propran ĝibon neniu vidas
propran vangon neniu batas
timi sian propran ombron

**propravola**
jugo propravola ne estas malmola

**prosperi**
kiu koleras, tiu ne prosperas
se amas Dio, prosperas ĉio

**prospero**
post sufero venas prospero
sen ordo en afero ne ekzistas prospero

**protekti**
kiun reĝo protektas, tiun ministro elektas
unu malamiko pli difektas, ol cent amikoj protektas
vundan lokon protektis, alian difektis

**protekto**
al protekto kaj forto helpas la sorto

**protesto**
kontraŭ neesto ne helpas protesto

**proverbo**
proverbo estas sperto, proverbo estas averto
venas proverbo el popola la cerbo

**provi**
ĉiu provas, kion li povas
fajro provas la oron, mizero la koron
oni batas la oron, por provi ĝian valoron

**provo**
al amiko nova ne fidu sen provo
nenia peno nek provo donos lakton de bovo

**prudenta**
ju cerbo pli prudenta, des lango pli silenta
riĉigas ne enspezo, sed prudenta elspezo

**prudente**
aŭskultas prudente, kiu aŭskultas atente

**prudento**
aperas prudento, kiam pasis la momento
ĉiu vivas laŭ sia prudento kaj sento
de legado sen atento ne riĉiĝas la prudento
Dio donis oficon, Dio donas prudenton
kiu prudenton ne havas, tiun saĝo ne savas
venas prudento post la ĝusta momento
volo kaj sento faras pli ol prudento

**pruntedono**
perdiĝas per pruntedono amiko kaj mono

**pruntepreni**
vilaĝano kreditas, vilaĝestro prunteprenas

**prunti**
li dentojn prunti ne bezonas

**prunto**
prunto amikon forpelas

**pruvi**
larmoj pravecon ne pruvas
nigro sur blanko pruvas sen manko

**pruvo**
komparo ne estas pruvo
suspekto pruvon ne egalas

**publika**
ju laboro pli publika, des pli granda la kritiko
kiso publika estas kiso malamika

mono publika estu fortika

**pugno**
ludi kun iu ludon de pugnoj
minaci per pugno en la poŝo
trafis pugno pugnon

**pulso**
palpi al iu la pulson

**pulvo**
eksplodema kiel pulvo
eksplodis kiel pulvo
li pulvon ne elpensis

**pundoma**
aŭ ministran postenon, aŭ pundoman katenon

**puni**
bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno
bona puno por malbona peno
Dio punas laŭ la fortoj
Dio puni deziras, li la saĝon fortiras
ne punu edzinon antaŭ infanaj okuloj, ne punu infanojn antaŭ fremduloj
per mono, ne per mano punu vilaĝanon
senditon oni aŭskultas aŭ ne aŭskultas, sed ne punas nek insultas

**puninde**
vivis puninde, mortis ridinde

**punita**
ne kaptita - ne punita

**punite**
kune kaptite, kune punite
prave punite laŭmerite

**puno**
amo kaj puno loĝas komune
de kiu la kulpo, por tiu la puno
deko da pekoj - unu la puno
ju homo pli fiera, des puno pli severa
por peko senkonscia puno nenia
puno pekon svingas, favorkoreco ĝin estingas

**pura**
akvo kura - akvo pura
diri la puran veron
ne elverŝu la malpuran, antaŭ ol vi havas la puran

pli bona pura konscienco, ol malpura potenco
pura ĉielo fulmon ne timas
pura konscienco estas plej granda potenco
tro forta ĵuro - la afero ne pura

**pureco**
vesto eluzita, sed pureco spirita

**puŝi**
malplena sako puŝas al peko
ne puŝu vian regularon en fremdan anaron

**puŝo**
li ne enlasas puŝon en sian buŝon

**puto**
en puton ne kraĉu, ĉar vi trinki bezonos
kiam pasanto jam trinkis, li la puton insultas
ne kraĉu en puton, ĉar vi trinki bezonos

**putra**
de semo putra venas frukto ne nutra

**putrado**
putrado de fiŝo komenciĝas de l' kapo

**putraĵo**
akvon senmovan kovras putraĵo

**putranta**
eĉ por pomo putranta troviĝas amanto

**putri**
laboro homon nutras, sen laboro li putras

**putrigi**
laboro fortigas, ripozo putrigas

**rabi**
kiu rabi eliras, ofte nuda revenas

**rabia**
kolera kiel rabia hundo
por hundon dronigi, oni nomas ĝin rabia

**rabio**
se al hundo mankas nenio, ĝin atakas rabio

**rabisto**
malriĉulo rabiston ne timas

**rabo**
faras rabon kaj ŝtelon, por oferi al Dio kandelon

**radiko**
lernado havas maldolĉan radikon, sed bonan efikon

**rado**
ĵeti bastonon en la radon
kvina rado ĉe veturado
rado malbona knaras plej multe

**rajdanto**
ne estas piediranto kolego al rajdanto

**rajdi**
akiro kaj perdo rajdas duope
malfeliĉo venas rajde, foriras piede
ne volis rajdi sur ĉevalo, ekrajdis sur azeno
rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo

**rajte**
leĝe kaj rajte

**rajti**
kion rajtas leono, ne rajtas azeno

**rajto**
al venko rajto venas, se ĝin forto subtenas
kie regas la forto, tie rajto silentas
kiu havas forton, havas rajton
kiu havas la forton, havas la rajton

**rakonti**
rakonti ĉion faritan kaj kaŝitan

**rakonto**
belaj rakontoj el trans la montoj
inter faro kaj rakonto staras meze granda monto
pri la lupo rakonto, kaj la lupo renkonte

**rando**
laŭdu belecon de l' maro, sed ĉe rando de barbaro

**rangeto**
rangeto rangon respektu, modestan lokon elektu

**rango**
rangeto rangon respektu, modestan lokon elektu

**rano**
kie ajn rano iras, ĝi ĉiam marĉon sopiras
rano eĉ en palaco sopiras pri marĉo

**rapida**
tro rapida akcelo ne kondukas al celo
tro rapida edziĝo - porĉiama kateniĝo
tro rapida faro estas nur baro
tro rapida laboro, tro malgranda valoro
tro rapida riĉiĝo diablon ĝojigas

**rapide**
bona famo sin trenas testude, malbona kuras rapide
kiu donas rapide, donas duoble
kiu tro rapide saltas, tiu baldaŭ haltas
malsano venas rapide, foriras rigide
rapide iras la vortoj, sed ne rapide la faroj
rapide - senvide

**rapidi**
kun konfido neniam rapidu
ne rapidu insulti, volu aŭskulti
ne rapidu kun fido antaŭ longa kunesido
ne rapidu kun vortoj, rapidu kun faroj
ne rapidu, trankvile decidu
rapidu malrapide
ŝajnon ne fidu, juĝi ne rapidu

**raporti**
kion koro portas, vizaĝo raportas
raporti pri ĉiuj cirkonstancoj kaj nuancoj
sendito nur portas; kion oni ordonis, li raportas

**raporto**
ne ĉiu raporto estas vera vorto

**rato**
kontentigi la katon kaj kune la raton
ne venos rato mem al la kato
renkontiĝis la kato kun sentima rato
tro saltas la rato - ĝin kaptas la kato

**raŭke**
kriu eĉ raŭke, sed kanti ne ĉesu

**ravi**
nin ĉiam ravas, kion ni ne havas

**razi**
razisto raziston razas

**razisto**
razisto raziston razas

**reciproka**
du sinjoroj en unu bieno, du mastrinoj ĉe unu kameno - neniam vivas sen reciproka malmeno

**reciproke**
montradi al si reciproke la dentojn
ni reciproke nin konas, klarigon ne bezonas
sango komuna reciproke sin altiras

**rediro**
por parolo delira ne ekzistas rediro

**redoni**
oni prenas avide, oni redonas malrapide
oni prenas per manoj, redonas per piedoj
vi amas preni, amu redoni

**redono**
plej kruela estas redono por farita bono

**refariĝi**
farita ne refariĝos
kio fariĝis, jam ne nefari

**regado**
kie sklav' regadon havas, tie mastro baldaŭ sklavas

**regalado**
kia regalato, tia regalado

**regalato**
kia regalato, tia regalado

**regali**
kiel oni vin taksas, tiel oni vin regalas
kiu regalas per ŝtonoj, tiun oni dankas per bastonoj
kiu ŝteliston regalas, mem ŝteliston egalas
por via bono vin regalas bastono

**regalo**
en via malica regalo vin atendas ankaŭ pokalo
sen regalo ne estas balo

**reganto**
kia reganto, tia servanto
pli valoras malgranda reganto, ol granda servanto

**regi**
en ĉiu kranio regas aparta opinio
kie regas konkordo, regas ordo
kie regas la forto, tie rajto silentas
kie regas virino, malbona estas la fino
mono mondon regas
pli facile estas regi ol agi

**regimento**
li ne estas el la regimento de timuloj

**reglui**
pecon detranĉitan al la pano ne regluu

**regna**
por regna speso ne ekzistas forgeso
regna kaso - bona ĉaso

**regularo**
ne iru al fremda anaro kun via regularo
ne puŝu vian regularon en fremdan anaron

**regulo**
ne ekzistas regulo sen escepto

**reĝa**
dando el reĝa hundejo
geedzoj en paco vivas en reĝa palaco
ĝi estas malpaco pri la reĝa palaco

**reĝejo**
mia loĝejo - mia reĝejo

**reĝi**
inter la blinduloj reĝas la strabuloj
pronomoj “mia” “min” kaj “mi”, en mondo reĝas ĉiam tri

**reĝo**
de nehavanto eĉ reĝo nenion ricevos
hundo povas boji eĉ kontraŭ la reĝo
kiun reĝo protektas, tiun ministro elektas
mono estas reĝo, mono estas leĝo
reĝo donacis, sed polico minacas
respektu Dion kaj reĝon kaj obeu la leĝon

**reiri**
pli bone estas reiri, ol perdi la vojon
pli facile estas ne iri, ol tro malfrue reiri

**reĵuri**
ĵuri kaj reĵuri

**rekaŝi**
ne prenis pastro la donon - rekaŝu sako la monon

**rekomendi**
faro farinton rekomendas

**rekomendo**
de senpripensa rekomendo venas ploro kaj plendo
rekomendo kondukas al plendo
sen mensoga rekomendo ne iros la vendo

**rekompenci**
Dio longe paciencas, sed severe rekompencas

**rekte**
kurba estas la ligno, sed rekte ĝi brulas
sako malplena sin rekte ne tenas
trafi per la parolo rekte en la vizaĝon

tranĉi rekte en la karnon

**remi**
en trankvila vetero ĉiu remas sen danĝero

**renkonte**
pri la lupo rakonto, kaj la lupo renkonte

**renkonti**
ne venas mont' al monto, sed homo homon renkontas

**renkontiĝi**
renkontiĝis la kato kun sentima rato

**renversiĝi**
post mia malapero renversiĝu la tero

**repacigi**
malsaĝulo malpacigis kaj dek saĝuloj repacigi ne povas

**repacigita**
timu lupon edukitan kaj malamikon repacigitan

**reporti**
vento sendita tondron reportos

**repreni**
donacon reprenu kaj mian vivon ne venenu
sub seruro promesojn tenu, sed doninte ne reprenu

**resalti**
bastono batas, bastono resaltas

**resaniĝo**
ĝis la edziĝo ĝi resaniĝos
ĝis la edziĝo venos resaniĝo

**reservo**
kvitiĝas servo per reservo
servo postulas reservon

**resoni**
kio al mi sonis, tion mi resonas
kiu resonis, tiu sin donis

**resono**
kia sono, tia resono

**respekti**
kiu groŝon ne respektas, riĉecon ne kolektas
rangeto rangon respektu, modestan lokon elektu
respektu Dion kaj reĝon kaj obeu la leĝon

**respondo**
kia demando, tia respondo

**resti**
agrabla estas gasto, se ne longe li restas
al sklavo mon' ne estas savo - li ĉiam restas sklavo
almozpetanto sinĝena restas kun sako malplena
beleco hodiaŭ estas, morgaŭ ne restas
eĉ signo ne restis, kie urbo estis
ĝibulo ĝis morto restos ĝibulo
infana inklino restas ĝis la fino
kaprica fianĉino restos eterne fraŭlino
kiu venis post la manĝo, restas sen manĝo
laŭdu la maron, sed restu sur tero
lernado sen fruktoj ne restas
nenia peketo restas longe sekreto
plej kuirita kampulo ĉiam restos krudulo
por malfrua gasto restas nur osto
post dolĉa vino restas acida vinagro
restas nek konsilo, nek konsolo
resti maljuna knabino
restis nenio absolute, nek por mordi, nek por gluti
restu tajloro ĉe via laboro
se geedzoj sin batas, fremdulo restu flanke
se la gasto estas amata, eĉ lia servanto ne restas malsata
servo al Dio vana ne restas
sperta mano ne restas sen pano
tiel estas, tiel restas
unufoje ŝtelinta restas ĉiam ŝtelisto
vundo pasas, vorto restas

**reteni**
kio tra l' dentoj travenis, tion la lipoj ne retenos

**retiri**
animo al paradizo deziras, sed pekoj retiras
kiam vorto eliris, vi ĝin jam ne retiros

**reto**
virina rideto pli kaptas ol reto

**retrovi**
kiu ne akiras, kiam li povas, tiu poste deziras, sed jam ne retrovas
kiu okazon forŝovas, ĝin jam ne retrovas

**reveni**
foriris bovido, revenis bovo
forveturis azenido kaj revenis azeno
forveturis malsaĝa, revenis nur pli aĝa
kio pasis, ne revenos
kiu rabi eliras, ofte nuda revenas
ne fanfaronu irante, fanfaronu revenante
pastro ŝafon ne prenas, ĝi hejmen revenas
pelu mizeron tra l' pordo, ĝi revenos tra l' fenestro
vorto dirita al la mondo apartenas kaj neniam revenas

**revi**
bona kaporalo revas esti generalo
kiu aŭskultas, kie li ne devas, tiu aŭdas, kion li ne revas

**rezervi**
al Dio servu, diablon rezervu

**rezina**
flamiĝema kiel ligno rezina
li estas flamiĝema kiel rezina ligno

**rezonado**
rezonado kaj filozofado panon ne donas

**rezoni**
kiu konsilas kaj rezonas, tiu helpon ne donas
ne rezonu pri tio, kio estas ekster via metio

**rezulto**
de elekto tro multa plej malbona rezulto

**ricevi**
de nehavanto eĉ reĝo nenion ricevos
Dio ne ricevis, diablo forlevis
doni ovon, por ricevi bovon
esperis flaton, - ricevis baton
fordoni anseron, por ricevi paseron
hodiaŭ pagi vi devas, morgaŭ kredite ricevos
kiu elektas tro multe, ricevas nenion
kiu ne petas, tiu ne ricevas
maro ĉiujn riverojn ricevas kaj tamen ne krevas
ne havante, oni petas; ricevinte, forĵetas
prave li ricevas

ricevi grizan haron, ne vidinte altaron
ricevi muŝon en la cerbon
ricevis bandito laŭ sia merito
ricevos vulpo por sia kulpo
silentu donante, parolu ricevante
sinjoroj sin batas, servantoj vundojn ricevas
tro elektema ricevas nenion

**ricevo**
saĝa estas la frato post ricevo de l' bato
saĝa estas la hundo post ricevo de l' vundo

**riĉa**
aŭ plej riĉa stato, aŭ plena malsato
kontentulo estas pli feliĉa, ol homo plej riĉa
ne naskiĝu riĉa, naskiĝu feliĉa
oni estas riĉa neniam sufiĉe
pli bona estas paco feliĉa, ol havo plej riĉa
riĉa estas tiu, kiu ŝuldas al neniu
riĉa preparo, sed povo avara
riĉa zorgas pri ĉampano, malriĉa pri pano
se ne la "se" malfeliĉa, mi estus nun homo plej riĉa

**riĉeco**
fasto kaj preĝo riĉecon ne donas
kiu groŝon ne respektas, riĉecon ne kolektas
kiu ŝuldojn estingas, riĉecon atingas
kontenteco estas pli bona ol riĉeco
pli bona ĉifona vesto, ol riĉeco en malhonesto
riĉeco estas frato de fiereco
riĉeco sen gvido kiel ĉevalo sen brido

**riĉigi**
riĉigas ne enspezo, sed prudenta elspezo

**riĉiĝi**
de legado sen atento ne riĉiĝas la prudento
kiu frue leviĝas, facile riĉiĝas
kiu riĉiĝas, tiu fieriĝas

**riĉiĝo**
tro rapida riĉiĝo diablon ĝojigas

**riĉo**
feliĉo kaj riĉo envion elvokas
kontraŭ malfeliĉo ne defendas eĉ riĉo

**riĉulo**
al malriĉulo ovo kiel al riĉulo bovo
mono fluas al riĉulo, batoj al malriĉulo
oni priŝtelas ne riĉulon, sed sengardulon
pagas ne riĉulo, pagas kulpulo
pli feliĉa sinjoro sen havo, ol riĉulo sed sklavo
por riĉulo fasto - por malriĉulo festo
riĉulo havas grandan parencaron
riĉulo havas kornojn, malriĉulo dornojn
riĉulo kiel fajro proksime bruligas, malproksime ne varmigas
riĉulo veturas, malriĉulo kuras

**ridanto**
ploranton ni evitas, ridanton ni imitas

**rideto**
virina rideto pli kaptas ol reto

**ridi**
bone tiu sidas, al kiu la sorto ridas
kaldrono ridas pri poto kaj mem estas kota
kiu sentas - ploras, kiu vidas - nur ridas
ni vidas, kiu ridas - kiu ploras, ni ne vidas
plej bone ridas, kiu laste ridas
ridas blindulo pri lamulo

**ridigi**
Dion kolerigis, homojn ridigis

**ridinda**
de majesta ĝis ridinda estas nur unu paŝo
fremda mizero - ridinda afero
sen povo kolero estas ridinda afero

**ridinde**
vivis puninde, mortis ridiede

**rido**
oni ekkonas bovon per la vido kaj malsaĝulon per lia rido
rido matene - ploro vespere
venas rido post minaco, kaj paciĝo post malpaco

**rifuĝi**
kiu kutimis ĉion juĝi, nenie povas rifuĝi

**rifuĝo**
granda estas la mondo, sed rifuĝon ne donas

**rifuzi**
Petro rifuzas, Paŭlo ekuzas

**rifuzo**
postulo ne pretendas, rifuzo ne ofendas

**rigardaĉi**
rigardaĉi kiel bovido

**rigardi**
ĉion rigardi tra sia persona vitro
kiu rigardas ĉielon, maltrafas sian celon
komercisto estas ĉasisto, li rigardas, kiu sin ne gardas
rigardi kaj aspiri ne devigas akiri
rigardi malafable
rigardu per ambaŭ okuloj!

**rigardo**
de rigardo tro alta malsaniĝas okulo
kiu tro alten rigardon direktas, tiu tre baldaŭ okulojn difektas
sen rigardo, sen gardo

**rigide**
malsano venas rapide, foriras rigide

**rikolti**
kion vi semas, tion vi rikoltos
kiu semas venton, rikoltos fulmotondron
parolanto semas, aŭdanto rikoltas
printempo semas, aŭtuno rikoltas
se Peĉjo ne semos, Petro ne rikoltos

**rikolto**
kia la semo, tia la rikolto

**rimedo**
grandaj malbonoj - grandaj rimedoj
kontraŭ ĉiu tedo ekzistas rimedo

**rimiĝi**
plej facile promeso rimiĝas kun forgeso

**rimo**
kio akorde ne sonas, tio rimon ne donas

**ripetado**
ripetado estas plej bona lernado

**ripetata**
ripetata parolo pri la sama titolo

**ripeti**
kiu ripetas abunde, lernas plej funde
se amiko petas, li neniam ripetas

**ripo**
aŭ kuseno sub ripo, aŭ bato per vipo
oni batas per vipo, por ke sentu la ripo

**ripozi**
kiu tro ripozas, baldaŭ almozas
li ripozu trankvile!

**ripozo**
laboro finita, - ripozo merita
laboro fortigas, ripozo putrigas
post nokta ripozo helpas la muzo

**riproĉi**
azen' al azeno riproĉas malsaĝon
petolu, diboĉu, sed poste sorton ne riproĉu

**riski**
kiu ne riskas, tiu ne gajnas
kiu ne riskas, tiu ne havas

**risko**
dubo gardas kontraŭ risko

**rivera**
sola vojo libera al la fundo rivera

**riverenco**
se mi faru riverencon, mi elektas potencon

**rivereto**
riveretoj fluas al riveroj

**rivero**
atendi sur tero, ĝis sekiĝos la rivero
el malgrandaj akveroj fariĝas grandaj riveroj
la manĝota fiŝo estas ankoraŭ en la rivero
li trafis el sub pluvo en riveron
maro ĉiujn riverojn ricevas kaj tamen ne krevas
ne konante la profundecon, ne iru en la riveron
ne moku riveron, ne atinginte la teron

riveretoj fluas al riveroj

**rolo**
rol' de virino - bona mastrino

**Romo**
bona estas Romo, sed tro malproksima de nia domo
esti en Romo kaj ne vidi la Papon
ne povas ĉiu homo esti Pap' en Romo
Romo estas tie, kie estas la Papo

**rompi**
kiu rompis la glason, ordigu la kason
kiu rompis, tiu pagu
surmeto rompas, komparo trompas

**rompiĝi**
kie maldike, tie rompiĝas
longe ĉerpas la kruĉo, ĝis ĝi fine rompiĝas
se elsaltas la okazo, ĝi rompiĝas kiel vazo
pli bone fleksiĝi, ol rompiĝi

**rompita**
ŝipon rompitan ĉiuj ventoj atakas
vazo rompita longe sin tenas

**rompo**
por la mono pastra preĝo, por la mono romp' de leĝo

**rondo**
magia rondo

**rostita**
rostita kolombeto ne flugas al buŝeto

**rozo**
ŝiru rozojn en somero, ĉar en vintro ili ne estos

**ruinigi**
konkordo malgrandaĵon kreskigas, malkonkordo grandaĵon ruinigas

**ruiniĝo**
en ĉiu transloĝiĝo estas parto de ruiniĝo

**rustiĝi**
ŝuldo ne rustiĝas, ŝuldo ne mortiĝas

**rusto**
rusto manĝas feron, ĉagreno la koron
rusto manĝas la feron, kaj zorgo la homon
ŝlosilo uzata ruston ne konas

**ruza**
eĉ plej ruza vulpo en kaptilon falas
eĉ vulpo plej ruza fine estas kaptata

**sabato**
liaj dentoj povas festi sabaton

**sablo**
li eĉ el sablo vipojn tordas
tordi ŝnurojn el sablo

saĝa
estu saĝa homo en via propra domo
france saĝa, angle sovaĝa
lernu juna, por esti saĝa maljuna
maljunaj jaroj, sed ne saĝaj faroj
plej saĝa maljunulo ne estas tro saĝa
pli bona estas saĝa malamiko, ol malsaĝa amiko
saĝa estas la frato post ricevo de l' bato
saĝa estas la hundo post ricevo de l' vundo
saĝa hundo post la vundo
saĝa kapo duonvorton komprenas
saĝa scias, kion li diras, - malsaĝa diras, kion li scias
saĝa tenas aferon, malsaĝa esperon

**saĝigi**
bona stato saĝigas, malbona malsaĝigas
feliĉo fierigas, malfeliĉo saĝigas
mi lin liberigis, li min saĝigis

**saĝo**
barbo elkreskis, sed saĝon ne naskis
bela per vizaĝo, sed ne bela per saĝo
bela vizaĝo, sed ne bela la saĝo
ĉiu iras, kiel saĝ' al li diras
ĉiu propran saĝon posedas
Dio puni deziras, li la saĝon fortiras
en ĉiu aĝo devas kreski la saĝo
estis la tempo, ni ne komprenis - pasis la tempo, la saĝ' al ni venis
fiŝo scias pri naĝo ankaŭ sen via saĝo
griza barbo saĝon ne atestas
kiam havo malaperis, saĝo aperis
kiam pasis la aĝo, aperas la saĝo
kiu prudenton ne havas, tiun saĝo ne savas
kiu saĝon ne havas, Dio lin savas
kiu volas komerci, tiu saĝon bezonas
kresko mamuta, sed saĝo liliputa
lango nenion atingas, se ĝin saĝo ne svingas
ne ĉiam per aĝo mezuriĝas la saĝo
oni akceptas laŭ vizaĝo, oni forlasas laŭ saĝo
perdi la saĝon
plej danĝera malsano estas manko de saĝo

pli helpas guto da feliĉo, ol barelo da saĝo
post domaĝo venas saĝo
saĝo abunda, sed ne profunda
saĝo barbon ne atendas
sperto saĝon akrigas
tempo kaj cirkonstancoj saĝon alportas
unu saĝo estas bona, du estas pli bonaj
vergo doloras, sed saĝon ellaboras
virino havas haron longan kaj saĝon mallongan

**saĝulo**
en mizero eĉ saĝulo estas malsaĝa
kion saĝulo ne komprenas, ofte malsaĝa divenas
li ne estas el la grandaj saĝuloj
malsaĝulo diris vorteron, saĝulo komprenas la tutan aferon
malsaĝulo malpacigis kaj dek saĝuloj repacigi ne povas
malsaĝulo ŝtonon ĵetis, dek saĝuloj ĝin ne atingos
ofte ĉapo de kampulo kovras kapon de saĝulo
ofte ligis malsaĝulo kaj dek saĝuloj malligi ne povas
ofte saĝulo vivas malriĉe kaj malsaĝulo feliĉe
por malsaĝulo bastono - por saĝulo leciono
por saĝulo sufiĉas aludo
saĝulo scias ion, sed neniu scias ĉion
se mi scius, kion mi ne scias, ĉiuj saĝuloj min envius
sen mono oni estas nulo, kun mono - saĝulo

**sako**
almozpetanto sinĝena restas kun sako malplena
edziĝo pro amo flamanta al la sako sonanta
en unu sako du katoj, ĉiam mordoj kaj gratoj
kiam sako mizeras, amo malaperas
malplena sako puŝas al peko
malplena sako tentas al peko
ne prenis pastro la donon - rekaŝu sako la monon
okulo ne vidis - pagu la sako
plena sako ĉiun mastron al vi klinos
pli kostas la sako, ol la tuta pako
sako alenon ne tenas, ĝi baldaŭ elvenas
sako malplena sin rekte ne tenas
sako ne sonas - amiko ne konas
sakon kun truo vi neniam plenigos
se sako tro pleniĝas, ĝi baldaŭ disŝiriĝas
vivu stomako laŭ stato de l' sako
vortoj sakon ne plenigas

**sale**
pli bone estas sensale, ol tro sale

**sali**
pli bone ne sali, ol sali tro multe

**salo**
tro multe da salo malbonigas la manĝon

**saltadi**
saltadi ĉirkaŭ afero, kiel blovata neĝero
saltadi el unua al deka

**salti**
kiu tro rapide saltas, tiu baldaŭ haltas
li saltas gracie, kiel urso ebria
mizero saltas, mizero haltas
sur arbon kliniĝintan saltas la kaproj
tro saltas la rato - ĝin kaptas la kato

**salto**
ne diru “hop” antaŭ la salto

**saluti**
li salutas profunde kaj mordas hunde
se vi krudulon salutos, li vin tutan englutos

**sama**
aliloka ĉielo estas sama ĉielo
ambaŭ floroj de samaj valoroj
de sama koloro, de sama valoro
el la sama buŝo li blovas varmon kaj malvarmon
el sama tero devenas, saman sukon entenas
la sama afero, sed kun la kapo al tero
ne sama la vento blovas konstante
ripetata parolo pri la sama titolo
sama buŝo blovas varmon kaj malvarmon
sama gento, sama sento
samaj kondiĉoj, samaj superstiĉoj

**samtempe**
al du sinjoroj samtempe oni servi ne povas

**sana**
malsanan demandu, al sana donu

**sanga**
virino batas per lango - aperas vundo plej sanga

**sango**
maldolĉa por la lango, sed saniga por la sango
sango bolas, juneco petolas
sango komuna reciproke sin altiras
sango ne silentas, sian sangon ĝi sentas
virina lango buĉas sen sango

**saniga**
maldolĉa por la lango, sed saniga por la sango

**sanigaĵo**
sanigaĵo malbongusta, sed efiko plej ĝusta

**sanigi**
mizero piedojn sanigas, kolon elastigas

**sankciita**
kio estas farita, estas sankciita

**sankta**
en la tago de la sankta Neniamo
ne ĉiam estas sankta Johano

**sanktfiguro**
sanktfigurojn ornamas kaj homojn malamas

**sanktulo**
al ĉiu sanktulo apartan kandelon
ĉirkaŭ sanktuloj diabloj vagas
ĉiu angulo kun sia sanktulo
ne ĉiu ĝibulo estas sanktulo
ne sanktuloj potojn faras
neniu sanktulo estas sen makulo
preĝu al la Eternulo, ne al lia sanktulo
se Dio ne volas, sanktulo ne helpos

**sano**
akvo kaj pano servas al sano
ĝi estu por vi al sano!
nenio pli grandan mizeron prezentas, ol se sano mankas kaj ŝuldoj turmentas
taksi la sanon ni lernas en malsano
trinki pro ies sano

**sapo**
nigran kornikon sapo ne blankigos
sapo blankecon ne havas, tamen blanke ĝi lavas

**sapumi**
sapumi la okulojn

**sata**
ke la lup' estu sata, kaj la ŝaf' ne tuŝata
sata malsatan ne povas kompreni
sata stomako ne lernas volonte
tro sata, tro bata
tuta jam sata, sed okulo malsatas

**satano**
esti anĝelo inter homoj, sed satano en la domo
falis el mano - prenu satano

**sate**
nutru lupon plej sate, li ĉiam serĉas arbaron
vivi sate kaj glate

**satigi**
kuiriston vaporo satigas
promeso ne satigas

**satiĝi**
muso satiĝis, faruno malboniĝis

**savi**
du mortojn vi ne havos, de unu vi vin ne savos
eĉ kvar piedoj de ĉevalo ĝin ne savas de falo
kiu neniun savis, malamikojn ne havas
kiu prudenton ne havas, tiun saĝo ne savas
kiu saĝon ne havas, Dio lin savas
kiu sin gardas, tiu sin savas
longa konsidero savas de sufero

**savita**
ŝafo kalkulita ne estas savita

**savito**
dronanto domon proponas, savito eĉ brikon ne donas

**savo**
al sklavo mon' ne estas savo - li ĉiam restas sklavo
ne ekzistas savo kontraŭ malbona virino

**scienco**
ĝi estas por mi ĥina scienco
per pacienco venas scienco
scienco havas semon enuan, sed frukton bonĝuan

sciencon oni ne mendas, klerecon oni ne vendas

**scienculo**
ne demandu scienculon, demandu spertulon

**scii**
de malriĉula manĝo ni guston ne scias
de manĝo malriĉula ni guston ne scias
Dio scias bone pri niaj bezonoj
donu al krudulo plezuron, li ne scios mezuron
fiŝo scias pri naĝo ankaŭ sen via saĝo
infano ne krias, patrino ne scias
juneco ne scias, maljuneco ne povas
kion mi ne scias, tion mi ne envias
kiu garantias, trankvilon ne scias
lernu juna - vi scios maljuna
li scias, kie la kankroj pasigas la vintron
mano dekstra ne sciu, kion faras la maldekstra
mi ne volas tion ĉi scii
neniu scias, kio morgaŭ lin trafos
pri la ŝtrumpa truo scias nur la ŝuo
saĝa scias, kion li diras, malsaĝa diras, kion li scias
saĝulo scias ion, sed neniu scias ĉion
scias la kato, kies lardon ĝi manĝis
sciu elokventi, sciu ankaŭ silenti
sciu funde, sed tenu profunde
se junulo ne lernis, maljunulo ne scias
se mi scius, kie mi falos, mi tien metus tapiŝon
se mi scius, kion mi ne scias, ĉiuj saĝuloj min envius
via dekstra mano ne sciu, kion faras la maldekstra
virino scias - tuta mondo scias

**Scilo**
trafi de Scilo al Ĥaribdo

**scio**
de tro multa scio krevas la kranio
mi havas pri tio nek scion nek supozon
ne zorgu pri tio, kio estas ekster via scio
scion akiru, sed ne ĉion eldiru

**sciuro**
kio konvenas al sciuro, ne konvenas al vulturo
kiu naskiĝis sciuro, ne fariĝos vulturo

**se**
agrabla estas gasto, se ne longe li restas
al venko rajto venas, se ĝin forto subtenas
ĉio dependas de “se” kaj “kiam”

ĉio havas sian “sed” kaj “se”
Dio ne perfidas, se homo lin fidas
dormus leporo, se ĝi ĉason ne timus
eĉ kaprino plaĉas, se la doto sufiĉas
eĉ ŝtipo estos bela, se vi ĝin ornamos
eĉ ŝtono verdiĝas, se ĝi longe ne moviĝas
facile estas danci, se la feliĉo kantas
famo ne flugas, se kaŭzo ne estas
kiu ne atentas la “se”, tiu sentas la “ve”
la dorm’ estas bona, se mankas la mono
lango nenion atingas, se ĝin saĝo ne svingas
leĝo estas bona, se advokato ĝin helpas
malplaĉas nenio, se taksas pasio
ne ŝtelus ŝtelistoj, se ne ekzistus kaŝistoj
nenio pli grandan mizeron prezentas, ol se sano mankas kaj ŝuldoj turmentas
oni maron admiras, se oni maron ne iras
por honoro ni dankas, se manĝ’ al ni mankas
se al hundo mankas nenio, ĝin atakas rabio
se amas Dio, prosperas ĉio
se amiko petas, li neniam ripetas
se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas
se brulas nenio, fumo ne iras
se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo
se ĉiu speson donos, malriĉulo malsaton ne konos
se decidos la sorto, helpos nenia forto
se devigas neceso, faru kun kareso
se Dio ne aranĝos, lupo vin ne manĝos
se Dio ne volas, sanktulo ne helpos
se Dio ordonos, eĉ ŝton’ lakton donos
se edzino ordonas, domo ordon ne konas
se elsaltas la okazo, ĝi rompiĝas kiel vazo
se en kor’ io sidas, vizaĝo perfidas
ezoko piiĝis, gobio ne dormu
se forestas la suno, sufiĉas la luno
se geedzoj sin batas, fremdulo restu flanke
se gut’ al guto aliĝas, maro fariĝas
se haroj ne mankus, oni kalvon ne havus
se homoj mankas, infano ankaŭ estas homo
se io venas al buŝo, buŝon ne fermu
se juneco estus sperta, se maljuneco estus lerta!
se junulo ne lernis, maljunulo ne scias
se kalumnio ne brulas, ĝi almenaŭ makulas
se la arbo falis, ĉiu branĉon derompas
se la ĉielo falus al tero, birdokaptado estus facila afero
se la gasto estas amata, eĉ lia servanto ne restas malsata
se la gasto meritas, eĉ lia hundo profitas
se la kaliko tro pleniĝas, la vino elverŝiĝas
se la sorto vin batas, mokantoj ne mankas
se la tempo forblovis, ni jam helpi ne povas

se lipo dikiĝas, ventro maldikiĝas
se lupo ekpentis, ŝafo atentu
se malriĉulo sukcesas, li ĉiujn forgesas
se malsato turmentas, lupo timon ne sentas
se mi faru riverencon, mi elektas potencon
se mi scius, kie mi falos, mi tien metus tapiŝon
se mi scius, kion mi ne scias, ĉiuj saĝuloj min envius
se muso nur unu truon disponas, ĝi baldaŭ la vivon fordonas
se ne estus "se" kaj "tamen", mi al ĉio dirus amen
se ne la "se" malfeliĉa, mi estus nun homo plej riĉa
se ne plaĉas la najbaro, ne plaĉas lia faro
se ne venas per bona vorto, oni prenas per forto
se neĝas sur la monto, estas malvarme en la valo
se neniu plendas, neniu defendas
se okulo ne atentas, dorso eksentas
se okulo ne vidas, koro ne avidas
se oni amas la gaston, oni zorgas la paston
se Peĉjo ne semos, Petro ne rikoltos
se peko trafas, eĉ bastono ekpafas
se sako tro pleniĝas, ĝi baldaŭ disŝiriĝas
se silentas draŝejo, malpacas loĝejo
se stomako doloras, kapo laboras
se unu ne venis, dek ne atendas
se vendisto ne mensogas, li aĉetanton ne allogas
se vi donas mielon, donu ankaŭ kuleron
se vi faros vin ŝafo, la lupoj vin manĝos
se vi krudulon iom karesos, li al si ĉion permesos
se vi krudulon salutos, li vin tutan englutos
se vi povas, profitu, sed aliajn ne incitu
se vi prenis la violonon, prenu ankaŭ la arĉon
se vi pri ĉio informiĝos, vi baldaŭ maljuniĝos
se vi sendis malsaĝulon, sendu kontrolon
se vi senfine parolos, de ĝi la poto ne bolos
se vi sidos en branoj, vin manĝos la porkoj
se vi ŝafo fariĝos, lupoj ne mankos
se vi volas filinon, flatu la patrinon
se vulpo pentofaras, gardu la kokidojn

**sed**
akvo bolas, murmuras, sed fine ĝi kuras
al Dio plaĉu, sed sur diablon ne kraĉu
amaso da fianĉoj, sed la ĝusta ne venas
amiko estas kara, sed mi mem estas pli kara
amiko estas kara, sed vero pli kara
amikon karesu, sed kalkuli ne forgesu
amo estas forta, sed mono pli forta
amu Antonon, sed gardu vian monon
amu edzinon plej kore, sed tenu ŝin bonmore
animo al paradizo deziras, sed pekoj retiras

barbo elkreskis, sed saĝon ne naskis
barbo potenca, sed kapo sensenca
bela vizaĝo, sed ne bela la saĝo
belecon taksas ne okulo sed koro
bona estas fremdlando, sed aliaj tie loĝu
bona estas Romo, sed tro malproksima de nia domo
bone kreskas la herbo, sed ĉevalo jam mortis
bone sukcesu, sed ankaŭ nin ne forgesu
bravulo kontraŭ muŝo, sed muŝo kontraŭ bravulo
ĉesis esti vino, sed vinagro ne fariĝis
ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme
ĉio havas sian "sed" kaj "se"
ĉiun demandu, sed mem al vi komandu
dancu diabloj, sed ne en mia arbaro
deziro tre granda, sed mankas la forto
Dio donis kaj benis, sed diablo forprenis
Dio longe paciencas, sed severe rekompencas
Dio manĝon donacis, sed la dentoj agacas
Dion fidu, sed senfare ne sidu
disputo kredigas, sed ne certigas
disputu pri ĉio, sed sen garantio
drinku tutajn tagojn, sed kontrolu viajn agojn
du manoj faras ĉion, sed unu nenion
ekzemplo proponas, sed ne ordonas
el la buŝ' multaj vortoj eliras, sed ne ĉiuj ion diras
en nomo de l' ĉielo, sed pro bono de l' felo
esti anĝelo inter homoj, sed satano en la domo
famo kredon allogas, sed tre ofte mensogas
fiŝo ne iras, sed hoko ĝin tiras
fremdlando objekton por speso donas, sed por ĝin venigi, oni spesmilon bezonas
granda doto kaj oro, sed mankas la koro
granda estas la mondo, sed rifuĝon ne donas
granda kranio, sed interne nenio
granda parolo, sed malgranda volo
guto malgranda, sed ŝtonon ĝi boras
ĝemu kaj ploru, sed ĝis fino laboru
ĝoju kaj festenu, sed malriĉulojn subtenu
hakilo estas tranĉa, sed ne cedas la branĉo
havu poton malgrandan, sed mem estu granda
juku la haŭto, sed ne sur mia korpo
kapo kun herbo, sen guto da cerbo
kapo majesta, sed cerbo modesta
koko krias fiere, sed ne danĝere
konfidu, sed vidu
konsilojn ĉiu donas, sed ne kiam oni bezonas
konsoliĝas mizerulo, se li estas ne sola
kontraŭ peko batalu, sed pekanton ne tuŝu
kontraŭ peko prediku, sed pekinton pardonu
kresko mamuta, sed saĝo liliputa

kriu eĉ raŭke, sed kanti ne ĉesu
kulo nenion valoras, sed ĝia piko doloras
kun urso promenu, sed pafilon prete tenu
kurba estas la ligno, sed rekte ĝi brulas
la sama afero, sed kun la kapo al tero
laboro lacigas, sed akiro ĝojigas
lango miela, sed koro kruela
laŭdu belecon de l' maro, sed ĉe rando de arbaro
laŭdu la maron, sed restu sur tero
leĝo valoras por poste, sed ne por antaŭe
lernado havas maldolĉan radikon, sed bonan efikon
li faras princan promeson, sed ne havas eĉ speson
lipharo de grandsinjoro, sed koro de leporo
luksa la vesto, sed malplena la poŝo
lupo kaptas, sed li ankaŭ enfalas
lupo ŝanĝas la harojn, sed ne la farojn
maldolĉa por la lango, sed saniga por la sango
malgranda aspekte, sed granda intelekte
malgranda birdeto, sed akra ungeto
malgranda pezo, sed granda prezo
maljunaj jaroj, sed ne saĝaj faroj
mensogu kiom vi volas, sed memoru kion vi parolas
multaj kompatantoj, sed neniu helpanto
multaj vokitoj, sed ne multaj elektitoj
multe da fianĉoj, sed la ĝusta ne venas
multe da sprito, sed neniom da profito
multe en kapo, sed nenio en poŝo
multe entreprenis, sed ne multe eltenis
murmuregas la urso, sed danci ĝi devas
ne bela estas amata, sed amata estas bela
ne bela estas kara, sed kara estas bela
ne beligas loko homon, sed homo la lokon
ne juĝo kondamnas, sed juĝanto
ne karesu per mano, sed karesu per pano
ne kvanto, sed kvalito decidas pri merito
ne maro dronigas ŝipon, sed la ventoj
ne valoranto plaĉas, sed plaĉanto valoras
ne venas mont' al monto, sed homo homon renkontas
ne volas kokin' al festeno, sed oni ĝin trenas perforte
neniom da oro, sed bona gloro
ni amu nin frate, sed ni kalkulu akurate
nomo egala, sed esenco mala
nur pano kun fromaĝo, sed afabla vizaĝo
oni batas ne la aĝon, sed la vizaĝon
oni konsilas kaj konsolas, sed helpi ne volas
oni lekas la manon, sed celas la panon
oni perfidon prenas, sed perfidulon abomenas
oni priŝtelas ne riĉulon, sed sengardulon
oni vivas ne kun mono, sed kun persono

oni vokas la bovon ne festeni, sed treni
parolo anĝela, sed penso pri ŝtelo
petolu, diboĉu, sed poste sorton ne riproĉu
Petro parolas sen direkto, sed Paŭlo konjektu
plena glaso da vino, sed kun guto da veneno
pli feliĉa sinjoro sen havo, ol riĉulo sed sklavo
preĝejo proksima, sed Dio malproksima
preĝon faru, sed farunon preparu
profiton celu, sed aliajn ne pelu
proksima kubuto, sed ne por la buŝo
rapide iras la vortoj, sed ne rapide la faroj
reĝo donacis, sed polico minacas
riĉa preparo, sed povo avara
riĉigas ne enspezo, sed prudenta elspezo
saĝo abunda, sed ne profunda
saĝulo scias ion, sed neniu scias ĉion
sanigaĵo malbongusta, sed efiko plej ĝusta
scienco havas semon enuan, sed frukton bonĝuan
scion akiru, sed ne ĉion eldiru
sciu funde, sed tenu profunde
se vi povas, profitu, sed aliajn ne incitu
seka panpeco, sed en libereco
senditon oni aŭskultas aŭ ne aŭskultas, sed ne punas nek insultas
senlanigu, sed ne senfeligu
senlanigu, sed ne senhaŭtigu
senpaga estas nur la morto, sed ĝi kostas la vivon
serpenton oni povas eviti, sed kalumnion neniam
sidas gasto minuton, sed vidas la tuton
sinjoro karesas, sed baldaŭ ĉesas
sonorado al li venas, sed de kie - li ne komprenas
sub seruro promesojn tenu, sed doninte ne reprenu
ŝuldo ne makulas, sed pagon postulas
tablo festena, sed telero malplena
tablon ornamas ne tuko, sed kuko
tago tagon sekvas, sed ne similas
tempo toleras, sed vero aperas
tuta jam sata, sed okulo malsatas
vergo doloras, sed saĝon ellaboras
vespere ĝuu lunon, sed ne serĉu la sunon
vesto eluzita, sed pureco spirita
vian vivon ĝuu, sed fremdan ne detruu
vidas okulo, sed mano ne trafas
vivu mizere, sed vivu libere!
vivu, progresu, sed lerni ne ĉesu
vizaĝo de Katono, sed virto de fripono
vizaĝo sen kulpo, sed koro de vulpo
volus kato fiŝojn, sed la akvon ĝi timas
vulpo mienon ŝanĝas, sed plue kokidojn manĝas

**seka**
seka panpeco, sed en libereco

**sekiĝi**
atendi sur tero, ĝis sekiĝos la rivero
larmo virina baldaŭ sekiĝas

**sekreta**
vundo sekreta doloras plej multe

**sekrete**
vi sekrete vorton diros, ĝi tra l' tuta mondo iros

**sekreti**
pri kio amikoj sekretas, ili vian juĝon ne petas
vi sekretos al edzino, ŝi sekretos al fratino, kaj tiel la sekreto promenados sen fino

**sekreto**
lerneja sekreto ne iru al gazeto
nenia peketo restas longe sekreto

**sekvi**
tago tagon sekvas, sed ne similas

**selakto**
ĝi estas nek lakto, nek selakto

**seli**
selante ĉevalon, oni ĝin karesas

**semajno**
en la triĵaŭda semajno

**semata**
nenie semata, ĉie trovata

**semi**
kion vi semas, tion vi rikoltos
kiu semas venton, rikoltos fulmotondron
parolanto semas, aŭdanto rikoltas
printempo semas, aŭtuno rikoltas
se Peĉjo ne semos, Petro ne rikoltos

**semo**
de semo putra venas frukto ne nutra
kia la semo, tia la rikolto
malsaĝuloj kreskas mem, sen plugo kaj sem'
scienco havas semon enuan, sed frukton bonĝuan

**sen**
al amiko nova ne fidu sen provo
bato de frato estas sen kompato
bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno
de legado sen atento ne riĉiĝas la prudento
disputu pri ĉio, sed sen garantio
du sinjoroj en unu bieno, du mastrinoj ĉe unu kameno - neniam vivas sen reciproka malbeno
eĉ malgranda muŝo ne estas sen buŝo
eĉ najtingalo ne estas sen galo
elektadis sen fino, edziĝis kun porkino
eliri sen frakaso el granda embaraso
en trankvila vetero ĉiu remas sen danĝero
esti en situacio sen eliro
festotaga laboro estas sen valoro
fiŝo scias pri naĝo ankaŭ sen via saĝo
fiŝo sen vino estas veneno
fluidaĵo sen difino, nek vinagro nek vino
fremda animo estas abismo sen limo
fremda spesmilo estas sen utilo
gasto sen avizo estas agrabla surprizo
instruas mizero manĝi panon sen butero
kiu venis post la manĝo, restas sen manĝo
kiu vivas sen kalkulo, baldaŭ estos almozulo
klopodi sen limo per korpo kaj animo
klopodo estas kun mono, sed sen ĝi pli malbone
komenciĝis proceso, mono fluas sen ĉeso
kun Dio vi iros ĉien, sen Dio nenien
laboro homon nutras, sen laboro li putras
lernado sen fruktoj ne restas
li parolas sen senco kaj sen interligo
malfeliĉo kaj peko leviĝas sen veko
malfeliĉo venas sen alvoko
malsaĝuloj kreskas mem, sen plugo kaj sem'
ne batas bastono sen persono
ne ekzistas fumo sen brulo
ne ekzistas fumo sen fajro
ne ekzistas honoro sen laboro
ne ekzistas juneco sen kapricoj, nek maljuneco sen malicoj
ne ekzistas kareso sen intereso
ne ekzistas naiva vulpo, ne ekzistas homo sen kulpo
ne ekzistas ofico sen benefico
ne ekzistas regulo sen escepto
ne ekzistas terno sen nazo nek fakto sen bazo
ne faru kalkulon sen la mastro
ne kredu al parolo sen propra kontrolo
ne venas honoro sen laboro
nenia ago fariĝas sen pago

nenia konstruo povas esti sen bruo
neniu sanktulo estas sen makulo
nigro sur blanko pruvas sen manko
nuda kaj kruda, sen groŝo en poŝo
okupi sen celo lokon sub ĉielo
pagi sen partopreno por fremda festeno
peli tagojn sen afero de mateno al vespero
pensoj iras trans limo sen pago kaj timo
petolado sen mezuro ne kondukas al plezuro
Petro parolas sen direkto, sed Paŭlo konjektu
pli bona estas virto sen oro, ol oro sen honoro
pli bona homo sen mono, ol mono sen homo
pli bona pano sen butero, ol dolĉa kuko sen libero
pli bona pano sen butero, ol kuko sen libero
pli bona virto sen oro, ol oro sen honoro
pli feliĉa sinjoro sen havo, ol riĉulo sed sklavo
post morto kuracilo jam estas sen utilo
promesita trezoro estas sen valoro
rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo
riĉeco sen gvido kiel ĉevalo sen brido
sen atendo, sen espero venis mizero
sen fajro ne brulas eĉ pajlo
sen gutoj malgrandaj maro ne ekzistus
sen laboro ne venas oro
sen mensoga rekomendo ne iros la vendo
sen mono en urbon ne iru
sen mono oni estas nulo, kun mono - saĝulo
sen ordo en afero ne ekzistas prospero
sen povo kolero estas ridinda afero
sen regalo ne estas balo
sen rigardo, sen gardo
sen speso unua ne ekzistas la dua
situacio sen eliro
sperta mano ne restas sen pano
titolo sen mono - sensignifa sono
tro akra fajro estas sen daŭro
venas ĉagreno sen granda peno
vi sekretos al edzino, ŝi sekretos al fratino, kaj tiel la sekreto promenados sen fino
virina lango buĉas sen sango
virina ploro sen valoro
vivo sen modero kondukas al mizero
vizaĝo sen kulpo, sed koro de vulpo

**senatenda**
kontraŭ bato senatenda ekzistas nenia defendo

**sencele**
muele sencele

**senco**
li parolas sen senco kaj sen interligo
mi ne povas kapti en ĝi la sencon

**senĉesa**
senĉesa guto eĉ ŝtonon traboras

**sendanĝera**
vivo modera estas vivo sendanĝera

**sendemanda**
sendemanda ekprotesto estas ofte kulpatesto

**sendi**
al loko dolora ni manon etendas - al loko ĉarma okulojn ni sendas
bovidon mi atendis, infanon dio sendis
se vi sendis malsaĝulon, sendu kontrolon

**sendita**
vento sendita tondron reportos

**sendito**
sendito nur portas; kion oni ordonis, li raportas
senditon oni aŭskultas aŭ ne aŭskultas, sed ne punas nek insultas

**senenhava**
ofte de kaŭzo senenhava venas efiko plej grava

**senfara**
senfara plendo ne estas defendo

**senfare**
Dion fidu, sed senfare ne sidu

**senfeligi**
senlanigu, sed ne senfeligu

**senfine**
melku bovon senfine, li lakton ne donos
se vi senfine parolos, de ĝi la poto ne bolos

**senforta**
knabon senfortan ĉiuj batoj atingas

**senfortulo**
senfortuloj longe vivas

**senfunda**
al kavo senfunda ŝtopado ne helpas

**sengardulo**
oni priŝtelas ne riĉulon, sed sengardulon

**senhalte**
eksalte senhalte

**senhariĝi**
malsaĝulo ne griziĝas nek senhariĝas

**senhaŭtigi**
senlanigu, sed ne senhaŭtigu

**senkonscia**
por peko senkonscia puno nenia

**senkonscie**
senkonscie vi agis - konscie vi pagos

**senlaboreco**
pli valoras senlaboreco, ol sensenca laboremeco
senlaboreco dormon alportas
senlaboreco estas patrino de ĉiuj malvirtoj

**senlana**
de ŝafo senlana eĉ lanero taŭgas

**senlanigi**
senlanigu, sed ne senfeligu
senlanigu, sed ne senhaŭtigu

**senmakula**
konscienco senmakula estas kuseno plej mola

**senmova**
akvon senmovan kovras putraĵo

**sennuksa**
pli bona branĉo sennuksa, ol kaĝo plej luksa

**senpaga**
de kantado senpaga doloras la gorĝo
senpaga estas nur la morto, sed ĝi kostas la vivon

**senpeka**
homo senpeka neniam ekzistis

**senpeziĝi**
virino eliĝis, kaleŝo senpeziĝis

**senplumigi**
senplumigi kokinon, ne vekante mastrinon

**senpripensa**
de senpripensa rekomendo venas ploro kaj plendo

**senpripense**
kiu ĉion senpripense parolas, aŭdos tion, kion li ne volas

**sensale**
pli bone estas sensale, ol tro sale

**sensenca**
barbo potenca, sed kapo sensenca
pli valoras senlaboreco, ol sensenca laboremeco

**sensencaĵo**
paroli sensencaĵon

**sensignifa**
titolo sen mono - sensignifa sono

**senti**
de fremda dento ni doloron ne sentas
eĉ muŝo sentas, kiam vi ĝin turmentas
kion koro sentas, lango prezentas
kion mi ne sentas, pri tio mi silentas
kiu lin tuŝas, tiu lin sentas
kiu ne atentas la “se”, tiu sentas la “ve”
kiu sentas - ploras, kiu vidas - nur ridas
kiun malĝojo ne turmentis, tiu ĝojon ne sentas
oni batas per vipo, por ke sentu la ripo
plumo ne sentas, papero silentas
sango ne silentas, sian sangon ĝi sentas
se malsato turmentas, lupo timon ne sentas

**sentima**
renkontiĝis la kato kun sentima rato

**sentime**
kiu mensogas kutime, mensogas sentime

**sento**
ĉiu vivas laŭ sia prudento kaj sento
sama gento, sama sento
volo kaj sento faras pli ol prudento

**senvide**
rapide - senvide

**serĉi**
fiŝo serĉas dronon, homo serĉas bonon
fiŝo serĉas profundon, homo serĉas abundon
formanĝis en merkredo, ne serĉu en vendredo
kion Dio ne donis, tion perforte ne serĉu
kion vi ne perdis, tion ne serĉu
kiu serĉas marcipanon, perdas sian panon
li serĉas la venton sur la kampo
li vorton en la poŝo ne serĉas
mortinta serĉu ĉielon, vivanta ian celon
ne serĉu bonan arbaron, serĉu bonan najbaron
nutru lupon plej sate, li ĉiam serĉas arbaron
pano buŝon ne serĉas
pekon serĉi oni ne bezonas
serĉi la tagon pasintan
vespere ĝuu lunon, sed ne serĉu la sunon

**serpento**
dorloti serpenton sur sia brusto
turniĝadi kiel serpento
serpenton oni povas eviti, sed kalumnion neniam
vi varmigos serpenton, ĝi al vi enpikos la denton

**seruro**
sub seruro promesojn tenu, sed doninte ne reprenu

**servanto**
ĉe mastro ŝtelisto la servantoj ne ŝtelas
kia reganto, tia servanto
mastro en vojo - servantoj en ĝojo
pli valoras malgranda reganto, ol granda servanto
se la gasto estas amata, eĉ lia servanto ne restas malsata
sinjoroj sin batas, servantoj vundojn ricevas

**servi**
akvo kaj pano servas al sano
al Dio servu, diablon rezervu
al du sinjoroj samtempe oni servi ne povas
eĉ bagatelo povas servi al celo
kio servas por ĉio, taŭgas por nenio
kiu servas al ĉiu, al si mem malutilas
ne servas larmo anstataŭ armo

**servo**
kvitiĝas servo per reservo
servo al Dio vana ne restas
servo ne petita ne estas merita
servo postulas reservon

**severa**
ju homo pli fiera, des puno pli severa
kontraŭ homo fiera Dio estas severa
kun vero severa komercaĵo forvelkos
ne en ĉiu afero estu severa
negocaj aferoj estas severaj

**severe**
Dio longe paciencas, sed severe rekompencas
ne ĉion oni devas severe ekzameni

**sezono**
ĉiu sezono kun sia bono

**sidi**
bone tiu sidas, al kiu la sorto ridas
Dion fidu, sed senfare ne sidu
en arbaro sidas kaj arbojn ne vidas
en arbaro sidis kaj arbojn ne vidis
en ŝerco kaj ludo ofte sidas aludo
forte sidas, kiu Dion fidas
kio en koro sidas, la vizaĝo perfidas
kiu bone sidas, tiu lokon ne ŝanĝu
kiu venas plej frue, sidas plej ĝue
li sidas en ŝuldoj ĝis super la ŝultroj
mi flanke sidis, mi ne aŭdis nek vidis
mi hejme sidis, nenion vidis
se en kor' io sidas, vizaĝo perfidas
se vi sidos en branoj, vin manĝos la porkoj
sidas gasto minuton, sed vidas la tuton
sidi en amaso da embaraso
sidi en laboroj ĝis super la oreloj
sidi kiel muso sub balailo
sidi kiel sur pingloj
sidi sur pingloj
sidu lango malantaŭ la vango
sur lia nuko sidas pli ol peruko

**sieĝi**
danĝero sieĝas, al Dio ni preĝas - danĝero ĉesas, ni Dion forgesas
diablo ne ĉiam unu pordon sieĝas
sieĝi ies pordon

**sigelo**
la sigelo ankoraŭ ne estas metita

**signo**
eĉ signo ne restis, kie urbo estis
ĝi havas ankoraŭ signon de demando

**silenta**
akvo silenta subfosas la bordon
ju cerbo pli prudenta, des lango pli silenta
ne timu hundon bojantan, timu hundon silentan

**silenti**
batanto povas argumenti, batato devas silenti
sciu elokventi, sciu ankaŭ silenti
cent jarojn silentis kaj subite sin prezentis
kie regas la forto, tie rajto silentas
kion mi ne sentas, pri tio mi silentas
kiu pri ŝtelo silentas, tiu ŝtelon konsentas
kontraŭ nehavo eĉ juĝo silentas
mastro elbabilis, gastoj ne silentos
pekinto pentas - kolero silentas
plumo ne sentas, papero silentas
sango ne silentas, sian sangon ĝi sentas
se silentas draŝejo, malpacas loĝejo
silentu donante, parolu ricevante

**silento**
paca silento, ke ne blovas eĉ vento
parolo estas arĝento, oron similas silento
per mono eĉ silento fariĝas elokvento
plej bona sprito estas silento
post brua vento subita silento
silento estas konsento

**silko**
vivi en silko kaj veluro, en ĝojo kaj plezuro

**simile**
temp' estas valoro simile al oro

**simili**
parolo estas arĝento, oron similas silento
tago tagon sekvas, sed ne similas
unu similas nulon, ne prezentas kalkulon

**simio**
simio al simio plaĉas pli ol ĉio

**simple**
la enigmo simple solviĝas

**sincere**
deziru sincere, vi atingos libere

**sincero**
ĉe tro ĝentila ekstero mankas sincero

**singarda**
post la falo oni fariĝas singarda

**singardema**
singardeman Dio gardas

**sinĝena**
almozpetanto sinĝena restas kun sako malplena

**sinjora**
fortoj leporaj, kaj kapricoj sinjoraj
ne longe sinjora daŭras favoro

**sinjorino**
sinjorino kaj sinjoro, unu alian valoras

**sinjoro**
al ĉiu sinjoro estu lia honoro
al du sinjoroj samtempe oni servi ne povas
al grandaj sinjoroj grandaj honoroj
du sinjoroj en unu bieno, du mastrinoj ĉe unu kameno - neniam vivas sen reciproka malbeno
estu sinjoro de via vorto
la "tuj" de sinjoroj estas multe da horoj
novaj sinjoroj - novaj moroj
pli feliĉa sinjoro sen havo, ol riĉulo sed sklavo
por sia oro ĉiu estas sinjoro
poton taksu laŭ sono, sinjoron laŭ tono
sinjorino kaj sinjoro, unu alian valoras
sinjoro karesas, sed baldaŭ ĉesas
sinjoro petas, kvazaŭ dekretas
sinjoroj sin batas, servantoj vundojn ricevas
sub tero sklavo kaj sinjoro ne diferencas per valoro

**sistemo**
vivi per sistemo de "el mano al buŝo"

**sitelo**
al vi ne plaĉis sitelo, laboru per martelo
edzino pli elverŝas per funelo, ol edzo enverŝas per sitelo

**situacio**
esti en situacio sen eliro
situacio sen eliro

**sklavi**
kie sklav' regadon havas, tie mastro baldaŭ sklavas

**sklavo**
al sklavo mon' ne estas savo - li ĉiam restas sklavo
kie sklav' regadon havas, tie mastro baldaŭ sklavas
pli feliĉa sinjoro sen havo, ol riĉulo sed sklavo
sklavo kun forta mano estas plej granda tirano
sub tero sklavo kaj sinjoro ne diferencas per valoro

**skribi**
malsaĝulo ĉie sian nomon skribas

**skribo**
diron oni neas, skribo ne pereas

**skui**
vivo glate ne fluas, ĉiam batas kaj skuas

**sobreco**
kion sobreco deziras, ebrieco ĝin diras

**sojlo**
elbatadi ies sojlon

**sola**
konsoliĝas mizerulo, se li estas ne sola
kun edzo plej malmola estas pli bone ol sola
sola vojo libera al la fundo rivera
unu sola guto la glason plenigas

**soldato**
unu soldato militon ne faras

**sole**
malfeliĉo malofte venas sole

**solviĝi**
la enigmo simple solviĝas

**somero**
kio taŭgas por somero, ne taŭgas por vintro
ŝiru rozojn en somero, ĉar en vintro ili ne estos

**sona**
vorto sona estas plej admona

**sonanta**
edziĝo pro amo flamanta al la sako sonanta

**sonĝite**
ne esperite, ne sonĝite

**sonĝo**
sonĝo teruras, sonĝo forkuras

**soni**
barelo malplena sonas plej laŭte
kio akorde ne sonas, tio rimon ne donas
kio al mi sonis, tion mi resonas
sako ne sonas - amiko ne konas

**sono**
kia sono, tia resono
poton taksu laŭ sono, sinjoron laŭ tono
titolo sen mono - sensignifa sono

**sonorado**
sonorado al li venas, sed de kie - li ne komprenas

**sonorilo**
sonorilo vokas al preĝejo kaj mem neniam eniras

**sopiri**
kie ajn rano iras, ĝi ĉiam marĉon sopiras
lupo sopiras, al arbaro sin tiras
rano eĉ en palaco sopiras pri marĉo

**sorĉo**
lerteco sorĉon ne bezonas

**sorto**
al mono kaj forto humiliĝas la sorto
al protekto kaj forto helpas la sorto
ankaŭ la lupon atingos la sorto
ankoraŭ neniu evitis la sorton

bataladi kontraŭ la sorto
bone tiu sidas, al kiu la sorto ridas
ĉiu kreas sian forton, ĉiu forĝas sian sorton
fianĉon de l' sorto difinitan forpelos nenia malhelpo
kiun favoras la sorto, por tiu eĉ koko estas ovoporta
kiun la sorto karesas, al tiu ĉio sukcesas
kiun la sorto karesos, tiu sukcesos
petolu, diboĉu, sed poste sorton ne riproĉu
se decidos la sorto, helpos nenia forto
se la sorto vin batas, mokantoj ne mankas
sian sorton neniu evitos
sorto donas favoron, sorto donas doloron
sorto ofte alsendas, kion oni ne atendas
venkas ne forto, venkas la sorto

**sovaĝa**
france saĝa, angle sovaĝa

**spegulo**
de l' koro spegulo estas la okulo
ne helpas spegulo al malbelulo
stomako ne estas spegulo: kion ĝi manĝis, ne vidas okulo

**sperta**
li estas homo sperta kaj lerta
mizero faras lerta, mizero faras sperta
pasero sperta estas lerta
pasero sperta ne bezonas averton
se juneco estus sperta, se maljuneco estus lerta!
sperta mano ne restas sen pano

**sperte**
kiu iras sperte, iras certe

**sperto**
eĉ malsaĝulon sperto instruos
ni forgesas averton, ni memoras la sperton
por Paŭlo sperto - por Petro averto
por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno
proverbo estas sperto, proverbo estas averto
sperto saĝon akrigas

**spertulo**
ne demandu scienculon, demandu spertulon

**spesmilo**
fremda spesmilo estas sen utilo
fremdlando objekton por speso donas, sed por ĝin venigi, oni spesmilon bezonas
kiu speson ne tenas, tiu al spesmilo ne venas

oni donacas por speso kaj laborigas por spesmilo
spesmilo superflua poŝon ne ŝiras
spesmilo vojon trabatas

**speso**
fremdlando objekton por speso donas, sed por ĝin venigi, oni spesmilon bezonas
kiu speson ne tenas, tiu al spesmilo ne venas
li faras princan promeson, sed ne havas eĉ speson
oni donacas por speso kaj laborigas por spesmilo
por regna speso ne ekzistas forgeso
se ĉiu speson donos, malriĉulo malsaton ne konos
sen speso unua ne ekzistas la dua

**spiciĝi**
ne spiciĝas manĝo de mastrina beleco

**spico**
al farun' malbonspeca ne helpos la spico

**spiko**
spiko malplena plej alte sin tenas

**spirita**
vesto eluzita, sed pureco spirita

**spirito**
pli valoras kontenta spirito, ol granda profito

**spiro**
li jam faras la lastan spiron

**spiti**
abelujon ne incitu, amason ne spitu
pli facile estas eviti ol spiti

**sprita**
sprita vorto tentas, nenion atentas

**spriti**
vero ne bezonas mediti nek spriti

**sprito**
malsato donas spriton
multe da sprito, sed neniom da profito
plej bona sprito estas silento
por glate mensogi, oni spriton bezonas
sprit' en tempo ne ĝusta estas tre malbongusta

**stari**
antaŭ okuloj ne staras, doloron ne faras
ĝi jam staras al mi en la gorĝo
ĝi staras ankoraŭ malproksime en la kampo
inter faro kaj rakonto staras meze granda monto
jen staras la bovoj antaŭ la monto!
kuraĝe li staras, kiam muro lin baras
la afero ne staras sur pinto de ponto
la vivo staras sur la karto
min ne tuŝas la afero, mi staras ekstere
staras la morto jam en la korto
stari per unu piedo en la tombo
stari por iu kiel muro kaj turo
staris, ekfaris

**stariĝi**
stariĝi obstine

**stato**
aŭ plej riĉa stato, aŭ plena malsato
bona stato saĝigas, malbona malsaĝigas
nova stato, nova vivo
vivu stomako laŭ stato de l' sako

**sterni**
kiel oni sternas, tiel oni dormas

**stomako**
ĉe stomako malsata ne kapricas palato
ĉe vesto velura suferas stomako
honoro ne donas, kion stomako bezonas
malsata stomako orelon ne havas
plena stomako laŭdas la faston
plendoj stomakon ne plenigas
sata stomako ne lernas volonte
se stomako doloras, kapo laboras
stomako malsata nur pri pano meditas
stomako ne estas spegulo: kion ĝi manĝis, ne vidas okulo
vivu stomako laŭ stato de l' sako

**strabulo**
inter la blinduloj reĝas la strabuloj

**strato**
virta virino straton ne konas

**streĉi**
streĉi la orelojn
streĉu la okulojn!

**streĉiĝi**
la haroj streĉiĝas
streĉiĝi el la haŭto

**streĉo**
teni la okulojn en streĉo

**strukturo**
konservas eĉ karbo la strukturon de l' arbo

**studo**
li taŭgas nek por studo, nek por ludo

**stulte**
kiu glutis tro multe, tiu agas tro stulte

**sub**
okupi sen celo lokon sub ĉielo
sub seruro promesojn tenu, sed doninte ne reprenu

**subfosi**
akvo silenta subfosas la bordon

**subita**
post brua vento subita silento

**subite**
cent jarojn silentis kaj subite sin prezentis
feliĉo leĝon ne obeas, subite naskiĝas, subite pereas
mi panon ne esperis, subite kuko aperis
ne atendita, ne esperita ofte venas subite
neniam atendita ofte venas subite

**submeti**
kiu supren kraĉon ĵetas, sian barbon al ĝi submetas

**subteni**
al venko rajto venas, se ĝin forto subtenas
donacetoj subtenas amikecon
ĝoju kaj festenu, sed malriĉulojn subtenu
kiun feliĉo subtenas, al tiu mem ĉio venas

**suferi**
ankaŭ diablo tondron suferos
ĉe vesto velura suferas stomako
kapo pekas, piedoj suferas
kio post ni aperos, ni de ĝi ne suferos
pro kapo malsaĝa suferas la kruroj

**suferigi**
malsato malfortigas, ŝuldo suferigas

**suferinto**
nur suferinto ŝatas feliĉon
suferinto pli valoras, ol lerninto

**sufero**
fremda mizero ne estas sufero
kie estas sufero, estas ankaŭ espero
kiu diras la veron, havas suferon
longa konsidero savas de sufero
ne ĉiam daŭras malbona vetero, ne ĉiam daŭras homa sufero
post sufero venas prospero
propra sufero - plej granda sur tero
suferoj sufokas kaj homoj mokas
tro longa sufero - malgranda espero

**sufiĉe**
oni estas riĉa neniam sufiĉe

**sufiĉi**
eĉ kaprino plaĉas, se la doto sufiĉas
ne sufiĉas ploro al kreditoro
por paro amanta ĉiu loketo sufiĉas
por saĝulo sufiĉas aludo
por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno
se forestas la suno, sufiĉas la luno

**sufloro**
kia sufloro, tia aktoro

**sufoki**
suferoj sufokas kaj homoj mokas

**sukcesa**
sukcesa venkanto de pordoj malfermitaj

**sukcesi**
bone sukcesu, sed ankaŭ nin ne forgesu
kiun la sorto karesas, al tiu ĉio sukcesas
kiun la sorto karesos, tiu sukcesos
per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro
se malriĉulo sukcesas, li ĉiujn forgesas

**sukceso**
envia moko sukceson ne detruas
per mezuro kaj peso akiriĝas sukceso

**suko**
de pli da suko ne malboniĝas la kuko
el sama tero devenas, saman sukon entenas

**suno**
ankaŭ al ni la suno eklumos
bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno
eĉ sur la suno troviĝas makuloj
leviĝu kun la suno, edziĝu dum juna
post vetero malbela lumas suno plej hela
se forestas la suno, sufiĉas la luno
vespere ĝuu lunon, sed ne serĉu la sunon

**super**
li sidas en ŝuldoj ĝis super la ŝultroj
super ne iru okuloj super la frunton
super sidi en laboroj ĝis super la oreloj

**superi**
malbona virino diablon superas
pardonemeco superas justecon
propra volo ordonon superas

**superflua**
spesmilo superflua poŝon ne ŝiras

**superfluo**
de superfluo malboniĝas la ĝuo

**supermezura**
amo supermezura ne estas plezura
ĉio supermezura estas terura

**superpinte**
superpinte - nur tuŝinte

**superstiĉo**
samaj kondiĉoj, samaj superstiĉoj

**supo**
de la manoj ĝis lipoj la sup' elverŝiĝis
inter la mano ĝis la buŝo ofte disverŝiĝas la supo
ne por lupo estas supo
propra supo brogas, fremda allogas

**supozo**
mi havas pri tio nek scion nek supozon

**supre**
hodiaŭ supre, morgaŭ malsupre

**supren**
kiu supren kraĉon ĵetas, sian barbon al ĝi submetas
li tenas la nazon supren
nazo supren, vento antaŭen

**surda**
virino bonorda estas muta kaj surda

**surdulo**
prediki al surduloj

**surmeto**
surmeto rompas, komparo trompas

**surprizo**
gasto sen avizo estas agrabla surprizo

**surtera**
li diris adiaŭ al la mondo surtera

**suspekti**
kie ĵuron vi aŭdas, malbonon suspektu

**suspekto**
ju pli da ĵuroj, des pli da suspekto
suspekto pruvon ne egalas

**svatiĝi**
multaj svatiĝas, feliĉulo edziĝas
ne ĉiu fianĉiĝas, kiu svatiĝas

**svingi**
kiu tro alte svingas, nenion atingas
kiu tro forte la manon svingas, nenion atingas
lango nenion atingas, se ĝin saĝo ne svingas
puno pekon svingas, favorkoreco ĝin estingas

**ŝafaro**
ŝafaro harmonia lupon ne timas
unu fava ŝafo tutan ŝafaron infektas

**ŝafido**
pereis ŝafino, pereu ankaŭ la ŝafido

**ŝafino**
pereis ŝafino, pereu ankaŭ la ŝafido
oni tondas ŝafinojn - tremas la ŝafoj

**ŝafo**
de malbona ŝafo estas bona eĉ tufo
de ŝafo senlana eĉ lanero taŭgas
estas ŝafoj, estos lano
gardatan ŝafon eĉ lupo timas
ke la lup' estu sata, kaj la ŝaf' ne tuŝata
lupo dormanta ŝafon ne kaptas
oni tondas ŝafinojn - tremas la ŝafoj
pagos lupo por la ŝafo
pastro ŝafon ne prenas, ĝi hejmen revenas
por ŝafo tondita Dio venton moderigas
por ŝafon formanĝi, lupo trovos pretekston
se lupo ekpentis, ŝafo atentu
se vi faros vin ŝafo, la lupoj vin manĝos
se vi ŝafo fariĝos, lupoj ne mankos
ŝafo donas sian lanon, por ke mastro havu panon
ŝafo kalkulita ne estas savita
unu fava ŝafo tutan ŝafaron infektas

**ŝajno**
ŝajno trompas
ŝajnon ne fidu, juĝi ne rapidu

**ŝanĝi**
kiu bone sidas, tiu lokon ne ŝanĝu
kiu edziĝas, tiu ŝanĝiĝas
kiu konstante lokon ŝanĝas, neniam sin aranĝas
lupo ŝanĝas la harojn, sed ne la farojn
tago aranĝas, tago ŝanĝas
vulpo mienon ŝanĝas, sed plue kokidojn manĝas

**ŝarĝa**
promeso estas larĝa, plenumo estas ŝarĝa

**ŝarĝi**
tro alta postulo aĉetanton ne ŝarĝas

**ŝarĝo**
ĉiu havas sian ŝarĝon
sur ĉeval' de najbaro la ŝarĝo ne pezas

**ŝati**
amikon ŝatu, malamikon ne batu
bono posedata ne estas ŝatata
ĉion novan oni ŝatas, malnovan oni forbatas
kiu hundon mian batas, min mem ne tre ŝatas
kiu malmulton ne ŝatas, multon ne meritas
konu nin, ŝatu nin!
nur suferinto ŝatas feliĉon
ŝatu amikon laŭ la dato de akiro
ŝteletiston oni batas, ŝtelegiston oni ŝatas

**ŝelo**
li ĵus elrampis el la ova ŝelo

**ŝerce**
ŝerce dirite, cele pensite

**ŝerco**
diablo ŝercon ne komprenas, vokite li venas
en ŝerco kaj ludo ofte sidas aludo
la morto ŝercon ne komprenas, oni ĝin vokas, ĝi venas
ne ekzistas en komerco amikeco nek ŝerco

**ŝi**
ĉiu "li" havas sian "ŝi"

**ŝipo**
eĉ plej bonan ŝipon malbonigas la ventoj
granda ŝipo bezonas profundon
ne maro dronigas ŝipon, sed la ventoj
ŝipon rompitan ĉiuj ventoj atakas

**ŝiri**
spesmilo superflua poŝon ne ŝiras
ŝiru rozojn en somero, ĉar en vintro ili ne estos
ŝiru vin en du partojn, la mondo trian postulos

**ŝiriĝi**
de fremda groŝo ŝiriĝas la poŝo
ŝiriĝis fadeno sur la bobeno

**ŝlosilo**
ora ŝlosilo ĉion malfermas
ora ŝlosilo ĉiun pordon malfermas
ŝlosilo uzata ruston ne konas

**ŝmiri**
dolĉe ŝmiri al iu la lipojn
kiu bone ŝmiras, bone veturas

**ŝnuro**
en dom' de pendigito pri ŝnuro ne parolu
tordi ŝnurojn el sablo

**ŝovi**
kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas
en fremdan vazon ne ŝovu la nazon
ne ŝovu la nazon en fremdan vazon
ne ŝovu nazon en fremdan vazon

**ŝpari**
ne ŝpari monon nek penon
ŝparu groŝon - vi havos plenan poŝon
ŝparu kiam bone, vi havos kiam bezone
vortojn ŝparu, agojn faru

**ŝparita**
groŝo ŝparita neniam perdiĝas
vivi de ŝparita kaso

**ŝtelaĵokaŝisto**
ŝtelaĵokaŝisto mem estas ŝtelisto

**ŝtelegisto**
ŝteletiston oni batas, ŝtelegiston oni ŝatas

**ŝtelego**
oni komencas per ŝteletoj kaj finas per ŝtelegoj

**ŝteletisto**
ŝteletiston oni batas, ŝtelegiston oni ŝatas

**ŝteleto**
oni komencas per ŝteletoj kaj finas per ŝtelegoj

**ŝteli**
apud propra domo ŝtelisto ne ŝtelas
ĉe mastro ŝtelisto la servantoj ne ŝtelas
groŝon ŝtelis - ho, ŝtelisto! milojn ŝtelis - financisto
infano ŝtelas ovon, grandaĝulo ŝtelas bovon

li ŝtelas de najbaro, por doni al altaro
longe ŝtelas ŝtelisto, tamen fine li pendos
ne ŝtelus ŝtelistoj, se ne ekzistus kaŝistoj
ne trovante bovinon, oni ŝtelas kokinon
ŝteli ĉe ŝtelisto estas malfacile
ŝtelu malproksime, edziĝu proksime
unu fojon ŝtelis pomon kaj perdis por ĉiam honestan nomon

**ŝtelinta**
unufoje ŝtelinta restas ĉiam ŝtelisto

**ŝtelisto**
apud propra domo ŝtelisto ne ŝtelas
ĉe mastro ŝtelisto la servantoj ne ŝtelas
groŝon ŝtelis - ho, ŝtelisto! milojn ŝtelis - financisto
kiu ŝteliston regalas, mem ŝteliston egalas
longe ŝtelas ŝtelisto, tamen fine li pendos
malbone kaŝita ŝteliston incitas
ne ĉiu bojato estas ŝtelisto
ne kredas ŝtelisto, ke honestaj ekzistas
ne ŝtelus ŝtelistoj, se ne ekzistus kaŝistoj
okazo faras ŝteliston
okazo kreas ŝteliston
plena kaso ŝteliston altiras
por pendigi ŝteliston, antaŭe lin kaptu
sur la ŝtelisto brulas la ĉapo
ŝtelaĵokaŝisto mem estas ŝtelisto
ŝteli ĉe ŝtelisto estas malfacile
ŝtelisto ŝteliston evitas, ĉar li tie ne profitas
ŝtelisto ŝteliston ne perfidas
unufoje ŝtelinta restas ĉiam ŝtelisto
venos ŝtelisto al la juĝisto

**ŝtelo**
faras rabon kaj ŝtelon, por oferi al Dio kandelon
kiu pri ŝtelo silentas, tiu ŝtelon konsentas
malfermita kelo tentas al ŝtelo
mensogo kaj ŝtelo estas du fratoj
parolo anĝela, sed penso pri ŝtelo

**ŝtipo**
eĉ ŝtipo estos bela, se vi ĝin ornamos
malsaĝa kiel ŝtipo

**ŝtono**
eĉ ŝtono verdiĝas, se ĝi longe ne moviĝas
gast' en tempo malĝusta estas ŝtono sur brusto
guto malgranda, sed ŝtonon ĝi boras
kiu regalas per ŝtonoj, tiun oni dankas per bastonoj

kontraŭ vesto malbona konspiras ĉiu ŝtono
li ne elpensis la filozofian ŝtonon
malaperis kiel ŝtono en maron
malsaĝulo ŝtonon ĵetis, dek saĝuloj ĝin ne atingos
per unu ŝtono oni du ĵetojn ne faras
se Dio ordonos, eĉ ŝton' lakton donos
senĉesa guto eĉ ŝtonon traboras
ŝtono de falpuŝiĝo
trafi du celojn per unu ŝtono
trafis falĉilo sur ŝtonon

**ŝtopado**
al kavo senfunda ŝtopado ne helpas

**ŝtrumpa**
pri la ŝtrumpa truo scias nur la ŝuo

**ŝuldanto**
eminenta ŝuldanto - malbona paganto
pago de ŝuldanto estas bona en ĉiu kvanto

**ŝuldi**
riĉa estas tiu, kiu ŝuldas al neniu

**ŝuldo**
bedaŭro kaj ĉagreno ŝuldon ne kovras
festeno kaj ĉaso kaj da ŝuldoj amaso
kiu donis garantion, tiu pagu la ŝuldon
kiu ŝuldojn estingas, riĉecon atingas
larmoj ŝuldon ne pagas
li havas pli da ŝuldoj en la urbo, ol da haroj en la barbo
li sidas en ŝuldoj ĝis super la ŝultroj
longa dormado ŝuldojn kreskigas
malsato malfortigas, ŝuldo suferigas
nenio pli grandan mizeron prezentas, ol se sano mankas kaj ŝuldoj turmentas
ŝuldo estas unua heredanto
ŝuldo havas longan vivon
ŝuldo kaj mizero estas najbaroj
ŝuldo ne bruas, tamen dormon detruas
ŝuldo ne makulas, sed pagon postulas
ŝuldo ne rustiĝas, ŝuldo ne mortiĝas
ŝuldoj kaj mizero estas najbaroj
ŝuldon tempo ne kuracas

**ŝultro**
li sidas en ŝuldoj ĝis super la ŝultroj

**ŝuo**
ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo
esti sub la ŝuo (de sia edzino)
pri la ŝtrumpa truo scias nur la ŝuo

**ŝuti**
ŝuti polvon en la okulojn

**ŝviti**
kiu ŝvitas, tiu profitas
li ŝvitas ankoraŭ super la alfabeto
pli bone estas ŝviti, ol tremi

**tablo**
ĉe tablo malplena babilo ne fluas
tablo festena, sed telero malplena
tablo kovrita faras amikojn
tablon frapas tajloro, tuj tondilo eksonas
tablon ornamas ne tuko, sed kuko
vivi inter forno hejtita kaj tablo kovrita

**tagiĝo**
ĉe la tagiĝo

**tagmanĝo**
tro kara aranĝo por malkara tagmanĝo

**tago**
Dio donis tagon, Dio donos manĝon
drinku tutajn tagojn, sed kontrolu viajn agojn
eĉ por plej terura tago venas vespero
en la tago de la sankta Neniamo
en luma tago
kiu ĉion formanĝis en tago, malsatos vespere
kiu havas bonan najbaron, havas bonan tagon
laŭdu tagon nur vespere
matenas, vesperas - kaj tago malaperas
morgaŭ estas la amata tago de mallaboruloj
ne en unu tago elkreskis Kartago
ne laŭdu la tagon antaŭ vespero
peli tagojn sen afero de mateno al vespero
serĉi la tagon pasintan
tago aranĝas, tago ŝanĝas
tago festa - for aferoj
tago tagon sekvas, sed ne similas
tago tagon sekvas, sed ne similas

**tajloro**
ĉiu tajloro havas sian tranĉmanieron
oni ne pagas per gloro al sia tajloro
restu tajloro ĉe via laboro
tablon frapas tajloro, tuj tondilo eksonas
tajloro krimis, botisto pendas
truon de l’ honoro flikos neniu tajloro

**taksi**
belecon taksas ne okulo sed koro
kia oni vin vidas, tia oni vin taksas
kiel oni vin taksas, tiel oni vin regalas
kiel oni vin vidas, tiel oni vin taksas
malplaĉas nenio, se taksas pasio

poton taksu laŭ sono, sinjoron laŭ tono
taksi la sanon ni lernas en malsano

**talenta**
mizero havas talentan kapon

**tamburo**
malsaĝulo kiel tamburo, - kiu pasas, lin batas

**tamen**
dentoj mordas la langon, tamen ambaŭ sin amas
eĉ kiu plej bone pafas, tamen iam maltrafas
longe ŝtelas ŝtelisto, tamen fine li pendos
malgranda estas la flamo, tamen ne mankas la fumo
malriĉeco ne estas krimo, tamen kondukas al malestimo
metio manĝon ne bezonas kaj manĝon tamen donas
sapo blankecon ne havas, tamen blanke ĝi lavas
se ne estus "se" kaj "tamen", mi al ĉio dirus amen
ŝuldo ne bruas, tamen dormon detruas

**tanado**
la felo tanadon ne valoras

**tani**
tani al iu la haŭton

**tapiŝo**
se mi scius, kie mi falos, mi tien metus tapiŝon
tapiŝon ne deziris, maton akiris

**tasko**
plenumiĝis la tasko per granda fiasko

**taŭgi**
ĉio taŭgas, kio venas
de ŝafo senlana eĉ lanero taŭgas
ilo el oro taŭgas por ĉiu laboro
kio servas por ĉio, taŭgas por nenio
kio taŭgas por somero, ne taŭgas por vintro
li taŭgas nek por studo, nek por ludo
ne taŭgas du ursoj por unu nesto
ne taŭgas la vero por komerca afero
unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj

**tedi**
en juneco logas, en maljuneco tedas

**tedo**
kontraŭ ĉiu tedo ekzistas rimedo
malpli da posedo, malpli da tedo

**tegmento**
en fremda tegmento li flikas truon kaj en propra ne vidas la fluon
ĝi estas ankoraŭ birdo sur la tegmento

**teksto**
nek al teksto, nek al preteksto

**telero**
el malplena telero vane ĉerpas kulero
granda telero, malplena kulero
tablo festena, sed telero malplena

**temo**
nek al temo, nek al celo

**tempo**
alia tempo, aliaj moroj
aliaj tempoj, aliaj moroj
depost tempo nememorebla
en la bona malnova tempo
estis la tempo, ni ne komprenis - pasis la tempo, la saĝ' al ni venis
gast' en tempo malĝusta estas ŝtono sur brusto
kio estis kaj pasis, tion tempo frakasis
la afero havas tempon
la tempo ĉiam malkaŝas la veron
la tempo venos, ni ĉion komprenos
plej bona kuracisto estas la tempo
por ĉiu ago venas la tempo de pago
se la tempo forblovis, ni jam helpi ne povas
sprit' en tempo ne ĝusta estas tre malbongusta
ŝuldon tempo ne kuracas
temp' estas mono
temp' estas valoro simile al oro
tempo flatas, tempo batas
tempo kaj cirkonstancoj saĝon alportas
tempo prenas, tempo pagas
tempo toleras, sed vero aperas
tempo venos, zorgon prenos
uzu tempon estantan, antaŭvidu estontan, memoru estintan
venos tempo, venos konsilo

**teni**
amu edzinon plej kore, sed tenu ŝin bonmore
kiu entreprenis, tiu sin tenu
kiu langon ne tenas, mem sin malbenas
kiu speson ne tenas, tiu al spesmilo ne venas
kun urso promenu, sed pafilon prete tenu
li tenas la nazon supren
Petro kornojn tenas, Paŭlo lakton prenas
saĝa tenas aferon, malsaĝa esperon
sako alenon ne tenas, ĝi baldaŭ elvenas
sako malplena sin rekte ne tenas
sciu funde, sed tenu profunde
spiko malplena plej alte sin tenas
sub seruro promesojn tenu, sed doninte ne reprenu
teni iun per fera mano
teni la okulojn en streĉo
teni sian langon en la buŝo
vazo rompita longe sin tenas

**tenti**
malfermita kelo tentas al ŝtelo
malplena sako tentas al peko
sprita vorto tentas, nenion atentas
vane vi tentas, mi ne konsentos

**terno**
ne ekzistas terno sen nazo nek fakto sen bazo

**tero**
atendi sur tero, ĝis sekiĝos la rivero
ĉio estas por li kiel polvero sur la tero
de atendo kaj espero pereis multaj sur la tero
de peko kaj mizero estas plena la tero
eĉ el sub la tero aperas la vero
el aero al tero
el sama tero devenas, saman sukon entenas
enpremi en la teron
kastel' en aero - malsato sur tero
kiu leviĝis fiere, baldaŭ falos al tero
la sama afero, sed kun la kapo al tero
laŭdu la maron, sed restu sur tero
li vivas sur la tero kiel en infero
mi ankaŭ lokon sur la tero okupas
ne batalu pot' el tero kontraŭ kaldrono el fero
ne moku riveron, ne atinginte la teron
pluvo en aprilo - por la tero utilo
post mia malapero renversiĝu la tero
propra sufero - plej granda sur tero

se la ĉielo falus al tero, birdokaptado estus facila afero
sub tero sklavo kaj sinjoro ne diferencas per valoro

**terura**
ĉio supermezura estas terura
eĉ por plej terura tago venas vespero

**teruri**
sonĝo teruras, sonĝo forkuras

**teruro**
atakis teruro, ektremis la kruro
tra vitro de teruro pligrandiĝas la mezuro

**testamento**
okaza komplimento ne iras al testamento

**testude**
bona famo sin trenas testude, malbona kuras rapide

**tia**
kia ago, tia pago
kia demando, tia respondo
kia drapo, tia vesto
kia estas la homo, tia estas lia nomo
kia estas via laboro, tia estas via valoro
kia fripono, tia bastono
kia greno, tia pano
kia la birdo, tia la kaĝo
kia la homo, tia lia nomo
kia la kapo, tia la ĉapo
kia la poto, tia la kovrilo
kia la semo, tia la rikolto
kia naskiĝis, tia grandiĝis
kia naskinto, tiaj naskitoj
kia oni vin vidas, tia oni vin taksas
kia pago, tia ago
kia paroĥestro, tia paroĥo
kia patrino, tia filino
kia regalato, tia regalado
kia reganto, tia servanto
kia sono, tia resono
kia sufloro, tia aktoro
kia vivo, tia morto
kiaj kolegoj, tiaj kutimo
kun kiu vi festas, tia vi estas
kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas

**tial**
ĉiu “tial” havas sian “kial”

**tiam**
ĉiu klopodu nur en sia metio, tiam al la urbo mankos nenio

**tie**
bona estas fremdlando, sed aliaj tie loĝu
kie dento doloras, tien iras la lango
kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas
kie estas mielo, tie muŝoj ne mankas
kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas
kie jukas, tie ni gratas
kie maldike, tie rompiĝas
kie mi disponas, tie mi ordonas
kie minaco, tie malpaco
kie ne estas konsileble, tie ne estas helpeble
kie pano estas, tie musoj ne mankas
kie regas la forto, tie rajto silentas
kie sklav’ regadon havas, tie mastro baldaŭ sklavas
kie timo, tie honto
kien kudrilo iras, tien fadenon ĝi tiras
li loĝas tie, kien eĉ birdo ne flugas
Romo estas tie, kie estas la Papo
se mi scius, kie mi falos, mi tien metus tapiŝon
ŝtelisto ŝteliston evitas, ĉar li tie ne profitas
tie ĉi malbone, tie nebone
tie iras fumo per densaj nuboj
tie vi petos, vi tiros, vi nenion akiros
tien okuloj iras, kion la koro deziras

**tiel**
bojas hundido, ĉar tiel faras la hundo
ĝi ne estas tiel facila, kiel laboro argila
kiel akirite, tiel perdite
kiel li meritis, tiel li profitis
kiel oni sternas, tiel oni dormas
kiel oni vin taksas, tiel oni vin regalas
kiel oni vin vidas, tiel oni vin taksas
kiel oni, tiel ĉe ni
li mensogas tiel, ke la muroj krakas
tiel estas, tiel restas
vi sekretos al edzino, ŝi sekretos al fratino, kaj tiel la sekreto promenados sen fino

**ties**
kies gasto mi estas, ties feston mi festas

**tima**
antaŭ tima okulo potenciĝas eĉ kulo

**timi**
arbo krakanta venton ne timas
dormus leporo, se ĝi ĉason ne timus
gardatan ŝafon eĉ lupo timas
kiu akvon evitas, droni ne timas
kiu bone agas, timi ne bezonas
kiu hontas nenion, ne timas Dion
kiu ne krimas, tiu ne timas
kiu timas bestaron, ne iru arbaron
korniko vundita propran voston timas
malbona herbo froston ne timas
malriĉulo rabiston ne timas
ne timu hundon bojantan, timu hundon silentan
ne timu tranĉilon, timu babilon
pura ĉielo fulmon ne timas
ŝafaro harmonia lupon ne timas
timi sian propran ombron
timu lupon edukitan kaj malamikon repacigitan
volus kato fiŝojn, sed la akvon ĝi timas

**timo**
kie timo, tie honto
pensoj iras trans limo sen pago kaj timo
se malsato turmentas, lupo timon ne sentas
timo havas grandajn okulojn

**timulo**
kontraŭ muŝoj bravulo, kontraŭ homoj timulo
li ne estas el la regimento de timuloj

**tiom**
kiom da homoj, tiom da gustoj
kiom da juĝantoj, tiom da juĝoj
kiom da kapoj, tiom da opinioj
kiom da koroj, tiom da voloj

**tirano**
sklavo kun forta mano estas plej granda tirano

**tiri**
fadeno iras, kien kudrilo ĝin tiras
fiŝo ne iras, sed hoko ĝin tiras
kien kudrilo iras, tien fadenon ĝi tiras
kiu sin enjungis, devas tiri
lupo sopiras, al arbaro sin tiras
pli tiras virina haro, ol ĉevala paro
tie vi petos, vi tiros, vi nenion akiros
urson al mielo oni ne tiras per orelo

**tirita**
la loto estas tirita

**tiro**
eltrinki per unu tiro

**titolo**
amaso da mono kaj titolo de barono
deziri al iu amason da mono kaj titolon de barono
ripetata parolo pri la sama titolo
titolo sen mono - sensignifa sono

**tolaĵo**
tolaĵon malpuran lavu en la domo

**toleri**
li ne toleras eĉ muŝon sur la muro
tempo toleras, sed vero aperas

**tolero**
al la papero ne mankas tolero

**tombo**
atendis, meditis, ĝis en tombon englitis
ne mankas tombo por mortinto nek pano por vivanto
stari per unu piedo en la tombo

**tondi**
oni tondas ŝafinojn - tremas la ŝafoj

**tondilo**
tablon frapas tajloro, tuj tondilo eksonas

**tondita**
por ŝafo tondita Dio venton moderigas

**tondri**
ne ĉio batas, kio tondras

**tondro**
ankaŭ diablo tondron suferos
ankaŭ por diablo tondro ekzistas
el klara ĉielo tondro ekbatis
tondro kampulon memorigas pri Dio
vento sendita tondron reportos

**tono**
doni la tonon
karakteron al kanto donas la tono
poton taksu laŭ sono, sinjoron laŭ tono

**tordi**
li eĉ el sablo vipojn tordas
ne unu hundo lin mordis, ne unu vento lin tordis
tordi ŝnurojn el sablo

**tra**
tra unu orelo eniras, tra la dua eliras

**trabati**
spesmilo vojon trabatas

**trabo**
en fremda okulo ni vidas ligneron, en nia ni trabon ne vidas
meti trabojn sur la vojon

**trabori**
eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan
senĉesa guto eĉ ŝtonon traboras

**trafe**
trafe aŭ maltrafe

**trafi**
celi anseron, trafi aeron
celis paseron, trafis anseron
fluis sur lipoj, sed en buŝon ne trafis
homo pafas, Dio trafas
li trafis el sub pluvo en riveron
mi blinde pafos, eble trafos
neniu scias, kio morgaŭ lin trafos
se peko trafas, eĉ bastono ekpafas
trafi de Scilo al Ĥaribdo
trafi du celojn per unu ŝtono

trafi per la parolo rekte en la vizaĝon
trafi per la vizaĝo en koton
trafis falĉilo sur ŝtonon
trafis hakilo al ligno malmola
trafis pugno pugnon
trafos hakilo al ligno malmola
vidas okulo, sed mano ne trafas

**traflugi**
traflugis anĝelo preter orelo

**tralavi**
tralavi la gorĝon

**tranĉa**
hakilo estas tranĉa, sed ne cedas la branĉo

**tranĉi**
el fremda ledo oni tranĉas larĝe
tranĉi rekte en la karnon

**tranĉilo**
ne timu tranĉilon, timu babilon
venis tranĉilo al la gorĝo

**tranĉmaniero**
ĉiu tajloro havas sian tranĉmanieron

**trankvila**
akvo trankvila estas akvo danĝera
en trankvila vetero ĉiu remas sen danĝero
ĝentila kaj trankvila, kun koro el oro
konscienco trankvila estas bona dormilo

**trankvile**
kiu iras trankvile, iras facile
kiu vivas trankvile, vivas facile
li ripozu trankvile!
ne rapidu, trankvile decidu

**trankvilo**
kiu garantias, trankvilon ne scias
post dorma trankvilo venas bona konsilo

**trans**
kiu trans muro aŭskultas, tiun la muro insultas
li jam estas trans montoj kaj maro
pensoj iras trans limo sen pago kaj timo

**transireble**
nek transnaĝeble, nek transireble

**transloĝiĝo**
en ĉiu transloĝiĝo estas parto de ruiniĝo

**translokiĝo**
li faris sian lastan translokiĝon

**transmara**
ĉio transmara estas ĉarma kaj kara
en landoj transmaraj estas oraj arbaroj

**transnaĝeble**
nek transnaĝeble, nek transireble

**trapafadi**
trapafadi la aeron

**trapiki**
eĉ pinglo povas koron trapiki

**traveni**
kio tra l' dentoj travenis, tion la lipoj ne retenos

**travivi**
vivon travivi estas art' malfacila

**tre**
de parolo ĝis faro estas tre malproksime
deziro tre granda, sed mankas la forto
famo kredon allogas, sed tre ofte mensogas
ĝi estas al li tre bonvena
kiu hundon mian batas, min mem ne tre ŝatas
kiu tro alten rigardon direktas, tiu tre baldaŭ okulojn difektas
sprit' en tempo ne ĝusta estas tre malbongusta

**tremi**
li tremas, kiel aŭtuna folio
oni tondas ŝafinojn - tremas la ŝafoj
pli bone estas ŝviti, ol tremi

**tremo**
tremo atakas

**treni**
bona famo sin trenas testude, malbona kuras rapide
ne volas kokin' al festeno, sed oni ĝin trenas perforte
oni vokas la bovon ne festeni, sed treni

treni sian vivon de mizero al mizero

**trezoro**
amiko fidela estas trezoro plej bela
promesita trezoro estas sen valoro

**tri**
pronomoj “mia” “min” kaj “mi” en mondo reĝas ĉiam tri
unu, du, tri, kvar, kaj finita la far’

**tria**
du militas - tria profitas
ŝiru vin en du partojn, la mondo trian postulos

**triĵaŭda**
en la triĵaŭda semajno

**trinki**
en puton ne kraĉu, ĉar vi trinki bezonos
ne kraĉu en puton, ĉar vi trinki bezonos
kiam pasanto jam trinkis, li la puton insultas
trinki pro ies sano

**trinkigi**
vi min manĝigos, mi vin trinkigos

**trinko**
de lia vivo aranĝo estas trinko kaj manĝo

**trio**
trio plaĉas al Dio

**tro**
aĝo tro matura ne estas plezura
al glacio printempa kaj al amiko tro nova ne fidu
bona estas Romo, sed tro malproksima de nia domo
ĉe tro ĝentila ekstero mankas sincero
de edziĝo tro malfrua orfoj naskiĝas
de elekto tro multa plej malbona rezulto
de rigardo tro alta malsaniĝas okulo
de tro da pano venas malsano
de tro multa scio krevas la kranio
edziĝo tro momenta estas longapenta
gasto tro petata foriras malsata
kiu elektas tro multe, ricevas nenion
kiu glutis tro multe, tiu agas tro stulte
kiu kaptas tro vaste, konservas malmulte
kiu komencas tro frue, finas malfrue
kiu tro alte svingas, nenion atingas

kiu tro alten rigardon direktas, tiu tre baldaŭ okulojn difektas
kiu tro bezonas, tiu leĝon ne konas
kiu tro forte la manon svingas, nenion atingas
kiu tro multe deziras, nenion akiras
kiu tro pelas, nur malakcelas
kiu tro rapide saltas, tiu baldaŭ haltas
kiu tro ripozas, baldaŭ almozas
kiu tro sin pravigas, tiu mem sin kulpigas
koro tro plena - buŝo parolas
li havas cerbon ne tro potencan
li havas en la cerbo tro multe da herbo
per tro multa varto malboniĝas la farto
plej saĝa maljunulo ne estas tro saĝa
pli bone estas sensale, ol tro sale
pli bone ne sali, ol sali tro multe
pli facile estas ne iri, ol tro malfrue reiri
por amiko komplezo neniam estas tro peza
se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas
se la kaliko tro pleniĝas, la vino elverŝiĝas
se sako tro pleniĝas, ĝi baldaŭ disŝiriĝas
tro akra fajro estas sen daŭro
tro alta postulo aĉetanton ne ŝarĝas
tro da bono ne turmentas
tro da enspezo ne estas tro da pezo
tro da konfido kondukas al perfido
tro da kuiristoj kaĉon difektas
tro da libero kondukas al mizero
tro da metioj, profitoj neniaj
tro elektema ricevas nenion
tro forta ĵuro - la afero ne pura
tro grandaj kalkuloj kondukas al nuloj
tro kara aranĝo por malkara tagmanĝo
tro longa atendo ĝis fino de l' vendo
tro longa sufero - malgranda espero
tro multe da salo malbonigas la manĝon
tro rapida akcelo ne kondukas al celo
tro rapida edziĝo - porĉiama kateniĝo
tro rapida faro estas nur baro
tro rapida laboro, tro malgranda valoro
tro rapida riĉiĝo diablon ĝojigas
tro saltas la rato - ĝin kaptas la kato
tro sata, tro bata
vivi modere, ne tro interne nek tro ekstere

**troa**
troa festeno estas veneno
troa petolo danĝera al kolo
troa petolo estas danĝera por la kolo

**trogranda**
malriĉigas ne nehavado, sed trogranda dezirado

**trompa**
aprila vetero - trompa aero

**trompi**
surmeto rompas, komparo trompas
ŝajno trompas

**trompo**
komenco aprila - trompo facila

**trono**
ne atingos krio ĝis la trono de Dio

**trovata**
nenie semata, ĉie trovata

**trovi**
ĉiu abomenaĵo trovas sian adoranton
eĉ blinda kokino povas trovi grajnon
faru hodiaŭ, kion vi povas - morgaŭ vi eble okazon ne trovos
kiu bati deziras, trovas bastonon
kiu kapon posedas, kombilon jam trovos
kiu mensogis per unu vorto, ne trovos kredon ĝis la morto
liveru nur panon, manĝontoj sin trovos
ne trovante bovinon, oni ŝtelas kokinon
por ŝafon formanĝi, lupo trovos pretekston
trovis malbonulo malbonulon pli grandan
unu kapo facile trovas apogon

**troviĝi**
eĉ ĉe kokino troviĝas propra inklino
eĉ kontraŭ pastra prediko troviĝas kritiko
eĉ por pomo putranta troviĝas amanto
eĉ sur la suno troviĝas makuloj
en ĉiu objekto troviĝas difekto
kiam filino edziniĝis, multaj fianĉoj troviĝis
kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas
kie lumo ekzistas, ankaŭ ombro troviĝas
lumo fariĝos, kulpulo troviĝos
troviĝas bonaj homoj en la mondo

**trovita**
la unua trovita

**truo**
ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo
en fremda tegmento li flikas truon kaj en propra ne vidas la fluon
li havas truon en la manplato
pri la ŝtrumpa truo scias nur la ŝuo
sakon kun truo vi neniam plenigos
se muso nur unu truon disponas, ĝi baldaŭ la vivon fordonas
truon de l' honoro flikos neniu tajloro

**tubero**
estas tubero en la afero

**tufo**
de malbona ŝafo estas bona eĉ tufo

**tuj**
la "tuj" de sinjoroj estas multe da horoj
malfeliĉo sin ne ĝenas, faru geston - ĝi tuj venas
pli valoras tuj ovo, ol poste bovo
tablon frapas tajloro, tuj tondilo eksonas

**tuko**
tablon ornamas ne tuko, sed kuko

**turmenti**
eĉ muŝo sentas, kiam vi ĝin turmentas
kiun malĝojo ne turmentis, tiu ĝojon ne sentas
la konscienco lin ne turmentas
nenio pli grandan mizeron prezentas, ol se sano mankas kaj ŝuldoj turmentas
se malsato turmentas, lupo timon ne sentas
tro da bono ne turmentas

**turni**
kien vi vin turnos, ĉie malbone
sin turni al la poŝo

**turniĝadi**
turniĝadi kiel serpento

**turo**
stari por iu kiel muro kaj turo

**tuso**
tuso kaj amo ne estas kaŝeblaj

**tuŝata**
ke la lup' estu sata, kaj la ŝaf' ne tuŝata

**tuŝi**
ĝi eĉ ne tuŝas lian orelon
ĝi tuŝas lin, kiel akvo anseron
kio min ne tuŝas, kuŝu kiel kuŝas
kio post la montoj kuŝas, tio nin neniom tuŝas
kiu lin tuŝas, tiu lin sentas
kontraŭ peko batalu, sed pekanton ne tuŝu
leĝo pasintaĵon ne tuŝas
lin tuŝas nek admono, nek ordono
min ne tuŝas la afero, mi staras ekstere
ne mia estas la ĉevalo, min ne tuŝas ĝia falo
superpinte - nur tuŝinte
vin ne tuŝu la eraroj en fremdaj faroj

**tuta**
donu fingron al avidulo, li tutan manon postulas
drinku tutajn tagojn, sed kontrolu viajn agojn
homo lernas la tutan vivon
kiu domaĝas groŝon, perdas la tutan poŝon
kontraŭ tuta kohorto eĉ Herkulo estas malforta
krii el la tuta gorĝo
kun sia tuta domo kaj havo
kun sia tuta posedo kaj heredo
la tuta ludo ne valoras kandelon
lavu tutan jaron, negro ne blankiĝos
malsaĝulo diris vorteron, saĝulo komprenas la tutan aferon
per paroloj li bruas, tutan urbon detruas
peto kaj demando kondukas tra l' tuta lando
pli kostas la sako, ol la tuta pako
se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo
se vi krudulon salutos, li vin tutan englutos
tuta jam sata, sed okulo malsatas
unu fava ŝafo tutan ŝafaron infektas
unu fojon oni donas kaj tutan vivon fanfaronas
unu ovo malbona tutan manĝon difektas
vi sekrete vorton diros, ĝi tra l' tuta mondo iros
virino scias - tuta mondo scias

**tute**
tute ĝuste laŭ lia gusto
tute libera, kiel birdo aera

**tuto**
sidas gasto minuton, sed vidas la tuton

**ungeto**
malgranda birdeto, sed akra ungeto

**ungo**
vizaĝo agrabla kaj ungo diabla

**unu**
de majesta ĝis ridinda estas nur unu paŝo
de unu bovo oni du felojn ne deŝiras
de unu bovo oni du felojn ne ŝiras
dek fojojn mezuru, unu fojon detranĉu
deko da pekoj, unu la puno
diablo ne ĉiam unu pordon sieĝas
du kontraŭ unu prezentas armeon
du manoj faras ĉion, sed unu nenion
du mortojn vi ne havos, de unu vi vin ne savos
du sinjoroj en unu bieno, du mastrinoj ĉe unu kameno - neniam vivas sen reciproka malbeno
edzo kaj edzino estas nur unu
eltrinki per unu tiro
en unu sako du katoj, ĉiam mordoj kaj gratoj
ili vivas per unu animo en du korpoj
kio al unu donas forton, al alia donas morton
kiu mensogis per unu vorto, ne trovos kredon ĝis la morto
ne el unu forno li manĝis jam panon
ne en unu tago elkreskis Kartago
ne taŭgas du ursoj por unu nesto
ne unu fajron li pasis, ne unu hundo lin ĉasis
ne unu hundo lin mordis, ne unu vento lin tordis
per unu ŝtono oni du ĵetojn ne faras
pli zorgas unu patrino pri dek infanoj, ol dek infanoj pri unu patrino
por unu - festeno, por alia - ĉagreno
se muso nur unu truon disponas, ĝi baldaŭ la vivon fordonas
se unu ne venis, dek ne atendas
sinjorino kaj sinjoro, unu alian valoras
stari per unu piedo en la tombo
tra unu orelo eniras, tra la dua eliras
trafi du celojn per unu ŝtono
unu amiko malnova pli valoras ol du novaj
unu fava ŝafo tutan ŝafaron infektas
unu floras, alia ploras
unu floro ne estas krono, unu monero ne estas mono
unu fojon oni donas kaj tutan vivon fanfaronas
unu fojon ŝtelis pomon kaj perdis por ĉiam honestan nomon
unu guto plenigas la glason
unu hako kverkon ne faligas
unu hirundo printempon ne alportas
unu kapo facile trovas apogon

unu malamiko pli difektas, ol cent amikoj protektas
unu orienten, alia okcidenten
unu ovo malbona tutan manĝon difektas
unu pasero alian valoras
unu saĝo estas bona, du estas pli bonaj
unu similas nulon, ne prezentas kalkulon
unu sola guto la glason plenigas
unu soldato militon ne faras
unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj
unu vundo alian kuracas
unu, du, tri, kvar, kaj finita la far'

**unua**
kiu aŭdis unuan, ankaŭ aŭdu la duan
la unua trovita
saltadi el unua al deka
sen speso unua ne ekzistas la dua
ŝuldo estas unua heredanto
unua atesto estas la vesto
unua paŝo iron direktas
unua venis, unua prenis

**unue**
kiu venis unue, muelas pli frue

**unueco**
unueco donas fortecon

**unufoje**
unufoje ŝtelinta restas ĉiam ŝtelisto

**urbeto**
neniu estas profeto en sia urbeto

**urbo**
alia urbo, alia moro
ĉiu klopodu nur en sia metio, tiam al la urbo mankos nenio
eĉ signo ne restis, kie urbo estis
li havas pli da ŝuldoj en la urbo, ol da haroj en la barbo
per paroloj li bruas, tutan urbon detruas
se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo
sen mono en urbon ne iru

**urĝi**
la afero ne urĝas

**ursa**
fari al iu ursan kareson

**urso**
antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon
kun urso promenu, sed pafilon prete tenu
li saltas gracie, kiel urso ebria
murmuregas la urso, sed danci ĝi devas
ne taŭgas du ursoj por unu nesto
urson al mielo oni ne tiras per orelo
urson evitu, duonpatrinon ne incitu

**urtiko**
urtikon frosto ne difektas

**utili**
ne ĉio utilas, kio brilas

**utilo**
fremda spesmilo estas sen utilo
pluvo en aprilo - por la tero utilo
post morto kuracilo jam estas sen utilo

**uzata**
ŝlosilo uzata ruston ne konas

**uzi**
por muŝon mortigi, oni pafilegon ne uzas
uzi monon kaj admonon kaj flaton kaj baton
uzu tempon estantan, antaŭvidu estontan, memoru estintan

**vagi**
ĉirkaŭ sanktuloj diabloj vagas

**vakso**
mola kiel vakso

**valizo**
pli valoras propra ĉemizo, ol fremda plena valizo

**valo**
se neĝas sur la monto, estas malvarme en la valo

**valoranto**
ne valoranto plaĉas, sed plaĉanto valoras

**valori**
bona gloro pli valoras ol oro
kio multe kostas, multe valoras
kion ni havas, por ni ne valoras, - kiam ni ĝin perdis, ni ploras
kiu groŝon ne honoras, eĉ duongroŝon ne valoras
kiu mem sin adoras, nenion valoras
kiu nenion valoras, plej multe sin gloras
kulo nenion valoras, sed ĝia piko doloras
la felo tanadon ne valoras
la ludo kandelon ne valoras
la tuta ludo ne valoras kandelon
leĝo valoras por poste, sed ne por antaŭe
montras parolo, kion cerbo valoras
ne valoranto plaĉas, sed plaĉanto valoras
ne valoras bofilo, kiam mortis filino
ne valoras la akiro eĉ la penon de l' deziro
ne valoras la faro la koston de l' preparo
pli valoras faro nenia, ol faro malbona
pli valoras interkonsento, ol juĝa dokumento
pli valoras konkorda ovo, ol malkonkorda bovo
pli valoras kontenta spirito, ol granda profito
pli valoras malgranda reganto, ol granda servanto
pli valoras paco malbona, ol malpaco plej bona
pli valoras propra ĉemizo, ol fremda plena valizo
pli valoras senlaboreco, ol sensenca laboremeco
pli valoras tuj ovo, ol poste bovo
pli valoras vinagro donacita, ol vino aĉetita
sinjorino kaj sinjoro, unu alian valoras
suferinto pli valoras, ol lerninto
unu amiko malnova pli valoras ol du novaj
unu pasero alian valoras
valoras ne la vesto, valoras la enesto

**valoro**
ambaŭ floroj de samaj valoroj
de sama koloro, de sama valoro
en malfacila horo eĉ groŝ' estas valoro
festotaga laboro estas sen valoro
kia estas via laboro, tia estas via valoro
oni batas la oron, por provi ĝian valoron
popola kutimo havas valoron de leĝo
promesita trezoro estas sen valoro
sub tero sklavo kaj sinjoro ne diferencas per valoro
temp' estas valoro simile al oro
tro rapida laboro, tro malgranda valoro
valoron de objekto ni ekkonas post difekto
virina ploro sen valoro

**vana**
kontraŭ forta mano la leĝo estas vana
lecionoj al profesoro estas vana laboro
por longa malsano kurac' estas vana
servo al Dio vana ne restas

**vane**
el malplena telero vane ĉerpas kulero
vane vi tentas, mi ne konsentos

**vango**
fari aplaŭdon sur la vangon
ne kaŝiĝas lia lango malantaŭ la vango
propran vangon neniu batas
sidu lango malantaŭ la vango

**vaporo**
havi iom da vaporo en la kapo
kuiriston vaporo satigas
malaperis kiel vaporo

**varma**
havi varman lokon

**varme**
ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme

**varmega**
forĝu feron dum ĝi estas varmega

**varmigi**
doto koron ne varmigas
riĉulo kiel fajro proksime bruligas, malproksime ne varmigas
vi varmigos serpenton, ĝi al vi enpikos la denton

**varmo**
el la sama buŝo li blovas varmon kaj malvarmon
sama buŝo blovas varmon kaj malvarmon

**varto**
per tro multa varto malboniĝas la farto

**vasta**
la parto plej vasta venos la lasta

**vaste**
kiu kaptas tro vaste, konservas malmulte

**vazo**
en fremdan vazon ne ŝovu la nazon
krevis la vazo antaŭ la nazo
ne ŝovu la nazon en fremdan vazon
ne ŝovu nazon en fremdan vazon
se elsaltas la okazo, ĝi rompiĝas kiel vazo
vazo rompita longe sin tenas

**ve**
ho ve!
kiu ne atentas la “se”, tiu sentas la “ve”

**veki**
ne veku malfeliĉon, kiam ĝi dormas
se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas
senplumigi kokinon, ne vekante mastrinon

**veko**
malfeliĉo kaj peko leviĝas sen veko

**velura**
ĉe vesto velura suferas stomako

**veluro**
difekton de naturo ne kovros veluro
sur la ventro veluro, en la ventro murmuro
vivi en silko kaj veluro, en ĝojo kaj plezuro

**vendi**
antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon
kiu ne mensogas, tiu ne vendas
sciencon oni ne mendas, klerecon oni ne vendas

**vendiĝi**
kio vendiĝas kaŝite, vendiĝas plej profite

**vendisto**
por vendisto mensogo estas necesa apogo
se vendisto ne mensogas, li aĉetanton ne allogas

**vendo**
sen mensoga rekomendo ne iros la vendo
tro longa atendo ĝis fino de l' vendo

**vendredo**
formanĝis en merkredo, ne serĉu en vendredo

**veneni**
donacon reprenu kaj mian vivon ne venenu

**venenita**
kuradi kiel venenita muso

**veneno**
fiŝo sen vino estas veneno
plena glaso da vino, sed kun guto da veneno
troa festeno estas veneno

**veni**
al kuko kaj kaso ĉiam venas amaso
al venko rajto venas, se ĝin forto subtenas
amaso da fianĉoj, sed la ĝusta ne venas
ankaŭ al nia nesto venos iam la festo
bona ideo venas post la pereo
ĉio taŭgas, kio venas
de semo putra venas frukto ne nutra
de senpripensa rekomendo venas ploro kaj plendo
de tro da pano venas malsano
diablo ŝercon ne komprenas, vokite li venas
dum la manĝado venas apetito
eĉ por plej terura tago venas vespero
estis la tempo, ni ne komprenis - pasis la tempo, la saĝ' al ni venis
feliĉo venas gute, malfeliĉo venas flue
fiereco venas antaŭ la falo
for konscienco, venos potenco
ĝis la edziĝo venos resaniĝo

kara estas ovo, kiam venas la Pasko
kio aliloke promenos, al ni ankaŭ ĝi venos
kio iras el koro, venas al koro
kio mem ne venas, li per la dentoj ĝin prenas
kiom ajn oni penas, per forto plaĉo ne venas
kion vi pripenas, tio al vi venas
kiu laboras kaj deziras, tiu akiras, - kiu mem ne penas, nenio al li venas
kiu pli frue venas, pli bonan lokon prenas
kiu pli frue venas, pli frue muelas
kiu speson ne tenas, tiu al spesmilo ne venas
kiu venas plej frue, sidas plej ĝue
kiu venis post la manĝo, restas sen manĝo
kiu venis unue, muelas pli frue
kiun feliĉo subtenas, al tiu mem ĉio venas
komenciĝis mizero, ĝi venas per pordo kaj fenestroj
la morto ŝercon ne komprenas: oni ĝin vokas, ĝi venas
la parto plej vasta venos la lasta
la tempo venos, ni ĉion komprenos
li atendas, ke la okazo venu al lia nazo
malfeliĉo malofte venas sole
malfeliĉo sin ne ĝenas, faru geston - ĝi tuj venas
malfeliĉo venas, malfeliĉon kuntrenas
malfeliĉo venas rajde, foriras piede
malfeliĉo venas sen alvoko
malfeliĉoj kaj batoj venas ĉiam kun fratoj
malsaĝulo venas, komercisto festenas
malsano venas rapide, foriras rigide
morgaŭ frue venos plue
multe da fianĉoj, sed la ĝusta ne venas
ne atendita, ne esperita ofte venas subite
ne ĉiam estas festo, venos ankaŭ fasto
ne moku mizeron de alia, ĉar baldaŭ venos via
ne venas honoro sen laboro
ne venas mont' al monto, sed homo homon renkontas
ne venos rato mem al la kato
neniam atendita ofte venas subite
nuksoj venis, kiam dentoj elfalis
ofte de kaŭzo senenhava venas efiko plej grava
oni invitas - venu, oni donacas - prenu
per bezono venas mono
per pacienco venas scienco
por ĉiu ago venas la tempo de pago
post domaĝo venas saĝo
post dorma trankvilo venas bona konsilo
post kolero venas favoro
post konfeso venas forgeso
post la fasto venas festo
post sufero venas prospero
se io venas al buŝo, buŝon ne fermu

se ne venas per bona vorto, oni prenas per forto
se unu ne venis, dek ne atendas
sen atendo, sen espero venis mizero
sen laboro ne venas oro
sonorado al li venas, sed de kie - li ne komprenas
tempo venos, zorgon prenos
unua venis, unua prenis
venas ĉagreno sen granda peno
venas kvazaŭ vokita kaj petita
venas profito - venas merito
venas proverbo el popola la cerbo
venas prudento post la ĝusta momento
venas rido post minaco, kaj paciĝo post malpaco
venis fino al mia latino
venis mizero, helpu min, frato - pasis mizero, for, malamato
venis tranĉilo al la gorĝo
venos ŝtelisto al la juĝisto
venos knabeto ankaŭ kun peto
venos tempo, venos konsilo

**venigi**
fremdlando objekton por speso donas, sed por ĝin venigi, oni spesmilon bezonas

**venkanto**
sukcesa venkanto de pordoj malfermitaj

**venki**
li neniam venkis la alfabeton
venkas ne forto, venkas la sorto

**venkito**
venkiton oni ne batas

**venko**
al venko rajto venas, se ĝin forto subtenas

**vento**
arbo krakanta venton ne timas
batadi la venton
eĉ plej bonan ŝipon malbonigas la ventoj
flugema kiel vento
hundo bojas la vojon, vento portas la bojon
kaptu lin kiel forflugintan venton
kiu semas venton, rikoltos fulmotondron
li serĉas la venton sur la kampo
minacas dento al la vento
nazo supren, vento antaŭen
ne maro dronigas ŝipon, sed la ventoj
ne sama la vento blovas konstante

ne unu hundo lin mordis, ne unu vento lin tordis
oni ne povas sin movi laŭ ĉiu vento aparte
paca silento, ke ne blovas eĉ vento
por ŝafo tondita Dio venton moderigas
post brua vento subita silento
ŝipon rompitan ĉiuj ventoj atakas
vento al li ekflugis sub la haŭto
vento sendita tondron reportos

**ventobatado**
ludi ventobatadon

**ventro**
okuloj estas pli grandaj ol la ventro
se lipo dikiĝas, ventro maldikiĝas
sur la ventro veluro, en la ventro murmuro
ventro malsata orelon ne havas

**vera**
li estas vera hidrargo
ne ĉiu raporto estas vera vorto
vera kiel vorto de profeto
vera opinio montriĝas en ebrio

**verdiĝi**
eĉ ŝtono verdiĝas, se ĝi longe ne moviĝas

**vere**
kion ni vere bezonas, Dio ĝin donas

**vergo**
vergo doloras, sed saĝon ellaboras

**verko**
koniĝas majstro laŭ sia verko
la fino kronas la verkon

**vermo**
ĉiu havas sian vermon

**vero**
amiko estas kara, sed vero pli kara
diri al iu nudan veron
diri la puran veron
eĉ el sub la tero aperas la vero
kiu diras la veron, havas suferon
kun vero severa komercaĵo forvelkos
la lumo por vero ofte estas danĝero
la tempo ĉiam malkaŝas la veron

malsaĝulo kaj infano parolas la veron
ne taŭgas la vero por komerca afero
tempo toleras, sed vero aperas
vero ne bezonas mediti nek spriti

**verŝi**
verŝi aeron al aero

**vespere**
kiu ĉion formanĝis en tago, malsatos vespere
laŭdu tagon nur vespere
rido matene - ploro vespere
vespere ĝuu lunon, sed ne serĉu la sunon

**vesperi**
matenas, vesperas - kaj tago malaperas

**vespero**
antaŭ vespero ne estu fiera
atingi la vesperon de sia vivo
eĉ por plej terura tago venas vespero
ne laŭdu la tagon antaŭ vespero
peli tagojn sen afero de mateno al vespero
vespero lacigas, mateno freŝigas

**vesto**
ĉe vesto velura suferas stomako
fremdan vundon kaŝas vesto
kia drapo, tia vesto
kiun vesto ornamas, tiun homoj ekamas
kontraŭ vesto malbona konspiras ĉiu ŝtono
luksa la vesto, sed malplena la poŝo
pli bona ĉifona vesto, ol riĉeco en malhonesto
unua atesto estas la vesto
valoras ne la vesto, valoras la enesto
vesto eluzita, sed pureco spirita
vesto homon prezentas

**vetero**
aprila vetero - trompa aero
atendi bonan veteron kaj laman kurieron
en trankvila vetero ĉiu remas sen danĝero
ne ĉiam daŭras malbona vetero, ne ĉiam daŭras homa sufero
post vetero malbela lumas suno plej hela

**veto**
per kio la veto?

**veturado**
kvina rado ĉe veturado

**veturi**
kiu bone ŝmiras, bone veturas
riĉulo veturas, malriĉulo kuras
veturi sur sia paro da kruroj

**vezike**
feliĉo vezike sin levas, sed baldaŭ falas kaj krevas

**viando**
ĝi estas nek viando, nek fiŝo
li havis viandon, mi havis nur oston - li havis la ĝuon, mi pagis la koston

**vico**
antaŭ ĉio zorgu oficon - plezuro atendos sian vicon
ekster via ofico estas ekster via vico
plenumita via ofico, nun pasis via vico!

**vidi**
aliajn gvidas kaj mem ne vidas
arbaro aŭdas, kampo vidas
ĉiu sin gvidas, kiel li vidas
elmeti la okulon kaj vidi nulon
esti en Romo kaj ne vidi la papon
en arbaro sidas kaj arbojn ne vidas
en arbaro sidis kaj arbojn ne vidis
en fremda okulo ni vidas ligneron, en nia ni trabon ne vidas
en fremda tegmento li flikas truon kaj en propra ne vidas la fluon
en infano vidiĝas, kia homo fariĝos
juĝanto decidas, kiel li vidas
kia oni vin vidas, tia oni vin taksas
kiel oni vin vidas, tiel oni vin taksas
kiu laboron evitas, bonon ne vidas
kiu sentas - ploras, kiu vidas - nur ridas
kiu vivos, tiu vidos
konfidu, sed vidu
li vidas nur ĝis la pinto de sia nazo
malproksime vidas, antaŭ la nazo ne vidas
mi flanke sidis, mi ne aŭdis nek vidis
mi hejme sidis, nenion vidis
neniu vidas, kio lin insidas
ni vidas, kiu ridas - kiu ploras, ni ne vidas
okulo avidas ĉion kion vidas
okulo ne vidis - pagu la sako
pro multo da arboj li arbaron ne vidas
propran ĝibon neniu vidas

ricevi grizan haron, ne vidinte altaron
se okulo ne vidas, koro ne avidas
se okulo ne vidis, pagas la poŝo
sidas gasto minuton, sed vidas la tuton
stomako ne estas spegulo, kion ĝi manĝis, ne vidas okulo
vidas okulo, sed mano ne trafas

**vido**
oni ekkonas bovon per la vido kaj malsaĝulon per lia rido
unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj

**vilaĝano**
per mono, ne per mano punu vilaĝanon
vilaĝano kreditas, vilaĝestro prunteprenas

**vilaĝo**
pli facile estas perdi vilaĝon, ol akiri domon
pli facile estas vilaĝon perdi, ol domon akiri

**vino**
bona vino al la fino
ĉesis esti vino, sed vinagro ne fariĝis
fiŝo sen vino estas veneno
fluidaĵo sen difino, nek vinagro nek vino
havi vinagron en la mieno
li ne elrampis ankoraŭ el la vindoj
plena glaso da vino, sed kun guto da veneno
pli allogas kulero da mielo, ol da vinagro barelo
pli valoras vinagro donacita, ol vino aĉetita
post dolĉa vino restas acida vinagro
se la kaliko tro pleniĝas, la vino elverŝiĝas

**vintro**
kio taŭgas por somero, ne taŭgas por vintro
li scias, kie la kankroj pasigas la vintron
ŝiru rozojn en somero, ĉar en vintro ili ne estos

**violono**
ne el ĉiu ligno oni faras violonon
se vi prenis la violonon, prenu ankaŭ la arĉon

**vipo**
aŭ kuseno sub ripo, aŭ bato per vipo
li eĉ el sablo vipojn tordas
oni batas per vipo, por ke sentu la ripo

**virina**
larmo virina baldaŭ sekiĝas
pli tiras virina haro, ol ĉevala paro
virina lango buĉas sen sango
virina ploro sen valoro
virina rideto pli kaptas ol reto

**virino**
kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas
kie regas virino, malbona estas la fino
la lango de virino estas ŝia glavo
malbona virino diablon superas
ne ekzistas savo kontraŭ malbona virino
rol' de virino - bona mastrino
virino batas per lango - aperas vundo plej sanga
virino bonorda estas muta kaj surda
virino eliĝis, kaleŝo senpeziĝis
virino havas haron longan kaj saĝon mallongan
virino kolera pli ol hundo danĝera
virino scias - tuta mondo scias
virta virino straton ne konas

**virta**
beleco logas, virto apogas
el la mizero oni devas fari virton
el la neceseco oni devas fari virton
pli bona estas virto sen oro, ol oro sen honoro
pli bona virto sen oro, ol oro sen honoro
por virta orelo ne danĝeras vorto malbela
virta virino straton ne konas
vizaĝo de Katono, sed virto de fripono

**vitro**
ĉion rigardi tra sia persona vitro
tra vitro de teruro pligrandiĝas la mezuro
vitro kaj feliĉo ne estas fortikaj

**vivanta**
mortinta serĉu ĉielon, vivanta ian celo

**vivanto**
ne mankas tombo por mortinto nek pano por vivanto
vivanton ni malhonoras, mortinton ni adoras

**vivi**
ĉiu vivas laŭ sia prudento kaj sento
du sinjoroj en unu bieno, du mastrinoj ĉe unu kameno - neniam vivas sen reciproka malbeno
geedzoj en paco vivas en reĝa palaco
ili vivas per unu animo en du korpoj
kiu agas afable, vivas agrable
kiu dormas longe, vivas mallonge
kiu vivas sen kalkulo, baldaŭ estos almozulo
kiu vivas trankvile, vivas facile
kiu vivos, tiu vidos
li vivas en ĝuo kaj bruo
li vivas sur la tero kiel en infero
metio lacigas, metio vivigas
ne vivu kiel vi volas, vivu kiel vi povas
ofte saĝulo vivas malriĉe kaj malsaĝulo feliĉe
oni vivas ne kun mono, sed kun persono
pastro vivas de preĝoj, advokato de leĝoj
senfortuloj longe vivas
vivi de estontaj enspezoj
vivi de ŝparita kaso
vivi emerite
vivi en silko kaj veluro, en ĝojo kaj plezuro
vivi iele-trapele
vivi inter forno hejtita kaj tablo kovrita
vivi kiel ĉe la brusto de Dio
vivi kiel kuko en butero
vivi kun iu en fido kaj konfido
vivi kun iu en intima amikeco
vivi kun iu kiel hundo kun kato
vivi larĝe kaj lukse
vivi laŭ postuloj de la ĝustaj kalkuloj
vivi modere, ne tro interne nek tro ekstere
vivi per sistemo de “el mano al buŝo”
vivi sate kaj glate
vivis puninde, mortis ridinde
vivu, progresu, sed lerni ne ĉesu
vivu mizere, sed vivu libere!
vivu stomako laŭ stato de l’ sako
zorgu vivon vian kaj lasu vivi alian

**vivo**
atingi la vesperon de sia vivo
de lia vivo aranĝo estas trinko kaj manĝo
donacon reprenu kaj mian vivon ne venenu
homo lernas la tutan vivon
hunda vivo
kia vivo, tia morto

la vivo staras sur la karto
nova stato - nova vivo
se muso nur unu truon disponas, ĝi baldaŭ la vivon fordonas
senpaga estas nur la morto, sed ĝi kostas la vivon
ŝuldo havas longan vivon
treni sian vivon de mizero al mizero
unu fojon oni donas kaj tutan vivon fanfaronas
vian vivon ĝuu, sed fremdan ne detruu
vivo glate ne fluas, ĉiam batas kaj skuas
vivo modera estas vivo sendanĝera
vivo sen modero kondukas al mizero
vivon privatan kaŝu la muroj
vivon travivi estas art' malfacila
zorgu vivon vian kaj lasu vivi alian

**vivulo**
elpeli iun el la mondo de la vivuloj

**vizaĝo**
bela per vizaĝo, sed ne bela per saĝo
bela vizaĝo estas duono da doto
bela vizaĝo, sed ne bela la saĝo
kio en koro sidas, la vizaĝo perfidas
kion koro portas, vizaĝo raportas
nur pano kun fromaĝo, sed afabla vizaĝo
oni akceptas laŭ vizaĝo, oni forlasas laŭ saĝo
oni batas ne la aĝon, sed la vizaĝon
se en kor' io sidas, vizaĝo perfidas
trafi per la parolo rekte en la vizaĝon
trafi per la vizaĝo en koton
vizaĝo agrabla kaj ungo diabla
vizaĝo de Katono, sed virto de fripono
vizaĝo sen kulpo, sed koro de vulpo

**vizito**
mizero faras viziton, ne atendante inviton

**voĉo**
havi la ĉefan voĉon
infanoj kaj fiŝoj voĉon ne havas

**voji**
hundo bojas, homo vojas
hundo bojas, pasanto vojas

**vojo**
hundo bojas la vojon, vento portas la bojon
ju pli malproksimen la vojo, des pli da larmoj
kiu ĉe l' vojo konstruas, tiun ĉiu instruas

mastro en vojo - servantoj en ĝojo
meti trabojn sur la vojon
pli bone estas reiri, ol perdi la vojon
por amiko intima ne ekzistas vojo malproksima
sola vojo libera al la fundo rivera
spesmilo vojon trabatas
vojon batitan herbo ne kovras

**voki**
la morto ŝercon ne komprenas, oni ĝin vokas, ĝi venas
ne voku diablon, ĉar li povas aperi
oni vokas la bovon ne festeni, sed treni
sonorilo vokas al preĝejo kaj mem neniam eniras

**vokita**
venas kvazaŭ vokita kaj petita

**vokite**
diablo ŝercon ne komprenas, vokite li venas

**vokito**
multaj vokitoj, sed ne multaj elektitoj

**volanta**
volanta kruro ne laciĝas de kuro

**volapukaĵo**
ĝi estas por mi volapukaĵo

**voli**
antaŭe kion vi devas, poste kion vi volas
birdo petolas, kiom ĝi volas
edzigu filon, kiam vi volas, edzinigu filinon, kiam vi povas
fiŝo volas naĝi
kion oni volas, tion oni povas
kiu ĉion senpripense parolas, aŭdos tion, kion li ne volas
kiu volas komerci, tiu saĝon bezonas
kiu volas mensogi, devas bone memori
kiu volas panon, ne dorlotu la manon
mensogu kiom vi volas, sed memoru kion vi parolas
mi ne volas baton, mi ne volas kompaton
mi ne volas tion ĉi scii
ne rapidu insulti, volu aŭskulti
ne vivu kiel vi volas, vivu kiel vi povas
ne volas kokin' al festeno, sed oni ĝin trenas perforte
ne volis rajdi sur ĉevalo, ekrajdis sur azeno
oni konsilas kaj konsolas, sed helpi ne volas
prenu kiel vi volas, la poto ĉiam bolas
se Dio ne volas, sanktulo ne helpos

se vi volas filinon, flatu la patrinon
voli aŭ ne voli neniu malpermesas
volus kato fiŝojn, sed la akvon ĝi timas

**volo**
de la volo la ordono pli efikas ol bastono
granda parolo, sed malgranda volo
kiom da koroj, tiom da voloj
kontraŭ volo de Dio helpos nenio
propra volo ordonon superas
volo kaj deziro leĝojn ne konas
volo kaj sento faras pli ol prudento

**volonte**
ju pli frue, des pli certe - ju pli volonte, des pli lerte
sata stomako ne lernas volonte

**vorta**
pro vorta ludo li eĉ patron ne domaĝas
pro vorta piko ofte perdiĝas amiko

**vortero**
malsaĝulo diris vorteron, saĝulo komprenas la tutan aferon

**vorto**
afabla vorto pli atingas ol forto
de bona vorto lango ne doloras
de vorto ĝentila ne doloras la lango
el kanto oni vortojn ne elĵetas
el la buŝ' multaj vortoj eliras, sed ne ĉiuj ion diras
estu sinjoro de via vorto
fidanta al vorto atendas ĝis morto
ĝi estas ankoraŭ vortoj de orakolo
ĝustatempa vorto estas granda forto
ju disputo pli forta, des pli multaj la vortoj
kiam vorto eliris, vi ĝin jam ne retiros
kiu mensogis per unu vorto, ne trovos kredon ĝis la morto
li vorton en la poŝo ne serĉas
ne ĉiu raporto estas vera vorto
ne rapidu kun vortoj, rapidu kun faroj
paroli per vortoj kovritaj
per vorto ĝentila ĉio estas facila
pli bona estas vorto afabla, ol kuko agrabla
por virta orelo ne danĝeras vorto malbela
pri dolĉa vorto ne fieru, maldolĉan ne koleru
rapide iras la vortoj, sed ne rapide la faroj
se ne venas per bona vorto, oni prenas per forto
sprita vorto tentas, nenion atentas
vera kiel vorto de profeto

vi sekrete vorton diros, ĝi tra l’ tuta mondo iros
vort’ en ĝusta momento faras pli ol arĝento
vorto dirita al la mondo apartenas kaj neniam revenas
vorto donita estas kiel leĝo
vorto sona estas plej admona
vortoj sakon ne plenigas
vortojn ŝparu, agojn faru
vundo pasas, vorto restas

**vosto**
ĉiu vulpo sian voston laŭdas
korniko vundita propran voston timas
okazon kaptu ĉe l’ kapo, ĉar la vosto estas glita

**vuali**
kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas

**vulpo**
ĉe vulpoj ĉiam naskiĝas nur vulpoj
ĉiu vulpo sian voston laŭdas
eĉ plej ruza vulpo en kaptilon falas
eĉ vulpo plej ruza fine estas kaptata
kiu lupo naskiĝis, vulpo ne fariĝos
ne ekzistas naiva vulpo, ne ekzistas homo sen kulpo
ricevos vulpo por sia kulpo
se vulpo pentofaras, gardu la kokidojn
vizaĝo sen kulpo, sed koro de vulpo
vulpo faras oferon - atendu danĝeron
vulpo mienon ŝanĝas, sed plue kokidojn manĝas

**vulturo**
kio konvenas al sciuro, ne konvenas al vulturo
kiu naskiĝis sciuro, ne fariĝos vulturo

**vunda**
piki al iu la vundan lokon
vundan lokon protektis, alian difektis

**vundi**
kiu batas edzinon, tiu vundas sin mem

**vundita**
korniko vundita propran voston timas

**vundo**
fremdan vundon kaŝas vesto
langa vundo plej profunda
mordantaj hundoj kuras ĉiam kun vundoj
saĝa estas la hundo post ricevo de l’ vundo

saĝa hundo post la vundo
sinjoroj sin batas, servantoj vundojn ricevas
unu vundo alian kuracas
virino batas per lango - aperas vundo plej sanga
vundo pasas, vorto restas
vundo sekreta doloras plej multe

**zorgi**
antaŭ ĉio zorgu oficon, plezuro atendos sian vicon
ĉiu besto zorgas pri sia nesto
faru vian aferon, Dio zorgos ceteron
kapo estas por tio, ke ĝi zorgu pri ĉio
li zorgas pri ĝi kiel pri neĝo pasintjara
ne zorgu pri tio, kio estas ekster via scio
pli zorgas unu patrino pri dek infanoj, ol dek infanoj pri unu patrino
riĉa zorgas pri ĉampano, malriĉa pri pano
se oni amas la gaston, oni zorgas la paston
zorgu pri vi, kaj nenion pli
zorgu vian metion kaj ne miksu vin en alian
zorgu vivon vian kaj lasu vivi alian

**zorgo**
ĉiu morgaŭ havas sian zorgon
de zorgoj, ne de jaroj, blankiĝas la haroj
granda ofico - grandaj zorgoj
malpli da havo, malpli da zorgoj
pli da mono, pli da zorgo
rusto manĝas la feron, kaj zorgo la homon
tempo venos, zorgon prenos